

**LA NOVA PARADIGMO  
EN PSIKOLOGIO**

***RUBEN  
FELDMAN GONZALEZ***

Cercle espérantiste de l'Agenais  
F 47340 Laroque Timbaut  
1985 \* 35 FF



SAT-BROŝURSERVO

# **LA NOVA PARADIGMO EN PSIKOLOGIO**

***RUBEN  
FELDMAN GONZALEZ***

**TRADUKIS :**  
NESTOR KALUSKY  
ANALIA ODETTO  
ALICIA TOFFI  
MONICA LUCERO  
(ROSARIA TRADUKRONDO DE ARGENTEJO)

**KONFERENCOJ KAJ DIALOGOJ  
EN UNIVERSITATOJ  
DE USONO, EŬROPO KAJ LATINAMERIKO**

**SAT-BROŝURSERVO**  
Cercle espérantiste de l'Agenais  
F 47340 Laroque Timbaut

En la sama serio :  
**Jiddu Krishnamurti** : Rimarki  
Eduko kaj vivsignifo  
Fronte al la vivo

La notoj de la aŭtoro - signitaj per simpla cifero - kaj la notoj de la tradukistoj - signitaj per interkrampaj ciferoj - troviĝas fine, ekde p. 257.

La eldoninto.

Gvidite de nova paradigmo, sciencistoj 1) ekuzas novajn instrumentojn kaj 2) enrigardas novajn lokojn.

Eĉ pli grave, dum revolucio, sciencistoj 3) vidas novajn kaj malsamajn aferojn, kiam ili enrigardas per kutimaj instrumentoj lokojn, kien ili jam enrigardis... Estas kvazaŭ la profesia komunumo estus subite transportita al alia planedo, kie kutimaj objektoj estas vidataj sub nova lumo kaj al ili aldoniĝas novaj neordinaraj objektoj...

Post revolucio, sciencistoj respondos al malsama mondo.

Thomas Kuhn

### **La strukturo de la sciencaj revolucioj.**

Teorio estas la plej simpla maniero ekspliki la plej grandan nombron da realaĵoj.

Paradigmo estas la plej simpla maniero kunligi la plej grandan nombron da teorioj.

La aŭtoro.

## ENKONDUKO

Kio estas la menso ?

Ĉu ĝi estas propreco emerĝanta de la interagado inter organismo kaj ĝia medio ? Aŭ ĉu ĝi estas reflektajo de la baza organizo de la universo ?

La ĵus okazintaj neŭrofiziologiaj progresoj (Karl Pribram), kiuj sankcias la funkciadon de la hologramo rilate la cerban agadon kaj la koncepton pri holokinetiko (David Bohm) en kvantumfiziko, ebligas al ni respondi jese ambaŭ demandojn.

Estis nia ripetita persona kontakto kun Jiddu Krishnamurti, post kiam ni enprofundiĝis en la konceptojn pri holografio kaj holokinetiko, kiu ebligis al ni formuli la koncepton pri unueca perceptado.

La unueca perceptado, kiu iugrade estas la integrita agado de la kvin sensoj, estas la ponto inter ambaŭ agoj de la menso :

- 1) La menso kiel duala propreco emerĝanta de la interrilito inter organismo kaj ĝia medio (kion ni nomas procezo META), kaj
- 2) La menso kiel reflektajo de la holokinetiko (kion ni nomas **karyon**<sup>1</sup> aŭ kerno).

Pri tio ĉi kaj ĝiaj gravegaj sekvoj en la esplorado, la praktiko kaj eĉ en la signifo mem de la psikologio, ni traktos en ĉi tiu libro.

# I

## LA UNUA PARADIGMO EN PSIKOLOGIO

En la historio de Psikologio, Sigmund Freud estis la unua, kiu klopodis por paradigma integriĝo inter la siatempaj Neŭrologio kaj Fiziko, kaj siaj observoj pri la homa konduto en si mem, siaj proksimuloj kaj siaj pacientoj. Ĉirkaŭ 1885, Freud sukcesis esti unu el la ĉefaj neŭrologoj en Vieno, post tio, ke li laboris kun Ernst Brücke kaj Theodor Meynert ; ĉi tiu lasta, esploristo de la cerba anatomio, postlasis sian nomon en la anatomio de la nerva sistemo, kiun ni ankoraŭ studas.

En 1933, en siaj **Novaj alportoj al la psikoanalizo** diris Freud rilate al sia psikoanalizo :

"Ĉar ĝi estas speciala scienco (...) ĝi estos tute neadekvata por disvolvi apartan koncepton pri Universo (Weltanschauung) kaj ĝi devos akcepti tiun de la scienco (...), ĉar la spirito kaj la animo estas objektoj de la scienca esplorado, ekzakte same kiel ĉiuj ajn aliaj aferoj eksteraj al la homo". (S. Freud, *Obras Completas*, II, Madrido, Biblioteca Nueva 1968, pĝ. 953-954).

Kurioze, antaŭ ol Freud skribis la supran paragrafon, William James diris :

"Nia unua konkludo, do, konsistas en tio, ke iu kvanto da cerba fiziologio (neŭrofiziologio) devas esti antaŭsupozita aŭ inkludita en Psikologion.

La psikologo estas devigata parte esti neŭrofiziologo". (W. James, *Principles of psychology*, Novjorko, Dover, 1890)

Sed io, kio eĉ pli rimarkinde rezultas, estas, ke Freud skribis (antaŭ aprilo 1895) iun **Projekton de Psikologio por neŭrologoj**, eĉ antaŭ ol lanĉi sian psikoanalizon.

Freud, pro iu kialo, neniam publikigis nek titolis sian projekton. Eble, la kialo estis, ke li mem komprenis, ke lia projekto estas tro avangarda por la epoko.

Robert C. Solomon diris, ke la projekto estis spekulativa, sed neniel senkoneksa kun evidenteco, aŭ nekonfirmebla.

La unuan seriozan studon de tiu ĉi projekto faris Karl H.

Pribram preskaŭ sepdek jarojn post kiam Freud skribis ĝin kaj ĝi aperis en la kompilaĵo de A.J. Bachrach, *Experimental Foundations of Clinical Psychology*, en la ĉapitro : "The neuropsychology of Sigmund Freud", Novjorko, Basic Books, 1962, pĝ. 442-468.

Evidente, la profundaj rimarkoj de Freud en klinika Psikologio ne povis esti kompletigitaj de la neŭrologiaj konoj de lia epoko kaj al ni diras Ernest Jones, en la biografio de Freud publikigita en 1953, ke Freud estis tiel disreviĝinta kaŭze de tia realaĵo, ke li eĉ intencis detrui sian **Projekto-n de Psikologio por neŭrologoj**.

Tiutempe nenion oni konis pri neŭrologiaj stimulado, kondukado kaj lokalizado, kaj do Freud serĉis en la Fiziko la manieron doni sciencan fundamenton al sia teorio.

Jam en 1895 Freud helpis sin per la kristalografio por ekspliki la kunfandiĝon de "subpremitaj histeriogenaj memoj", asertante ke tiu kunfandiĝo okazis ĉirkaŭ kerno.

Ni klarigu komence, ke en nia paradigmo ni uzas tiun saman vorton **kerno**, sed tute alisence.

En 1915 Freud parolas pri premoj kaj kontraŭpremoj inter konscio kaj nekonscio.

En 1923 li parolas per prihidraŭlika ĵargono, pri fluoj kaj blokado.

Dinamika Psikologio estas esprimo videble ĉerpita el Fiziko de lia epoko kaj ĝi estas preskaŭ sinonimo de psikoanalizo.

Ni kredas nenecese pliprofundiĝi en tiujn ĉi eksplikojn por montri la intencon de Freud integri la siatempajn Fizikon kaj Neŭrofiziologion kun sia psikologia paradigmo.

Ĉio ĉi, eĉ senkonsidere pri la influo, kiun sur Freud mem havis la sinteno kaj fiziologio de lia epoko, lia socia kondiĉo, kaj tiel plu.

## LA NOVA PARADIGMO EN PSIKOLOGIO

Dum la lastaj 50 jaroj, sen tro retroiri, kaj ĉiutage kun kreskanta rapideco, ege pliiĝis la konoj pri Neŭrofiziologio kaj Nuklea Fiziko ĝis la ekstremo, kie foje la absurdo miksiĝas kun la scienco.

La novaj fizikaj eltrovoj ne ĉesas influi sur la hodiaŭan Filozofion, kaj eĉ sur la manieron mem rigardi la vivon, la personojn, la aferojn, kaj la ideojn.

Nur Psikologio persistas en uzado de konceptoj karteziaj, neŭtonaj kaj hidraŭlikaj de la pasinta jarcento. Estas ĝuste tiu Psikologio, kiu bezonas integriĝi al la nuntempa scienca movado, kiel provis fari Sigmund Freud mem

kun Neŭrofiziologio kaj Fiziko, kaj integriĝi nun, unue, al Nuklea Fiziko.

Kompreneblas, ke teorio estas nur maniero rigardi la mondon, sed ne maniero scii kiel vere la mondo estas.

D-ro David Bohm estas profesoro pri Nuklea Fiziko en la Birbeck College de la Universitato de Londono. Li publikigis en 1951, **Quantum theory** ; en 1957, **Causality and Chance in Modern Physics** ; en 1966, **Special Theory of Relativity** ; en 1973, **Foundations of Physics** ; en 1977, **Fragmentation and Wholeness**, kaj en 1980, **Wholeness and the Implicate Order**.

Diras al ni Bohm, en sia libro **Fragmentation and Wholeness** : "Oni trovas, ke malnovaj teorioj iĝas pli kaj pli neklaraj, kiam oni provas uzi ilin por akiri komprenon en novaj kampoj. Tiel okazis kun la epicikloj(2) de Ptolemeo kaj kun la neŭtonaj konceptoj nelonge antaŭ la alveno de la relativeco kaj la Kvantumfiziko.

Zorga priatento pri la maniero, kiel tio okazas, estas ĝenerale la ĉefa ŝlosilo de novaj teorioj, kiuj estas la bazo por novaj kaj pli ampleksaj komprenmanieroj.

Tiel, anstataŭ diri, ke la malnovaj teorioj estas falsaj iu-momente, ni diras, ke la homo senĉese disvolvas novajn komprenmanierojn (insight)(3), kiuj estas klaraj ĝis difinita limo kaj poste montras tendencon malklariĝi.

En tiu ĉi agado ne ekzistas kialo por supozi, ke estas aŭ estos fina komprenmaniero aŭ insight (respondanta al la absoluta vero) aŭ eĉ konstanta serio de proksimiĝo al ĉi tiu.

Pli ĝuste, ni povas atendi senfinan disvolviĝon de novaj specoj de insight aŭ manieroj de kompreno, kiuj ĉiam asimilas difinitajn ŝlosilajn trajtojn de la malnovaj formoj kiel simpligojn, same kiel la teorio pri relativeco faras rilate la teorion de Newton.

Tio signifas, ke oni devas konsideri niajn teoriojn kiel kosmovidojn (ĝeneralajn manierojn rigardi la mondon aŭ la universon), sed ne kiel absolutajn verojn, kiuj scias kiel vere la mondo estas.

La atingita kono de la faktoj estas kondiĉita aŭ muldita de niaj teorioj. Ekzemple, en la Antikveco, la movon de la planedoj oni priskribis laŭ la ideo pri la epicikloj de Ptolemeo (cirkloj sur cirkloj). En la epoko de Newton oni priskribis tiun movon kiel planedajn orbitojn, analizitajn laŭ indicoj de falo al pluraj centroj.

Poste alvenis Einstein kun sia relativeca vidado laŭ siaj konceptoj pri spaco kaj tempo. Eĉ pli poste, la kvantum-



teorio specifis tre malsaman klason de realo (kiu ĝenerale alportas nur statistikan realon).

En Biologio oni parolas pri evoluo, sed antaŭe oni parolis pri la vivantaj estaĵoj, kiel fiksjaj specoj.

Pli ĝenerale, do, sur la perceptado kaj la agado, niaj teoriaj komprenmanieroj aŭ insights alportas la ĉefan originon de organiziĝo de nia fakta kono. Fakte, nia tuta sperto alĝustigas ĉi tiel.

Verŝajne estis Kant la unua, kiu diris, ke ĉiu sperto estas organizita laŭ la kategorioj de nia penso, tio estas, laŭ nia maniero pensi pri la tempo, la spaco, la materio, la substanco, la kaŭzeco, la kontingenco, la neceso, la deziro, la universaleco, la partikulareco, ktp... Oni povas aserti, ke tiuj ĉi kategorioj estas specialaj manieroj de insights aŭ manieroj rigardi la tuton. Iasence, ili estas klaso de teorio, sed kompreneble tiu ĉi nivelo de teorio eble disvolviĝis tre frue."

## DIFERENCOJ INTER AMBAŬ

La nova psikologia paradigmo ne venas detrui la antaŭan, nek la multajn branĉojn devenigitajn de tiu antaŭa. Temas pri tute nova ordo de abstraktado en Psikologio, kaj alproksimiĝo al la integriĝo de Psikologio kun la nuntempaj Neŭrofiziologio kaj Fiziko.

La nova paradigmo implicas reorganizadon de malnovaj konceptoj. Ĝi forigas la emfazon sur la nekonscio kaj, baziĝante sur la moderna Neŭrofiziologio, lokas la ne-neigeblan nekonscion en unuecan mensan procezon, kiu nomiĝas mnemonika-eidetika(4)-timika(5)-aŭtonomika(6) (META) procezo. Tiu ĉi unueca procezo (META) estas la esenco de la identeco (egoo aŭ mio) kaj oni povas, laŭ simpliga maniero, egaligi ĝin al la vorto penso.

Ekzistas du ĉefaj pensotipoj (negativa kaj pozitiva), sed la origino de ilia dinamiko estas en la dualeco kaj la kontraŭstaro. Oni devas diferencigi tion ĉi disde la funkcieco aŭ nefunkcieco de la penso (vidu poste). Ni redifinas la inteligentecon ; kaj parto de tiu inteligenteco estas la kapablo diferencigi la funkciecan penson disde la nefunkcieca kaj determini, kiam tiu ĉi lasta devas devenigi la unuecan perceptadon aŭ triangulan konscion.

Oni necese redifinas la vorton "menso" (vd. poste).

La nova emfazo lokiĝas en tio nomata unueca perceptado, kiu estas la konscia kaj nekonscia integriĝo de la kvin-sensa agado, precipe tiu de la vidado kaj la aŭdado.

La koncepto pri unueca perceptado implicas bazan insight'n: la homo (eĉ ne alvenante en psikozon) vivas ĝenerale en malsamaj gradoj de diskonekso kun la ĉiutaga realo. Tiu ĉi diskonekso okazas tiom rilate lian internan realon, kiom la tiel nomitan "eksteran" realon. Oni komencas do, ne antaŭsupozante, ke la homo nomita "normala" kontaktiĝas kun la realo. De tiu ĉi insight devenas la neceso relerni percepti kaj do, pensi, sperti kaj vivi novmaniere.

Tio estas la bazo de neeviteble nova psikoterapio. En tiu ĉi psikoterapio, metodoj kaj teknikoj estas duagradaĵaj ceremoniaroj. La unuagrada aspekto estas la resonado aŭ la kunligo, afableco sen korinklino, kiu estas fonto de mensa sano. Por ŝajne kompliki la aferon, bedaŭrinde, tio ĉi ne estas ĉio.

La nova paradigmo enkondukas tute novan koncepton en Psikologion: la koncepton pri karyon aŭ kerno.

S. Freud, malgraŭ sia nediskutebla genio, ne povis, eĉ reveni pri tia koncepto, ĉar estis nenio en la siatempaj Neurofiziologio aŭ Fiziko, kiu povus subteni ĝin. Ni jam diris, ke Freud uzis la vorton "kerno", sed alisence.

Parto de la inteligenteco estas lerteco distingi inter memoro, unuflanke, kaj unueca aŭ kerna perceptado aliflanke. Tiu ĉi inteligenteco faciligas la kapabligan senkondiĉadon de la menso en la ago de unueca perceptado kaj tiu ĉi senkondiĉado estas, siafoje, la nura kunligebleco aŭ reala kontakto inter la homoj: la unueca rilato.

Ni povus ekkompreni tion, kio estas la kerno aŭ karyon, dirante simplamaniere, ke ĉiu sensa stimulo povas sekvi almenaŭ du vojojn:

1) Registrado en la procezo META;

2) Restarigo de la kosma holokinetiko en la menso, komencante per la kunligo (unueca perceptado) inter la observanto kaj la observataĵo. Temas pri kontakto kun mensa kaj kosma ordo latentaj (fizika ordo matematike konkludebla), kiu estas fonto de energio (vd. ĉap. V.)

"Topografie", la kerno estas mensa spaco sen la centro de la "mio" aŭ mnemonika ento. "Dinamike" (akceptante la esprimon, elprenitan el la unua paradigmo), la karyon aŭ kerno interrespondas kun la metanoja stato.

Metanojo(7) estas malnova grekdevena vorto uzita de la unuaj kristanaj verkistoj, kiu estis malbonege tradukita kiel "pento" (kaj kiu laŭvorte signifas "denove senti malĝojon"), sed ĝi vere signifas "trans la penso aŭ la kono".

Ni dirus : "trans META", tio estas, trans la memoro, la ideo, la idoloj kaj la ideologioj, la emocio, kaj la visceraj kaj glandaj reagoj.

Tio ĉi implicas malsaman modalon de konscio, kiun ni nomas "cirkla konscio". Ni dubas, ĉu nomi ĝin "senhava konscio", ĉar estas tie, kie produktiĝas la "restarigo" de la baza ordo implicita de la realo, kio estas la vera kontakto kun ĝi. Estas pli bone diri, ke ĝi estas konsciformo sen mnemonika enhavo.

Eble, la plej bona maniero difini la psikologian kernon estas resti silente.

## SKEMA PREZENTADO DE LA MENSMODELO

Mi helpas min per tiu formo de prezentado (paĝo 11), ĉar kvankam mi ne emas uzi skemojn, ekzistas io tre grava por kompreni ; kaj estas pli bone kompreni ĝin plurmaniere, ol tute ne kompreni ĝin.

1) Perceptado. Ĉe la supra maldekstra ekstremo, oni prezentas la kvin sensojn, ligitajn per du perpendiklaj linioj T-forme kun :

- a) la procezo META ĉe la supra dekstra loko (siafoje dividita laŭ pozitivo kaj negativo), kaj
- b) la kerno ĉe la malsupra loko.

La linioj T-formaj prezentas la unuecan perceptadon, kiu ne dependas de la objekto (maldekstre en la skemo) nek de la bildo (en la procezo META). La unueca perceptado integrigas la agadon de la kvin sensoj.

2) Inteligenteco. Tiu ĉi unueca perceptado estas parto de la inteligenteco (punktlinia triangulo) aŭ estas "senkatenigita" far la inteligenteco. La "verticoj" de la inteligenteco tuŝas siajn tri bazajn elementojn :

- a) perceptado,
- b) penso (precipe la negativa, nereakta, esplora), kaj
- c) kerna stato.


La unueca perceptado konsistas el vektoro en sia dekstra eskremo, kio implicas, ke ĝi kontaktiĝas kun la penso (META), sed la movo kontraŭdirekten ne estas ebla, tio estas, la penso (aŭ procezo META) ne kontaktiĝas kun la perceptado, sed male, interferas ĝin.

3) Penso. La penso aŭ procezo META estas dividita vertikale laŭ pozitivo (dekstre) kaj negativo (maldekstre).

La pozitiva penso havas larĝan malsupran regionon (ombrumitan), kiu estas la nekonscio, pro tio, ke ĝi estas aktiva kaj rekta. Ĉar ĝi estas aktiva kaj rekta, estas multo kion oni rezignas vidi ; kaj tio ĉi, kion oni rezignas vidi, estas la nekonscio, kiu siafoje moviĝas laŭ sia propra dinamismo, siaj propraj principoj, ktp., kiel Freud kaj liaj sekvantoj majstre priskribis (foresto de kronologio, kondensado, simbolismo, principo pri plezuro : "unuagrada procezo").

Pas.Esp. Akt. Difin.

(-) (+)



1. sensa perceptado
2. inteligenteco kaj unueca perceptado
3. procezo META (mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika)
4. karyon aŭ kerno
5. nerva sistemo

Ekzemplo de pozitiva penso. "La amo estas doni kaj deziri bonon por la aliulo" (aktiva kaj rekta difino, tre vundebla al la distordoj truditaj de la esencaj karakteroj de la procezo META, kiuj estas la celo, la fragmentado kaj la kontraŭstaro).

Ekzemplo de distordo de la pozitiva penso : "tial, ke mi deziras la bonon por la homaro, mi devas ekstermi tiun grupon (la negroj, ekzemple) por tio, ke ili ne malpurigu ĝin).

Ekzemplo de negativa penso . "La amo ne estas egoismo,

ne estas reteno, ne estas deziro kaj ankaŭ ne estas manko de deziro ; la amo ne estas vorto, ne estas bildo, ne estas formulo, ne estas memoro". Tiu ĉi pensformo estas pasiva, nereakta kaj esplora, sed esploro, kiu ne atendas respondon sed restas sub rekta kontakto kun la demando. Elde tiu rekta kontakto kun la demando, kun la sinteno pasiva aŭ nereakta aŭ negativa de esplorado, povas aperi la inteligenteco, kiu disigu la bildon disde la pura aŭ kerna perceptado. Ekzemple : "Kio estas tio, kiu la amo ne estas ? Kio estas koni sin ? Ĉu estas en tiu ĉi kunigo, rilato inter ni aŭ nur intelekta pridiskuto kiel tiom multaj aliaj ? Ĉu estas malveroj en la veroj kaj veroj en la malveroj ?".

Dekstrekstreme de la penso, oni vidas la aparaton de la mio, kiu estas iluzio, foje utila, sed plejfoje senutila kaŭze de sia intenca (koruptita) ago, prezentita per spirala linio.

4) La kerno, kiu estas la nura motivo de nia studado, la fonto de la regenerado, de la sano, de iu apartenanta al ĉio (diference de la mio, kiu estas iu izolita de la ĉio).

Dekstre de la kerno, en la skemo, oni prezentas la spontanegan, inteligentan kaj integran agon de la homaro. Estas en ĝi unu ne mnemonika-eidetika konsciformo. La kerno ne estas prezentita laŭskeme, ĉar ĝi estas sencentra spaco (la mio ne intervenas tie) kaj la fakto, ke ĝi estas cirklo, rolas nur estetike en la skemo.

La kerno estas ankaŭ pura aŭ rekta perceptado kaj rilatas al la inteligenteco.

5) La centra nerva sistemo. La malsupra parto de la skemo prezentas la substraton anatomian (neŭronon) kaj molekulan de la centra nerva sistemo, kies integrigita agado estas tio, kion ni nomas menso. Tio ĉi estas tio, kion oni povas transformi ekde tio nemanifestiganta el la kosmo en ni mem, kiu estas la kerno, kiam la procezo META restadas trankvile, kiel okazas en ĉiu rekta aŭ unueca perceptado kaj dum la sensorĝa dormo.

**Konscio (rimarkado) = 2=**

1) kerna agado, ne intenca aŭ pura aŭ sentempa.

2) reala agado (res = afero), intenca, malpurigita aŭ distordita far la tempo, pasinta - venonta.

Du agoj kaj du konscioj (kaj du vortoj). Ne ĉiu stimulo estas konscia psika fenomeno (aŭ "funkcia" ĉe la kerna Psikologio).

## REDIFINO DE "MENSO"

1) Ni redifinas la vorton menso kiel la integriĝo de la nerva sistemo (centra kaj periferia, memvola kaj nevola) ekde la cerbo ĝis la mjela konuso.

2) Tiun integriĝon oni povas fari je malsamaj niveloj. Vidu poste "La menso kiel kontinuum" (paĝo 40).

3) Kiam ni parolas pri integriĝo de la agado de la tuta nerva sistemo, ni nepre devas diri, ke ĉiu organisma ĉelo, sendepende de kie ĝi lokiga, estas parto de la homa menso, laŭ nia difino.

## MENSO, CERBO KAJ KORPO

Tuta branĉo de la Medicino nomita (honorante la akutan Kartezian dualismon) "psikofiziologia Medicino", studis la rilatojn, ankoraŭ ne tute klarajn, inter la menso (malnova difino), la cerbo kaj la korpo. La distordo dualeca ne estis la unika problemo en tiu ĉi giganta entrepreno.

La lingvo uzata en interna Medicino kaj Neurologio ne povas adaptiĝi al la lingvo uzata en Psikiatrio. Ĝiaj metodoj kaj instrumentoj estas tute malsimilaj.

La psikofiziologia Medicino uzis dekomence la unikan seriozan psikologian paradigmon, pri kiu ĝi disponis (1940-jardeko) : la Freudan paradigmon.

Flanders Dunbar en Novjorko intencis fari komparstudon inter "karakteroj de personeco" kaj specifaj problemoj "psikofiziologiaj" (astmo, artrito, arteria hipertensio, stomak-intestaj ulceroj, ktp.).

Poste, Frank Alexander per sia "triparta modelo" parolis pri faktoro X aŭ konstituanta, kiu entenis ambaŭ, tion genetikan (kromosoman) kaj tion epigenetikan (aŭ programojn kaj "argumentojn" ekzistadajn naskitajn dum la post-naskiĝa disvolvo de la memoro). La lastaj eltrovoj, tiom genetikaj kiom epigenetikaj, ne permesas subteni tian ĉi pseudosintezon.

Pli postaj laboroj far Grinker, Deutsch, Garma, Sperling, Kubie, ne priatentis la molekularajn faktorojn, kiuj nuntempe iĝis gravegaj en Psikiatrio.

La serĉado de etiologia specifeco pli-malpli absoluta igis malgrava la kontribuon de sciencistoj kiel Hans Selye, kiuj parolis pri nespecifaj, nehumoraj reagoj al streso ĝenerale (malvarmo, laciĝo, radiado, infektiĝo, toksigi, traumato, brulaj vundoj, ktp.).

La sociekonomiaj faktoroj pruviĝis gravaj en difinitaj

problemoj, nome skizofrenio, tuberkulozo, mensa malavantaĝo, ekzemple.

Estis granda ŝoko por multaj neŭropsikiatroj kaj psikofiziologoj rimarki, ke malsato kaj subnutrado okazigis multe pli grandan nombron da mensaj malavantaĝuloj ol tiuj okazigitaj de la "malbonaj kromosomoj".

Malsanoj, kiujn antaŭe oni konis kiel nosologie(8) unikajn entojn, iĝis heterogenaj sindromoj, kiel ekzemple la arteria hipertensio, la skizofrenio, la artrito, la hipertiroidismo, por mencii nur kelkajn.

Alia ĵusaperinta surprizo estis akcepti, ke la cerbo povas esti la celtabulo de nocivaj substancoj kaj estis necese komenci paroli science serioze pri specifaj psikofiziologiaj faktoroj.

La libroj **La neŭrobiologio de la malsano** (Elsevier), de H. Weiner ; **Neŭrologio de la konduto**, (Oxford Univ. Press), de Jonathan Pincus ; kaj **Psikoendokrinologio**, de Sacha, reflektas pensmanieron pli kaj pli unuecan. Ĉiuj ĉi verkoj aperis inter 1977 kaj 1979.

**Biofeedback**, de G. Fuller (Biofeedback Institute of S. Francisco, 1977) estas bona resumo de disciplino, kiu pretendas kondiĉi la aŭtonomikan funkciadon ĝis eventuale atingi la regadon de la indeco je urinproduktado, de la sanga haŭta fluo, de la gastrointesta moveco, la kora ritmo, la arteria tensio, ktp.

## LA MEMORO : KVAR GRANDAJ SKOLOJ

	1	2	3	4
A	Freud	Ne stimulo	Nekonscia memoro	Defendoj.
B	Pavlov	Kondiĉ. Stimulo Senkond.	Nekonscia memoro	Reflekso aŭ respondanta konduto
C	Skinner	Ne stimulo	Konscia memoro	Konduto aganta, kontrolita per siaj konsekvencoj
Ĉ	Kario- psiko- logio	Stimulo	Ne memoro Percepti unuece	Spontanea konduto. Ne memoro. Ne konsekvenco

Ni havas tie ĉi skemon konsistantan el kvar horizontalaj vicoj (ABCĈ) kaj kvar vertikalaj vicoj (1234).

Ni povas preni kiel centran koncepton, tiun de la vertikala vico 3 : la memoro-n.

La memoro (tio estas, la sola aĵo, kiun la homo konas) verŝajne estas la ĉefa peranto inter la stimulo (vertikala vico 2) kaj la konduta reago, aŭ ago (vertikala vico 4).

Nu, ni komparu simple kaj rapide, kion ni diras en la nova psikologia paradigmo rilate la memoron, kaj kion diris almenaŭ tri gravaj pensantoj de nia jarcento : Freud, Pavlov kaj Skinner.

**A)** Kiel ni scias, Freud emfazas la gravecon de la "nekonscio". La nekonscio estas ne pli ol tiu parto de la memoro, kiu estas neatingebla vole far la individuo en la ĉiutaga vivo. Al tiu "nekonscia mondo" apartenas la instinktoj. Freud konsideras, ke la konduto havas unu celon kaj, ke la instinktoj estas io - pli-malpli - kiel konduta unuo, aŭ kondutoj, kiuj ne povas esti simpligitaj aŭ reduktitaj sen perdi sian econ de "konduto". Freud asertas, ke plej grandan tempoparton ni restas nekonsciaj pri la celo de niaj agoj. Tiu ĉi nekonscio ne povus ekzisti, se ne estus danke al "subprema forto" (kaj subpremo kaj defendo estas preskaŭ sinonimoj).

Subteni nekonscia la celon de la instinktoj (simplaj kondutoj) estas do la celoj de la defendoj (negacio, projekcio, disocio, konvertado, reakcia formado, delokado, identigado, ktp.). La funkcio de la defendoj estas redukti la tension aŭ maltrankvilecon produktitajn de la instinktoj, kiam ili perforteniras en la konscion, kiu estas kondiĉita de la eduko, por subteni la "civilizacion" funkciantan.

**B)** Pavlov emfazas la gravecon de la stimulo (vertikala vico 2). La klasika ekzemplo estas tiu pri la hundo, kiu sekrecias salivon antaŭ senkondiĉa stimulo, nome la manĝaĵo, kaj kiu povas salivi ankaŭ kunigante tiun stimulon kun alia kondiĉa (ekzemple sonoril-sono). Kiam la dua stimulo (sonorilsono) estas fiksita en la memoro kune kun tiu, kiu produktas salivadon (manĝaĵo), la hundo salivos poste antaŭ la nova kondiĉa stimulo (la sonorilsono). La salivado estos la nomita reflekso aŭ reaganta konduto. Esence, ĉi tie funkcias tipo de nekonscia memoro, kiun Pavlov tute ne emfazas.

**C)** Skinner emfazas la gravecon de la vico 4 de nia skemo.



La konduto, li diras prave, povas esti regata per siaj konsekvencoj. Infano ploras en la magazeno, ĉar li deziras ĉokoladon. Se lia patrino, kiu akompanas lin, aĉetas la ĉokoladon, ŝi klare fortigas la konduton de la infano : plori por ĉokolado. Se lia patrino malatentas la ploron kaj la peton aŭ se ŝi punas lin, ŝi fakte inhibicios tiun konduton.

Unuakaze, la konsekvenco de plorado estis premio : oni plifortigas la konduton. Tiu infano ploros, celante atingi ĉokoladon ĉiufoje, kiam li eniros kun sia patrino en magazenen.

Duakaze, la konsekvenco de plorado estis malatento aŭ puno. Se tiu reago estas firma, la infano ne plu ploros celante ĉokoladon.

Per serio de teknikoj devenigitaj esence de la antaŭa ekzemplo, eblas, en principo, regi (per ĝiaj konsekvencoj) ĉiun ajn kondutotipon en la homo.

C) En Kariopsikologio (la nova paradigmo) ni diras, ke kiam ekzistas serena perceptado de la realoj ; perceptado, kiu ne dependas de la objekto aŭ stimulo, nek de la mnemonika bildo (konscia aŭ nekonscia) de tiu stimulo ; kiam ekzistas klara perceptado kie estas plej grave vidi kaj aŭdi (pli grave ol tio, kion ni vidas aŭ aŭdas, aŭ memoras), okazas iu sensa sintezo, kiun ni nomas unueca perceptado, kaj kiu estas intime rilatanta kun ĉiu spontanea konduto. Tiu konduto ne baziĝas sur bildoj, ideoj, memoro, planoj, nek sur la konsekvencoj de si mem.

Tio ĉi eventuale (kiel ni vidas en venontaj klarigoj) povas kaŭzi iun mensan staton neniam konsideritan en Psikologio, kiu iel estas ankaŭ speciala stato de konscio, kaj kiun ni nomas karyon, nur por tio, ke ni povu iel nomi ĝin. Kiel al ni sugestas la nuntempa Fiziko, la karyon estas la baza subordo ekde kiu disvolviĝas ĉiu mensa ordo. Bedaŭrinde, tiu stato de unueca perceptado ne estas stimulata de nia kulturo, kiu pleje emfazas la memoran aktivecon (ambaŭ, konscian kaj nekonscian). La Kariopsikologio ne nur emfazas la valoron de tiu unueca perceptado en la ĉiutaga vivo de la homo, sed ankaŭ studas la ŝlosilojn por ĝia disvolviĝo. Baziĝante sur tiu sama unueca perceptado en ĝia plej ampleksa senco, la Kariopsikologio montras al ni novan direkton en Psikologio kaj, plej grave, donas al la Psikologio mem, novan ĝeneralan signifon.

## II

### LA PROCEZO META

Kiam ni parolas pri procezoj, okazaĵoj, fenomenoj aŭ psikologiaj spertoj, ni ne povas preterlasi senuze serion da vortoj uzataj malsammaniere far pluraj aŭtoroj, kaj foje, eĉ far la sama aŭtoro en malsamaj kunteksto. La plej memvideblaj ekzemploj de facilanima uzado de la pripsikologia terminologio estas la vortoj : menso, inteligenteco, perceptado, emocio, afekcio, penso ; sen konsideri tiujn, kiuj apartenas al idiosinkraziaj ĵargonoj de malsamaj "skoloj".

Nepre necese, nova maniero rigardi la aferojn implicas, ĉu la uzadon de alia lingvo, ĉu la saman lingvon uzitan alimaniere.

Ni diras (inter aliaj aferoj, kiujn ni jam supraĵe menciis), ke la memoro, la ideo, la emocio, kaj la okazaĵoj regitaj de la aŭtonoma nerva sistemo, estas fenomenoj apartenantaj al sama mensa procezo (laŭ nia difino de la vorto menso), kaj tiun unuecan procezon ni nomas per la komenc-literoj M.E.T.A.

META devenas de la sekvantaj kvar vortoj :

Mnemonika : de la memoro : vidu poste mermeros.

Eidetika : grekdevena vorto rilatigita al niaj vortoj "ideo", "ideologio", "idolo" kaj eĉ "imago".

Timika : la greka vorto timos signifas "emocio" aŭ "inklino". La vorto "timo" rilatiĝas kun timos, sed timos havas origine pli ĝeneralan sencon (emocio ĝeneralsence). Ĉiunaniere, timo precipe estas fundamenta emocio kaj neevitebla parto de la funkciado de la procezo META.

Aŭtonomika : Ni konscias pri la anglismo "aŭtonomika" rilate al funkciado de la aŭtonoma nerva sistemo, sed ni uzas ĝin por ĝin distingi disde la freŭda koncepto de "aŭtonoma" funkcio de la mio.

Resume : ni diras, ke la memoro, la ideo, la idolo, la ideologio, ĉiu bildo, ĉiu emocio (timo unuavice kaj la viscera funkciado kunligita al la nervaj sistemoj simpata kaj parasimpata, estas partoj el unueca procezo en la homa menso.

Celante simpligi la parolon, ni nomos "penso" tiun ĉi unuecan mensan procezon, kiun ni nomas ankaŭ META. Mnemonos greklingve signifas "memoro", sed "mermeros" (greke : "malkvieteco") estas vorto, kiu devenigas la hispanan vorton "memoria"(9).

Originoj de la problemo (memoro kontraŭ perceptado) = filogeneza memoro.

La ĵusnaskito malbone perceptas, sed tamen ĝi kapablas subteni bonan organisman homostatton(10) (humoraj ekvilibroj) pere de la funkciado de la aŭtonoma nerva sistemo.

Tio estas, la ĵusnaskito vidas, aŭdas, gustas, flaras kaj perceptas ĝenerale fragmenta- kaj primitiva-maniere, eble pro la mjelina nematureco de la nervaj vojoj.

Malsame, la filomnemonika procezo aŭ filogeneza memoro regas perfekte bone la "biologian meĥanisman de supervivado" (homostatton) pere de la funkciado de la aŭtonoma nerva sistemo (simpata kaj parasimpata) inkludante la hipotalamon. Dekomence la ĵusnaskito estas pli multe kaj pli bone okupiĝinta regulante la malsaton, la urinproduktadon, la soifon, la dormon, ol starigante sensajn aŭ perceptajn kontaktojn kun la medio. Ekde la komenco estas klara mal-ekvilibro inter :

- 1) la ĝermo de kio poste estos la procezo META (la ĝermo estas la komenca homostato), kiu dependas de specifa aŭ filogeneza memoro, kaj
- 2) la neŭrologiaj meĥanismoj de la sensa perceptado.

Simpligante ni diras, ke de frue en la homa vivo ekestas malekvilibro inter memoro kaj perceptado, la unua super-reganta la duan.

Memoro de la dormoj

Tiu ĉi misproporcio klare rimarkeblas en la tipo de dormo de la ĵusnaskito. 85 procentoj de la dormo de la ĵusnaskito estas REM-dormo (dormo de rapidaj okulaj movoj), nomita ankaŭ "dissinkronigita" aŭ "primitiva". Laŭ la maturiĝado de la nerva sistemo elde la struktura kaj fiziologia vidpunktoj, la ofteco de la dissinkronigita dormo malgrandiĝas ĝis 25 procentoj de la tuta dormo, estante proksimume 12-monata, kaj daŭras tiel dum la restanta vivo. Tiu ĉi dormotipo estis nomita de W. Dement "konduitanomalia" kaj ĝi estas paradoksa dormo ĉar ŝajnas profunda

laŭ la vidpunkto de la muskola malstreĉeco (atonia dormo) sed estas malprofunda laŭ la elektroencefalografia vidpunkto, ĉar dum ĝia okazado oni registras aktiviĝajn ondojn, similajn al tiuj de la maldorma stato.

Estas dum tiu ĉi dormotipo dissinkronigita, kiam oni travivas sonĝojn kaj sufersonĝojn. Se oni vekas plenkreskulon dum tiu ĉi dormotipo, li memoros sonĝojn kaj sufersonĝojn pli facile ol se li estas vekata dum la okazado de aliaj tipoj de dormo.

Tio ĉi estas por ni bona ekzemplo de la misproporcia graveco de la procezo META (aŭ mnemonika-eidetika-timika aŭtonomika) ekde la komenco mem de la homa vivo.

## Atento

Tiu ĉi procezo META, tiel grava por la supervivado, estas la sama, kiu interferos, dum la tuta vivo de la individuo, kun la sensopercepta "malfermo" al la medio kaj al la aliaj uloj en tiu medio.

Alivorte : estas la "penso" kun siaj komponaĵoj (memoro, ideo, bildo, emocio kaj aŭtonomikaj reagoj), kiu ĉiam interferos en la rekta kontakto de la individuo kun la realo.

Tio ĉi signifas ankaŭ, ke la penso (kiu estas memoro) estas la ĉefa distorda faktoro en la homaj rilatoj.

## Cerbo, eidetos, ideo, bildo kaj komparo

Ronald Clark, profesoro pri biologia strukturo en la Universitato de Miami, diras al ni en sia **Resumo de Neŭrofiziologio kaj klinika Neŭroanatomio** (1975, p. 150) : "La supramargena giro (areo 40) kaj la angula giro (areo 39) en la homa cerbo estas ankaŭ (kiel la areoj 5, 7, 18, 19, 42 kaj 22) gravaj areoj de asocio, kiuj interrilatigas estezajn, vidajn kaj aŭdajn stimulojn. Tiuj ĉi asocioj havas jenajn taskojn: 1) formuli sensajn stimulojn per objektaj bildoj, kaj 2) sintezi ĝenerale ilian signifon. Tiu ĉi procezo de "konado" (gnosis) kunportas komparon inter la sensa fenomeno ĉeestanta kaj la pasinta sperto. Ekzemple, la areoj de vid-asocio 18 kaj 19 devas esti vokitaj por funkcii, kiam oni rekonas malnovan amikon inter la homamaso".

Kion ni diras, uzante la novan psikologian paradigmon, tio estas, ke oni bezonas la funkciadon de "nova" faktoro en la homa menso por percepti la amikon de la ekzemplo inter la homamaso, kvazaŭ estus la unua fojo, por havi unuecan kaj rektan perceptadon, realan kontakton ĉi tie kaj nun.

Kompreneble, tiu "nova" faktoro ekzistis ĉiam en la homa menso, sed oni nek priskribis nek konsideris ĝin eĉ en antaŭaj paradigmoj de la homa Psikologio. Sendube estas la konceptoj ĵusaperintaj, tiel en Fiziko kiel en Neŭrologio, kiuj ebligas la sciencan konsideradon kaj priskribon de tia faktoro, kiun oni nomas karyon.

### Emocio kaj memoro

Estas facile, dum oni eniras en la studon de tiu ĉi problemo, identigi la subkuŝantan unuecon inter tiuj ĉi fenomenoj ŝajne malsimilaj : memoro, ideo, ideologio, bildo, emocio, timo, malamo kaj muskola kaj viscera agado.

Jam en 1890 diris William James en sia libro **Principles of Psychology** : "Emocio estas la perceptado de muldiloj aŭ modeloj autonomikaj, kiuj aperas kiel konsekvenco de la agado".

Sekvante preskaŭ tiun ĉi saman vojon, Schachter kaj Singer en 1962 aldonas la konsideradon de konaj procezoj al la aŭtonomika ekscitado, kiu akompanas la emociajn statojn ("Konaj, sociaj kaj fiziologiaj determiniloj de la emocia stato", Psychological Review).

C. Izard en 1971 en **La vizaĝo de la emocio**, reliefigas la interagadon de kombinaĵoj de neŭrofiziologiaj sistemoj, inkludante diskretan formojn de muskola agado (vizaĝaj kaj poziciaj muskoloj) kiel subkuŝantaj meĥanismoj antaŭ la sperto devenanta de la emocio.

Rabio : En 1937 Papez eltrovas, ke la rabi-viruso lokiĝas prefere en la cerba hipokampo(11). Estas memvideble, ke la vorto "rabio" aludas emocian staton, kiu estas tiu, kiu ŝajnigas la simptomaron de la malsano, sendube pro la rilatoj ekzistantaj inter la hipokampa lobo, la memoro kaj la emocio, ĝeneralsence.


### Neŭrokirurgio kaj tempia epilepsio

Malkonekto. En eksperimenta Neŭrokirurgio oni malkonektas tiun lobon disde la restanta cerbo (alokorteksa malkonekto) kaj okazas tipa simptomaro, kiun oni nomis sindromo de Kluver-Bucy, karakterizita de hipermetamorfozo (konstantaj ŝanĝoj en la konduto aŭ personeco), hiposentiveco (nesufiĉa aŭ nula reago de timo aŭ agresemo antaŭ nocivaj stimuloj) kaj memorŝanĝoj (nedaŭra memoro aŭ memora hiperŝanĝiĝemo).

Hiperkonekto. Kontraŭe, en kazoj de tempia epilepsio,

kiuj laŭdifine estas statoj de "hiperkonekto" de tiu alokor-teksta areo kun la restanta cerbo, la homo prezentas simptomaron, kiun ni povas nomi "kontraŭa" al la antaŭa : glueca, viskoza personeco (konversaciante, ili ne kapablas diri adiaŭ), hipersentiveco, kaj troa maltrankvileco (timo) kaj agresemo (malamo). La memoro iĝas detalema, kaj ili kredas vidi, kion ili neniam vidis (**déjà-vu**).

Iĝas evidente, ke la agado de la hipokampo kaj la tempiaj loboj estas gravega (kvankam ne ekskluziva) en la homa memoro kaj ke tiu agado intime rilatiĝas almenaŭ kun la maltrankvileco kaj la agresemo, kiujn ni povas konsideri kiel formojn de timo kaj de malamo. Skeme :



### MEMORO SEN STIMULO KAJ PSEŬDOMEMORO PRO LA STIMULO

Diras Jonathan Pincus en 1978 en sia libro **Neŭrologio de la konduto**, paĝo 62 : "Kiel antaŭdiris Papez en 1937 (antaŭ 40 jaroj), ekzistas tendenco en la limbusaj(12) komponaĵoj elektre stimilitaj, daŭri malsarĝiĝante longe, eĉ sen stimulo kaj kun malmulta interveno de la neokortekso".

Wilder Penfield elektre stimulante malsamajn partojn de la limbusa lobo, reproduktis multajn simptomojn de la tempiloba epilepsio ; inter aliaj, la tre ofta fenomeno pri tio "jam vidita" (**déjà-vu**), kiu ŝajnas nur daŭra malsarĝiĝo de la tempilobo, kiu, kiam koincidas kun sensa impresio (vida, aŭda, gusta, ktp) okazigas, ke tiun novan sensimprezon oni interpretu kiel ion malnovan, "jam viditan". La malnova alokortekso (procezo META) malplivalidigas tiel la agadon de la nova neokortekso (sensaj impresoj).

Penso, fermitaj cirkloj kaj iluzio

Estas tre malfacile rezisti la tenton longe spekulativi pri tiuj ĉi neŭrofiziologiaj okazaĵoj, sed ni rezistos.


Ni diros nur, ke kion ni simpliĝe nomas "penso" (procezo META), tio havas pruvitan naturan tendencon funkcii aŭtonome en "fermitaj cirkloj", preskaŭ kiel hundo, kiu ludas

mordante sian propran voston.

Cetere, se tio ĉi ne sufiĉus, ĝia agado mem estas fonto de iluzio, interferante en la perceptado, modifante la manieron kiel ĝi integriĝas kaj fine estas "interpretita" je cerba nivelo.

Estas kurioze, ke tiu ĉi procezo de "pensado" (procezo META), kiu havas sian funkcion en la konstruplanado de konstruaĵo aŭ ponto, meblo aŭ veturilo (ĉu aŭtomobilo, ĉu aviadilo), aŭ en la ellaborado de manĝaĵoj aŭ de medicina preskribo, estas strukturita tiamaniere, ke ĝi povas mergi nin ankaŭ en la iluzion, la halucinon, la timon aŭ la simplan diskonekton kun la realo, en kiu ni vivas la plej grandan parton de la tempo.

Skeme :



Anekdoto : komentario pri la dĉjĉ-vu

Post unu el miaj prelegoj en Latinameriko, distinginda sinjorino alproksimiĝis al mi kaj faris la sekvantan komenton : "Ĉu vi ne kredas, ke la dĉjĉ-vu aŭ almenaŭ 'iuj formoj de dĉjĉ-vu' rilatas al la reenkarriĝo aŭ metempsiĉozo ? Se mi vidis mezepokan kastelon en mia antaŭa vivo, kiam mi vidos ĝin denove en tiu ĉi nova vivo mia, mi kapablos rekoni ĝin sub determinitaj cirkonstancoj".

Mi respondis al ŝi pli-malpli tiel : "Sinjorino, mi ne parolas pri la vero aŭ la malvero de la reenkarriĝo aŭ metempsiĉozo. Ni parolas pri la plej granda tragedio de la homo ĉiutempe : la diskonekso de la individuo disde la realo, kiu ĉirkaŭas lin, la manko de reala kontakto de unuj kun aliaj, krom nura interŝanĝo de lernitaj simboloj, parolaj aŭ ne parolaj, amikecaj aŭ malamikecaj. Uzante vian saman ekzemplon, kio interesas nin, tio estas rimarki, ĉu ni simple re-konas la kastelon, kiun ni vidis (ne gravas kiam), aŭ ĉu ni vere rigardas kaj vidas ĝin ; ĉu ni estas en reala kontakto kun ĝi, tie ĉi kaj nun.

Ni povas aldoni, ke se interesas nin esti en vera perceptiva kontakto kun la realo (unueca perceptado), fine, mal-

multe gravas, ke la penso estas funkcia aŭ ne. La funkcia aŭ nefunkcia penso ankoraŭ estas procezo META (mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika) kaj tiu ĉi procezo nepre interferas kun la unueca perceptado de la realo, kiel ni diris plurfoje kaj kiel iu ajn el ni povos pruvi al si mem tuj, kiam li klopodos.

## LA MIO : PARTO KAJ PRODUKTO DE LA PROCEZO META

Ni estas prezentantaj novan paradigmon en la psikologi-historio ; kaj temas pri simpla vero kun grandegaj kaj multaj implicoj. Inter la aferoj, kiujn ni devas rigardi novmaniere, se ni volas kompreni pli bone la homan dramon, estas la koncepto pri "mio".

Uzante tiun subtilan pensmanieron, kiun ni nomas "esplora negativa penso", ni komencu klarigante tion, kio estas, kio ne estas por ni la mio.

Kiam la Hindoj diras **tal-vam-asi** (vi estas tio), ili parolas pri la identeco de la homa mio (aŭ almenaŭ pri "supera" parto de la homa mio) kun la dia mio (Dio aŭ Atman).

Kiam Moseo parolas kun Dio, demandante Lian nomon kaj Li respondas : "Mi estas, kiu estas" (Eliro, 3), estas alia aludo al la dia identeco de la homo. En tiuj ĉi parolaj klopodoj komuniki ion tre gravan por la homo, oni perceptas kvankam subtile, la kompareman esencon de la procezo META.

Ni estas dirantaj, ke la mio estas parto kaj produkto de la procezo META kaj ke tiu ĉi procezo estas tio, kio kreas la kontraŭaĵojn "tio ĉi kaj tio" aŭ "supera kaj malsupera".

Tiu ĉi esenco mem de la procezo META estas tio, kio malhelpis dum jarcentoj la komprenadon de tio fundamenta de la religia mesaĝo.

Aliflanke, la "mio" estis konceptita en Psikologio laŭ multaj malsamaj manieroj, kiuj pliiĝis la konfuzon.

Por Sullivan, la mio aŭ la "mi-sistemo" estas la integriĝo de trajtoj, kiujn aprobis plenkreskuloj gravsignifaj dum la unua vivjaro kaj la infaneco.

Por Freud la "karaktero" estas rezultato de la sublimigado de la instinktoj far la supermio, kaj la supermio estas ne malpli ol la internigado de sintenoj de la plenkreskuloj gravsignifaj, dum la unua vivjaro kaj la infaneco.

Karen Horney parolas pri aktuala mio, reala mio (kio oni estas laŭ la nuntempa potenco) kaj idealigita mio (kio



oni devus esti pro si mem).

Poste aperis la koncepto pri "epigenezoz(13) de la mio", konsekvence de la granda scivolemo por koni kiel disvolv-iĝas en la tempo tiu ento tiel malpreciza kaj samtempe tiel reala, kiu estas la mio.

Valoras la penon legi kelkajn el la tiusencaj klopodoj, kiuj jam iĝis klasikaj :

- 1) La ĉapitro "Ok aĝoj homaj", en la libro **Infancia y Sociedad** de Erik H. Erikson (Bonaero, Hormé, 1978, 7a eld.)
- 2) La libro de Anna Freud **El yo y los mecanismos de defensa** (Bonaero, Paidós, 1977, 11a eld.)
- 3) **El primer año de vida del niño**, de Rene Spitz (Madrido, Aguilar, 1975).
- 4) **El nacimiento psicológico del infante humano**, de Margaret Mahler (Bonaero, Marymar, 1977)

Carl Jung parolas pri "mi-kompleksoj", kio estas preskaŭ same kiel priskribi la ekzistadon de kelkaj aŭ pluraj psikologiaj "mioj", agantaĵoj iel "sendepende" unu de la alia. Lia sekvanto Maurice Nicoll disvolvis tiun ĉi ideon pri la "pluraj mioj" kaj parolis pri la "observanta mio".

Nia opinio, denove montriĝas ĉe tiuj ĉi aŭtoroj la tendenco fragmentiga kaj esence dualeca de la procezo META; procezo, kiu moviĝas senĉese inter "kontraŭaĵoj" aŭ "paroj". Laste, tiu ĉi tendenco disigas la observanton de tio, kion li observas ĝis diskoneksigi la individuon disde ties propra realo kaj disde la realo mem, je diversaj gradoj.

En 1923 Sigmund Freud prezentas al la mondo sian strukturan teorion ; tio, kio kristaligas kion ni nomas "la unua paradigmo en psikologio". La nia estus do "la nova paradigmo".

Freud priskribas la mion kiel psikologian agenton okupatan pri la perceptado de la realo kaj pri la aĝustigo al tiu media realo.

Li kondensas interne de la mio, serion da funkcioj, kiuj estis tre bone resumitaj kaj ordigitaj en la libro de Leopold Bellak **Funkcioj de la mio en normaluloj, neŭrozuloj kaj skizofreniuloj**.

Sed Freud lokas en tiu mio la memoron kaj la perceptadon. En nia nova paradigmo ni zorgas tre bone respekti la fundamentajn diferencojn ekzistantajn inter la mnemonika procezo (META) kaj la unueca perceptado. Ambaŭ ili estas neakordigeblaj kaj, pro tio, ni vidos, ke oni ne povas inkludi ilin en unu solan koncepton.

Ni diras, ke la memoro okazigas tiun "psikologian glaciigon", kiu estas la mio aŭ egoo. Ni diras ankaŭ, ke la mio ne estas nur la produkto, sed fine ĝi prenas parton de la procezo META kaj ambaŭ, META + mio, kiuj fakte samas, interferas la unuecan perceptadon.

Ĉu eblas tamen la ekzistado de unueca perceptado de la mi-procezo ?

Almenaŭ hispane, ni ne diras "mi kreskigas miajn ostojn aŭ cirkuligas mian sangon", same kiel ni diras "mi pensas, do mi ekzistas".

Kio okazas, kiam la mio pripensas pri si mem kaj demandas sin : "kio mi estas?" aŭ "kio estas la mio?" ?

Tiu ĉi demando povas :

- 1) okazigi amason da ideoj, bildoj, memoroj kaj emocioj (Ĉio, kion ni hispane nomas sendistinge "pripenso(14)", aŭ
- 2) okazigi agon de memobservado, kiu eventuale povas iĝi parto de la unueca perceptado, kaj en tiu unueca perceptado, tiom la mio, kiom la procezo META, ne plu ekzistas. La restarigo en la psikologia kampo (akceptante la esprimon) de la mnemonika procezo aŭ mio, finiĝas siafoje per la ago de unueca perceptado.

Mio, tempo kaj kaŭzeco (Piaget kaj Einstein)

Resume kaj simpligante : tio, kion ni nomas "si mem" ; tio, kion ni nomas mio, kaj kiu kredas "pligrandiĝi", protektiĝi kaj sekuriĝi per la rekono de probabla deveno, de siaj propraj kaj universitataj titoloj (konoj kaj posedaĵoj), kiu sentiĝas savita, partoprenante grupon, klanon aŭ nacion ; tio, kio baziĝas sur la konceptoj : "de mi" kaj "pli kaj pli" (pli da grandiĝo, pli da kono, pli da sekureco, pli da sekureco, ktp), tio ne estas stabila ento. Pli ĝuste, tiu "mio" tiu "si mem" estas procezo, kiu pli similas al kina mova filmo ol al senmova fotografia bildo.

Kiam ni esploras la kialon de io, kio ni kredas esti, ni serĉas unu el la fotoj en la longa rulo de tiu senĉese mova filmo, kiu estas la procezo META, kiu estas nia memoro.

La fizika-kemia procezo mem de la cerbo je molekula nivelo en la neŭronoj estas konscie interpretita pere de bildoj, kiuj estas poste registritaj far la memoro. Oni do povas konstrui vortojn surbaze de tiuj memoraj bildoj, kiujn ni nomas "penso". La penso ĉifras kaj deĉifras centripetajn mesaĝojn (al la neŭronaj molekuloj tra la sensaj vojoj) kaj centrifugajn (al la medio tra la movaj vojoj) je malsamaj niveloj. Vidu la skemon de sir John Eccles en ties libro

**Alfrontante la realon**, publikigita en 1970.

Iĝas videble, laŭmezure kiel ni penetras en la problemon, ke ekzistas viscera kaj glanda (aŭtonomika) ekvivalento al tiu procezo META kaj ke eĉ la molekularaj procezoj mem de la neŭrono iom post iom eniĝas en la nuran mensan procezon, kiun oni instruis al ni rekoni en nia kulturo.

Ankaŭ ĉiam pli evidentiĝas, precipe kiam ni konstatas la mensagadon en ni mem sen "antaŭjuĝoj" aŭ iaj ajn kondiĉoj, ke la mnemonika procezo kaj ĉio, kio akompanas ĝin (ĉu neŭrofiziologie ĉu psikologie) ne estas la nura mensagado.

Iom post iom oni perceptas kiamaniere la procezo META interferas kun la aliaj mensagadoj ĝis tio, ke ĝi fariĝas neakordigebla kun ili.

Tiu ĉi procezo META polarizas diversajn bildojn, ideojn kaj memorojn ĉirkaŭ la mi-koncepto. Tio ĉi okazas en la infano, kiu identiĝas kun siaj gepatroj, aŭ en la adoleskanto, kiu "iĝas unu kun" la idolo (eidetos), kiun iumomente kaj iuloke la kulturo elstarigas : la milit-heroo, la televidkantisto, la kinaktoro aŭ la footballudisto.

Se ni intencas kredi, ke la procezo META (penso) kaj la mio estas disigitaj aŭ estas malsamaj, ne eblos havi unuecan perceptadon pri la funkciado de la procezo META (la mio) en determinita momento.

Ankaŭ ne eblos havi insight-n (aŭ internan vidadon) de la procezo META, se ni uzas ian ajn formon de mnemonika dualeco : la komparon, la justigon aŭ la kondamnon, kiuj estas nur mezuroj inter du imagaj punktoj. Tiuj ĉi "mezuroj" estas alia maniero ŝanĝi la kinan filmon en senmovan fotoĝrafjon.

**Kontinueco, daŭrigo kaj restado**

La memoro (mnemonos), kiu registras la diversajn stadiojn de la propra vivo, trudas al ĝi kontinuecon pere de la koncepto pri "mio", kiu tiamaniere iĝas parte utila. Tiel la "mio" estas la formo imaga (eidetos) aŭ ideiga kiel la procezo META havigas al si kontinuecon en la pasinteco kaj daŭrigon en la venonteco. La "mio" iĝas ankaŭ iluzia imago de restado trans la senĉesa ŝanĝiĝo de ĉiuj aĵoj, personoj, ideoj kaj okazaĵoj. La "mio" eĉ iĝas la iluzio resti ĉiam sama, malatentante la sekvencajn ŝanĝojn en si mem.

La koncepto pri "mio" estas la "vojo de la plej malgranda peno", kompare kun la senĉesa energia konsumo bezonata de la rekta (aŭ unueca) perceptado de la senĉesa ŝanĝo de ĉio.

## La tri konscioj

Kaj la mio estas unu el la eblaj formoj de konscio kaj agado ; tiu konscio, kiun nia kulturo unuflanke emfazas. Surbaze de nia modelo de menso ni dirus, ke ekzistas almenaŭ tri formoj de konscio kaj agado en la homo :

- 1) "linia" konscio : tiu de la procezo META, kie estas registro de la realo.
- 2) "triangula" konscio : tiu de la unueca perceptado kaj de la inteligenta diferencigo, kaj
- 3) "cirkla" konscio aŭ kariokonscio, kie ekzistas rekonstitudo de la realo. Oni vidas kaj aŭdas sen distordi tion viditan aŭ aŭditan.

Ni rediras, ke tiujn esprimmanierojn oni ne devas konsideri tre laŭlitere kaj ke ili estas nur poreksplikaj eblecoj.

La "linia" konscio, "mieca" aŭ "META" emfazas la gravecon de la fotografaĵo aŭ senmova bildo. La "triangula" konscio de la "inteligenta unueca perceptado" estus pli rilatigitaj kun la kina filmo, kiu estas la realo, tiel interna, kiel media.

### Vojaĝoj kaj movo

Vojaĝoj : alivorte, la agado de la procezo META estus tiu de reaj vojaĝoj ekde unu punkto ĝis alia (fragmentaj movoj ene de la dualeco, kiu estas komparo, justigo, kondensio [nekonscia], kondamno, mezuro, ktp).

Movo : male, la agado de la unueca perceptado estus same kiel partopreno en la movo de la realo transe de ĉia dual-eco, komparo aŭ mezuro. Tio ĉi implicas, ke ĝi estas la sola mensa agado, en kiu eblas rekta kaj profunda kontakto kun alia homo : la unueca rilato. Tie ne ekzistas la komparo, la kondamno, la justigo, la mezuro, la bildo, kaj la timo, kiu iras kune kun ĉio ĉi.

### Tempo, spaco kaj kaŭzeco

Jean Piaget observis, ke inter la kvara kaj la sepa vivjaroj la infano firmigas tion, kion ni nomas la "mio", per formado de la koncepto pri spaco kaj tempo, kaj per la komenco de la strukturado de la ideo pri kaŭzeco.

Sed kio vere okazas ?

La esenco de la realo, kiu ĉirkaŭas nin, estas la movo. Je nivelo de unueca perceptado, ekzistas nur movo kaj konstanta ŝanĝo, "tiom interne, kiom ekstere".

En tiu movo kaj tiu ŝanĝo, kiun la procezo META aŭ la linia konscio "fiksas" aŭ intencas fiksi aŭ fotografi inter du punktoj tute hipotezaj :

Punkto 1 : ĉi tie.

Punkto 2 : tie, kaj inter ambaŭ punktoj, ekzistas la spaco. aŭ :

Punkto 1 : Antaŭe (memoroj)

Punkto 2 : Nun (sed ne la percepta nuno, sed la bilda kaj parola nuno).

Punkto 3 : Poste (kiu estas nur ideo aŭ memoro de la koncepto pri estonteco), kaj inter tiuj ĉi punktoj ekzistas la tempo).

La procezo META tradukas parte la movon de la realo (interna aŭ ekstera) en parolan, emocian, imagan, idean lingvon, kiun oni konas kiel spacon kaj tempon. Ne surprizas, ke de tiuj ĉi ideoj pri spaco kaj tempo (eterna komparo inter du punktoj) rezultas kiel natura konsekvenco la ideo pri kaŭzeco. Ĉiu kaŭzo havas sian efikon kaj inverse (aliffoje la du punktoj de la dualeco). Tie ĉi la infano malkovris la "ĉefŝlosilon", kiu malfermas la pordojn de la rilatoj inter kaŭzoj kaj efikoj : ĝiaj demandoj "kial?".

La eblaj distordoj de tiuj rilatoj inter kaŭzoj kaj efikoj, kiuj rezultas kiel respondo al la demando "kial?", estas sen-nombraj, kaj multon oni skribis pri tiuj distordoj.

Modeloj de la kaŭza rilato

Ekzistas almenaŭ kvin muldiloj aŭ modeloj por respondi la demandon "kial?" en la procezo META.

1) Kaŭza ĉeno : la modelo plej simpla kaj do la plej uzata: unu kaŭzo havas unu efikon kaj ĉiu efiko estas antaŭigita en la tempo per kaŭzo.

2) Polideterminismo (kaŭza reto) : inter kaŭzo kaj efiko estas "spaco", kiu nepre estas okupita de la novaj okazaĵoj, kiuj siafoje igas sin novaj kaŭzoj de la sama efiko. Tiamaniere, al unu sama efiko kunfluas multaj ĉenoj de kaŭzoj kaj efikoj.

3) Kaŭza retroflekso : ĉu povas la efiko transformiĝi en kaŭzon de la kaŭzo ? Tio estas, ĉu oni bezonas kuradi longe ĉiutage por havi bonfartan koron, aŭ ĉu oni bezonas havi bonfartan koron por kuradi longe ĉiutage ? Ĉu estas malriĉeco rezultato de skizofrenio, kiel konsekvenco de la nefirma socia kaj labora adaptiĝo de la skizofreniulo, aŭ ĉu malriĉuloj estas pli dispoziciitaj je la skizofrenio, konsek-

vence de dieto vitamine kaj proteine nesufiĉa, kio finfine difektas la cerban metabolon ? Wynne kaj Singer antaŭdiris 100% ekzakte kiuj estos la patroj, kiuj edukos skizofreniajn filojn kaŭze de "misdirektoj ĉe komunikiĝo". Tamen, pli poste aperis la diskutado pri tio, ke eble estus la infanoj jam skizofreniaj, kiuj kreis la "misdirektojn ĉe komunikiĝo" kun siaj gepatroj.

4) Kaŭza interago : tiu modelo de kaŭza rilato havas bonan ekzemplon en la teorio de la ĝeneralaj sistemoj, de Bertalanffy, vaste aplikita en familia psikoterapio (Minuchin kaj aliaj) : "Du elementoj de unu rilato estas la rezultato de reciproka kaj konstanta transformiĝo".

5) Sinkroneco : tiu modelo de kaŭza rilato estis priskribita de Carl Jung kaj li plendis ĝismorte pri tio, ke oni ne komprenis lin. Ni memoru, por ne plikonfuziĝi, ke la vorto "sinkroneco" estis uzita tute alisence far René Spitz, neniel rilatigite al tiu ĉi senco. Sinkroneco estas la senkaŭza rilato inter du samtempaj faktoj. Estas la procezo META (la penso), kiu estigas la neceson de linia rilato kaŭzo-efiko inter du samtempaj faktoj. La originala ekzemplo de Jung en lia artikolo "Sinkroneco" estis la Astrologio. La ĵus aperintaj laboroj kune faritaj de la neŭrologo Karl Pribram (Universitato de Stanford) kaj la kernfizikisto David Bohm (Universitato de Londono) pri la holografia modelo aktualigas kaj igas pli signifaj la konceptojn de Jung pri la senkaŭza rilato aŭ sinkroneco.

### Einstein kaj la tempo

Ni do klare vidis, kiel la mnemonika dualeco kompari du hipotezajn punktojn kondukas nin el la koncepto pri spaco al la koncepto pri tempo kaj laste, al la starigo de diversaj specoj de kaŭza rilato inter la faktoj.

Iu diris al mi dum unu el miaj universitataj prelegoj en Latinameriko, ke Albert Einstein alportis alian nocion pri tempo krom la mnemonika dualeco. Ni vidu kial tio ne pravas.

La teorio de la relativeco de Einstein ne modifas la esencan dualecon (mnemonikan) de la origino de la koncepto pri tempo. La matematikaj deduktoj kaj konkludoj de Einstein influis nur la ĉefajn Neŭtonajn ideojn en la nuntempa Fiziko, detruante la bazan Neŭtonan ekirpunkton, kiu diras, ke "la tempo estas absoluta kaj universe la sama".

Einstein siaflanke parolas al ni pri la tempa relativeco kaj enkondukas la varianton de la observanto kaj ties movo

kiel gravan faktoron por la taksado kaj la mezurado de la tempo.

La plej konata ekzemplo, kiun Albert Einstein mem plurfoje uzis, estas jena : "Ĉefo de fervoja stacio vidas du fulmojn falantajn malproksime sur la relvojoj, ekzakte samtempe, unu oriente kaj la alia okcidente, kaj li deduktas, ke ili ambaŭ falis samtempe.

En la momento kiam tio ĉi okazas, trajno preterpasas okcidenten, en kiu iu pasaĝero lokiĝas samdistance inter la du fulmoj, same kiel la staciĉefo.

La trajno moviĝas rapidege kaj la pasaĝero registras malsaman bildon : la okcidenta fulmo ŝajnas fali antaŭ ol la orienta fulmo, ĉar la trajno moviĝas okcidenten, do la fulmlumo orient-devenanta bezonas iomete pli da tempo por atingi la retinojn de la pasaĝero ol la fulmlumo okcident-devenanta".

En nia nova psikologia paradigmo ni dirus, ke Einstein konfirmis, ke la procezo META estas fonto de eblaj iluzioj kaj ke ĝi estas esence dualeca.

Ni dirus figure, ke la atomoj aŭ nedivideblaj unuoj de la procezo META estas "unuoj de dualeco".

La movo de tiuj "unuoj de dualeco", kiu estas la procezo META mem, originigas skemojn kaj modelojn aŭ simbolojn, kiuj helpas nin interpreti, registri aŭ memori la realon, sed ili neniel helpas nin starigi rektan kontakton kun tiu realo, t.e. rekonstitui la realon en nia interno.

En la ekzemplo uzita de Einstein, la tempomezuro dependas de la elekto de la referenca kadro.

La mezuro estos malsama por la staciĉefo kaj por la pasaĝero de la trajno, sed ili ambaŭ senalternative dependos de komparo inter du punktoj. La komparo mem estas fragmenta vido (kaj konsekvence, distordita) de la realo, eĉ se ni forgesas kion la ekzemplo de Einstein sugestas : la komparoj aŭ mezuroj de la pasaĝero kaj la staciĉefo estos malsamaj kaj ili ambaŭ pensos, ke la alia eraras, eĉ kiam ambaŭ perceptis la realon ekzakte same kiel ĝi estas en la momento, kiam ambaŭ fulmoj falis sur la relvojojn.

## UNUECA PERCEPTADO KAJ TRIANGULA KONSCIO

La mio kreas "sekvencajn spacojn" ĉirkaŭ si mem. Tiuj spacoj estas, kiel ni scias, "unuoj de dualeco" kaj ne estas strange do, ke la mio moviĝas senĉese inter la malgrandaj polarizoj, nome, la sukceso kaj la malsukceso, la venko kaj la malvenko, la memoro kaj la forgeso, la povo kaj

la envio, la ĝojo kaj la malĝojo, la plaĉo kaj la malplaĉo, la espero kaj la malespero...

Ni diris, ke la esenco de la ŝajna realo estas ĝia konstanta stato de transformiĝo. Kiam la unueca perceptado registras en sia penetranta kaj pasiva atento, ke la propra interno estas ankaŭ fluo en konstanta ŝanĝo, la koncepto pri mio perdas sian hipertrofian gravecon kaj ĉesas interferi la perceptadon kaj la agadon mem en la ĉiutaga vivo.

La procezo META estas plurflanke procezo de memfermiĝo, kiel oni povas rimarki en la propra vivo, kaj estis montrite eĉ eksperimente (vd. antaŭe, sur pĝ. 21, "Memoro sen stimulo kaj pseŭdomemoro pro la stimulo"). La unueca perceptado implicas sensan malfermiĝon al ĉio. Malfermiĝo per la kvin sensoj (eĉ ne necesas konsideri sesan senson). Tiu ĉi sensa malfermiĝo al la realaĵoj de la ekzistado estas sana kaj samtempe saniga. La unueca perceptado simple perceptas la kunfanditan fluon de tio ekstera kaj tio interna, tio estas, de la stimulo kaj la reago, kiu estas samtempe memoro kaj emocio. Tiu ĉi perceptado estas fidela al la realo, rekonstituante la eksteraĵon same kiel ĝi estas, kaj la internaĵon same kiel ĝi estas.

Ekzistas la interfero de neniu mnemonika registro, ne ekzistas la ĝeno de lernitaj aŭ "kreitaj" bildoj. La unueca perceptado moviĝas sendepende de ĉiu formulo, ĉiu metodo kaj ĉiu ideologio. Formuloj, metodoj, **sadhana**-j kaj ideologioj estas nur produktoj de la procezo META (memoro aŭ penso).

Kiam tiu ĉi unueca perceptado, kiu ne blokas nek neas la vidon de iu elemento - kiu ne "subpremas", laŭ Freŭda lingvo - iĝas parto de la propra ĉiutaga vivo, la fluo de la interno, kiu ŝajnas neelĉerpebla por multe da tempo, unue kvietiĝas kaj poste ĉesas, laŭ periodoj ĉiufoje pli longaj, tute senpene. En tiuj ĉi momentoj, kiam la fluo de la interno ŝajnas forestanta de la psikologia kampo, okazas la triangula konscio, aŭ tiu profunda silento, ekde kiu oni kapablas percepti plene la fluon de la ekstero sen esti interferita de interna fluo.

Ĉi tie estas, kie komencas okazi vere eksterordinaraj faktoj. La menso komencas funkcii ĉi tie kaj nun kun sia plej bona efikeco. La memoro mem iĝas preskaŭ neerarema, sed ne bezonas esti aktivigita pli ol malmultajn minutojn ĉiutage (ne pli ol 30 aŭ 40 minutojn en 24 horoj) por la lernejoj, teknikaj kaj faktaj funkcioj.

Tiuj ĉi malmultaj minutoj estas la nura saĝa agado de la procezo META aŭ penso.



Krom tio ĉi, la agado de la penso (memoro) estas ne nur senutila, sed ankaŭ malutila. Ĝi estas ne nur (kiel ni jam vidis) fonto de iluzio, sed ankaŭ la origino de la deprimo, la maltrankvileco, la timo, la obsedo, la konverto, kaj eĉ de disintegriĝaj simptomoj kiel la psikozo mem.

La menso, kiu per la unueca perceptado iris trans la procezo META (la penso), fariĝis kanalo de energio verŝajne senĉesa. Tiu ĉi energio ankoraŭ ne estis mezurita science fidinde, sed ĝi determinus kontakton kun subkuŝanta ordo, kiu ekzistas ne nur en la menso, sed en la tuta universo. Tiu ĉi lingvo ŝajnas mistik-natura, sed ne estas tiel. En la sekvontaj ĉapitroj ni pritraktos la koncepton pri holokinetiko de profesoro David Bohm kaj kelkajn faktojn pri la neŭropsikologio de la dormo, kiuj ŝajnas rilataj.

La kontakto kun tiu holokinetika ordo sub- aŭ trans- atoma, determinas alian staton de konscio kaj aktiveco (triangula konscio), kiu estas sojla aŭ potenciala stato de la karyon aŭ cirkla konscio.

La mio kaj la penso povas havi ideon aŭ bildon (kaj eĉ fortajn emociojn, kaj glandajn kaj viscerajn reagojn) pri kio estas tiu alia formo de konscio ; sed ni memoru, ke ĉiu bildo, ideo kaj emocio estas parto kaj produkto de la linia konscio aŭ procezo META. La aĵoj kaj personoj rigardataj kiel eblaj posedaĵoj aŭ plezurfontoj, kaj la ideoj (memoroj kaj babilado), ne interferas en la triangula konscio.

La ago esti komencas esti pli grava ol la ago havi. La unueca perceptado ne povas ektimi - same kiel faras la mio, kiu estas memoro kaj penso - simplan vivon sen avido, sen envio, kie la senĉesa serĉado de sukceso, povo, plaĉo, mono, prestiĝo kaj posedaĵo, ne ekzistas...

## UNUECA INTERRILATO

Interrilatado komencas esti pli grava ol superregado aŭ manipulado. La fama fizikisto Niels Bohr, sur pĝ. 57 de sia libro **Atoma Fiziko kaj la priskribo de la naturo**, diras : "La materiaj partikloj izolitaj estas abstraktaĵoj ; iliaj proprecoj estas difineblaj kaj observeblaj nur danke al ilia interago kun aliaj sistemoj".

Ni diras, ke individuo povas observi sin nur pere de sia interago kun aliaj estaĵoj kaj individuoj.

Tiu ĉi serioza intenco lerni pri si mem en la rilato aŭ vidi ĉiun personon kiel spegulon de si mem transformas la naturon de la rilato, igas ĝin ĉiam interesa ; kaj la "lernado ne estas registra lernado aŭ mnemonika lernado, sed kons-

tanta disciplino de reciproka rekonstitudo aŭ de rekonstitudo de la aliulo en la propra interno pere de la unueca perceptado aŭ triangula konscio.

Perceptado simple estas pli grava ol memorado kaj planado. Lerni ĉiumomente en la propra vivo, estas pli grave ol rediri kion aliaj jam diris, ne gravas kiom saĝa ĝi estas.

## DISCIPLINO KAJ OBEADO

La procezo META ne permesas la konstantan lernadon, kiu estas disciplino - konsiderante disciplinon la eco de la disĉiplo de la ekzistado. Tiu ĉi disciplino, kiu estas la ordo de la konstanta (kaj ĉiam nova) lernado kiel parto de la unueca perceptado, havas nenian rilaton kun la disciplino de la procezo META, kiu estas la "regado akirita per la altrudo de la obeado". Ne devas surprizi nin, ke la modernaj vortaroj donas tiun lastan signifon de la vorto "disciplino", forgesante ĝian devenon.

Ni jam diris, ke nia kulturo emfazas nur kaj ekskluzive la procezon META.

La saman semantikan degeneron suferis la vorto "obeado" kiun niaj vortaroj difinas kiel "cedemo kaj submetiĝo al la aŭtoritato".

La origina signifo de tiu vorto estas "malfermiĝo", kiun ni nevole uzadas rilate al la "sensa malfermiĝo de la unueca perceptado".

La procezo META nur memoras, planas, imagas kaj babilas. Ĝi ne permesas la unuecan perceptadon, kiu estas ankaŭ pasiva atento, do ne permesas la esploradon kaj la lernadon (disciplinon) realajn.

La procezo META estas ne nur potenciala kaŭzo de iluzio sed ĝi ankaŭ produktas ĉiam tiun kompleksan da iluziojn, kiu estas la "mio". Ĝi okazigas la konstantan deziron je plaĉo, sekureco kaj komforto ; kiel ankaŭ la troan timon antaŭ la doloro, la soleco kaj la malĝojo. Ĝi kreas ankaŭ la forsavon al sia propra timo : toksoj, trinkaĵoj (alkoholaj aŭ ne), bankedoj, generila (maltrafe nomite seksa) senordo, ritoj nomitaj "religiaj", televido, banalaj sociaj kunvenoj, hazardludoj, amasaj kaj pasivaj amuzoj aŭ sportoj, estas esence je la sama nivelo. Ili reprezentas formojn de forevito ekde tiu iluzio, kiu estas la maltrankvileco aŭ la timo. Tiuj ĉi forevitoj blokas la perceptadon de la internaj movoj kaj kune kun ilia subpremado aŭ forigo (por uzi nun la freŭdan lingvon), kompletigas la generadon de tio, kion ni nomas "la nekonscio".

Sed la nekonscio estas nur tio, kion ni ne volas vere percepti.

Kaj ni volas esti "iu" ; esti rekonitaj en (planeda) socio ne nur signifa sed ankaŭ pli kaj pli koruptita. Vidi tiun groteskan deziron sen kondamni ĝin, estas parto de la unueca perceptado, kaj nur la unueca perceptado povas finiĝi ĝin.

La unueca perceptado finigas la uzadon de la vizado, la aŭdado, la gusto, la flar- kaj tuŝo-senso kiel nuraj instrumentoj por plezuro.

La sensoj iĝas la naturaj pontoj inter la menso kaj la ekstera mondo. La sensoj ne serĉas la plezuron. Sed la sensoj ne neas la plezuron. La kvin sensoj estas plene malfermaj kaj intense lertaj.

### **META KAJ META : KLARIGO PRI SIGNIFOJ**

1) Meta estas vorto grekdevena signifanta "trans" ; ĉi-sence, oni uzas ĝin en vortoj kiel metanojo. Metanojo, ni devas rediri, signifas "trans la procezo META (aŭ penso)", en nia lingvo. Metanojo kaj procezo META fakte estas neakordigeblaj.

2) Ankaŭ, kiam ĝi estas en terminoj kiel metalogiko, metamatematiko kaj same, ĝi montras, ke temas pri nova kaj supera nivelo de konceptado ene de determinita scienca fako.

3) META kiel komencliteroj kaj ne kiel vorto temas, cele al mallongigo, pri la unueca procezo Mnemonika (M) - Eidetika (E) - Timika (T) - Aŭtonomika (A).

4) Alia senco(15) de la vorto meta estas "celo", sed la celoj aŭ objektivoj, eĉ la subtile implicitaj en ĉiu psikologia tekniko, estas parto de la mnemonika procezo, esence duala aŭ procezo META.

## LA MNEMONIKA DUALECO

### CELO, KONTRAŬSTARO KAJ FRAGMENTADO

Ni jam diris, ke la plej supera esenco de la procezo META (aŭ penso) kaj de ties produkto, kiu estas la mio, estas la dualeco.

Tiu ĉi realaĵo fariĝas klare videbla sen ia peno por individuo en unueca perceptado.

Sed en nia emo klarigi ĝin pervorte, ni helpis nin per esprimoj kiel "sekvencaj spacoj kreitaj de la mio" aŭ "unuoj de dualeco". La mio, ekzemple, serĉas la sukceson. La sukceso estas ne nur celo de la mio, sed estas psikologie ankaŭ mallarĝa "spaco", kiu etendiĝas ekde tie ĉi (kio mi estas nun) ĝis tie (la sukceso, la triumfo, la povo, la riĉeco, ktp).

Tio ĉi estas nepre kontraŭstara stato (inter kio mi estas kaj kio mi emas esti) kaj ankaŭ fragmenta maniero percepti la ekzistadon.

La mio, kiu serĉas la sukceson, estas kondamnita tujen-tuje trovi frustracion, kiu estas parto kaj enhavo de tiu serĉado, kiu estas sekvenco de la sukces-serĉado.

Tiamaniere la mio moviĝas en tiuj dualec-unuoj ; ĝi iras de "spaco al spaco", sekvence, pasante ekde unu dualeco al la sekvonta. Tiel estas la afero de la mio, kiu frustraciita dum la serĉado de sukceso, sin okupas nun pri nova celo, nome la serĉado de sankteco, la mensa paco, la transcenda meditado, aŭ io ajn.

Tio ĉi kreas ne nur novan spacon aŭ dualecunuojn (ekde tio ĉi, kio mi estas [1] mi aliras al la sankteco [2], sed kreas ankaŭ kontraŭdiron (aŭ kontraŭstaron) kun la celo de la antaŭa serĉado, kiu estis la monduma sukceso.

Tiu ĉi estas la esenco de la maniero, kiel ni komplikas nian ekzistadon per la agado de la mio (tiu agado, kiu estas penso aŭ procezo META).

La mnemonika dualeco, kiu por iuj havas molekulan originon en la neŭrono, estas unuo kun la celo, la kontraŭstaro kaj la fragmentado. La celo estas nur formo de kontraŭstaro (inter kio oni kredas esti, kaj kio oni kredas, ke oni devus esti).

Iĝas facile rimarki kiamaniere la celo, la kontraŭstaro kaj la fragmentado estas samaj, kiam ni pensas pri konkretaj dualaĵoj kiel Arabo kontraŭ Judo, bonulo kontraŭ malbonulo, venkinto kontraŭ venkito, katoliko kontraŭ protestanto, religiulo kontraŭ mondano, Ruso kontraŭ Usonano, ktp.

Tiu ĉi estas la fragmenta kaj redukta maniero kiel moviĝas nia kutima pensostrukturo, kiu estas la fonto de niaj senĉesaj konfliktoj.

### Lingvo kaj dualeco

La deveno de la vorto "pensi" estas la sama kiel tiu de la vorto "pesi". La ago pesi implicas komparon inter la du teleroj de la pesilo kaj tiu ĉi komparo (kiu estas nur alia dualeco) estas, kiel ni diras, la esenco mem de la penso.

Dum somero 1978 mi vizitis la Instituton Max Planck por Cerbesplorado, en Kolonjo (Germanio). Mi tiam havis la bonŝancon teni tre interesan konversacion pri la lastaj esploroj pri homa memoro kun doktoroj Fred Jungmann kaj Carl Schulz. Ni parolis angle, sed Jungmann kaj Schulz faris germane oftajn komentariojn inter si.

Ne sciante la germanan, mi surpriziĝis pro la rilatoj inter jenaj vortoj :

Gedächtnis	= memoro
Gegen	= kontraŭa
Geschlecht	= ambaŭ seksoj
Gesperrt (kaj	
Geschlossen)	= fermita
Gewohnheit	= moro aŭ kutimo

Ĉiuj ĉi vortoj komenciĝas per Ge kaj fakte ili estis la origino de longa pridiskuto, kiu rilatis la lingvon kaj ĝiajn originojn al ĉio, kion ni diras pri la procezo META. Nia pretendo esti en kontakto kun la realo baziĝas sur la penso (procezo META) kaj ties karaktero dualeco. La instrumentoj mem, kiujn ni uzas, kaj la sistemoj por priskribo de la realo emergas el tiu procezo : kiel memvideblajn ekzemplojn, ni havas la pesilon, la karteziajn koordinatojn kaj la lenson. La META-dualeco kreas tipon de konscio de la realo kaj ankaŭ specialan tipon de instrumentoj kaj priskriboj, kiuj subtenas aŭ apogas tiun tipon de konscio, kiun ni nomas "linia". Ni denove pritraktos tion ĉi en la ĉap. V,

kiam ni parolos pri la lenso kaj la hologramo, kaj pri la implicita kaj manifestiĝinta ordoj de la universo.

## Disvolvado de la dualeco

Luj ege enprofundiĝas, serĉante la originon de tiu tendenco de la mio al la fragmentado, la kontraŭstaro kaj la konflikto.

La elektra molekula aktiveco rilate la pozitivon kaj la negativon estis konsiderata ; sed la sama divido inter pozitivo kaj negativo povas esti parto de nia dualeca maniero ekspliki la molekulan aktivecon.

Sen tiom enprofundiĝi, la formadon de la mnemonika dualeco en la homo oni povas atribui al la spertoj, kiujn li alfrontas ekde sia naskiĝo :

1) Dum la unuaj vivmonatoj, la bebo psikologie vivas en la tiel nomita "aŭtisma" fazo, pro tio ke li sentas sin unu kun sia patrino. Komence "la patrino" estas perceptita kiel ne multe pli ol du nutrantaĵoj. Sed eĉ kiam la patrino ne mamnutras sian bebon, ŝi devas teni ĝin sur sia brako ĉu maldekstra ĉu dekstra, kaj la infano rilatigas kinesteze la konsolon al la streĉeco de malsato kun tiuj ĉi du pozicioj (kuŝante maldekstran aŭ dekstren). Tiu ĉi estas la kontakto kun la unua du (la unua dualeco) kaj okazas minimume ses-sepfoje ĉiutage.

2) Kiam la infano malkovras la patrinan vizaĝon (aŭ tiun de ŝia anstataŭanto), la unua trajto, kiu elmontriĝas en tiu unuagrada perceptado, estas la ĉeesto de du brilaj kaj movaj objektoj, la okuloj, kiuj plejofte altiras ĝian atenton.

3) Ĉirkaŭ la oka aŭ naŭa vivmonato, la infano ekkonscias esti ento disigita disde sia patrino. Cetere ĝi komencas rekoni sian patrinon disde tiuj, kiuj ne estas ŝi. Panjo estas la konata estaĵo (n-ro 1) kaj la aliaj estas la "nekonata estaĵo" (n-ro 2).

4) Kiam la infano komencas moviĝi kvarpiede kaj piediri, la disiĝo inter ĝi kaj ĝia patrino estas ankaŭ fizika. La infano jam malkovris, ke ĝi havas du (2) manojn kaj ke unu estas la spegula reflektajo de la alia. Estas neevitebla la rilatado inter ĝiaj unuaj volaj agoj kaj tiu "mana dualeco". En la unuagrada vola ago kvarpiedi aŭ piediri malproksimiĝante de sia patrino, la infano rigardas la n-ron 1 (sian patrinon) antaŭ ol direktiĝi al sia objektivo, kiu estas la n-ro 2 (la nekonaĵo aŭ la celo de sia movo).

Tiu ĉi rigardo al 1 kaj 2 estis nomita "dufaza vida muldilo". Margaret Mahler nomas tiun ĉi procezon "refueling", termino signifanta "denove ŝarĝi karburadon". Tiu ĉi estas unu el la elementaj eroj en la ĉeno por individuigo aŭ formado de la "mio".

5) Rilate al la piedirado, memvideblas, ke la koncepto pri funkcio daŭras profunde ligita al la n-ro 2 (du gamboj). Ekde du (2) manoj, kiuj mildigas la unuan streĉecon de malsato postnaskiĝe, aŭ almenaŭ du eblaj pozicioj, kuŝante maldekstren aŭ dekstren ĉe la patrino sino, du okuloj, kiuj centrigas ĝian atenton, du manoj, kiuj prenas (kvankam oni ne ankoraŭ vidu ilin "propraj" aŭ "miaj"), du gamboj, kiuj portas aŭ tenas lin starigita.

Tiu simpla fakto, kiu estas teni sin stare (dupiedestado), forte kunlaboras en la formado de la spacaj konceptoj pri supre-malsupre, antaŭ-malantaŭ kaj dekstre-maldekstre, ĉiam nepre en la muldilo de dualeco kaj la kontraŭstaro. En la ĉap. II ni parolis pri la rilatoj inter la mio, la spaco, la tempo kaj la kaŭzeco, kiuj estis tiel bone priskribitaj de Jean Piaget dum ties studoj pri la infano de kvar- ĝis sepjaraĝa. Jean Piaget nomas tiun periodon "intuicia fazo de la kona disvolvo".

6) Sed longe antaŭ ol tio ĉi okazas, la infano komencas esti admonata de siaj gepatroj, ĉiufoje kiam ĝi malsekiĝas perurine aŭ malpuriĝas perfekte. Tio ĉi estas la komenco de la kondiĉado aŭ trejnado de la infano por tio, ke ĝi diferencigu inter tio akceptebla (n-ro 1) kaj tio neakceptebla (n-ro 2) en nia kulturo.

Tiu ĉi estas la periodo de la ĉagrenoj kaj infankoleroj kaj oni ofte trovas la ĉi-aĝan infanon (unu- ĝis trijaraĝa proksimume) en la ambautendenco (fari du aĵojn kontraŭajn) kaj la ambivalenco (havi du kontraŭajn sentojn).

Ne estas strange en tiu ĉi fazo vidi infanon plori dum ĝi mem ridas, aŭ vidi ĝin pugnanta tuj post kareso.

La muldilo por pensi (kaj esti kondiĉita) inter la kontraŭoj igas onin senti dualece kaj ankaŭ agi dualece.

7) Kaj se tio ĉi ne sufiĉas por fiksi la modelon por memori, rilatigi, imagi kaj pensi ene de la muldilo de la kontraŭo, tie konstante estas panjo kaj paĉjo, la 1 kaj la 2 (ambaŭ seksoj). Kaj kvankam estus nur patro sola, la diferenco inter ambaŭ seksoj ne povos esti nerimarkita en normalaj kondiĉoj.

Denove, lingva kuriozaĵo : la vorto "koruptado" etimologie signifas "rompadon en du partoj", kio estas elokventa sinonimo de la vorto "dualeco".

La procezo META estas tempo, estas spaco, estas celo, kaj estas la fragmentado mem, tial ĝi prezentas la nuran interferon al la unueca perceptado kaj estas neakordigebla kun ĝi.

La procezo META estas, kiel ni diris, kio deziras starigi rilatojn inter kaŭzoj kaj efikoj ; kaj ĝia agado okazigas la kontraŭstaron kaj havas ĝian originon en tio ĉi.

Tie ĉi ni havas ekirpunkton por la studado de la esenca naturo de la intrapsika konflikto, kiun la humanisma Psikologio de Maslow kaj Bühler ankoraŭ serĉas.

Dualeco, kontraŭstaro, spaco, tempo kaj celo rilatas al la neceso de "ŝanĝo". Mi estas kolerema aŭ mi estas kolera kaj mi devas igi min trankvila kaj pacema. Ekde tie ĉi mi ŝanĝiĝas vole ĝis tie ; ekde kio mi estas, mi iras ĝis tio, kio mi deziras esti.

Mi timas esti sola kaj malsekura, do mi vivas serĉante la sekurec-iluzion. En tiu serĉado mi izoligias elde la aliaj kaj de mi mem, eĉ kiam mi loĝus ĉiutempe kun iu en la sama domo.

Dio mem transformiĝas en "provizanton de fina sekureco", tiel mi falsas la signifon de la religio, kiu, laŭ nia lingvo, konsistas en tio : "ne doni al la procezo META pli grandan valoron ol tiun, kiun ĝi vere meritas". Tiu ĉi maniero koncepti aŭ interpreti la koncepton pri Dio pliriĉigas la mnemonikan procezon kaj ĝian produkton : "la mio". Kiam la laboro estas pli ol funkcio kaj servo kaj fariĝas rimedo por "pliriĉigi la mion" per la mono, la prestiĝo aŭ la rango, tiam aperas nova dualeco, fonto de konflikto. Tiu ĉi konflikto ne estos nur intrapsika. Tio interna, neeviteble malpurigos tion eksteran (la medion kaj la interpersonajn rilatojn). Laŭ tio, kiel estas la menso de la homo individue, tiel estos la socio, kiun li konstruos.

En nia planeda civilizacio, kiu estas esence la sama oriente kaj okcidente, norde kaj sude, kiam individuo unuiĝas kun aliaj por fari ion, li ne faras tion pro amikeca kaj spontanea kunlaboro. Li faras tion ĝenerale, serĉante iun celon, kaj plej ofte temas pri ideologia, idola aŭ imaga celo, kion en nia lingvo ni nomas "eidetika" celo.

Mi havas unu perceptadon pri problemo, kiu devas esti solvita. Aliaj jam havis la saman perceptadon de la sama



kruda problemo. (Bona ekzemplo estus tio, ke ni perceptis, ke ok el dek personoj en nia planedo suferas malsaton, misnutriĝon kaj analfabetismon).

Do ni organiziĝas (se ni farus tion), kaj la organizo iĝas pli grava ol tio, por kio ĝi estis kreita.

Ciuj ni sendube povas doni ekzemplojn pri partopreno en senutila organizo aŭ eĉ pli malbone, pri aparteno al organizo, grupo aŭ nacio, kiu kreas konflikton, malamon kaj eĉ morton inter la homoj.

Dum la serĉo de la celo, ni fragmentiĝas, kontraŭstaras unu la alian, ĝis la ekstremo murdi ; kaj tiel ĉio iĝas absurda kaj sensignifa.

## LA MENSO KIEL "CONTINUUM"

Ĉu du tipoj de cerbo kaj du tipoj de mensoj ?

Kio estas la kialo, ke ni konstruis kulturon aŭ, pli precize planedan civilizon, kiu emfazas ekskluzive kaj unufanke la funkciadon de la procezo META aŭ "linia" konscio (aŭ "mieca" konscio, t.e. de la mio)?

W.S. Mac Culloch, aŭtoro de la libro **Embodiments of Mind**, eĉ difinis la cerbon kiel "maŝinon, kiu ekestigas analogajn modelojn".

La serĉado de respondoj en la plej frua prahistorio, per la uzo de polemikaj antropologiaj metodoj, iĝis tre respektinda. Estas same, kvazaŭ la serĉado de la eblaj kaŭzoj, malproksime en la tempo, estus pli grave ol vidi tie ĉi kaj nun tion, kio vere okazas.

Rezultas de iuj antropologiaj studoj la spekulativa konkludo pri tio, ke estis inter la primatoj, kiujn oni konsideras "antaŭuloj" de la homo, almenaŭ du tipoj tute malsamaj de cerbo aŭ nerva centra sistemo :

- 1) la cerbo fruntotempia, prezentita prototipe far la **Homo habilis**, kies krania enhavo estis 500-kubcentimetra, kaj
- 2) la cerbo parietalokcipitalo, prezentita far la homo de Neandertalo (kaj la homo de Cro-Magnon), kies krania enhavo estis 1500-k.c.

Ŝajne, la tipo de primato posedanta la fruntotempian cerbon supervivis sur la tero dum preskaŭ du jarmilionoj antaŭ la ekapero de la parietalokcipitala cerbo kun la homo de Cro-Magnon kaj tiu de Neandertalo, kies ekzistado sur la planedo estis kompare tre efemera (eble ne pli ol 10000 jarojn).

Ambaŭ cerbotipoj verŝajne konverĝis kaj kunekzistis en ia punkto de la tempo.

Eble fruktas de tiu kunekzistado la salutoj, kiel levi la dekstran manon, kio eble signifus : "Mi ne portas armilojn por ataki vin" aŭ "mi povus ataki vin sed mi elektas ne fari tion".

La vorto "Hola!"(16) povus origini inter ili, kaj tiu vorto eble signifas pli-malpli la samon kiel la antaŭaj frazoj : "Mi ne dismembriĝos vin, ne fragmentigos vin, vi povos plu daŭri fizike kompleta".

Estas do facile vidi, kiel tiu vorto povus devenigi en la angla lingvo tiujn tri aliajn :

whole = kompleta kaj bona

holy = sankta kaj bona

healthy = sana kaj bona

Eble la fruntotempia cerbotipo estis je pli bonaj kondiĉoj krei lingvon, ilojn, armilojn kaj socion kapablan konkuri kun la hienoj pri la sama tipo de manĝaĵo, en la sama ekologia medio. (Vidu "**La Neandertalhomoj**" de Trinkaus kaj Howell, en "American Scientist", decembro de 1979).

Aŭ ĉu temas nur pri pli bona fizika kapablo por supervivado en la primatoj portantaj tiun cerbotipon ?

Eble la Homo Neanderthalensis havis pli grandajn fizikajn malhelpojn, sed ne mankas tiuj, kiuj fantazias pensante, ke ili havis iun tipon de mensostato tute malsaman, pli dispoziitan je la kontemplado ol je la lukto, je la telepatio ol je la ideo aŭ la parolo.

Ĉu do ni heredis cerbotipon pli "proksiman" al tiu de la Homo habilis ol al tiu de la Homo Neanderthalensis, kondamnita emfazi la procezon META (la mion) kaj do krei civilizacion eterne konfliktigan, kie la milito estas nur alia flanko de la duala strukturo de tiu civilizacio ?

Kiel ni vidos poste, la lastaj neŭrofiziologiaj esploroj (bonŝance) ŝajnas ne konfirmi la jesan respondon al la antaŭa demando.

Ne temus pri determinita mensotipo responde al "cerbotipo", sed pli ĝuste, pri formoj aŭ gradoj de integriĝo de la interneŭrona agado en iu ajn tipo de nerva sistemo (inkludante tiun de kelkaj primatoj tiel nomitaj "superaj").

Kvar gradoj de neŭrona integriĝo (mensa taksio)

Ekzistus du statoj (skemaj) ekstremaj de neŭrona integriĝo : la n-ro 1 aŭ prototaksia neŭrofiziologia stato, kie la

integriĝo kaj la ordo (taksis) de la mensaj procezoj estas minimumaj aŭ unuagradaj (protos), kaj la n-ro 4 aŭ holosintaksia, kie la ordo estas totala (holos) ene de la fiziologiaj eblecoj de la nerva sistemo.

Inter ambaŭ ekzistus almenaŭ du statoj plene rekoneblaj : la n-ro 2 aŭ stato de la procezoj META, konsciaj kaj nekonsciaj, kaj la n-ro 3 aŭ stato de la unueca perceptado.

1) En la stato n-ro 1, kiu estas pli precize stato de mensa disigo, ni lokos la psikozojn, komencante per la apokalipsa fazo de Conrad en la skizofrenio, kiun li priskribas kiel kompletan rompon de la sento de interna kohero kaj fragmentado de la psika vivo.

Proksime de tiu "mensa loko" ni lokos la kazojn pli-malpli gravajn pri alkoholismo, toksigemo, traumatoj, misnutriĝo, febraj infektiĝoj, ktp. La formo plej integra de la prototaksia stato estus tio, kion Conrad nomis firmiga fazo en la skizofrenio aŭ restaĵaj statoj de diversaj formoj de skizofrenio. Tio ĉi ebligus nin loki la nomitajn "trancstatojn" inter la apokalipso kaj la prototaksia firmigo : ni konsiderus kiel "trancojn"n la hipnozajn statojn laŭ ties diversaj gradoj, la farmakologia-psikedela tranco kaj la mistika-mediuma tranco. Mi scias, ke mi perfortas la nuancajn klasigojn de la fakuloj pri tiuj ĉi temoj, sed mi intencas doni ĝeneralan ideon pri kio estas "mensa taksio" aŭ interneŭrona integriĝo, pli ol pretendi solvi problemojn, kiuj estis kaj estos polemikaj dum multe da tempo.

2) En la stato n-ro 2 ni lokas kion ni nomas procezo META. Ni jam parolis pri tio ĉi, sed ni diros, ke en la nekonscia ekvivalento de META ni lokas la arketipon de Jung, la plej multon de la sonĝotipoj aŭ sonĝaj imagoj, la neŭrozojn priskribitajn de Sigmund Freud kaj la psikofiziologiajn aŭ psikosomatajn misordojn.

En la "konscia ekvivalento de la procezo META" ni lokas la ritajn aktojn, la mitojn, la imagojn, la idolojn kaj simbolojn, inkludante la idealon aŭ "ismojn". Tie ĉi lokeblas la plej vulgara formo de arto, kiun ni povas nomi mnemonika aŭ pseudokrea, produkto de nura apudmeto de ideoj kaj bildoj (kion ni nomas imago).

3) La stato n-ro 3 estas tiu de la unueca perceptado aŭ triangula konscio, kiu estas la ĉefa objekto de nia studo. Ĉi tie povus lokigi tiu tre rara formo de arto, kiu estas la krea arto ĝustasence, aŭ arto de rekonstituado de la realo malsame kiel la mnemonika arto, kiu estas arto de registro, aŭ imago.

4) Laste per la stato n-ro 4 aŭ holosintaksia, ni plenigas la skemon (kaj ĝi estas nenio pli ol tio), lokante en ĝin ekstremajn gradojn de mensintegriĝo : kion ni nomas karyon aŭ cirkla konscio, kaj eble tiujn statojn priskribitajn nur de certa tipo de literaturo, kiel la **satori** de la Zenbudhismo, la nirvano de la bramanoj aŭ la stato de ekstazo priskribita de la unuaj kristanoj antaŭ jam ĉ. 2000 jaroj. Uzante lingvon pli proksiman laŭ la histori-vidpunkto, ni memoru, ke Kartezio difinis la personon kiel refleksan konscion. La procezo META, laŭ ĝuste kartezia lingvo, estus refleksa konscio (kion ni nomas "linia" konscio).

La stato n-ro 3 estus (laŭ tiu kartezia lingvo, kvankam Kartezio neniam parolis pri tio) la unueca perceptado aŭ eksponita konscio.

La stato n-ro 4, kerna aŭ holosintaksia stato, kion ni nomas cirkla konscio, estus por Kartezio (supozeble) konscio pura.

### Holosintaksio kaj cirkla konscio

Okulfrapas vidi kiom da diverĝaj vojoj ekzistas en la esplorado de tiu ĉi problemo, kaj kiel ĉiu el tiuj "vojoj" aŭ sistemoj iĝas neeviteble ia formo de reduktismo aŭ fragmentado.

Ni invadis diversajn psikologiajn skolojn kaj filozofiajn alproksimiĝojn kiel ekzemple, la sanktan literaturon de la tuta planedo, klopodante trovi iun komunan faktoron, kiu orientu nian propran esploron.

Unu vorto, kiun ni vidis multfoje ripetita en niaj intelektaj invadoj (ne gravas, kiuj estis la "vojoj") estis la vorto "transcendeco".

En la nova psikologia paradigmo, la vorto "transcendeco" povas havi nur unu signifon : transcendi aŭ "trans-salti" la procezon META kaj ĝian produkton, la mion (kion ni nomas ankaŭ "la linia konscio").

Famaj psikologoj, nome Greenacre (koncepto de la infana miro), Winnicott (koncepto pri la transira fenomeno) kaj Oreland (koncepto pri djado kaj monado) vidas la problemon nur ŝajne malsame. Neniu el ili tri forlasas iam la procezon META, ĉar ili tri parolas esence, kvankam malsamvorte, pri nura mnemonika regreso. Ili ne vidas la plenan mensan ordon (holosintaksio) kiel kunfluron de variabloj holografiaj neŭropsikologiaj, epigenezaj kaj prikondutaj, sed kiel psikologiajn regresojn al pli komfortaj spertigaj fazoj, kie la bezonoj estas pli bone kontentigitaj.

Ne eblas ekspliki la transcendecon (aŭ eliron elde la mio) kiam la eksplikon oni restigas ĉiutempe ene de limoj de tiu mio, kiu estas ne pli ol memoro.

Carl Jung kaj Maurice Nicoll havis la meriton, ke ili retaŭgigis en psikologio la vorton metanojo, ĉerpita el la Nova Testamento aŭ Kristana Evangelio, kaj pri kiu ni parolis jam en la ĉap. I.

Erick Neumann, rilatigita al la du antaŭaj aŭtoroj, priskribis la "mistikajn fazojn" kaj distingis inter la regresa transcendeo, kiu estas psikologia reveno en la patrinan uteron, kaj la maturiga transcendeo, kiu estas stato de paca unuiĝo kun la mondo.

Maurice Bucke diris, ke la transcendeo de la mio aŭ transcendeo de la procezo META (por uzi nian terminaron) eblas nur post plena maturiĝo, kiu estas ne nur la maturiĝo neŭropsikologia aŭ mensa aŭ epigeneza, sed ankaŭ socia maturiĝo de la individuo en lia propra kulturo.

Deikman parolas pri malaŭtomatigo. Temas pri pli malrapida neŭrologia procezado, malfruigo de la perceptiga integriĝo, de kiu rezultas pligrandigo de la spacoj inter okazaĵoj. Tiu ĉi pligrandigo de la "perceptiga spaco" ebligas novajn perceptadojn kaj eĉ novajn kaŭzajn interferojn inter la okazaĵoj.

Oni diras, ke vegetarana dieto kaj adekvata spirado kombinita kun hatha jogo aŭ aliaj tipoj de gimnastiko, faciligas subtilajn modifojn en la sango pH (alkalecon), kio predispozicias la nervan sistemon je tiu stato de holosintaksio.

## LA NOVA PARADIGMO

Ni kredas tamen, ke meze de tiom da opinioj la nova psikologia paradigmo integrigas kaj samtempe simpligas ĉiujn aliajn vidpunktojn.

Ni diras, ke la mensa (aŭ neŭropsikologia) holosintaksio komenciĝas per la akto de vera perceptado, tiu perceptado, kiun oni nomas unueca.

Tiu simpla aserto ekaperas post kiam oni komprenis kiel la perceptado de la META-proceza dualeco kaŝe enmetiĝis en la deklaroj de Colingwood (1959), kiam li diris, ke la realo kaj ties interpretado estas neapartigeblaj.

La filozofia empirismo asertas, ke la menso faras nenion krom kopii la realon. Tamen, tiom de la epistemologio, kiom de la rimarkoj de Jean Piaget, rezultas la implico, ke la menso povas organizi la realon preskaŭ propraguste laŭ

tempo-spacaj sekvencoj kaj interpreti ĝin surbaze de modeloj de rilato kaŭzo-efiko, pri kiuj ni jam parolis.

Tio ĉi lasas malmultajn esperojn trapasi la "abismon" inter la observanto kaj la observataĵo, kaj ni preskaŭ povus konkludi, same kiel faris Kant, ke la rekta kontakto kun la realo estas nebla.

Tamen ni diras, ke tiu kontakto eblas, se la inteligenteco povas malkondiĉi kapablige la menson de tiu speciala stato de "refleksa" konscio, kiun ni nomas "linia" (aŭ procezo META). Ankaŭ ni asertas, ke ne ekzistas kontaktebleco kun la realo sen tiu "malkondiĉado". En la ĉap. V ni konsideris la neceson reformuli la fizikajn leĝojn ekster la modelo de la karteziaj koordinatoj, kiuj same kiel la pesilo kaj la lenso "helpas" nin interpreti la mondon surbaze de la dualeco, la komparo, kaj la interrespondo (inter objektoj kaj bildo respektive).

Ni konsentu, ke ekzistas unu interna konscio, kaj unu realo aŭ observebla fakto. Laŭ la naturo de la konscio, kiu agas en la menso (kaj ekzistas, kiel dirite, almenaŭ tri konscitipoj), tiel aspektos la realo, kiu manifestiĝos antaŭ tiu konscio. La linia aŭ esence duala konscio de la procezo META (penso) estos kondamnita ellabori instrumentojn kaj priskribojn, kiuj estos ankaŭ de duala naturo kaj registros (instrumentoj) aŭ interpretos (teorioj aŭ priskriboj) nur fragmentajn aspektojn de la faktoj kaj la realaĵoj.

Temas pri okazado en nia menso de vera sensa revolucio. Temas pri tio, ke ni lernu denove la agojn vidi kaj aŭdi. Temas pri tio, ke la ago vidi fariĝu pli grava ol la objekto vidita kaj ol la bildo aŭ registro de tiu objekto, kiu konservas la procezon META.

Ni povas diri ĉi tion laŭ kelkaj malsamaj manieroj, se ni transdonis ne la esencon de kompreno, de kiu dependas nenio malpli ol :

- 1) la postvivado de la homaro kaj
- 2) la kvalito de tiu postvivado.

Ni estas parolantaj pri la neceso rekte percepti kaj ne pri simpla rekono de ideoj, personoj kaj okazaĵoj.

Ĉe la okazo de emocioj ni diras, ke senti koleron estas la faro de unueca perceptado de la kolero, kaj ke tiu perceptado estas solviga ago, tio estas, ke vidi aŭ senti la koleron estas ĝia fino, kiam ni ne disigas nin disde la kolero dirante "mi sentas koleron", per kio ni kreas la disiĝon inter la observanto (la mio) kaj la kolero (tio observata).

De tiu disiĝo (kiu estas dualeco) estis naskita la kolero, kaj subteni la dualecon estas ne pli ol kontinuiĝi la emocion (procezon META).

Vidi sen bildo kaj sen objekto diferencas de vidi ion. Kiam oni vidas ion, aŭtomate kreiĝas la dualeco inter la observanto kaj tio observata (io aŭ iu).

Tio ĉi similas diri, ke liberiĝo ne estas same kiel liberiĝi de io aŭ iu.

Mi kredas, ke estas facile vidi, se ni sekvis lerte kaj zorge tion diritan, ke tiu ideo pri liberiĝo, kune kun la iluzio de la serĉado de sekureco, estas la grandaj kolonoj, kiuj subtenas la ideologiojn (kaj la fatalajn kontraŭstarojn inter ili) tiel, kiel la senfina fermita cirklo inter la konscio de la individuo kaj ties propra kulturo.

Metafore, tiel kiel la fajro okazigas la cindron, sed la cindroj povas nur estingi la fajron, la pura ago vidi povas rilati al la procezo META, sed ĉi lasta estas letala por la ago vidi.

Estas kurioze vidi, ke germane la vorto "objekto" (ding) estas parto de **bedingen**, kiu signifas "tio, kio determinas aŭ kondiĉas". Estas klare, ke kiam la objekto kondiĉas aŭ determinas agon de memoro, kiun ni nomas bildo, ideo aŭ emocio, la ago vidi jam finiĝis; la rekta kontakto kun la realo jam finiĝis.

Se tio ĉi ne sufiĉus, la procezo META kaj ĝia produkto, la "mio", estas unueca realaĵo, kiu havas la raran eblecon respuguli kvazaŭ ĝi estus nova realaĵo. Tiu ĉi estas la enfalilo, kien falas Maurice Nicoll, kiam li parolas pri la bezono krei "mion observantan", en sia verko **Psikologiaj komentarioj**. Tiu estas ankaŭ la enfalilo de la psikanaliza metodo mem, kiu esence konservas la dualan fragmentadon inter la observanto kaj tio observata.

Laŭ grafika aŭ eidetika maniero, ni dirus, ke nia kulturo montras al ni televidajn programojn pri "nigraj truoj" kaj "novaĵoj", sed ne stimulas la unuecan perceptadon de soleca piedirado en la obskura nokto sub la steloj. La interŝanĝo de simboloj anstataŭas la rektan kontakton kun la realo.

Estas ĝojo kaj delico en tiu rekta kaj profunda kontakto kun persono, ekzemple, sed tiu ĝojo estas malsama al la plezuro, kiun oni klopodas ripeti ĉe la altrudema maltrankvileco de la procezo META.

Tiel ankaŭ aŭskulti estas malsame kiel konkludi. Konkludo estas opinio, tradicio, kredo, ideologio, komparo, kondamno

aŭ senkulpiga defendo, ĉio ĉi estas implicita en niaj metodoj kaj teknikoj.

Tiu vojo de la metodoj kaj la konkludoj implicas penon direktitan al celo, kiu estas dualeco kaj fragmentado. Tiel ni perdas nian tempon kaj energion kaj ankaŭ la ŝancon vidi la homan problemon totale (en unueca perceptado).

La metodo kaj la konkludo estas produkto de la penso, la rezultato de la mnemonika historio, individua kaj kolektiva.

La unueca perceptado, male, kun sia speciala formo de konscio, estas la unika ebleco de adekvata kaj ordigata agado, ĉar ĝi estas rekta kontakto kun tio, kio estas; sen la distordo aŭ interfero de tio, kio estis. Tiu ĉi estas la solvo de la kreskantaj homaj problemoj, multaj el ili sen precedentoj en la registrita historio de la homo sur la tero.

La procezo META kaj ties produkto (la mio) emfazas la informiĝon, bazon de nia kulturo kaj civilizo. La procezo META estas logika rezonado, komparo, mezuro kaj intelekta agado, plenbonkaze. Sed la unueca perceptado estas en si mem tiu transformado, kiun la homo bezonas por plu vivi digne en tiu ĉi planedo.

## DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

*Demando : Ĉu vi povus etendi viajn parolojn pri la neŭrofiziologio de la prototaksia kaj holosintaksia statoj?*

Respondo : Ni penetris sufiĉe en tio dum la lastaj jaroj. Karl Pribram, profesoro pri Neŭropsikologio en la Universitato de Stanford, ravigis pro la fakto, ke al komencaj tavoloj de la retino kaj al la nervaj retoj de la flarbulbo tute mankas nervaj impulsoj. Granda parto de niaj vidaj kaj flarsensaj spertoj (eĉ se oni diferencigas flarsenson disde gustosenso) devenas fine de certaj informoj elektroke procezitaj pere de neŭronaj cirkvitoj.

Dum multaj jardekoj ni asertis, ke la nerva sistemo konsistas el unuoj nomitaj "neŭronoj". Tamen, neniuj pruvis la ekzistadon de unu nerva ĉelo disigita de la aliaj en la cerba histo. La elektronika mikrografio montras, ke la dendritoj havas plurajn kontaktajn punktojn kun diversaj komponantoj de la nerva histo kaj ne nepre (kiel ni lernis en la klasoj de baza neŭrologio) kun la finiĝoj de la alineŭronaj aksonoj [efaptika(17) kontakto].

Estis la gravaj Bielchowsky kaj Golgi, kiuj asertis, ke



ekzistas esenca kontinueco de la nerva histo.

Sherrington, en 1947, trovis alarmajn dissimilojn inter siaj studoj pri la "elektrofiziologio de la nervaj trunkoj" kaj la rezultatoj de la prikonduta esploro de la reflekso. Sherrington solvis la problemon, parolante pri fenomenoj je nivelo de la sinapso, sufiĉe kompleksaj por ekspliki la konduton de la reflekso.

Karl Pribram parolas pri duobla mekanismo, kie polisinapsaj strukturoj de malalta potencialo disvolvus agadon nerilatisigitan kun la akceptema aŭ centripeta kampo de iu speciala neŭrono.

Tiuj polisinapsaj strukturoj estas multe pli ol "etapoj" de la nerva impulso. Ili estas unu el la partoj de tiu duobla mekanismo kun disigita neŭrofiziologia kaj neŭroelektra agado, kie ne nur alvenas nervaj impulsoj, sed ili transformiĝas por "reveni" en la korpon de la neŭronoj (la alia parto de la duobla mekanismo), kies impulsoj estas, siavice, transformitaj far tiuj de la polisinapsaj strukturoj.

George Bishop diris en 1956, ke la plej gravaj neŭronaj funkcioj realiĝas pere de gradigitaj reagoj, kie la efaptikaj kaj sinapsaj okazaĵoj de la jam menciitaj polisinapsaj strukturoj (precipe je dendrita kaj ne aksona nivelo) ludas ĉefan rolon.

Eksperimente oni atingis la gvidatan kreskadon de nervaj mikrofibroj (ni scias, ke la neŭronoj ne reproduktiĝas) kaj tiuj ĉi novaj fibroj ŝanĝas la spacan aranĝon de la polisinapsaj strukturoj.

Ŝanĝoj en tiuj ĉi spacaj aranĝoj kaj vastecoj de la polisinapsaj strukturoj, ŝanĝoj de potencialo, inhibiciitaj interagoj, ktp, determinas neŭronajn organizaĵojn "efemerajn" aŭ plimalpli nedaŭrajn, tiel, kiel malsamajn gradojn de "neŭrofiziologia integriĝo", kiun en nia nova nemensisma lingvo (laŭ tio, kiel interpretas la "mensismon" la ortodoksaj neurologoj), ni nomas "mensa taksio". Ni havos tiel, ekde la "prototaksiaj statoj" ĝis la "holosintaksiaj statoj" antaŭe jam priskribitaj, kun siaj respektivaj "statoj de konscio", kiujn preskaŭ ĉiuj el ni travivis, kvankam kelkajn el ili oni ne "memoru" - pro tio, ke ili ne apartenas al la procezo META konscia.

*Ĉu vi bonvolus aldoni ion pli pri la holografia funkciado de la cerbo ?*

Respondo : La holografiaj modeloj okazas je malsamaj niveloj. Ekzistas kompleksa interago de tiuj niveloj. La studado

de la formado de vidaj bildoj en la simio pravas, ke la impulsoj determinas elektran eksciton en certaj punktoj (aŭ pli bone dirite, holokinetikan eksciton, kiun oni registras per instrumentoj por detekti unu el la formoj de la holokinetiko, kiu estas la elektro). Sed la ŝanĝoj de la potencialo en la vidada ŝelo de la simio estis determinitaj ne nur far la vidaj stimuloj, sed ankaŭ far la kontingencoj de refortigo kaj la intenco mem respondi, laŭ iu aŭ alia maniero.

Kiam du fontoj de energiondoj kunfluas al sama punkto ekde du malsamaj originoj, ili determinas modelojn aŭ muldilojn de interfero en la tuta ĉirkaŭa nerva histo, same kiel okazas en la holografia negativo. Karl Pribram diris, ke la holografio povas esti pli ol analogeco ; ĝi povas esti vera homologeco, t.e. la reala maniero kiel funkcias la nerva centra sistemo.

Ni povas ĝislaciĝe spekulativi pri la distribuo de tiuj muldiloj de interfero (eble en la polisinapsaj strukturoj de malalta potencialo), sed plej gravas sendube la principo mem. Tiu ĉi principo estas, en si mem, tiu, kiu transformis la manieron kiel oni realigas la esploradon en neŭrologio kaj psikologio, la manieron kiel oni instruas psikologion kaj iam sendube, la manieron kiel oni praktikas la psikoterapion. Surbaze de tio ĉi, aperis la koncepto pri unueca perceptado, kiu, kiam fariĝas realo en nia ĉiutaga vivo, transformas ĝin totale.

*Ĉu tiuj muldiloj de interfero projekciigas aŭ distribuiĝas en la polisinapsaj strukturoj laŭ la tuta amplekso de la cerbo ?*

Respondo : Eble ne sur la tutaj supraĵo kaj profundaĵo de la cerbo. la regionoj, kiuj partoprenas en la holografia distribuado, estos tiuj, kie la "polisinapsaj kaj neŭronaj organizoj" estas la malplej efemeraj aŭ nedaŭraj ekde sia ekaktiviĝo, kiun determinas la stimuloj.

*Ĉu tio ĉi, kion vi diras, fine detruos la konceptojn de la klasika Neŭrofiziologio ?*

Respondo : Neniel. Kion oni klopodas priskribi, tio nur pliriĉigas la klasikajn konceptojn. Ni iom forigas la emfazon, kiun oni donis al la kondukado de nervaj impulsoj laŭlonge de la aksono, sed oni pli emfazas la polisinapsajn mikrostukturojn (ĉefe en la dendritaj retoj) de malalta potencialo. Ĉefe, ni havas unuafoje modelon, kiu estas pruvebla en Fizioko (kaj praktika por produkti tridimensiajn fotografaĵojn), kiu ebligas al ni kompreni pli bone multajn neŭrofiziologiajn

procezojn (vidu **Lingvoj de la cerbo**, de Karl Pribram) kaj kiu pliriĉigas la Psikologion, provizinte mekanismon, kiu eksplikas la plej diversajn fenomenojn en la mensa sperto de la homo.

Ĉiunaniere, ekzistas danĝero, pri kiu mi ne scias kiom da ĝi ni kapablas vidi.

En via intereso (kaj en mia intereso) kompreni la mekanikon de la procezo, kompreni "kiel okazas tio ĉi" (kvankam ni estus komprenintaj la demandon pri la kialo per la konsidero de la pluraj modeloj de kaŭzaj rilatoj), ni povas perdi la totalan vidadon de ĝuste tio, "kio vere okazas" je psikologia nivelo, kaj tio ĉi lastdirita estas eksciebla nur pere de la unueca perceptado.

Priskribi kiel okazas io (ĉi-kaze la neŭropsikologia integriĝo) estas parto de la agado de la procezo META. Tiu ĉi estas natura intereso, kiu estas la unika emfazita de niaj kulturoj.

Koni kio okazas ene de tutaĵo, estas eble nur en unueca perceptado. Tiu ĉi natura, rekta kaj intermita kontakto kun la realo, ne estas stimulata far nia edukado kaj ne strangas do, ke ĝi plejofte perdiĝas, kiam la individuo plenumas sian fizikan disvolvon.

## IV

# DIFERENCAJ NEŬROFIZIOLOGIAJ AU MENSAJ STATOJ \* MALDORMO KAJ DORMO<sup>1</sup>


La dormo ne estas stato de kvieteco aŭ senkonscio. La dormo estas tucerte mensa stato, sed ne homogena stato. Ernest Hartmann, kuracisto de la Universitato de Harvard, difinas ĝin stato de neregula, recidiva, returnebla konduto karakterizita per certa psikosensa diskonekso kun la medio.

Oni studas ĝin en malgrandaj laboratorioj kun grandega konsumo de tempo kaj mono, per tri registro-tipoj :

- 1) elektroencefalografia,
- 2) grafikado de la okulaj movoj, kaj
- 3) elektromiografia (18)

Surbaze de tiuj ĉi registroj ni diros, ke la dormo ne estas homogena stato, sed ke temas pri ciklo (precipe elektroencefalografia). En la normala dormo tiu ĉi ciklo estas ĝenerale laŭ la skemo : ekde la maldormo oni pasas al la sinkronigita (S) dormo, kaj post 90' de tiu ĉi dormo (kiu inkludas 4 fazojn), oni pasas al la dissinkronigita (D) dormo dum proks. 20' kaj poste reas tiu ĉi ciklo, proksimume kvar aŭ kvin fojojn ĉiunokte. De tiu ĉi ciklo oni konas precipe pli-malpli supraĵan epifenomenaron bazitan sur tiuj tri menciitaj registroj kaj grupeton da neŭrofiziologiaj konkludoj, kiuj multokaze ankoraŭ estas malprecizaj aŭ empiriaj.

Figuro 1. Ciklo de la dormo kaj maldormo



La registroj ne nur estas multekostaj - pro tio ke ili daŭras minimume ok horojn en ĉiu subjekto, kaj estas tri malsamaj tipoj, krom bezoni la atenton de teknika personaro alte specialigita laboranta ĝenerale dumnokte - sed cetere la multnombraj elektrodoj konektitaj al la subjekto nepre interferas la komforton necesan por "normala" dormo kaj postulas la adaptiĝon de tiu subjekto. Juna plenkreskulo pasigas 6 % de sia dormotempo en la fazo 1 de la sinkronigita dormo, 50 % en la fazo 2, 7 % en la fazo 3, 16 % en la fazo 4 kaj 20 % en la dissinkronigita dormo de la rapidaj okulaj movoj, kaj kiun oni rilatigas kun la sonĝaj imagoj plej intensaj. Tiu ĉi procento estas sendependa de la sonĝoneceso, kiun William Dement senvalidigis en 1965. Tiuj ĉi procentoj estas de Laverne Johnson (direktoro de psikofiziologiaj esploroj en San Diego, Kalifornio).

Oni pasigas 1 % de la tempo kun korpaj movoj kaj la dormo de la fazo 4 kreskas en la adolto, sed post la aĝo de 40 jaroj malpliiĝas ĝis malapero, je 50 aŭ 60. Neniu alia dormofazo rezultas tiom okulfrape modifita pro la aĝo, kiel la fazo 4.

La dormon S de la fazo 4, kiu elektroencefalografie estas dormo de malrapidaj ondoj (maltrafe nomita profunda), kun 25 procentoj da deltaj ondoj, oni vidas precipe dum la unua triono de la nokto. En la finaj partoj de dorma nokto, oni registras elektroencefalografian alternadon inter la dormo D kaj la fazo 2 de la dormo S. Pro iu nekonata kialo, la dormo D estas pli longa ĉe karnovoraj ol ĉe herbovoraj bestoj.

Oni diras, ke la dormo D (maltrafe nomita sonĝa) - de rapidaj okulmovoĵ - estas vera anomalio de la konduto, kiu konsistigas 85 % de la "dormo" de la ĵusnaskito, pro kio oni rilatigas ĝin kun la primitiva agado de la nematura nerva sistemo. Post la unua vivjaro tiu dormo D fariĝas nur 20 aŭ 25 % de la tuta dormo.

Se oni senigas al persono elekte la dormon D, oni diras, ke pliiĝas lia koleremo kaj la penso de tipo unuagrada procezo (fantazioj, sonĝoj kaj primitivaj imagoj kondensitaj, simbolaj, sen ordo kaj sen kronologio, movitaj precipe far la plezur-principo).

Ne ĉiuj esploristoj povis konfirmi tiun ĉi trovaĵon. Jam en 1969 Dewan asertis, ke la dormo D utilas en la rolo de procezado de informo, kribrante, procezezadante kaj akumulante la mensan agadon de la antaŭa maldormo. La studoj kun bestoj ŝajnas konfirmi la rilaton inter la dormo D kaj

la procezo META, same kiel la studoj de Chernik kun homoj en 1972, kiu studis la memoron kaj la lernadon en personoj senigitaj de la dormo D. Mirigas legi la artikolon de Evans kaj Gustafson en la revuo **Science**, n-ro 152, 1966 ; ili informas, ke eblas sekvi kompleksajn instrukciojn kaj eĉ plenumi ordonojn dum la dormo D sen vekigi. Plie, instrukcioj prezentitaj dum unu fazo de dormo D estas memorataj kaj plenumitaj dum postaj fazoj de dormo D, ĉu en la sama punkto, ĉu en sinsekvaj punktoj.

Sed la dormo havas multajn karakterojn de la profunda dormo kaj pro tio oni nomas ĝin ankaŭ "paradoksa".

1) La dormo D ŝajnas delikata en la elektroencefalogramo (ondoj de aktivigo teta, similaj al tiuj de la maldorma encefalogramo).

2) Sed samtempe ĝi ŝajnas "profunda" aŭ "peza" en la elektromiogramo (EMG), kiu registras atonion de la dugastra muskolo, similan al tiu, kiun oni vidas dum la timiga muskola kolapso de la narkolepsiuloj, kies dormo rekte komenciĝas per la dormo D.

En tiu ĉi dormo-tipo, daŭras tamen la eksterokula muskola tensio (rapidaj okulaj movoj dum tiu fazo), same kiel tiu de la porspiraj muskoloj kaj de la meza orelo.

3) La sojlo de ekscitado estas altvalora en la dormo D, tio estas, ke necesas pli granda stimulo por veki la subjekton elde tiu dormotipo.

Ĉi-sence, la dormo D estus ankaŭ sonĝo profunda.

Tamen la vortojn "profunda" aŭ "malrapida" oni aplikas por la fazo 4 de la dormo S.

## **ĈU ESTAS LA PENSO IU FORMO DE HIPNOTO ?**

La altvalora sojlo de ekscitado (malfacileco vekigi antaŭ mediaj stimuloj), kiun oni observas dum la dissinkronigita dormo kaj la evidenta rilato inter tiu dormo-tipo kaj la mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika procezo (procezo META) igis onin pensi, ke la plej ordinara modalo de nia mensa funkciado (la procezo META) povus esti speco de hipnota stato.

La eksperimento de Bernheim. Tiu ĉi eksperimento, facile reproduktebla kaj tial ĝenerale unuavice instruata en la kuracistaj ŝtaĝadoj en Usono, konsistas en la posthipnotita plenumo de ordono : "Nun vi eliros de la hipnota stato kaj per fingre nombros ĝis 3, tuj post kiam mi diros al vi 'adiaŭ' ".

Tuj post kiam la hipnotisto diras 'adiaŭ', la subjekto

nombras per siaj fingroj ĝis tri, kaj kiam oni demandas al li, kial li tiel nombris, li kapablas doni nenian eksplikon ; tiam li inventas racian aŭ logikan eksplikon, kiel ekzemple : "Mi estis mense reordiganta kion mi devos fari morgaŭ matene". La subjekto forgesas la sugeston (kondiĉadon).

Ekzistas granda probableco pri tio, ke la tuto de la intrapsika vivo de la homo, kiun ni nomas "procezo META", estus la rezultato de sugestoj originintaj en diversaj partoj de la socio (hejmo, televido, lernejo, religiaj aŭ politikaj organizoj, ktp) kaj kiuj kondiĉas la menson laŭ maniero aganta same kiel la eksperimento de Bernheim.

La kreado de la "mio" far la procezo META kaj la neakordigebleco de ĉi-lastata kun la unueca kaj rekta perceptado de kio vere okazas, determinus la neperforteban kredon (ankaŭ kondiĉitan per la socikultura medio), ke ni agas vere kiel konsekvenco de individua sendependa volo.

Tiu ĉi "libervolo" ne estus alia procezo ol tiu de konstanta stato de posthipnota sugestio, kiel sugestas la eksperimento de Bernheim.

La dormon de la fazo 4 oni nomas malrapida kaŭze de la elektroencefalografiaj ondoj delta, kaj profunda pro tio, ke kiam oni vekas iun de tiu dormo, ne estas vera stato de atento, ĝis post certa tempo.

La subjekto estas iom pli perturbita aŭ konfuzita, kvazaŭ li revenus de mensa mondo ekstera al la vortoj, bildoj, memoroj kaj revoj.

Tamen, kelkaj esploristoj subtenas tion, ke subjektoj, kiujn oni vekis en tiu fazo, rakontas ankaŭ pri sonĝaj imagoj (aŭ sonĝoj).

Tio ĉi povus okazi, ĉar :

- 1) la subjekto memoras sonĝojn de unu fazo D antaŭa (vidu Evans kaj Gustafson, Science, n-ro 152, 1966), aŭ
- 2) la procezo META invadas la fazojn 3 kaj 4, kie normale ĝi ne intervenus.

Tio ĉi rezultus de la superstimulado far la ĉiutaga vivo, per sia televido, labora kaj interpersona maltrankvileco kaj la konstanta emfazo almetita sur la parola kaj mnemonika procezo.

Ni faru du gravajn demandojn :

Ĉu estas la kerna stato atingebla dum la fazo 4 de la dormo S ? Ĉu oni atingas la kernan staton dum la fazo 4 pli facile ol kiam ekzistas certa objekta senigo nomita sensa

senigo? (Vidu Azima, "Sensory deprivation", 1961; Brownfield, "Isolation", 1965 ; Snedfeld, "Sensory deprivation in redcigar smoking", 1973 ; Zubek, "Fifteen years of research", 1969 kaj 1974).

Laverne Johnson mem, kiu neas riparivan funkcion al fazo 4 de la dormo S, asertas, ke se ekzistas periodo de kvieteco en la dormo, tia estas tiu de la fazo 4, kun siaj malrapidaj ondoj (delta) el la elektroencefalogramo. La korpa moveco en tiu ĉi fazo estas preskaŭ nula kaj, kiel ni jam diris, kiam oni vekas la subjekton en tiu ĉi fazo, estas por li pli malfacile respondi efike, ol kiam oni vekas lin en la fazo 2 de la dormo S aŭ en la dormo D.

Laverne Johnson neas la riparivan funkcion de la dormo 4 baziĝinte nur sur studoj pri elektita senigo de la dormo, en kiuj oni ne trovas diferencojn de efikeco en la konduto de individuoj sen dormo D aŭ sen dormo S respektive.

Tamen, pli detala studo montras jenan fakton :

1) Dum la dormo de malrapidaj ondoj, oni trovas spontanajn reagojn galvanajn de la haŭto, kiuj komenciĝas dum la fazo 2 sed pliiĝas en la fazo 4. La intenso en la fluktado de la dermaelektra agado determinis, ke oni baptis tiun agadon per la nomo "dermetelektraj ŝtormoj". La agado de energiaj kurentoj dum la fazo 4 de la dormo S eksurprizas la esploristojn. En epilepsiaj pacientoj la elektroencefalografiaj malŝarĝoj de konvulsia tipo pliiĝas, laŭmezure kiel la dormo proksimiĝas al la fazo 4. Ni demandas nin : ĉu ekzistas iu tipo de neŭrofiziologia integriĝo de alta energio en la fazo 4 de la sinkronigita dormo ? Malfacilas integri ĉiujn ekzistantajn konataĵojn pri la fazo 4 kun tio, kio okazas dum nuraj elektrolizaj ŝanĝoj en la sanga sero.

2) Takahashi kaj Kipnis studis en 1968 la sekreciaron de la hormono de kreskado dum la dormo. Ili pravas (kaj aliaj poste konfirmos), ke la hormono de kreskado estas sekreciata dum la unuaj horoj de la nokta dormo ekskluzive, t.e. en tiuj momentoj, kiam okazas la fazo 4 de la dormo S. Estas malfacile lasi senrilatiga la fazon 4 kun agadoj de energio, kreskado kaj regenerado en la homa organismo.

3) Tio ĉi konfirmiĝus per la nenebla fakto, ke la fazo 4 pli longe daŭras post intensa fizika ekzerco, kiel pruvis Baekeland kaj Lasky en 1966, studante la dormon de universitataj atletoj.



4) La studoj de Laverne Johnson pri tuta kaj parta senigado de dormo montras, ke la taksadojn de konduta efikeco oni faris per aritmetikaj taskoj, la Testo de tuja memoro de vortoj de Williams kaj la Testo de seria adicio. Johnson konkludas, ke la totala defcito de dormo estas kio malpliigas la efikecon dum la maldormo, kaj ne la defcito de iu speciala dormotipo. Ni memoru, ke la mezuro de agado aŭ maldorma energio estas nura taksado de taskoj rilatigitaj kun la mnemonika eidetika procezo, kaj tiu procezo rilatus nur al la dormo D, kaj multe malpli (aŭ eĉ neniamaniere) al la dormo S normala (vidu la punkton 7).

5) Ni jam diris, ke post la aĝo de 40 jaroj, la fazo 4 de la dormo S malpliigas ĝis malaperi je la 50- aŭ 60-jaraĝo. Ĉu okazas ĉi tie disigo disde neŭrofiziologia stato de integriĝo, ekvilibro kaj regenerado ; disigo, kiu estus unu el la manieroj ekspliki la morton de la organismo ?

6) Ne nur la maljunuloj perdas la kapablon dormi en la fazo 4. Tio ĉi okazas ankaŭ al kiuj konsumadas alkoholon troe.

7) En 1967 Agnew, Webb kaj Williams faris komparon de la efikoj de la senigo de la dormoj D kaj S 4 en dek du subjektoj. Ili konkludis, ke la defcito de la fazo 4 en ses subjektoj kaŭzis deprimon kaj hipokondrion. La defcito de la dormo D en la aliaj ses subjektoj kaŭzis en ili ekscitiĝemon kaj emocian labilecon.

Malfacilas lasi la regeneradon kaj la gajecon ne rilatigitaj al la fazo 4 de la dormo S.

La malpliigo de serotonino(19) kaŭzita per paraklorofenilalanino (PCPA) ankaŭ kaŭzas malpliigon en la daŭrado de la sinkronigita dormo (Jouvet en sia artikolo "Neŭrofiziologio de la dormostatoj", *Physiological Review*, n-ro 47, 1967) Ni scias, ke troigas teorioj, kiuj rilatigas la malpliigon serotoninan al la fizika kaj emocia deprimado. Estas kurioze, ke ankaŭ la malo estas vera : tiuj deprimitoj dormas pli en la dormo D ol en la dormo S.

8) Estas bone memori, ke tiom la diazepam (la sedativo kaj muskola malstreĉilo plej uzata), kiom la flurazepam (la dormigilo plej kutima) forigas la staton 4 de la dormo S.

## NOKTAJ TERUROJ

Por fini la aferon, ni reproduktas la komenton, kiun okazigis la interveno de iu el la partoprenantaj kuracistoj.

*Demando : La ekzisto de la noktaj teruroj (pavor nocturnus) dum la fazo 4 de la sinkronigita dormo ŝajnas malfavori la rilatigon, kiun vi faras inter tiu fazo kaj tio, kion vi nomas "kerna stato".*

Respondo : Ni devas tre zorge diferencigi tion, kio estas simbolo, disde tio, kio estas realo. Ankaŭ necesas rimarki la naturon de la rilatoj inter niaj simboloj ĉi-okaze parolaj, kaj la realo, kiun ili pretendas reprezenti.

Kio estas "teruro" ?

Ege impresas vidi atakon de nokta teruro kaj ĉe knabo kaj ĉe adulto, sed kurioze, la malplej impresita estas la viktimo mem de la atako. Ni nomas "teruro" la fakton, ke persono sidiĝas en sia lito kaj senbride krias, eĉ kiam post vekigo li memoras absolute nenion, kio okazis. Kion ni faris, tio estis interpreti konduton surbaze de nia mnemonika enhavo. Estas la procezo META, kiu estigas la rilaton kaŭzo-efiko, nomante "teruro" al tiu sonĝa aŭ sonĝoida konduto.

Vi scias, kio okazas, kiam trijara infano ektrovas siajn gepatrojn sekse kuniĝantajn. La interpretadon de tiu nomita "unuagrada sceno" oni faras laŭ la mnemonika enhavo de tiu menso apenaŭ trijara, kaj tial ke estas neniu sperto en ĝia propra spertaro, kiu eksplikus tiun novan percepton, do la infano nepre estigas distorditan rilaton kaŭz-efikan, kaj diras : "Paĉjo estas batanta (aŭ atakanta) panjon".

Tiel agon de amo oni interpretas kiel agon de malamo, kaŭze de la naturo de la procezo META kaj laŭ la riĉeco aŭ malriĉeco de la mnemonika enhavo.

Simpla disekvilibro en la funkciado de la cerba ŝelo povas determini aŭtomatan konduton, kiun ĝenerale oni interpretas kiel intencan. Ekz. la simptomaroj de hiperkontakto kaj diskontakto alokorteksaj (tempia epilepsio kaj sindromo de Kluver-Bucy, respektive).<sup>2</sup>

Alia klasika ekzemplo estas la paciento, kiu suferas koreon de Huntington : nevola movo de la brako estas embara, do la malsanulo daŭrigas la aŭtomatan movon per intenca movo (li kombas sian hararon aŭ rearanĝas siajn vestojn) por komprenigi onin, ke la tuta movo estis intenca.

La fakto estas, ke en la nokta teruro la paciento ne suferas teruron, kaj la vorto "teruro" estas nur la interpret-

ado de la observanto.

La ĵus diritan punkton teruron oni ne devas konfuzi kun la sufersonĝoj, kiuj estas multe pli oftaj kaj estas parto de la dormo D.

La nokta teruro estas ekscita disordo, kiu okazas, kiam oni eligas el la stato S 4 (Tom Anders de la Universitato de Stanford).

Verŝajne la nokta teruro estas pli maniero eniri en la dormon D ol stato S 4 (same kiel la enurezo kaj la somnambulismo). Grupoj da delta-ondoj antaŭiras la fenomenon, kiu normale okazas en 85 procentoj el la infanoj inter 6 kaj 11-monataj (kaj nur en 3 % el la infanoj 7-jaraj), kaj estas indico de organisma nematureco de la nerva centra sistemo en tiuj ĉi statoj de "nokta teruro" kaj somnambulismo (Anthony Kales, Arĥivoj de Ĝenerala Psikiatrio, 1966).

Tiuj ĉi statoj okazos do nur en individuoj nematuraj. Ni memoru nian difinon pri "menso" : integriĝo de la agado de la nerva sistemo centra kaj periferia, vola kaj nevola, ekde la cerbo ĝis la mjela konuso, kiu realiĝas je diversaj niveloj, ĉar partoprenas laste la tuta organismo en tiu integrata agado. Laŭ tiu ĉi difino, la nokta teruro okazas en infanoj "mense nematuraj", kio neniel rilatas al epigenezaj aŭ intelekta malfruiĝo. Tiu ĉi "malfruiĝo" estus nur miso ĉe la procezo META.

Ni rajtas diri, ke en la procezo META ekzistas neŭrofiziologia agado ne integrata. Malsamaj centroj laboras preskaŭ sendepende por reguli malsamajn funkciojn ŝajne sendependajn.

En la kerna stato la neŭrofiziologiaj centroj funkcias kun pli da kunordigado, pli da integriĝo, pli da produktado kaj malpli da energi-konsumo kaj la fiziologia ekvilibro (aŭ ĝenerala homostato de la organismo) estas pli sekura.

En tiu ĉi stato, la ŝanco vivi psikologiajn statojn de integriĝo (holosintaksio aŭ cirkla konscio) estas ankaŭ pli granda.

## V

### EBLA HISTORIO DE LA NOVA PSIKOLOGIA PARADIGMO

La historio de la psikoanalizo (unua paradigmo) komenciĝas, laŭ kelkaj, en la antikva Grekio post Sokrato kaj antaŭ Jesuo Kristo.

Almuldigante la faktojn similmaniere, ni povus diri, ke la nova paradigmo komenciĝas en la ĉapitro VII de **La Respubliko** de Platono ; almenaŭ se ni ekivalentigas la lumon kun la ordo mensa kaj kosma manifestiĝinta (aŭ implicita) kaj la kavernon kun la ordo emerĝanta "malvolvita" kaj mezurebla de la universo.

La notlibro de Leonardo de Vinĉi havas priskribojn de la vida perceptado, kiuj multe similas la niajn ; io, kion ni malkovris antaŭnelonge.

Gottfried Wilhelm von Leibniz, eltrovinto de la diferenĉiala kaj integrala kalkuloj, diris, ke estas subkuŝanta realo generanta la materian koneblan universon. Spaco kaj tempo estas por li nur intelektaj konstruaĵoj. Ni ĝojas scii, ke tio ĉi estis memvidebla por formala sciencisto jam en la unua duono de la 18a jarcento ; Leibniz proponis universon de monadoj aŭ "unuoj, kiuj enkorpiĝus la informon de la tuto".

William James asertis, ke la cerbo agas kiel filtrilo de alia ordo de realo, kaj pri tio ĉi koincidis kun sia samtempulo Henri Bergson.

Ĉirkaŭ 1950, la hungaro Denis Gabor, uzante la kalkulon de Leibniz, priskribis iun eblan tridimensian fotografajon, kiun li nomis Holografio.

Sed pasis 20 jaroj antaŭ ol fariĝis realaĵo la revo de Gabor. Necesis la malkovro de laserradioj, por ke Leith kaj Upatnicks, de la Universitato de Michigan, sukcesu atingi la unuan hologramon.

Ĉirkaŭ 1970, Karl Pribram, disĉiplo kaj kunlaboranto de Karl Lashley, proponis la hologramon kiel eksplikitan modelon de la cerba funkciado.

En 1971, David Bohm, kunlaborinto de Einstein, subtenis, ke la organizado de la universo mem, povus esti holografia.

En aprilo de 1975 kaj denove en la sekvanta jaro, internacia grupo de psikiatroj kaj psikologoj renkontiĝis kun J. Krishnamurti en la Carnegie Institute for Endowment por pritrakti la problemon pri la mio kaj ties kontaktado (ebla aŭ ne) kun la ekstera realo.

Al tiuj ses konferencoj ĉeestis tiu, kiu skribas. En ili oni parolis pri Pribram kaj Bohm, kaj ekde tie komenciĝis mia kontakto perletera kun Bohm kaj persona kun aliaj membroj de la grupo, inkluzive de la edukisto Krishnamurti.

En junio de 1978, post la prezentado de serio da prelegoj en la Universitato de Miami, mi vojaĝis Anglujen, invitite de David Bohm, kun kiu mi pasigis plurajn tagojn, preparolante la neceson de nova paradigmo en Psikologio. Poste mi vizitis doktorojn K. Schulz kaj F. Jungmann en la Instituto Max Planck por Cerba Esplorado de Kolonjo (Germanio), sciante, ke Schulz estas pasia studanto de la memoro.

Ekde tie mi prezentis en diversaj universitatoj kaj sciencaj institutoj latinamerikaj la rudimentojn de la nova mensmodelo.

Reveninte en Usonon kaj loĝante en Kalifornio, mi daŭrigis la korespondadon kun Bohm, kiu en 1979 aprobis la mencion de miaj konversacioj kaj leteroj en miaj prelegoj kaj eĉ ilian publikigon. La 5an de novembro 1979 mi prezentis persone la manuskripton de tiu ĉi libro al doktoro Karl Pribram en lia laboratorio de la Universitato de Stanford, kaj li ne nur aprobis la publikigon de siaj kontribuajoj en mia libro, sed ankaŭ invitis min kunlabori kun li en ĉi tiu universitato.

## FUNDAMENTOJ EN FIZIKO

Albert Einstein neniam volis kredi, ke "Dio kubludas per la universo" kaj ke estas statistika probableco, ke resume la tuta universo konsistas el partikloj kiel elektronoj, fotonoj, ktp, kiuj moviĝas hazarde.

David Bohm sugestis, ke krom ĉi tiu ŝajne kaosa movado, ekzistas nemanifestiĝinta aŭ implicita ordo, grupo de kaŝitaj variabloj, kiuj - se ili estus eltrovitaj - alportus solidan bazon nestatistikan por tiu movado.

Same kiel mia profunda intereso pri Psikologio kondukis min ĝis David Bohm, kernfizikisto, estis profunda intereso por eltrovi certan universan ordon, kiu igis Bohm proksimiĝi al la Psikologio. "La observanto povas modifi kaj distordi la fenomenon de li observatan", diras Bohm.

Karl Pribram demandis sin, kial la operacioj de la mate-

matikista cerbo tiel ofte priskribas fidele la bazan ordon de la universo, kiun li perceptas. Estas eble, ke la matematikisto "kreis" la universon, konkretigante en konceptoj la movadon de la perceptita realaĵo. La matematikisto vidas la ordon en la strukturoj de la rilatoj, kiujn lia mnemonika procezo estigis, kaj liaj postaj esploroj estas kondiĉitaj de tiu strukturo.

La mnemonika mio de la matematikisto estus tiamaniere pli kontaktita kun si mem (la simbola aŭ teoria strukturo de la universo) ol kun la realo precize.

Kiam Bohm komprenas sian miskontakton kun la realo, kiun li observas, kaj kiamaniere lia partopreno de observanto distordas tiun realon, tiam li interesiĝas pri la interna procezo de la observanto kaj tiam fariĝas necesa la nova paradigmo en Psikologio, nova maniero rigardi la realon aŭ, pli ĝuste dirite : studo de la procezoj, kiuj interferas la kontakton de la observanto kun la realo. Tiu ĉi studo pravas ke estas nur du eblecoj : kontakto kun la realo aŭ foresto de ĉi tio.

La holografio montras spektakle al ni la reciprokan rilaton inter la kampo de la frekvencoj kaj la kampo de la objekto kaj la bildo.

La precipa demando estas jena :

- 1) Ĉu estas la menso propreco emerganta de la rilato inter iu organismo kaj ĝia medio, aŭ
- 2) Ĉu ĝi estas reflektajo de la organizado baza aŭ substanca de la universo ?

La transformado de frekvencoj en bildojn estas ne nur fizika realaĵo (en holografio), sed ankaŭ karaktero de la cerba procezado.

Estas unu karaktero speciale interesa en la "holografia ordo", kie, kio gravas, estas nur la denseco de okazaĵoj. Tiom la tempo, kiom la spaco malaperis, en la kampo de la frekvencoj. Do, la limoj kutimaj de la spaco kaj tempo kaj la lokoj en la tempo kaj en la spaco restas haltigitaj kaj devas esti "interpretitaj aŭ manifestitaj", kiam okazas la transformoj al kampo de la bildo.

Ĉar forestas spaco-tempaj koordinatoj, la kutima kaŭzeco, de kiu dependas ĉia scienca ekspliko, restas haltigita.

Ni povas diri, ke la "karteziaj koordinatoj ĉi tie estas forigitaj". Ni komencos rilatigi tion ĉi al tio, kion ni diris pri dualeco, kaŭzo kaj efiko, procezo META kaj mio.

Dum preskaŭ 30 jaroj (1930-1960) Karl Lashley serĉis la

"engramon"(20) aŭ cerban lokon, kie estus la substanco de la memoro. Li trejniĝis bestojn eksperimentajn kaj poste laŭ-  
elekte, li komencis difekti partojn de iliaj cerboj, supozante  
ke iam li detruus la "engramon" aŭ lokon, kie estus tio,  
kion ili lernis. Tiu ĉi perelekta detruado difektis la kondu-  
ton de la bestoj sed neniam eblis forigi kion oni instruis, eĉ  
detruinte la cerbon en gradoj neakordigeblaj kun la vivo.

Karl Pribram laboris kun Lashley kaj baldaŭ konkludis,  
ke ĉiu "engramo" aŭ "memoro" troviĝis en ĉiu cerba  
punkto. De tie ĝis konsideri la hologramon kiel modelon de  
la cerba funkciado, estis nur unu paŝo.

Povis fari tiun paŝon nur sciencisto kapabla diri, same  
kiel Pribram diris : "Vi devas decidiĝi havi la kuraĝon ŝajni  
stulta". En 1977 Pribram antaŭdiris ĝisfundan paradigman  
ŝanĝon, kiu etendiĝus sur la tutan sciencan kampon.

Tio ĉi memvideblas por ĉiu, kiu restas atenta al la evo-  
lucio de la okazaĵoj.

Amnezio. La klasikaj nesolvitaj misteroj de la cerba esplor-  
ado pri memoro, rekonado, perceptado, motora agado kaj  
lernado subite solviĝis kun la ekapero de la holografia  
modelo.

1) Persono, kiu suferas cerban disverŝadon kaŭzitan de arte-  
ria hipertensio, ne perdas la memoron "laŭ pecoj" (kiel  
okazus ekzemple, se li rekonus kelkajn membrojn de sia  
familio sed estus nekapabla memori aliajn), sed li perdas  
ĝin entute, eĉ se tio okazus laŭ determinitaj periodoj de  
tempo.

2) La kvanto da cerba histo difektita ne rilatas al la "kvan-  
to" da memoro perdita.

Rekonado. Ĉe la okazo de la re-konado ni scias, ke eblas  
identigi objekton jam konitan sendepende de la distanco  
kaj la perspektivo ekde kie oni rigardas ĝin. La fakto, ke la  
objekto ne estas distordita far tiuj variabloj de la percept-  
ado-procezo eksplikiĝas nur pere de la holografia modelo.

Motoreco. Laste, por fini ekzempli, ni memoru, ke persono,  
kiu skribas ĉefe per sia dekstra mano povas fari tion ankaŭ  
per la maldekstra. La enigmo lokiĝas en tio, ke la ĉeloj  
(neŭronoj) regantaj la movadon de la dekstra mano situas  
en la maldekstra (motora) cerba hemisfero, kaj ke la ĉeloj  
de la dekstra hemisfero, kiuj ebligas al la maldekstra mano  
skribi, neniam partoprenis la malsimplan agadon, kiu estas  
skribi. Necesas ĉi tie alia interveno de la holografia modelo

por estigi eksplikitan ordon.

Sir John Eccles diris, ke la sinapsaj potencialoj en la centra nerva sistemo ne okazas per si mem, kaj ke formiĝas ondofronto aŭ ondoj en la dendritoj kaj aksonoj. Kiam aliaj ondofrontoj kunfluas al sama punkto ekde multaj originoj, formiĝas modeloj (aŭ strioj) de interfero, same kiel tiuj viditaj en la negativo aŭ holografia plako. Sir John Eccles tamen revenis poste en la klasikan eksplikon de la transmisio de la nerva impulso.

Estas necese percepti la faktojn unuece. Kiel ni diris (kaj tion ĉi oni facile diras), tiu tipo de perceptado okazas simultane aŭ sinkrone kun speciala tipo de konscio, kiu neniel rilatas al la mnemonika konsci-tipo, por kiu nia kulturo trejnas nin. Tiel per trejnado, kiel per timo, estas por ni "malfacile" (aŭ rekte neeble) vidi la realon laŭ tiu unueca kaj ĝisfunde transformiga maniero. Kiam dum momento ni faris tion, ni revenas (ĝenerale) nepre funkcii en la malnova procezo de la linia konscio, kiun ni nomas logika rezonado, intelekto aŭ penso. Domaĝe, plej ofte la penso estas nelogika aŭ neracia kaj tie estas la radiko de la konflikto kaj de la psikologia doloro.

## LA HOLOGRAMO KAJ LA UNIVERSO HOLOGRAFIE RIGARDATA

La universon oni observis science kun ia tendenco konsideri certajn nociojn aŭ bazajn teoriojn pri ordo, kvazaŭ ili estus permanentaj kaj neŝanĝeblaj.

En Fiziko, ĝis nun la tasko estis alĝustigi novajn observojn pere de adaptoj, ene de tiuj bazaj nocioj pri ordo, kun la celo enfiksi la novajn realaĵojn. Tiu ĉi ciklo de adaptado komenciĝis, kiel oni jam diris en la ĉap. I, per la epikloj de Ptolemeo ĝis la alveno de la agado de Koperniko, Kepler, Galilejo kaj Neŭtono.

Sed ĉar la bazaj nocioj pri ordo estis klare esprimitaj en la klasika fiziko, oni supozis, ke la venonta laboro de la fiziko estus adapti tiun ordon por alĝustigi novajn realaĵojn. Tiel okazis ĝis la apero de la teorio de la relativeco kaj la kvantuma teorio.

Estas klare, ke la alĝustigo al kadroj de ordo jam ekzistantaj estis la ĉefa tasko en la scienca kampo, dum la perceptado de novaj ordoj estis vidita kiel io, kio okazas tre malofte, eble en revoluciaj periodoj, kiam falas la kutima procezo de alĝustigo. Tio ĉi estis pritraktita de David Bohm en lia libro **Fundamento de la Fiziko** (1973).



Jean Piaget priskribis la inteligentan perceptadon kiel du komplementajn movojn : alĝustigon kaj asimiladon. Alĝustigi signifas "estigi komunan mezuron". Ekzemploj pri alĝustigo estas : enfiiksi, almuldigi, adapti, imiti, akcepti certajn regulojn, ktp. Asimili estas "digesti" aŭ fari, ke io iĝu tuto nedisigebla kun unu mem. Asimili estas ankaŭ "kompreni". Estas klare, ke en la inteligenta perceptado plej gravas la asimilado, kaj ke la alĝustigo estas duavica aŭ nur kontribuanta.

En iu momento estas necese kompreni, ke la malnovaj pensordoj povas ĉesi esti gravaj. Tio estas, ke ili povas ĉesi koheri adaptiĝi al novaj realaĵoj.

Oni tiam devas vidi la sengravecon de malnovaj diferencoj kaj la gravecon de la novaj ; kaj tiel ekaperas la vojo al la perceptado de novaj ordoj, novaj mezuroj kaj novaj strukturoj.

Kompreni la realon, similigante ĝin al novaj ordoj, povas iĝi "la normala maniero por fari scienca esploradon".

La scienca esplorado estus io simila al la arta perceptado. Tiu ĉi perceptado komenciĝas, observante la tutan realon, en ties kompleta individueco kaj poste iom post iom artikigas la ordon, kiu taŭgas por asimili, kompreni kaj esprimi tiun realon. Tiu ĉi perceptado ne komenciĝas per abstraktaj antaŭkonceptoj pri kio la ordo devas esti, kaj kiuj adaptiĝas al la ordo de tio observata.

En angla lingvo, la vorto **fact** signifas "fakto" aŭ "realo", kaj ĝia deveno el la latina estas la vorto **facere** (fari), kio implicas, ke la realo estas "tio, kio estis farita". En la hispana, ni vidas tiun ĉi asocion en la vorto "manu-fac-turar"(21) lamaniere ni konstruas la realon laŭ nia bontrovo, kaj tiu estas parte la alportado de Jean Piaget al la epistemologio aŭ studo de la konad-naturo. Kiam pluraj personoj rigardas nubon, ĉiu el ili povas vidi ion malsaman en la sama nuboj. La Testoj de Rorschach, kiuj ni uzas en psikiatrio por la diagnozo de la personeco aŭ "apercepto", provizas plurajn bildojn en dubesenca formo. Kiam la paciento vidas ilin kaj parole interpretas ilin, li malkaŝas la t.n. "organizivajn muldilojn" de sia propra menso. Kelkaj pacientoj akuzis la psikologon montri al ili "malpurajn" aŭ "pornografiajn" bildojn, kiam oni aplikis al ili tiun ĉi teston. Jean Piaget diras, ke la agiva penso estas la organizado kaj la transformado (ne la kopiado) de la "sperto" kiel rezultato de la kunordigado de agoj laŭ sekvencoj tempaj, spacaj kaj kaŭzaj.

Ekzemplo : Infano povas eltrovi per si mem la komutecan proprecon de la matematiko, t.e., ke la vicordo de la adiciatoj aŭ faktoroj ne modifas la rezulton de sumo aŭ multipliko. La infano eltrovas tion, ludante per dek vitro-buletoj kaj, malgraŭ ke li ne estus povinta eltrovi ĝin ludante per akvogutoj, ekzemple, estas tre klare, ke la komuteco ne estas propreco de la buletoj mem, malgraŭ tio, ke estas fizika aspekto (solideco) ligita al tiu kono de la ekzemplo. Estas la infano mem (la subjekto aŭ observanto), kiu aranĝas la vitrobuletojn (la objekton, la observataĵon) unue linie kaj poste laŭcirkle. La infano mem (la subjekto, la observanto) estas tiu, kiu "eltrovas" - por iel diri - tiom la ordon, kiom la sumon. Tiun ĉi konadon aŭ lernadon oni ne atingis el la fizikaj proprecoj de la buletoj, sed de la sinsekvaj agoj, kiujn la observanto faris per la objekto, ĉi-kaze la buletoj. Piaget konsideras, ke la Matematiko estas tre grava ĉe la studado de la kono-disvolvo, ĉar ĝi estas ĉio, kio eblas en la propra kreipovo de la observanto aŭ subjekto. Ĝi estas disciplino tute deduktiva, kiu rezultas nur el la agado de la subjekto. Estas realaĵo farita de la homo, "manu-fakt-urita". La homo malofte eltrovas la mondon pere de la unueca perceptado (aŭ triangula konscio). La homo estas kondiĉita aŭ trejnita far la fragmenta edukado de niaj kulturoj (kaj fine alĉi tiu ĝi) inventi la mondon pere de la mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika procezo, tiu procezo, kiun oni konfuzas kun la mensa tuto, ĉar ĝi estas preskaŭ ĉio, kion ni konas.

Permesu al mi, ke mi reinterpretu la faman frazon "Mi pensas, sekve mi ekzistas" jene : "Estas procezo en mia interno, kiu okazigas serion da konceptoj aglomeritaj ĉirkaŭ la vorto mio ; kaj tiel la procezo, kiel la konceptoj kaj la mio, estas parto de mia ekzistado, sed ĝenerale ili malhelpas la veran kontakton kun la observataĵo, kiu estas la realo".

Kiam okazas ŝanĝoj de ordo kaj mezuro en iu teorio, oni faras eksperimentojn laŭ nova maniero kaj kreas novajn instrumentojn, kiuj siavice kondukas al la "manu-fakt-uro" de realaĵoj de nova tipo ĝuste ordigitaj kaj mezuritaj. Tiel okazas "alĝustigo" (aŭ komuna mezuro) inter la teorio kaj la realo.

Kiam ne eblas alĝustigo aŭ komuna mezuro inter teorio kaj realo, iĝas necesa freŝa perceptado (unueca perceptado) de la realo totale. Tio ĉi inkludas ne nur la eksperimentajn rezultatojn, sed ankaŭ la fiaskon de certaj teoriaj skoloj por

adaptiĝi-alĝustiĝi al la eksperimentaj rezultatoj.

Tiel, kiel la relativeco kaj la kvantumteorio pruvis la senutilecon disigi la aparaton observantan disde la observataĵo, sammaniere tio, kion ni nun konsideras, montras, ke ne havas signifon disigi la observatan realon (inkludanta la instrumentojn uzatajn por observi ĝin) disde la teoriaj nocioj pri ordo, kiuj helpas doni "formon" al tiu realo.

Dum ni plu disvolvas novajn nociojn pri ordo, irante trans tiuj de la kvantumteorio kaj la relativeco, ne utilas klopodi tuj apliki tiujn nociojn al la aktualaj problemoj, kiuj rezultis de la konsiderado de la nuna grupo de eksperimentaj faktoj. Kion oni bezonas, tio estas, unue, similigi la realtuton en Fiziko kun la novaj teoriaj nocioj pri ordo.

En la nova paradigmo, realo kaj teorio estas konsiderataj kiel malsamaj aspektoj de tuto kaj ne gravas la analizo de partoj disigitaj sed interagantaj.

La nedividita tuto estas implicita ne nur en la enhavo de la Fiziko (ĉefe en relativeco kaj kvantumteorio), sed ankaŭ en la maniero labori en Fiziko.

Tio ĉi signifas, ke ne ĉiam ni klopodas perforti la teorion, por ke ĝi adaptiĝu al la tipoj de realo, kiuj povas taŭgi laŭ ĝeneralaj priskribordoj nuntempe akceptataj, sed tion, ke ni ankaŭ pretas, kiam necese, konsideri ŝanĝojn en tio konsiderata kiel realo. Tio ĉi lasta povas esti bezonata por similigi tian fakton (aŭ realon) al novaj nocioj aŭ teoriaj ordoj.

## **INTERRESPONDO (kaj ĝia foresto) INTER LA OBJEKTO KAJ LA BILDO**


La enhavon de observata fakto oni ne povas kohere konsideri kiel disigitan disde la manieroj observadi kaj disde la instrumentaranĝado, nek disde la manieroj de teoria kompreno. Realo, observado, instrumentaranĝado kaj teorio kunformas nedivideblan tuton.

Estas du fundamentaj tipoj de vidado kaj pensado (asimilado) : unu rilatigita kun la analizo kaj la sintezo, kaj la alia kun la tuja perceptado de nedividebla tuto.

Estas du instrumentoj, kiuj interrespondas kun tiuj du manieroj asimili aŭ kompreni : unu estas la lenso kaj la alia, la hologramo.

La lenso estis unu el la ŝlosiloj de la disvolvo de la scienco moderna penso. La esenca lensa trajto estas, ke ĝi formas bildon, en kiu punkto A en la objekto interrespondas

(tre proksimume) kun la punkto B en la bildo :



Reliefiginte la interrespondon de specifaj trajtoj de la objekto kaj de la bildo, la lenso pliintensigis la homan perceptadon de la pluraj objekto-partoj kaj de la rilatoj inter tiuj partoj. Tio ĉi plivigligis la tendencon pensi laŭ analizaj kaj sintezaj terminoj.

Sed post la ekapero de la teorio pri relativeco kaj la kvantumteorio, kiuj implicas sendividan tuton, la analizo laŭ malsamaj kaj bone difinitaj partoj iĝas negrava. Estas la hologramo la instrumento, kiu faciligas la perceptadon de la sendivida tuto.

La holografio estas rimedo por krei fotografian bildon senpere de lensoj, kies registro estas la hologramo (holos = tuta, grama = mesaĝo). La hologramo estas nerekonebla muldilo de strekoj kaj strioj, kiu - kiam lumigita per kohera lumo (laser-radio) - organizas la lumon laŭ tridimensia prezentado de la origina objekto. La ordinara lumo ne estas kohera, t.e. la diferencoj de fazo inter amaso da ondoj en unu radio okazas tute hazarde. La ondoj de ordinara lumo ne marŝas sampaŝe.

### LA HOLOGRAMO




Fig.1


En malluma ĉambro, radio de kohera lumo direktaĝas ĝis la objekto. La radio B reflektiĝas kaj difraktiĝas pro la fizikaj trajtoj de la objekto kaj atingas la fotografian plakon. La radio A reflektiĝas en la spegulo kaj atingas la plakon en la sama punkto. Ambaŭ radioj interferas unu la alian kaj okazigas la hologramon (aŭ striojn de interfero). Tiu ĉi holografia muldilo de strioj kaj spiraloj enhavas la tutan optikan informon pri la fotografita objekto sen lensoj.

Nu, se ni lumigas la hologramon (plakon) per la kohera lumo laserradia, la plejmulto de la lumo perdiĝos, sed la interferaj strioj de la holografia negativo agos same kiel difraktiga krado, kiu inversigas la originan staton (Fig.1)

Ĉe la flanko, ekde kiu la kohera lumo estas elsendita, formiĝas virtuala bildo videbla por la observanto, kaj ĉe la alia flanko, reala bildo fotebla per ordinaraĵaj metodoj. Ambaŭ bildoj estas tridimensiaj, ĉar krom la informo pri larĝeco (kio estas tio registrita en la ordinara fotografi-procezo), oni registris prifazan informon enhavantan ekzaktan informon pri altecoj kaj profundecoj de la pluraj objektaĵaj konturoj.

La okulo de la observanto en la bildo 2 estas en la ondo-fronto, kies formo tre similas tiun, kiu devenas de la origina lumigita strukturo. La observanto vidas la tuton de la origina strukturo tridimensie kaj elde kampo, kiu enhavas plurajn eblajn vidpunktojn, kvazaŭ ĝi rigardus elde fenestro.

Se oni lumigas per kohera lumo nur unu punkton de la plako, ni ankoraŭ vidos la tutan strukturon, sed kun detaloj malpli distingeblaj, kvazaŭ ni rigardus elde fenestro pli malgranda.



Tie ĉi ne estas, kiel ĉe la lenso, interrespondo unu-unu inter punktoj de la lumigita objekto kaj punktoj de unu objektobildo en la plako. Fakte okazas, ke la modelo de luma interfero en ĉiu plakopunkto reflektas la tutan strukturon de la objekto, kaj ke ĉiu punkto de la strukturo de la objekto estas reflektita en la tuto de la modelo de interfero en la plako.

Eĉ plie, kvankam principe oni povus klopodi fari bildon de aparta atomo, la kvantumteorio implicas, ke fari tion havus nenian signifon. La formado de bildo estas ĝuste tio, kio ne gravas ĉe kvantuma kampo. La diskuto pri la bildoformado taŭgas nur por indiki la limojn de aplikebleco de la klasikaj modeloj de priskribado.

## **LA UNIVERSO : IMPLICITA ORDO KAJ MANIFESTIĜINTA ORDO**

Tio, kion ni ĵus vidis, estas gravega, ĉar la nura konsiderado pri la diferenco inter lenso kaj hologramo povas prezenti plensignifan rolon en la (unueca) perceptado de nova ordo, kiu estas grava por la fizikaj leĝoj.

Galilejo diferencigis la vakuon disde la viskoza medio, kaj li rimarkis, ke la fizikaj leĝoj devus baziĝi unuavice sur la movado de objekto en vakuo.

El la diferencoj inter lenso kaj hologramo ni vidas la eblecon, ke la fizikaj leĝoj baziĝu unuagrade sur ordo de nedividebla tuto (rilate la enhavon de priskribo simila al tiu indikita de la hologramo) pli ol sur ordo de analizo (rilate la enhavon de disigitaj partoj indikitaj de la lenso).

La Galilejaj konceptoj detruis la Aristotelajn ideojn pri la movo, sed Galilejo kaj liaj sekvantoj ektrovis la problemon priskribi detale la novan ordon de movo. La karteziaj koordinatoj donis la respondon, kiam oni etendis ilin al la lingvaĵo de la kalkulo (diferenciala ekvacio, k.c.), sed tiu ĉi tipo de priskribo taŭgas nur en kadro, kie la analizo de aŭtonomaj kaj malsamaj partoj gravas.

Oni bezonas novan tipon de priskribo por tiu ĉi kadro (la novan paradigmon).

Tiu ĉi nova tipo de priskribo artikiĝas kaj disvolviĝas nature kaj ne kiel rezultato de penoj por enfiksi ĝin en nociojn bone difinitajn kaj antaŭkonceptitajn.

Retraktante la temon de la hologramo, la malsamaj karakteroj de la lumigita objekto determinos malsamajn ŝablonojn de interfero, sed ne nur en la plako - kio ne multe gravas - sed ankaŭ en la spaco.

La plako havas kiel ĉefan celon, konstante registri "grafike" la ŝablonojn de luma interfero, kiuj estas en ĉiu spaca regiono. En ĉiuj el tiuj regionoj la lummovo implicite enhavas multajn distingojn pri ordo kaj mezuro adekvataj al la tuta lumigita strukturo. Eĉ plie, principe tiu ĉi strukturo etendiĝas en la tutan universon kaj en la tuton de la pasinteco, kun implicaĵoj por la tuta venonteco. Ekzemple, rigardante la noktan ĉielon, ni kapablas distingi strukturojn, kiuj ampleksas grandegajn etendojn de spaco kaj tempo, kiuj iel estas enhavataj per la lummovoj en la malgranda anatomia spaco limigita far la ŝeloj de la homa okulo.

Ekzistas jam la ĝermo de nova nocio pri ordo. Tiu ĉi ordo ne devas esti komprenita nur kiel regula aranĝo de objektoj (ekzemple laŭ vicoj), aŭ kiel regula aranĝo de okazaĵoj (ekzemple laŭ serioj). Pli precize, ni parolas pri totala ordo, enhavata implicite en ĉiu regiono de la spaco kaj tempo. Implicita signifas "volvita internen" (same kiel multiplikita signifas "volvita multfoje").

Ni diras do, ke iel ĉiu menciita regiono enhavas unu tutan strukturon "volvitan internen" aŭ implicitan.

La hologramo estas ekzemplo de la implicita ordo de la universo kaj estis proponata de Karl Pribram, kiel parto de la cerbo kaj la menso.

Ĉe la Reĝa Instituto de Londono estas aparato, kiu konsistas el du samcentraj cilindroj el kristalo kun tre viskosa fluidaĵo, ekzemple glicerino, inter ili. Tio ĉi ebligas al la cilindro interna rotacii malrapide sen difuzo de la viskosa fluidaĵo. Se oni metas guteton da nesolvebla inko en tiun viskozan fluidaĵon kaj se oni turnas ĝin malrapide, la guteto transformiĝas en fadenon, kiu fine iĝas nevidebla. Rotaciigante la internan cilindron en la kontraŭan direkton, oni atingas, ke la fadeno subite videbliĝas. Oni povas diri, ke la inkfadeno ene de la glicerino estis tiel kunvolvita en ĝi, kiel la ovo en la torto. Ne eblas disvolvi aŭ reestigi la ovon, tiel kiel ĝi estis antaŭe, disde la torto, sed eblas "disvolvi" la inkfadendon, ĉar ĉi-kaze ekzistas miksaĵo viskosa kaj nedifuzebila.

Kutime ni pensas, ke ĉiu punkto de la tempo kaj de la spaco estas malsama kaj estas disigita de la aliaj, kaj ke ĉiuj rilatoj okazas inter punktoj apudaj en la spaco kaj en la tempo. En la implicita ordo la inkoguto, kiu "kunvolviĝis" ĝis ĝi nevidebliĝis, estas en la tuto de la fluidaĵo kaj ĉiu ero de la tuto kontribuas al tiu guto.

En la kartezia modelo la koneksigoj estas apudaj, t.e., la

kampo kontaktiĝas nur kun elementoj de kampo tre proksimaj tempe kaj space al ĝi. En la implicita ordo ni havas unu tuton kun elementoj, kiuj interpenetras.

Ni konsideru alian modelon : ni "ĉirkaŭvolvas" la guton, turnante la internan cilindron  $n$ -foje. Ni aldonas alian guton en proksima loko kaj "ĉirkaŭvolvas" ĝin  $n$ -foje. Dume la unua guto estis ĉirkaŭvolvita  $2n$ -foje. Se oni metas trian guton, la unua estos turniĝinta  $3n$ -foje, ktp.

Kiam oni turnas la cilindron en kontraŭan direkton, la gutoj iom post iom reaperas sinsekve laŭ la kvanto da rotacioj (la tria aperos post  $n$ -nombro da fojoj, la dua post  $2n$ -nombro kaj la unua post  $3n$ -nombro da rotacioj).

Se la turnado okazas pli rapide ol la tempo de reago de la homa okulo, ni vidos parteton, kiu ŝajne trairas senĉese la kampon.

Sed tiu ĉi priskribo de la parteto estas tute malsama ol la kartezia priskribo. En la kartezia priskribo la parteto ekzistas kaj ĝia esenco konsistas en tio, ke ĝi estas en iu loko, poste en alia kaj poste en alia. Kion la nova paradigmo priskribas, estas tio, ke la tuto (aŭ la totaleco) estas manifestiĝanta, ĉar la parteto estas ĉiam la tuto, sed ĝi manifestiĝas antaŭ nia okulo, ĉar tiu ĉi vidas la guton nur, kiam la intensecon kaj la densecon de la inkguto atingas certan punkton. Do, nur la gutoj, kiuj atingis certan staton tre densan, estas videblaj je determinita momento.

Kaj kiam iu "kunvolviĝas" kaj la alia manifestiĝas, oni vidas parteton trairantan la kampon. Sed tiu ĉi parteto, kiu trairas, estas nur abstraktaĵo, kiu manifestiĝas antaŭ nia vido. La realo estas la implicita ordo, kiu estas ĉiam totala kaj estas esence sendependa de la tempo.

Ne estas rilato kun la tempo, ĉar du elementoj, kiuj intime rilatas, estas tiuj, kiuj manifestiĝos, rekonstituiĝos aŭ "disvolviĝos" unu post la alia, sed unue ili estas interpenetritaj kaj tiu fundamenta kaj totala rilato neniel rilatas al la spaco kaj al la tempo.

Ni kredas esti sugestintaj la bazojn por kompreni la grandegan gravecon distingi inter implicita ordo kaj manifestiĝinta ordo. La fizikaj leĝoj rilatis ĝis hodiaŭ al manifestiĝinta ordo. La ĉefa funkcio de la karteziaj koordinatoj estas priskribi klare kaj precize la manifestiĝintan ordon. Tio, kion oni nun ekproponas, estas, ke en la formulado de fizikaj leĝoj oni devas doni pli da graveco al la implicita ordo, dum la signifo de la manifestiĝinta ordo estas nur duagrada, same kiel okazis pri la Aristotelaj



movo-nocioj post la disvolviĝo de la klasika Fiziko. Oni povas esperi, ke la priskribo laŭ karteziaj koordinatoj ĉesu ricevi la ĉefan emfazon, kaj ke nepre disvolviĝu nova speco de priskribo por pritrakti la fizikajn leĝojn.

En la nova psikologia paradigmo ni parolas pri la fakto, ke la dualeco de la procezo META - kun tiu speco de konscio, kiun ni nomas linia - okazigu rekonstituadon je nuklea nivelo, kio implicus alispecan konscion (cirklan konscion) kontakte kun la implicita ordo, laŭ mensa vidpunkto. Eble ĝi estas tio, kion Pribram nomis "konscio sen enhavo", se enhavo estus ĉio devenanta de la memoro (aŭ procezo META).

La cirkla konscio fakte havas enhavon, kiu estas strikte la rekonstituado de la realo ĉi tie kaj nun, sen interfero aŭ distordo de la pasinteco.

Cirkla (aŭ kerna) konscio estus do totala unuiĝo inter la observanto kaj tio, kion li observas, por kio necesas, ke la observanto kiel subjektiva mensa ento estu momente malaperinta. Precize tiumomente restas nur la observataĵo (aŭ la realo), aŭ pli ĝuste tio, kio estas en la cirkla konscio. Tie ĉi la konscio estas la realo kaj la realo estas la konscio.

Por ke ĉi tiu fakto enorme grava ne estu vidata kiel simpla intelekta aŭ fiziologia spekulativado, ni ripetos ĝin alivorte : kiam la orelo aŭdas la flugeton kaj la grakon de birdo, estas tiu ago de rekonado aŭ registro de la procezo META per la nomo "birdo", kio malebligas, ke la ago percepti etendiĝu ĝis la kontakto kun la kosma holokinetiko, de kiu la birdo, la flugeto kaj la grako estas nur parta esprimo.

Kiam oni perceptas en la buŝo la guston de tomato, estas la vorto "tomato" (cetere tre utila ĉe la komunikado), kiu malebligos, ke la gusto (parta, sensa perceptado) transcendu la objekton (la tomaton) kaj la objektobildon (la vorton tomato kaj ties mnemonikan prezentadon) por ekkontakti kun la holokinetiko (totala energio) manifestiĝinta fragmente en la tomato kaj ties karakteroj.

## VI

### LA KONCEPTO DE HOLOKINETIKO DE DAVID BOHM

Holos signifas "totala" kaj kinesis signifas "movo". Enirante en novan klason de priskribo, kiu donas ĉefan gravcon al la implicita ordo, ni vidu denove la ŝlosilan trajton de la funkciado de la hologramo. En ĉiu regiono de la spaco, la ordo de tuta strukturo lumigita estas "envolvita" kaj "transportita" en la movado de la lumo.

Io simila okazas al la radioondo. Ĉiuokaze, la enhavo aŭ signifo, kiu estas "envolvita" kaj "transportita", estas unue ordo kaj mezuro, kiuj ebligas la disvolvon de strukturo. Per la radioondo tiu ĉi strukturo povas esti parola komuniko, bildo, ktp, sed per la hologramo oni povas disvolvi strukturojn pli subtilajn, precipe tridimensiajn strukturojn multvidpunkte videblajn.

Ĝenerale, tia ordo kaj mezuro povas esti "envolvita" kaj "transportita", ne nur per elektromagnetaj ondoj, sed ankaŭ per elektronaj radioj, per sono kaj aliaj sennombraj manieroj de movo.

Por ĝeneraligi kaj emfazi la nedividitan tuton, ni diros, ke tio, kio transportas implicitan ordon, estas la "holo-kinetiko" aŭ "totala movo", kio estas tuto ne fragmentita, ne dividita. En kelkaj okazoj ni povas abstrakti specialajn aspektojn de la holokinetiko, nome lumon, elektronojn, sonon, ktp, sed ĝenerale ĉiuj manieroj de holokinetiko konverĝas kaj estas nedisigeblaj. Tiel, en sia tuto, la holokinetiko estas limigita absolute far neniu specifebla maniero ; estas ne necese, ke ĝi adaptiĝu al iu speciala ordo, nek ke ĝi restu ene de la limoj de iu speciala mezuro. Pro tio, la holokinetiko estas nedifinebla kaj nemezurebla.

Doni al la holokinetiko ĉefan signifon implicas, ke ne gravas paroli pri fundamenta teorio, en kiu la tuta Fiziko povus trovi ĉiamdaŭran bazon, aŭ al kiu oni povus redukti aŭ traduki ĉiujn fizikajn fenomenojn. Pli ĝuste, ĉiu teorio abstraktos periodon da tempo.

Tamen, kiam ni ne plu rigardas la tempan ordon manifestiĝintan kiel unuagradan, la analiza fundamento tute ellasiĝas. Sed kompreneble, tio ĉi signifas, ke la ordinara lingvo de la "komuna saĝo", rafinita se necese ĝis la lingvo de la klasika Mekaniko, ne plu taŭgas por la priskribo, ne nur en Fiziko, sed ankaŭ en la komuna ĉiutaga sperto.

Same kiel oni ŝanĝas la ordon, per kiu oni asimilas la Fizikon, oni devas ŝanĝi ankaŭ la manieron paroli pri la mondo kaj la manieron mem rigardi ĝin.

La eksperimenta agado dependas (kaj ne nur en Fiziko) de la maniero kiel ni rigardas la mondon. Tiel ni alvenas al tuteco eĉ pli integra, kiu fine ne faras dividojn inter la scienca esplorado kaj iu ajn alia aspekto de la ekzistado.

### **UNUECAJ PERCEPTADO KAJ RILATO (Implicita ordo en centripetaj kaj centrifugaj movoj)**

Tiu ĉi estas nur alia maniero prezenti tion, kion oni nomis la unueca perceptado. Eble nun iĝas pli signifa la graveco emfazi tiun ĉi tipon de perceptado, kiel ni faras en la nova psikologia paradigmo.

David Bohm diris, ke la nedividita tuto en ĉiuj aspektoj de la observado kaj la perceptado malmulte rilatas al la nun validaj nocioj.

Ekde tiuj ĉi nocioj oni akceptas kvazaŭ neeviteblan, profundan kaj kreskantan abismon inter la matematika abstrakta karaktero de la fizikaj reguloj kaj la karaktero ŝajne malsimila de la rekta percepta sperto.

Fakte nia lingvo mem havas la tendencon krei tiun abismon inter fizikaj reguloj kaj unueca perceptado, ĉar kondiĉas nin enfokusigi la atenton en la analizo de la mondo laŭ aŭtonomaj objektoj kaj nin distras de la fakto de la perceptado rekta (aŭ unueca), kiu implicas la konceptadon de implicita ordo simila al tiu, kiu estas signifa en kunteksto "kvantuma". Ekzistas jam sufiĉa kvanto da evidenteco, kiu sugestas, ke la ordo de la rekta perceptado estas pli proksima al la relativeco kaj la kvantuma teorio ol al la klasika Fiziko.

En multaj modernaj psikologiaj esploroj oni vidis, ke la sensa perceptado devas esti komprenata kiel "inkluziva aŭ totala rimarkado de la rilatoj inter la centrifugaj movoj de la homo kaj liaj centripetaj sensacoj". Se oni donas objekton al iu, por ke li ĝin tuŝu sen vidi ĝin, laŭgrade kiel la fingroj sin movas por preni la objekton, komenciĝas la abstraktado de kono de objekto kiel tuto.

Pli bona observado montras al ni, ke la kono devenas de la totala movo jam priskribita, kio estigas rimarkadon de aro da rilatoj inter centrifugaj agoj de la mano kaj centripetaj tuŝosensacoj, kiuj akompanas tiujn agojn. Tio ĉi proksimiĝas al la maniero priskribi la observataĵojn de la kvantumteorio kaj de la relativeco, se oni adoptas la Ejnŝtejnman vidpunkton pri la unuigita kampo. Oni povus diri, ke la objekto estas implicita, sed iĝas "eksplikita" aŭ manifestiĝinta, en la koncepto, kiu abstraktas la personon (aŭ la mion).

Unuavide ŝajnas, ke la optika perceptado estas malsimila ĉar oni kredas vidi la objekton kiel disigitan enton. Se oni ĝin studas pli detale, ni vidas, ke tio ĉi okazas nur kiam la objektoj ne estas ordinaraj por ni, aŭ prefere, kiam ĝiaj formoj kaj ecoj (koloro, dimensioj) estas konceptitaj per adaptado, kiu estas la rezultato de lernado en la pasinta sperto kun similaj objektoj.

Multaj eksperimentoj pruvis, ke kiam nova speco de vidpercepta situacio estas prezentata al persono, tiu persono ne kapablos vidi ĝuste, se li ne movas sian korpon kelkmaniere kaj observas kiel la enhavo de sia vidkampo ŝanĝiĝas rilate liajn korpajn movojn. Denaska blindulo, kiu subite ekvidas post kirurgia operacio, unue ne klare perceptas la objektojn kaj bezonas kelkjaran lernadon por kompreni la rilatojn inter korpaj movoj kaj vidaj sensacoj, antaŭ ol esti kapabla vere vidi tiujn objektojn. La infano sana (ne blinda) bezonas kelkjaran naturan esploradon de tiuj rilatoj inter movoj kaj sensacoj antaŭ ol li povos vidi sufiĉe bone la objektojn.

Tiel en la vida perceptado, kiel en la tuŝa, la plej tuja sperto estas tiu de ordo implicita en la centrifugaj kaj centripetaj movoj. La eksplikita aŭ manifestiĝinta ordo de disigitaj objektoj aperas nur je certa grado de abstraktado. Ni jam diris, ke ne estas tro grave klarigi tiun ĉi sperton surbaze de tiu manifestiĝinta ordo, kiun ni nomas "tempo". La unueca perceptado de la movo ne implicas la tempon laŭ iu esenca maniero, sed implicas prefere tujan rimarkon de la implicita ordo, simila al tiu, kiu estas grava en kvantuma kunteksto.

La signifo (aŭ logos) de iu percepto estas konceptita ankaŭ rekte en implicita ordo. Ĉi-rilate la perceptado similas al la komunikado: kiam du personoj konversacias kune, tio plensignifanta ne estas nur la tempa ordo de la vortoj, sed prefere tre subtila ordo, kiu estas implicita

en la tuto dirita kaj farita, dum tio "resonas" en ambaŭ konversaciantoj. Kiam ni rimarkas la tutan signifon de konversacio (unueca rilato), ni atingas tre intiman kaj rektan sperton pri la signifo de la implicita ordo.

Teorio kaj observado estas du aspektoj de "totala movo", kiu implicas la naturon, la homon kaj la socion mem nedisigeble.

Tio ĉi signifas, ke la penso de la homo ne estas precipe "mensa imago" en respondo kun realo, kiu estas tute ekstera al la "menso". La unuaj signifoj de la vorto "menso" estis "penso" kaj "senso". La scienca esplorado eltrovas, ke pensi, senti kaj percepti signifojn ne estas disigebla de nerva kaj muskola ekscito, tiel en la cerbo kiel en la resto de la korpo. Ĉar tiuj ĉi ekscitoj povas esti priskribitaj laŭ la Fiziko kaj la Kemio, la mensa agado ne estas disigebla de la agado de la materio. "Materio" temas pri manifestiĝinta aspekto de la aferoj kaj "menso" temas pri implicita kaj subtila aspekto. Tamen, post ĉio dirite, devas esti klare, ke la materio mem havas aspekton subtilan aŭ implicitan.

La realo estas la holokinetiko ĉiuaspekte. Menso kaj materio estas aspektoj de la holokinetiko aŭ totala movo.

La koncepto, kiu disigas la "menson, kiu observas" disde la "materio dise ekzistanta, kiu estas observata", per neevitebla "interresponda rilato inter ili ambaŭ", ne estas trafa.

## UNUECA PERCEPTADO KAJ MEDITADO

La unueca perceptado estas la nura homa agado, kiu ebligas, ke la materio kaj la menso kune partoprenu en la holokinetiko. Partoprenanto en unu el niaj unuaj (kaj senordaj) prelegoj en Latinameriko - junio ĝis septembro 1978 - diris al ni, ke tiu speco de perceptado estas nur meditado.

Bedaŭrinde, oni vulgare interpretas meditadon kiel "koncentriĝon" kaj, por impliki la aferojn, ekzistas multaj "guruoj" aŭ spiritaj gvidantoj, kiuj elpensas ĉiutage malsamajn (kaj profitdonajn) metodojn nomitajn "de meditado". Tio ĉi ne nur komplikas kaj konfuzigas la signifon de la vorto meditado, kies deveno mem el la latina lingvo estas la vorto **mederi**, radiko, kiu devenigas niajn vortojn "mezuri", "medicino", "moderigi" kaj "mediti". Bedaŭrinde, la vorto "mezuro" en siaj historiaj komencoj signifis "ordo" aŭ "proporcio", tiu ordo, kiun oni trovas tiel en la arto, kiel en la Matematiko, sed iom post iom degeneris en la signifon "komparo kun ekstera modelo".

Por konigi ĉiujn lingvajn kuriozaĵojn pri la vorto "meditado" ni diros, ke la semantika ekvivalento de "mezuri" en sanskrito estas la vorto **maya**, kiu devenas de **matra** (mezuro), sed kiun oni interpretas kiel "iluzion".

Ni ne scias, ĉu ekzistas rilato inter la sanskrita **matra** kaj la greka **metron**. La konkludo ĉiam estis, ke nur tio nemezurebla estas reala - almenaŭ en la mondo influita de la sanskrito - ĉar tio, kion oni mezuras (**matra**) estas iluzia (**maya**).

Ni povas demandi al ni, ĉu la maniero vidi la mondon kaj la universon estis tio, kio donis strukturon kaj signifon al la sanskrita lingvo, aŭ ĉu okazis inverse.

Ĉiumaniere la vorto "meditado", pro la menciitaj kialoj, ŝajnas al ni nekonvena.

Krome, ni ne kredas, ke la spiritaj gvidantoj de Hindujo eĉ la plej avidaj, pretendas instrui al ni **maya**-n aŭ iluzion. Prefere ni kredas, ke ili pretendas traduki kiel meditadon tion, kion la antikvaj bramanoj instruis per la nomo **pratyaksham**, kiun oni povus traduki kiel "rektan vidadon de la realo aŭ objektivan perceptadon".

Eble estas unueca perceptado la mensa agado de la vera artisto. Kiam oni diras, ke la artisto "esprimas" sin mem, oni fakte diras, ke la artisto estas "esprimanta" eksteren ion jam formitan interne. Tio ĉi ankaŭ implicas, ke la artisto estas ento disigita disde tio, pri kio li laboras, kio estas lia verko.

Pli ĝuste ŝajnas, ke tio, kion la artisto unue faras, estas nur simila al tio, kion li pensas fari. Same kiel okazas, kiam oni konversacias kun alia konfidence, la artisto vidas la similaĵojn kaj la malsimilaĵojn inter sia interna bildo kaj sia objektiva verko ; kaj de tiu perceptado rezultas io nova, kaj el tio lasta, siafoje li klopodos fari ion diferencon. Tiel konstante kreiĝas novaj ordoj, mezuroj kaj strukturoj komunaj al la artisto kaj al la materialo, per kiu li laboras.

Ekzistas dialogo, ni dirus, kaj la artisto kunpartoprenas kun sia kreaĵo en la totala movo aŭ holokinetiko. Kiam iu rigardanto poste observas la artistan kreaĵon, tiu ĉi totala movo plu daŭras laŭ novaj manieroj, ĉar ekzistas transformiĝoj en la nova rilato inter tiu kreaĵo kaj la rigardanto.

La sciencisto estas engaĝita, preskaŭ same kiel la artisto, en dialogo kun la naturo kaj kun siaj similuloj. Ĉe tiu ĉi senfina dialogo ekaperas novaj ordoj, kiuj estas komunaj al pluraj aspektoj de la naturo kaj al ĉiuj, kiuj komprenas

la laboron. Tio ĉi signifas, ke la penso de la sciencisto ne estas unuagrade "pripenso" responde kun "objekto dise ekzistanta". Pli ĝuste tiu ĉi penso estas unu flanko de la realo kaj sekve ĝi povas esti kunprenita en "totala movo", kiu envolvas la homon kaj la naturon nedisigeble. En tiu ĉi totala movo, aŭ holokinetiko, la unuaranga ago de la penso estas koncentri la atenton al certa ordo, poste emfazita en la perceptado. Kiam tiu ĉi emfazita ordo estas elprovita en la eksperimentado kaj kiam oni pravas, ke tio, kio fakte okazas, estas malsama al tio, kion la sciencisto pensis, tiam ekaperas en lia penso io nova, kiu siavice devos esti elprovita kaj pruvita. Tiel estas kreata nova ordo komuna al penso kaj al funkciado de liaj instrumentoj.

Ĉu artisto, ĉu sciencisto, ĉu simpla vulgara homo, memvideble ĉiu individuo povas esti, almenaŭ unufoje, en unueca perceptado.

En tiu ĉi tipo de perceptado oni emfazas iujn aspektojn de la holokinetiko en si mem kaj en la medio, kaj pere de la sperto aŭ de la eksperimentado oni rimarkas la diferencojn inter la realeco de la faktoj kaj tio, kion oni pensis pri ili.

La homo povas vivi harmonie kun si mem kaj kun la mondo, aŭ je diversaj gradoj de kaoso, se li elektas vivi en la unueca perceptado aŭ en la nefunkcia procezo META, respektive.

### **RIMARKIGO PRI LA ORDO**

La homo ĉiam serĉis bazan signifon aŭ ordon, tiel en la realo, kiu ĉirkaŭas lin, kiel en sia propra mensfunkciado.

Ekzistas ĉiam pli granda evidenteco, ke eble estas ordo komuna al ambaŭ ; ordo, kiun oni povas vidi tiel en la menso, kiel en la kosmo.

La mekanisma Fiziko havis kiel "antaŭsupozitan ordon" la koncepton pri linio kaj serio, interligitan kun la karteziaj koordinatoj, kaj hipotezis, ke la universo konsistas el atomoj aŭ partoj, kiuj interrilatas aŭ ne.

Dum la 20a jarcento ekaperas la teorio de la relativeco kaj la kvantumteorio kaj iliaj "antaŭsupozitaj ordoj" prezentigas kiel memkontraŭdiraj. Einstein asertis, ke la universo estas nur unu kampo en la spaco, unu tuto nedivida, kaj ke la partikloj estas nur abstraktaĵoj, fakte koncentritaj regionoj de tiu unuigita kampo.

Laŭ la kvantumteorio la movo estas nekontinua. Oni povas pasi de unu stato al alia sen pasi tra interaj statoj.

Kvantumteorio ; antaŭdiro kaj strukturo de la realo

La kvantumteorio (KT) pruviĝis tre sukcesa por antaŭdiri rezultatojn de fizikaj eksperimentoj. La KT estas la fundamenta teorio de la atomoj, molekuloj, elementaj partikloj, la elektromagneta radiado kaj la solida stato, kaj ĝi alportis metodojn por kalkuli eksperimentajn rezultatojn en tiuj kampoj.

Tamen, la kutima maniero pensi estas defiata far konceptoj kiel tiu de "ondofunkcio", kiu priskribas la elektronon kvazaŭ ĝi estus "disvastigita" tra la spaco. Fakte, eksperimente la elektrono estas kie ajn en tiu spaco.

Tamen, kiam oni detektas la elektronon, ĝi ne estas "disvastigita" sed havas difinitan pozicion.

Havi klaran koncepton pri la elektronon laŭ nia kutima pensmaniero estas do tucerte neeble.

Al la demando : Ĉu la elektrono estas disvastigita aŭ lokiĝinta ? la trafa respondo, malgraŭ ke ĝi ŝajnas stranga al nia kutima logiko, estas : "La elektrono estas tiel disvastigita, kiel lokiĝinta".

Teorio pri la loka realismo. Tri premisoj.

Nia kutima pensmaniero rezultas de tri dogmaj premisoj (t.e. oni devas akcepti ilin senpruve) :

- 1) la realismo : doktrino, kiu asertas, ke la reguleco en la observitaj fenomenoj estas kaŭzita far fizika realo, kies ekzistado estas sendependa de la homa observanto ;
- 2) la indukta inferenco : estas valida pensmodalo, kiu povas esti laŭplaĉe aplikata, tiel ke la legitimaj konkludoj rezultas de koheraj observoj ;
- 3) la disigebleco aŭ lokebleco de Einstein : nenia influaĵo povas propagiĝi pli rapide ol la lumo.

La teorio pri la loka realismo alportas vidon pri la universo, bazitan sur la "komuna saĝo" (kiu ne estas tiel komuna), kiu tamen frakasiĝas antaŭ la novaj konceptoj pri tiu universo, alportitaj far la kvantumteorio kaj la ĵusa scienceksperimentado pri Fiziko.

La kvantumteorio starigas nin fronte al epistemologia revolucio, t.e. tuta transformado ĉe la studo kaj la naturo de la homa kono. Temas ne nur pri nova scienco, sed pri revolucio en la sciencostrukturo : nova maniero vidi, koni kaj agi.

La universo ne konsistas en disigitaj partoj, sed ĝi estas nedividebla tuto.



Plie : la ekzistado de objektoj en la ekstera realo povas ne esti sendependa de la konscio de la observanto. Ni rekomendas legi la artikolon "**Kvantumteorio kaj realo**" (Scientific American, nov. 1979), far Bernard D'Espagnat, profesoro pri Fiziko en la Universitato de Parizo.

Pridiskutante kun amiko fizikisto la supre menciitan artikolon, mi eksciis, ke la legendeca skolo de Pitagoro estis atinginta konosintezon, kiu kombinis tion racian kun tio ne racia. Ni klarigu, ke "ne racia" ne signifas "malracia" sed tiun pensmanieron, kiu ne alkonformigas sin al la tri premisoj de la kutima pensmaniero. Ĉirkaŭ la 5a jarcento a.K., tiu skolo, pri kies devenoj kaj unuaj jaroj mi povis trovi nenion seriozan en la plej bonaj bibliotekoj de Kalifornio, disiĝis en : 1) la akusmatika(22) skolo (tiuj, kiuj aŭskultas) kaj 2) la matematika skolo (tiuj, kiuj rezonas).

Ne surprizu nin la fakto, ke ĉio, kion ni nur scias pri Pitagoro, devenas ekskluzive de la "matematika" skolo.

Mia supozo estas, ke la Pitagora akusmatika skolo emfazis tion, kion ni nun nomas unueca perceptado, kaj ĉar tiu ĉi perceptado estas verŝajne pli malfacile esprimebla, komunikebla kaj komprenebla ol la leĝoj pri la logika-matematika rezonado, la akusmatika skolo finfine perdiĝis en la historio de civilizo, kiu moviĝas nur en la procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika (procezo META). La akusmatika skolo degeneris kaj miskreditiĝis, kaj enfalis en malraciajn mistikismon kaj ritismon. Alivorte, ĝiaj disĉiploj kaj instruistoj ne plu aŭskultis, ne plu vivis vere en unueca perceptado.

La procezo META aŭ penso povas do funkcii almenaŭ trimaniere :

- 1) Racia (asertiva-difiniva aŭ spactempa). Ekzemple : la Matematiko. Tiu ĉi kapablo estas mezurebla pere de la testoj pri intelekta koeficiento (maltrafe nomitaj pri "inteligenteco").
- 2) Ne racia (pasiva-esplora aŭ ne spactempa). Ekzemple : la koncepto pri la ondofunkcio en kvantum-mekaniko.
- 3) Malracia aŭ prototaksia, kiu - ĉar ĝi bezonas malmulte da energio - estas la maniero de kutima penso en la homaro.

Krom tiuj ĉi modaloj de la procezo META, la menso povas percepti rekte kaj inteligente (tiom la eksteran realon, kiom la funkciadon mem de la procezo META) kaj tiun manieron percepti ni nomas "unueca perceptado".

Tiu ĉi percepto-tipo ne determinas sed estas kontingence interligita al nedistordita kontakto kun ĉiu realo, kiun ni nomas cirkla konscio aŭ kerna stato.

Nuntempe la tendenco en Fiziko ŝajne direktiĝas al koncepto pri antaŭsupozita ordo, kiu proksimiĝas koncepte al la ideo de "etero" de la 19a jarcento, kiu asertis, ke la infinita spaco ne estas malplena sed plena de etero. Ĉirkaŭ la fino de la 20a jarcento, David Bohm surprizas nin per sia koncepto pri la holomovo ; movo, kiu inkludas la observanton kaj la observataĵo, kaj kiu montras implicitan aŭ envolvitan ordon kaj alian eksplicitan aŭ disvolvitan.

La holomovo de Bohm rilatas al la hologramo de Gabor, sed tiu ĉi lasta estas nur senmova registro de la lumomovo. La lumo mem estas unu el la multaj manifestiĝoj de la universa implicita ordo, kune kun aliaj energiformoj kaj la materio mem.

Laŭ la psikologia vidpunkto oni deduktas de tio supre dirita, ke la mov-perceptado estas ne nur memoro pri la antaŭa movo, sed ankaŭ (aŭ eble pli ĝuste) perceptado de la implicita ordo inter movo kaj movo.

La vorto "momanto", kiun oni tiom uzas en Fiziko, havas la saman etimologian devenon kiel la vorto "movo".

Ni povas percepti ĉiun momenton, kvazaŭ ĝi estus senmova okazaĵo (aŭ serio da okazaĵoj), kio estas kvalito "percepti" de la procezo META. Fakte, "momento" estas "movo" kaj la perceptado de tio, kio tiumomente okazas, kvazaŭ ĝi estus io senmova, estus distordo.

Kiel ni jam diris, la procezo META nepre distordas la unuecan perceptadon de la movo ĉiumomenta.

Sed, kio estas do la perceptado de la senmoveco?

Tio, kio estas rigardata (far la mnemonika procezo aŭ penso ĝustadire), kvazaŭ io permanenta (aŭ senmova) estas nur momentoj, kiuj sinsekvas je certa intermita simileco. La senmoveco estas nur formo de movo kun certa intermito.

La tempo ne estas spertata rekte en unueca perceptado, kaj ĝi estas nur abstraktaĵo de la penso proprasence, ideo aŭ bildo de la procezo META. Memvideblas, ke ni al kutimiĝis pensi certamaniere kaŭze de la akordo kun la logiko (plejbonkaze), kaj tiu ĉi kutimo, unu el kies ekzemploj estas la teorio de la loka realismo kaj ĝiaj tri dogmaj premioj antaŭe menciitaj, kondukas nin al unu sola maniero sperti la realon.

La totala malfermiĝo al la unueco de la sensa perceptado montras al ni aliajn aspektojn pli vastajn de la realo, la personoj, ktp.

La fundamenta realo aŭ la baza ordo de la tuta universo (kaj de la menso mem) estas la movo ; ne nur la movo de partikloj (apudaj aŭ ne), sed ankaŭ la movo de tio implicita en tio eksplacita (de tio envolvita en tio disvolvita), de tio nemanifestiĝinta en tio manifestiĝinta kaj inverse.

Kiel David Bohm diras, tio posta ne sekvas tion antaŭan (kiel klopodas esprimi la meĥanisma penso), sed tio posta malkaŝas la esencon de tio antaŭa. La koncepto pri tempo, kiu pli ĝuste ol realo estas abstraktaĵo de la linia konscio, ne enhavas unu ordon, sed ĝi manifestas la bazan (implicitan) ordon de la universo. Tiu ĉi lasta estas multe pli subtila ol la ŝajna ordo implicita en la ideo pri tempo.

La koncepto pri persona identeco, kiu implicas la ideon pri permanenta "mio", evidentigas mankon de perceptado (kaj kompreno) de tiu ĉi tuta problemo pri la movo, la ordo kaj la tempo.

La "mio" (kiel ideo pri persona identeco permanenta) povas ekzisti nur

- 1) se ni ignoras ĉiun logikan kaj racian penson,
- 2) se ni rifuzas fari la fundamentajn demandojn koncerne la realon, kaj
- 3) se ni ĉiunomente fermiĝas al la unueca perceptado de la realo.

La "mio" estas kvazaŭ kirlo en la rivero, kiu havas sian propran ordon kaj sian propran energion, parte malligitajn disde la tuta fluo de la rivero, kiu estus la realo kaj la tuta ordo. La kirlo distordas la movon de la rivero. Tamen, eĉ la energio de la kirlo devenas de la tuta rivermovo.

Tiu "kristaligita identeco", kiun ni nomas "mio", estigas socion tute sensencan. Tiel adapti sin, kiel opozicii al tiu socio ankaŭ ne havas sencon. Ni havas nenian alian alternativon ol vidi la movon de tio, kion ni konstruis aŭ estas konstruantaj, kaj kiu havas nenian sencon. Tiam komenciĝas ŝanĝo je profunda nivelo en tiu ŝajna "identeco", kiu unue komprenas la sencecon de sia stato kaj, duavice, "ne tuŝas psikologie" la sencecon de la medio, kie li vivas.

La unua klariga ago estas kompreni, ke la mio ne estas la aŭtoro (la deveno) de la penso, sed nur la produkto en la tempo de la penso kiel memoro. Tiu ĉi perceptado estas la unua kontakto kun iu interna fundamenta ordo.

De tiu ekirpunkto, la mio ne disiĝas de tio, kion ĝi observas kiel "observanto", sed oni perceptas ĝin kiel parton de tuta ordo, kiu estas unu sola movo inter la implicitaĵo kaj

la eksplicitaĵo (tiel en la observanto, kiel en la observataĵo).

Kiam la penso, kies funkcia esenco estas la dualeco, moviĝas irante de tio partikulara ĝis tio ĝenerala, tio partikulara estas la implicita ordo de tio ĝenerala. Kiam ĝi moviĝas de tio ĝenerala ĝis tio partikulara, tio ĝenerala estas la implicita ordo.

La penso kiel limigita procezo povas proponi la paradokson "tio limigita estas senlima", kies neevitebla konkludo estas, ke eĉ tio senlima estas limigata. Subita unueca perceptado (aŭ rekta kompreno) de tiu ĉi movo, en kiu la penso moviĝas, sufiĉos por kompreni ĝian naturon. Tiu ĉi kompreno povas sufiĉi (sed ne necese) ankaŭ por kompreni, ke la penso mem kiel tuto estas la eksplicita ordo de alia ordo, kiu estas envolvita aŭ implicita trans la penso.

Tiu ordo estas tio, kion ni nomas inteligenteco aŭ unueca perceptado, kiu eventuale povas devenigi la cirklan konscion.

La grava problemo estas, ke la simpla fakto pensi pri tiu ĉi implicita ordo igas ĝin parto el la eksplicita pensordo, kaj la bildo denove anstataŭas la intelligentan perceptadon unuecan aŭ rektan.

La vorto "absoluta" rilatas etimologie kun la vorto "absolvi". "Absoluta" estas tio, kio estas senkondiĉa. "Absolvi" (aŭ pardon!) estas liberigi de la kondiĉoj.

Tamen la procezo META kreas absoluton, kiu estas la "mio", serĉante sekurecon, stabilecon kaj permanentecon. La procezo META distordas tiel la signifon mem de la vorto "absoluto", kiu devenis de tiu procezo, ĉar la mio estas nur aro da kondiĉoj kaj produkto de la memoro (la kondiĉado).

La unueca perceptado estas la paŝo al la absoluto. Tio absoluta estas la cirkla konscio ; perceptado de la realo kaj la personoj ne distorditaj far la kondiĉoj truditaj al tiu perceptado far la memoro, la ideo, la imago, la emocioj kiel timo, malamo, ĵaluzo, envio, ktp, kaj la aŭtonomikaj reagoj kardicirkulaj, spiraj, gastrointestaj, glandaj kaj generilaj.

La supera funkcio de la cerbo estas rigardi, aŭskulti, percepti, tiel ke la nura enhavo de la konscio estas tio vidata, tio aŭskultata, tio perceptata. Sed ĉar tio vidata ŝanĝiĝas senĉese, la plej grava aĵo de tiu funkcio estas la ago vidi ĉiumomente, en la tuta movo.

Kiam ni pensas, kiel nun, pri kio estas observi sen la ideo pri iu senmova aŭ permanenta observanto kaj iu observata objekto senmova aŭ permanenta, tre gravas, ke la ago mem observi fine superu la agon pensi pri la observado.

Male, la simpla mekanismo de la formala kaj logika penso kondukas neeviteble al la distordo kaj sekve al la konfuzo.

Kiam oni observas la penson, oni ne observas la movon de la enhavo de la konscio (kiel kutime okazas ĉe la analizo), sed nur la movon mem. Ne temas nur transcendi la vertikalan konflikton inter la konsciaj kaj nekonsciaj enhavoj, aŭ la horizontalan konflikton, kiu estas la distordo, kiun la observanto faras al ĉio, kion li observas. Estas necese vidi la strukturon kaj la movon mem de la penso.

Kiam ni demandas "Kio mi estas?", la stato de embaraso kaj malpleno devenas de la unueca perceptado de la interna movo. Kontraste, kiam oni respondas iel ajn, aŭ kiam oni serĉas respondon sensukcese, kio estas moviĝanta, tio estas la kutima pensmaniero (la procezo META), la kondiĉado registrita en nia memoro - kies produkto estas la ideo pri "mio", la koncepto pri persona identeco aŭ aparteno al grupo, nacio, partio, ktp.

En la unueca perceptado estas la komenco de la ordo. En la procezo META estas la radiko de la distordo kaj la malordo.

## VII

### DEMANDOJ KAJ RIMARKIGOJ<sup>1</sup>

#### 1. La triangula konscio en tiu ĉi prelego

**Demando :** Se mi uzus tion, kion vi nomas la triangula konscio aŭ la unueca perceptado, ĉu mi eble interpretus tiun ĉi prelegon en tute malsama maniero ol tiu, kiun mi uzas en mia nuna konscistato, kiu estas la procezo META ?

**Respondo :** Unuavice vi ne uzas la unuecan perceptadon. Se io ene de vi uzas la perceptadon, vi tute ne estas perceptanta.

Aŭ vi totale (unuece) perceptas, aŭdas aŭ komprenas tion, kion oni diras, aŭ male vi ne faras tion. Estas tiel simple. Vi ne povas kompreni tion ĉi "pli bone". Simple, vi komprenas aŭ tute ne komprenas. Tio, kio malebligas al vi kompreni la simplajn aĵojn, kiujn ni eble diris dum niaj paroladoj, estas via timo kompreni, la agado de tiu "mio" ene de vi, kiu prenas al si ĉion, kio alportas al vi "forton", "sekurecon", "kontinuecon" aŭ "daŭrigon". Ĉio, kion ni diris, endanĝerigas la kontinuecon nefunkcian de tiu iluzia ento (via "mio" kaj mia "mio") kaj ne estas strange, ke aperas tie ĉiuspecaj rezistoj kompreni aŭ aŭdi tion diritan. Via mio (aŭ la mia) povas rezisti konscie aŭ nekonscie. Konscie, agresmaniere defendante ian teorion, ideologion aŭ nur opinion. Konscie, pasive pensante, ke se vi ignoras tion diritan, tio fine mortos aŭ malaperos.

La nekonscia rezisto povas alpreni iun ajn formon, kiun Sigmund Freud kaj liaj sekvantoj jam priskribis pli bone ol mi povus fari tion.

Kaj tiu ĉi nekonscia rezisto estas kompreneble la plej insida.

Tio, kio interpretas en nia menso, estas nur la procezo META, kaj tio implicas agadon, kiu povas utili aŭ ne, sed detruas la realan rilaton inter ni ; tiun rilaton (aŭ kunligon, se vi preferas), kiu povas rezulti de la unueca perceptado, de tiu totala ekscio pri tio, kion oni diras, pri kio okazas

precize nun en tiu ĉi rilato inter vi kaj mi. Do, en tiu stato vi ne bezonas interpreti kion mi diras, traduki ĝin al ia lingvo pli bone konata de vi, kun la emociaj kaj visceraj reagoj, kiuj ĉiam rilatas al tiu procezo.

Kiam ni estas en unueca perceptado, ekzistas totala mensa kontakto, kiu bezonas la interferon de nenia komparo, interpretado aŭ traduko, aŭ neniun alia agado de la memoro aŭ la mio. Tiam ekzistas kunligo kaj vi komprenas absolute klare ĉion diritan.

Demando : Kaj kio okazas, se mi estas en unueca perceptado kaj ne vi, kaj do se ne ekzistas kunligo ?

Respondo : Tiam vi komprenas tion, kio okazas, vi elpensas neniun intelektan planon, neniun teorion aŭ ideon por komunikiĝi kun mi. Vi simple komprenas, ke mi ne volas kompreni, kaj ke vi ne bezonas reagi iamaniere : malgajiĝi (pro mi aŭ pro vi mem), timi pri mi, memmortigi vin aŭ ŝanĝi vian fiziologion kaŭze de la procezo META ĝis la ekstremo "ellabori stomakan ulceron" (ekzemple). Kompreneble totalmaniere, vi aŭ via "mio" bezonas reagi niamaniere.

## 2. Pensado senpensa

Demando : Ĉu vi parolas pri pensi senpense ?

Respondo : Mi parolas pri formo de mensagado, kiu ne estas la mnemonika penso, kaj kiu neŭrofiziologie prezentas la funkciajn ekvivalenton de pli ampleksa kaj profunda stato de neŭrona integriĝo en la centra nerva sistemo.

Nia kulturo baziĝas sur la simpla interŝanĝo de parolaj aŭ ne parolaj simboloj, kaj tiu interŝanĝo faciligas pli la uzadon de la procezo META (aŭ mnemonika penso), ol tiun agadon de la inteligenteco, kiun ni nomas unueca perceptado, kaj kiu estas la maniero "plej vera" (pardonu la mnemonikan komparon) kontaktigi sin kun la interna aŭ ekstera realo.

Fakte, ĝi ne estas pli bona perceptado, sed la nura perceptado kun la realo, kiu eblas por ni.

La unueca perceptado estas ĉiumomenta totala perceptado de la realo. Sed ni estis trejnitaj far nia kulturo temposekvenca, analize, parole, kaj tia estas pli ekskluziva kaj fragmenta konsciformo. Tiu ĉi "linia" konsciformo (aŭ fragmenta mensagado) estas la sola grava interfero al la inteligenta unueca perceptado. Se vi volas, vi eble povas diri,

ke tiu ĉi lasta estas vida-aŭda-spaca kaj prefere "amiko de la sintezo", sed tiu ĉi maniero paroli estas eble pli malpreciza kaj konfuza.

### 3. La funkcio de la Psikiatrio

Demando : Kiu estas la vera funkcio de la Psikiatrio? Kiel fakte utilas la terapio?

Respondo : Terapio signifas "servo", kaj ni ne povas servi unu la alian (helpi unu la alian), kiam tiu, kiu servas aŭ helpas, sentas sin supera aŭ pretendas aŭtoritatecon.

La vortoj ŝanĝas kaj interŝanĝas senĉese siajn signifojn, kaj tio okazis ankaŭ pri la vorto "aŭtoritateco". Mi kredas, ke oni kutime konfuzas "aŭtoritatecon" kun "konkuremo" kaj kun "kompetenteco". Mi bezonas koni kion mi faras kaj fari ĝin bone ; tion ni nomas kompetenteco aŭ esti kompetenta. Bedaŭrinde, nia mekanismo "mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika" (META), tiom psikologia, kiom socia, faris la kompetentulon konkurema, serĉanta pli da mono kaj prestiĝo. Elde tie la signifoj komencas miksiĝi kun la vorto "aŭtoritateco".

Kiam vi diras "terapio", mi kredas, ke vi parolas pri la psikoterapio, pri kiu ekzistas sennombraj skoloj, ĉiuj diskutvekaj. Ĉe la komenco la nura profesia psikoterapio akceptebla estis la psikanalizo, kiu bezonis trejnadon de tri ĝis kvin jaroj. Hodiaŭ ni vidas la t.n. psikoterapeŭtojn profesiantaj la komercigitan klinikan praktikon post kelkmonata trejniĝo iom limigita kaj supraĵa. Tiu estas la parto konkreta aŭ pli kruda de la nuna tragedio en psikoterapio, eĉ sen konsideri teoriajn, sciencajn aŭ filozofiajn argumentojn.

La kariopsikoterapio, kiel branĉo de la Kariopsikologio, ne konsideras neevitebla la alkonformiĝon de la psikoterapia situacio al la modelo de aŭtoritateco. Plie, ni konsideras, ke la aŭtoritateco estas baro. Sed en kariopsikoterapio unuafoje oni konsideras la lernadon mnemonikan-eidetikan de la unueca perceptado kiel parton de la nepre necesa kompetenteco. Krome, la kariopsikoterapio estas la nura psikoterapio fundamentita per la aliaj hodiaŭaj sciencaj konoj (Kernfiziko, Neŭrofiziologio, kc).

Rilate la funkcion de la psikiatro ni diros, ke li estas precipe specialiginta kuracisto. Pro tio, lia funkcio estas trans la psikoterapio, kvankam ĝi inkludas ĝin. La psikiatro estas la sola profesiulo kapabligita por uzi neŭrokirurgion, elektroterapion (elektroŝokon), medikamentojn psikofarmaci-



ajn, aŭ aliajn, en ĉiuj tiuj kazoj, kiam la konduto estas perturbata far malsanoj maltrafe nomitaj "fizikaj", kiel malsanoj denaskaj, infektaj, metabolaj, endokrinaj, neoplaziaj, nutraj, toksaj, traŭmataj, senilecaj, alkoholaj, farmakologiaj, iatrogenaj(23), cerbovaskulaj, epilepsiaj, degenerigaj, ktp. La terapeŭtika fasto mem (likva dieto) ne devus koncerni tiujn, kiuj ne estas kuracistoj. La psikiatro, kiel specialiĝinta kuracisto ene de la profesia grupo pri mensa sano, kaj pro sia vasta scio, estas en plej bona situacio (potenciale) por vidi la homon kiel funkcia unuon krome de la dikotomio inter psiko kaj somato. Bedaŭrinde, ekzistas pri la psikiatro tre distordita publika bildo, kiu estas favorata de malgranda sed tro rimarkinda nombro da profesiuloj :

- 1) La psikiatro nesufiĉe trejnita (precipe en la evolulandoj, kie ne ekzistas sistemoj por atesto de specialistoj, inkludante kvinjaran medicino-psikiatrian trejnadon).
- 2) La psikiatro, kies persona vivo estas fakte malekvilibra aŭ misordigita.
- 3) La psikiatro engaĝiĝinta tro frue (aŭ antaŭtempe) en difinitaj psikologiaj skoloj aŭ ideologiaj sistemoj.
- 4) La komercigita psikiatro, kiu uzas nur du aŭ tri terapeŭtikajn metodojn (ĝenerale medikamentadon, polifarmakologion aŭ elektroŝokon).
- 5) La psikiatro servanta la Ŝtaton, kiu ordonas enhospitaligi la ideologiajn malamikojn.

Feliĉe, la plejmulto el la psikiatroj apartenas al neniu el tiuj kategorioj, sed ili iel estas malpli videblaj, malpli rimarkindaj. En enketo, kiun mi faris en Kalifornio kun miaj propraj pacientoj (gepatroj aŭ adoltoj), surprizis min ekscii, ke 70 procentoj el ili ne sciis, ke mi estis precipe kirurgo. Malmultaj estigis ian ajn rilaton inter la kuracisto kaj la psikiatro. Nur 30 procentoj el ili sciis, ke por esti psikiatro oni antaŭe nepre devas esti kuracisto. La malpli instruitaj egaligis la psikiatron al la psikologo, kaj al la prisocia laboranto.

#### 4. Futurologio kaj unueca perceptado.

Demando : Ĉu ni bezonas sciencon, kiu esploru la venontecon, la futurologion ? Historie, ekzistis personoj, kiuj racie antaŭdiris la venontecon, prikonsiderinte logikmaniere la variablojn, kiuj ekzistas en la nuntempo rilate difinitan problemon (kelkaj inkludas tie ĉi la racian Astrologion).

Ĉu vi kredas, ke eblas la ekzisto de personoj, kiuj antaŭ-

vidas aŭ profetas la estontaĵojn, ne laŭ logika maniero (per la maldekstra cerbo, ekzemple) sed laŭ intuicia maniero (per la dekstra cerbo) ?

Respondo : Mi havis rektan kontakton kun gravaj personoj en la kampo de cerba esplorado.

Nenio indikas, ke ekzistas en la cerbo fiksjaj lokiĝoj de la bazaj funkcioj kiel memoro, inteligenteco kaj (ĉi-okaze) la antaŭdirado. La cerbo funkcias kiel unuo. La profetaĵoj nomitaj intuiciaj aŭ nelogikaj ankoraŭ estas en la kampo inundita de la mistiko, kaj (ĝenerale) sub la rego de la ĉarlatanoj. La rimarkoj de kelkaj, kiel J.B. Rhine pri ekstersensa perceptado, kaj Russell Targ pri telea vidado, postulas pli da konsiderado.

Racia futurologio estas pli fidinda, kvankam ĝi ankoraŭ ne estas ekzakta, kiel ekzemple tiu praktikita far personoj kiel Bertrand de Jouvenel, Herman Kann, Olaf Helmer, ktp, helpe de komputiloj. Eble la Astrologio mem meritas pli serenan kaj seriozan atenton ol tiu, kiun ĝi ricevis ĝis nun en la sciencaj rondoj.

Sed mi ankoraŭ estas konvinkita pri tio, ke kiam ni komprenas la valoron de la unueca perceptado kaj do vivas en ĝi, la futurologio mem ĉesas havi la valoron, kiun nun donas al ĝi mnemonika procezo.

Kiam mi vivas en unueca perceptado, mi reagas antaŭ la okazaĵoj de la tuja nuntempo, laŭ totala aŭ nefragmenta maniero. Tiu ĉi totala reago ĉiumomenta igas nenecesa la planadon nur intelektan.

Ni konsideru universalan kaj fundamentan problemon : la malsaton. El dek personoj ok suferas malsaton de manĝaĵo, de konoj kaj de amo.

Se ni alfrontas la problemon serioze kaj totale, ni komencu, ne metante unuavicen niajn individuajn, grupajn, naciajn, religiajn, ideologiajn, politikajn kaj eĉ ekonomiajn interesojn. Agi tiamaniere fragmentigus nian alfrontadon al la problemo, kaj igus ĝin neadekvata, nesufiĉa, senefika.

Se mi perceptas la homaran malsaton sentive, unuece (sed ne emocie, sentimentale aŭ intelekte), mi unuiĝos kun aliaj, kiuj perceptas egalmaniere, por ke finiĝu tia maljusteco, por ke ĝi finiĝu kiel eble plej baldaŭ. Mi demandas min, ĉu grupo inspirita de unueca perceptado de problemo, profunde sentiva, kaj moviĝinta spontanee (ne ideologie) dank'al tiu sentemo, tiu animo por kunligiĝo, bezonas futurologion.

Alivorte, se mi vere volus fini la ĉi-planedan malsaton

(kio, laŭ teknika vidpunkto, estas tuta ebla), mi ne perdus mian tempon, demandante ĉu tiuj, kiuj malsatas, estas la infanoj de mia propra lando, aŭ de mia propra religia grupo, komunistoj aŭ katolikoj, infanoj aŭ maljunuloj, viroj aŭ virinoj, ĉinoj aŭ amerikanoj, malriĉuloj aŭ riĉuloj (kaj ekzistas speco de malsato ĉe la riĉuloj). Se mi vere volas fini la malsaton, mi ne perdos mian tempon en troa planado; mi devas unuavice forpeli miajn ideologiajn antaŭjuĝojn (mne-monikan procezon) kaj alfronti la grandan problemon rekte kaj unuece, laŭ profunde homa maniero.

## 5. Universitataj diskutoj pri Astrologio.

La Departemento pri Sociologio de la Universitato de Michigan, pro iniciatemo de D-ro Marcelo Truzzi, aŭspiciis sciencan diskutadon pri moderna Astrologio, surbaze (interalie) de la libro **Jusokazintaj progresoj en prinaskiĝa Astrologio**. Kritika revizio 1900-1976, de Geoffrey Dean kaj Arthur Mather (1977).

Difino. La problemo komenciĝas per la difino pri Astrologio. En la unua paĝo de la libro, G. Dean diras, ke "Astrologio signifas la studadon de la interrilato inter vivantaj organismoj, ĉefe la homo, kaj eksterteraj fenomenoj. Tamen, Michel Gauquelin jam estis dirinta, ke li tute ne akceptis tiun ĉi difinon kaj ne ŝatis vidi sian laboron citita kune kun tiuj de aliaj, kiujn li ne tro admiras.

Fakte, se ni komparas la laborojn de Gauquelin kun tiuj de profesoro Piccardi kaj kun tiuj de Dane Rudhyar, ni vidas, ke ili estas nur ŝajne interrilatigeblaj. Malfacilas estigi similaĵojn inter la tradicia holisma(24) Astrologio kaj la nova analiza Astrologio.

G. Dean mencias la efikon Piccardi, kiu konsistas en rilatoj inter fiziko-kemiaj reagoj (precipitato de bismuta klorido) kaj la suna agado. Tamen konvenas klarigi, ke Piccardi, kiu estis direktoro de la Instituto por Esplorado Fiziko-kemia en la Universitato de Florenco, ne konsentis nomi "Astrologio" sian propran laboron. Estas multaj la esploristoj de tiu ĉi problemo, kiuj akordiĝas kun tiu sinteno de Piccardi.

Aliflanke, ortodoksaj astrologoj, kiel Dane Rudhyar, ne akceptas, ke ĉiuj interrilatoj inter eksterteraj fenomenoj kaj vivantaj organismoj estu "Astrologio".

Eble estas interesa por la studanto la libro de Michel Gauquelin **Revoj kaj iluzioj de la Astrologio** (Buffalo,

Novjorko, Prometheus Press, 1979), en kiu la aŭtoro intencas malplivalorigi la ortodoksan Astrologion kaj propagandi sian "Astrobiologion".

Alia interesa libro por la scivolemuloj estas **La akceptado de la neortodoksa scienco** de Seymour Mauskopf (Boulder, Colorado, West View Press, 1979). En tiu ĉi libro oni pri-diskutas temojn rilate la totalan paradigman ŝanĝon, kiu alproksimiĝas en la scienco.

**Mekanismoj.** Alia granda problemo estas deterni la mekanismojn, per kiuj interrilatas la kosmaj ŝanĝoj al la homa konduto.

Ankaŭ malfacilas por la sciencistoj, interrilatigi la okultisman kaj supernaturan lingvon (alkemian-magian-reliĝian) de la tradicia Astrologio kun la faktoj multfoje nediskuteblaj, kiujn tiu lingvo difinas.

Tiuj ĉi sciencistoj forgesas, ke la Neŭtona prigravita teorio trovis en la komenco grandan kontraŭstaron ĉe la ĝiatempaj sciencistoj, kiuj rifuzis tion pri "transdistanca efiko". La kritikantoj de Newton senvalidigis lian agadon, konsiderante lin kiel okultiston. Verŝajne, Newton studis Astrologion antaŭ ol prezenti sian teorion prigravitan, kaj eble tiuj studoj donis al li la prikonceptan toleremon, kiu mankis al liaj kolegoj fizikistoj. Nuntempe Bhurrus Skinner estigis sciencon pri la konduto, farante ĝin "nombrebla" aŭ "mezurebla" (t.e. "scienca"). Skinner diras, ke la homa konduto povas esti modifata kvante kaj kvalite per scienca manipulado de ĝiaj "konsekvencoj". Li ne okupiĝas pri la cerbaj aŭ psikologiaj kaŭzoj de la konduto, kiuj nuntempe ne estas mezureblaj aŭ kvantigeblaj. Li diras, ke tiu ĉi estas la "nigra skatolo" de Skinner (la Psikologio), kaj ke li priokupas sin nur pri la mezureblaj epifenomenoj de la Psikologio, kiuj estas la kondutoj. Analoge la astrologoj asertas, ke necesas studi la faktojn kaj iliajn interrilatojn sen tro konsideri la "mekanismojn": la movo de la astroj, ties aspektoj, ktp, estas faktoj, kiuj interrilatas "nediskuteble" kun la homa konduto (alia fakto). Ni ne tro konsideru, kiamaniere tio okazas; tio ne gravas ankaŭ por Skinner, kiu estas konsiderata rigora sciencisto.

Tiuj, kiuj simpatias kun la Astrologio kaj konsideras sin "studemaj" pro tio, ke ili legis tri aŭ kvar librojn, ripetas, ke "same, kiel ekzistas rilato inter la Luno (kaj ankaŭ la Suno, laŭ pli malgranda grado) kaj la tajdoj,

ekzistas ankaŭ rilato de la Luno, la Suno kaj la planedoj, kun la homa konduto". La holisma tradicia astrologo ĉagreniĝas antaŭ tiaj asertoj, ĉar la interrilito inter la Luno kaj la tajdoj estas gravita, kaj la interrilito inter la Luno kaj la homa konduto estas el naturo "etera" (en astrologia lingvo) kaj nur fragmente gravita.

Eblas, ke la holografia Neŭrologio de Karl Pribram kaj la koncepto pri holokinetiko subtenata en moderna Fiziko far David Bohm pliproksimigu nin al la scienca ekspliko de la mekanismo, kiu interrilitigas la kosmajn faktojn kun la homa konduto.

Ni ne devas forgesi pri Carl Jung, la fama psikologo, ribelema disĉiplo de Sigmund Freud, kiu elpensis la koncepton pri sinkroneco, kaj klopodis demonstri, ke interrilito ne nepre ĉiukaze implicas kaŭzan rilaton. Povas ĉeesti ritmoj internaj similaj kaj sendependaj inter du faktoj malsamaj sed simultanaj. Multaj statistikaj faktoj eksterordinaraj kaj pasiigaj, kiujn la analizaj neoastrologoj prezentis en la lastaj jaroj, estas ankoraŭ senvalidigataj far la ortodoksaj astrologoj. Ambaŭ ankoraŭ agas ĉe tre malsamaj medioj. Ekzemplo pri tio estas la esplorado far John Henry Nelson pri la rilatoj inter la planedaj aranĝoj kaj la perturboj en la altfrekvencaj radiaj signaloj. Multajn el tiuj perturboj okazigas ŝargitaj partikloj forpelitaj de la sunaj eksplodoj, kiuj penetras kaj perturbas la ionigitajn tavolojn de la tera atmosfero.

Nelson kredas, ke li trovis statistikajn pruvojn pri tio, ke la eksplodoj ĉe la suna surfaco (kun forpelo de ŝargitaj partikloj en la teran atmosferon) estas precipitataj far certaj planedaj aranĝoj, en kiuj la planedoj troviĝas je 0,90 aŭ 180 gradoj rilate la aliajn. Tamen, Nelson mem koncedas, ke "la afero estas treege komplika kaj malfacila por statistike prezenti ĝin, ĉar estas nenia kombinaĵo de la naŭ planedoj de la suna sistemo, kiu povas esti re-produktata de tiu sistemo en pluraj centoj da jarmiloj".

La radiaj perturboj, antaŭdiritaj far Nelson, havis ekzaktecon je proks. 90 % dum pluraj jaroj.

Multaj specialistoj pri statistiko kaŝe akceptas, ke eblas statistike pruvi ĉion ajn, se oni formulas la problemon laŭ difinita maniero.

En *Time* (3an de sept. 1979, pĝ. 66) oni menciis, ke Phin Cohen denunciis gravajn malversaciojn en la manipulado de financaj fondusoj destinitaj por la esplorado en la Universitato de Harvard. Antaŭ nelonge oni malkovris serion da

fraŭdoj en la prezentado de la rezultatoj de diversaj "sciencaj esploroj", faritaj por plu ricevi la fondusojn por esplorado, provizitajn de la federala registaro de Usono.

Estas videble, ke la Astrologio de iuj profesiaj ortodoksaj astrologoj kiel Carl Payne Tobey, Sydney Omarr aŭ Zipporah Dobyns ne estas la Astrologio de Gauquelin (rilatoj inter planedoj kaj profesioj), de Nelson aŭ de Piccardi (precipitato de la bismuta klorido en rilato kun la suna agado).

Ekzistas kosmaj influoj sur la homo, sed multajn el ili povas ekspliki la modernaj sciencoj, senhelpe de la Astrologio. Diversaj organismoj disvolvis biologiajn ritmojn rilatigitajn kun la tago kaj la nokto, la tajdoj kaj la sezonoj.<sup>2</sup>

Per tio ĉi ni ne volas senvalidigi la alkemian-magian-religian eksplikon de la tradicia Astrologio, sed nur meti ĉiun aferon en ties ĝustan lokon.

Inter la psikologoj, kiuj antaŭ nelonge priatentis la Astrologion, estas H.J. Eysenck, kiu realigis esplorojn kun la astrologo brita J. Mayo. Ambaŭ trovis grandan statistikan signifon en la fakto, ke estas pli ofte ol tio esperebla pro la nura hazardo, ke la introvertitoj naskiĝas tuj post la apero aŭ supera kulminacio de Saturno, dum la ekstrovertitoj naskiĝas, kiam Jupitero kaj Marso okupas tiun lokon. Estas plensignifa por Eysenck kaj Mayo ankaŭ la nombro da introvertitoj naskiĝintaj dum paraj signoj, kaj tiu de ekstrovertitoj, naskiĝintaj dum neparaj signoj.

Eysenck diris, ke se liaj esploroj - tiel, kiel li kredas - ne havus erarojn de planado kaj interpretado (tiel oftaj!), ili apogus multajn klasikajn asertojn de la ortodoksa Astrologio. Pri tio ĉi, Eysenck kaj Mayo diferencas de Gauquelin, kiu - kiel jam dirite - neas ĉiun rilaton inter liaj esploroj ("Astrobiologio") kaj la tradicia Astrologio.

Estas iuj, kiuj pretendas enkonduki en Astrologion la esplorojn de Immanuel Velikovsky, sed aliaj asertas, helpe de rigoraj pruvoj, ke tia kunfandiĝo ne valoras. Immanuel Velikovsky estis rusa psikanalizisto, kiu aperigis en Germanio **Scripta Universitatis**, serion da monografioj, en kiuj Albert Einstein gvidis la fiziko-matematikan fakon. Velikovsky publikigis siajn artikolojn en la periodaĵo de S. Freud, **Imago**. De kiam li ekloĝis en Usono, li publikigis (1950) tre polemikekan libron, nomitan **Mondo en kolizio**. Li prezentas tie serion da pruvoj, kiuj kondukas lin al tre interesa konkludo: la Tero spertis serion da kataklismaj krizoj, kiuj okazis ne nur dum antaŭhomaj kaj prahistoriaj periodoj, sed eĉ antaŭ relative nelonge, en la periodo de la historio skribita de la

homo.

Ĉiu el tiuj kataklismoj havis grandegan efikon sur geologia evoluo de la planedo kaj sur la biologia evoluo de ĝia loĝantaro. Ĉiuj ili estus kaŭzitaj far korpoj de granda maso (filamentoj, kometoj aŭ protoplanedoj), kiuj - eĉ sen kontakti kun la Tero - estus sufiĉe proksimiĝintaj al ĝi por modifi ĝian rotacian movon, inversigi la polusojn, okazigi tektonikajn movojn de la ŝelo, glaĉerojn grandskale, relokigon de la ĉirkaŭsuna orbito, kaj katastrofajn elektrajn malŝargojn inter la planedoj. Tiuj, kiuj kontraŭstaras (foje pasie) al Velikovsky, faras tion surbaze de ideoj de la neŭtona Fiziko, kiu asertas, ke la planedaj movoj estas gvidataj nur de du faktoroj : inercio kaj universala gravito.

Einstein diris, ke eblus aldoni faktorojn de negrava influo por realigi pli precizajn kalkulojn pri la planedaj movoj, kiel ekzemple la premo de la lumo, kiu agas en la vosto de la kometoj.

Tamen, Velikovsky asertas, ke estas du pliaj fortoj, kiuj grave rolas : la elektro kaj la magnetismo. La elektromagnetismo, en iuj cirkonstancoj, sekvas la leĝon de la inversa kvadrato, same kiel faras la gravito. Estas pro tio, ke kiam la planedoj estas disigitaj per orbitoj, kiuj ne intersekcas, povas rezulti malfacilo distingi elde la gravito efikon atribueblan al la elektromagnetismo : kazo de "ŝargo kaŝita far la maso". Estas aliaj okazoj, kiujn (laŭ Velikovsky) ne povas ekspliki gravita modelo, sed ja elektromagnetisma modelo. Velikovsky sugestas la neceson esplori la ŝajne misplayproportcian gravitan influon, kiun efektivigas Plutono sur la orbitoj de Neptuno kaj Urano. Tio ĉi povus esti kaŭzita de ebla elektromagnetisma ega ŝargo superanta la graviton.

La teoriojn de Velikovsky ankoraŭ oni ne rajtas egaligi al tiuj fraŭdoj (kiel okazis kun la viro de Piltown kaj kun Donjuano, la persono de Castaneda ; vd. **Castaneda's Journey** de Richard De Mille, Santa Barbara, Kalifornio, Capra Press 1978).

Oni ankaŭ ne trovis la eraron en la proponoj de Velikovsky (kiel okazis ĉe la mezuroj de van Maanen pri la rotacio de la galaksioj).

Diras al ni G. Dean en sia libro **Ĵus aperintaj progresoj en prinaskiĝa Astrologio** (paĝo 15) : "La kompleksaĵoj de la Astrologio provizas fonton preskaŭ senfinan por novaj eltrovoj. Tio, kio okazas ofte (ne ĉiam), estas, ke la astrologo ellaboras sistemon, aldonas al ĝi eblajn interpretaĵojn bazitajn sur zorge elektitaj ekzemploj kaj prezentas ĉion

kvazaŭ eltrovon, kiam ĝi vere estas nur hipotezo. Tio ĉi ne signifas, ke la hipotezo estas nepre malĝusta, sed ja povus esti tiel". Tio ĉi okazas, kiam ne ekzistis pruvo sufiĉe kontrolita.

Ni jam diris, ke estas tre malfacile enrigardi en la tradician holisman Astrologion laŭ statistika maniero. La minimumaj elementoj en la ortodoksa Astrologio estas la 10 planedoj, la 12 signoj, la 12 domoj, la 5 pli gravaj interplanedaj aspektoj, kiuj (sen konsideri la regumojn, la 4 elementojn, la 3 fortojn, ktp) donas al ni preskaŭ 500 malsamajn faktorojn, el kiuj 40 estas en iu naskiĝa horoskopa karto (ni insistas : minimume). Se krom tio ni memoras, ke iu ajn planeda kombino en la suna sistemo povas reproduktiĝi nur ĉiun 300-an aŭ 400-an jarmilon, ni vidas, ke la statistika problemo fariĝas tute nesolvebla en la ortodoksa Astrologio.

Studoj kiel tiuj de Gauquelin, Nelson, Piccardi, Eysenck kaj Mayo estas tre allogaj por scienca menso, sed nepre fragmentaj por la ortodoksa astrologo.

Gauquelin studis la naskiĝojn de 3647 sukcesaj profesiuloj. Laŭ Gauquelin ekzistas du gravegaj sektoroj : unu estas sur la Orienta horizonto kaj la alia estas Okcidente de la ĉiela meridiano. Saturno okupis unu el tiuj du krizaj sektoroj 704 fojojn (la nombro 598 estus ankoraŭ prezentinta hazardon).

Por sukcesaj militistoj (3438) estis Jupitero tiu, kiu aperis en iu ajn el la du sektoroj 703 fojojn (dum oni estus atendinta 572 pro nura hazardo).

Kvankam tiuj ĉi diferencoj estas signifaj, ili estus malpli signifaj ol ili ŝajnas, pro la fakto, ke estas 10 astroj (inklude de la planedoj, la Suno kaj la Luno), kio donas al ni 20 eblecojn trovi signifan rilaton en la du sektoroj por ĉiu profesio.

Neniu ortodoksa astrologo konsiderus akceptebla la konsideradon de tiom malmultaj faktoroj por fari interpretadon de naskiĝa horoskopo.

Mi estas kirurgo specialiginta pri Pediatrio, Psikiatrio kaj Neŭrologio. Mi pensas, ke la fina funkcio de la homa cerbo estas estigi nedistordan kontakton kun la realoj interna kaj ekstera.

La Astrologio povas konduki nin en sendistordajn akceptadon kaj perceptadon de la realo, kiam ekzistas en la studanto la ĝusta sinteno. Sed ĝi (kaj tion ĉi mi ofte vidis)



povas konduki la malbonan studanton, tiun, kiu kontentiĝas per la mono, la banalaĵoj kaj la fragmentoj, en distordadon de la realo, foje ekstremmaniere. Estas klasika la rilato inter iuj mondfamaj diktatoroj, kiuj nepre alportis detruon, sangon kaj malordon (promesinte pacon kaj ordon) kaj ties konsilantaj astrologoj.

Sendube, la kapablo penetri en la veron aŭ la malveron de la Astrologio dependas de nia kapablo (ĝenerale paligita far la timo kaj la komfortodeziro) penetri en la veron kaj la malveron (ne gravas kiom teruraj ili estas) de nia propra menso.

## 6. Kariopsikologio kaj Metapsikiatrio

Demando : Ĉu vi identigas la Kariopsikologion kun la Meta-psikiatrio, aŭ ĉu vi konsideras, ke la unua estas parto de la dua ?

Respondo : Mi kredas, ke la Metapsikiatrio esploris fenomenojn, nome posedon, telepation, astrajn vojaĝojn (laŭ la senco de iu parto de oni mem, kiu trance forlasas la korpon por esplori de malproksime), telekinezon, antaŭsenton, ktp. Mi ŝatas, ke oni antaŭmetu la prefikson "meta" (kiu signifas "trans"), kaj ke oni konsideru, ke ĉio ĉi troviĝas trans la Psikologio kaj la Psikiatrio, eĉ viditaj laŭ holisma maniero. Alivorte, kvankam ni vidu la tritikon totale, estas bone disigi ĝin disde la pajlo. Aliflanke, la prefikso "meta", kiam oni uzas ĝin same kiel en metalingvo, metalogiko aŭ metamatematiko, havas alian signifon : ĝi indikas, ke temas pri nova kaj alta nivelo de konceptado ene de determinita scienca disciplino. En tiu ĉi lasta senco (kaj nur en tiu ĉi lasta senco) la KP estus parto de la Metapsikiatrio.

Por pli klare esprimi tion : ni ne rimarkas, ke ni ne estas en reala kontakto kun la personoj, la naturo kaj la aĵoj, kiuj ĉirkaŭas nin. Tiu kontakto, kiel ni diris, eblas nur pere de la unueca perceptado. Enfermite en la dualeco de la procezo META, ni ne lernis ankoraŭ kalkuli ĝis tri. Tiu tri estus (metafore) la unueca perceptado.

Elde tiu dualeca procezo, ni pretendas kompreni fenomenojn de duba aŭ polemika valoro (kiuj estus la numero kvar), kiam ni ankoraŭ ne kontaktas kun la simpla realo, kiu ĉirkaŭas nin (kiu estus la numero tri). Pro tio, ni diras figure, ke ni pretendas kalkuli ĝis kvar, dum ni ankoraŭ ne scias kalkuli ĝis tri.

## 7. Kariopsikologio kaj antipsikiatrio.

Demando : Ĉu estas la KP antipsikiatria movado ?

Respondo : Ne, ĝi ne estas tia. La KP estas nur movado por etendado, integrado kaj renovigado ene de la Psikologio kaj la Psikiatrio. Mi eniris en la Psikiatron per la flanko de la antipsikiatrio, kvankam tio ŝajnas stranga, kaj la unua libro, kiun mi legis, estis **Psikiatrio kaj antipsikiatrio** de David Cooper ; poste mi legis librojn de Szasz, Laing, Rosenham, Kesey, ktp.

Estis mia formala psikiatria trejniĝo je universitata nivelo kaj mia kreskanta sperto kun psikozaj malsanuloj (kaj ĉiam pere de la unueca perceptado), kiu detruis mian falsan kondiĉiĝon (mnemonikan-eidetikan-timikan kaj simple libro-parolan).

Trejnado, sperto kaj unueca perceptado montris al mi, ke la mensa malsano estas neniu mito, kaj ke la libereco ne estas nura manko de limigoj (kiel kredas la infanoj kaj kelkaj advokatoj). La mensa malsano estas trista realo, kiu degenerigas la individuon eĉ fizike aŭ organisme (se oni akceptas la neeviteblan dualecon, por ke mi povu esprimiĝi), kiu senigas lin de la libereco decidi pri sia propra vivo respondece, kaj kiu bedaŭrinde multfoje forigas la ŝancon de la stato de karyon aŭ kerno, kontraŭe al tio, kion Robert Laing kredigis al mi ; li diras, ke akiri psikozon estas maniero serĉi la propran savon antaŭ familio aŭ koruptita socio. Facilas vidi, kio okazas en la familio kaj en la socio. Facile estas vidi ankaŭ, ke la psikozo ne estas la solvo.

La troa kaj antaŭtempa disvastigo de tiuj ĉi falsaj ideoj eĉ influis la leĝojn de kelkaj landoj, pravigante la forlason de multaj psikozaj malsanuloj sub la eŭfemismo de "homaj rajtoj" aŭ de "libereco". Fakte, tiuj ĉi falsaj ideoj penetris la psikiatrian medicinon kiel reago antaŭ la korupto de iuj profesiaj psikiatroj kaj parapsikiatroj en totalismaj ŝtatoj, kiuj pravigis la "hospitalan malliberejon" por kelkaj politikaj aktivuloj, sub la titolo "psikozo". Pro tio ni insistas pri la neceso vidi la veron en la malveroj kaj la malveron kaŝitan en ĉiu vero.

Sed tie ĉi ni parolas ne pri korupto, sed pri Psikiatrio kaj Psikologio. Ne koruptitaj Psikiatrio kaj Psikologio estas tio, kio montros al ni la novajn (kaj plej adekvatajn) rilatojn inter la leĝo kaj la Psikiatrio. Unuavice, ni devas forigi la nekonscian tradicion (kaj pro nekonscia, pli influa

kaj danĝera), ke la leĝoj, la advokatoj, la leĝistaro kaj la justicaj kortumoj estas inspirataj de Dio (koncepto, kiun ni heredis ekde la Mezepoko).

La advokatoj kaj la kortumoj havas malfacilecon por kredi pri la nekonscio kaj por vidi, ke la konduto havas plurajn determinilojn.

Eĉ por multaj psikiatroj, malfacilas kompreni la eklektitajn konceptojn de la KP pri la rilatoj inter kaŭzoj kaj efikoj. Carl Jung plendis ĝismorte, ke liaj kolegoj ne komprenis lian koncepton pri "sinkroneco". Ŝajne ni komplikas la aferojn, parolante pri "ĉenoj", "retoj" kaj "interagoj" kaŭzaj.

Temas nur pri lernado vidi la realon moviĝantan. Ne ekzistas senmova realo. Do, ankaŭ ne ekzistas senkulpeco aŭ kulpeco senmovaj. Kaj mi sincere kredas, ke eĉ advokato povas esti senkulpa dum kelkaj momentoj de la tago, se li vivas en la unueca perceptado (permesu al mi la humoran intencon).

Kiom da fojoj ni klopodis serĉi kulpon en iu pro timo esti kulpigataj ? Iuj diras, ke tio estas la origino de la krimologiaj leĝoj. Eĉ plie, en Antipsikiatrio eblas identigi en ties defendantoj (ekzemple en Thomas Szasz, laŭ tio notita de Roth en la British Journal of Psychiatry, 1976, en la artikolo titolita "Schizophrenia and T. Szasz") la bazan dualecan dikotomion de la procezo META, kiu (ĉi-okaze) dividas kaj disigas rigide la menson disde la korpo, kvazaŭ ili estus du "substancoj" neakordigeblaj.

## 8. La Skinnera kondiĉado.

Demando : Ĉu okupas iun lokon en viaj skemoj la kontribuo de Bhurrus Skinner ?

Respondo : Mi konis Skinner persone la 17an de Decembro 1976 en la urbo Miami dum la 16a Interamerika Kongreso de Psikologio. Ni ne povis interparoli pri ĉio, kion mi volis, ĉar li estis ĉirkaŭita de fanatikaj sekvantoj, kiuj fotadis lin kaj petadis de li aŭtografojn. Iumomente mi demandis al li, kion li vere intencas. Li diris al mi : "Krei mondon, kie la peko kaj la eraro ne plu havu lokon".

Mi estis leginta du el liaj libroj : **Scienco kaj homa konduto** (Barcelono, Fontanella, 1974) kaj **Trans la libereco kaj la digno** (Barcelono, Fontanella, 1973). Skinner uzas la komunan saĝon, kaj mirigis min dekomence, ke la tiel simplaj aferoj, pri kiuj li parolas, havas tiom da disvastigo, precipe en Latinameriko.

Nialingve, kion Skinner deziras, tio estas sisteme kondiĉi la procezon META ĝis la ekstremo, ke ĝi iĝu socie akceptebla kaj sendanĝera. Kion ni diras unuafoje en la historio de la Psikologio, tio estas, ke kreskanta nombro da konitaĵoj kaj faktoj kunfluas por evidentigi (kaj por ke ni inferencu la ekziston de mensa stato - kerno aŭ karyon), kiu povus esti la plej grava mensa stato por la homo.

Cetere, la eksperimentoj de Skinner en ratoj kaj kolomboj utilis al li por eltiri konkludojn pri la homa naturo, kiuj povus esti eraraj. La mediaj kondiĉoj determinas la agadon de simplaj organismoj en simplaj okazoj. En la homa vivo, kiel ni jam diris, ne ekzistas simplaj okazoj, kaj la homa interagado, ĉiam kompleksa, stimulas la naturan tendencon de la procezo META konstante ŝanĝiĝi. En miaj prelegoj mi klopodis montri kiel ni estas pli "kina filmo", ol "fotografajo" en la procezo META kaj ties interesa produkto, kiu estas la mio aŭ ego.

Konsideri la vivon homan nur kiel procezon META - kio nepre emfazas nia kulturo, komence la edukado, kiun ni ricevas - estas eraro ne plu akceptebla en tiu ĉi momento de la historio de psikologio. La psikoanalizo donis al ni bonan enkondukon en la studadon de la mekanismoj de la procezo META. La Neŭrofiziologio, la Genetiko kaj la Psiko-biologio montras al ni iom post iom la naturon de tiuj mekanismoj. Skinner pretendas kondiĉi tiujn mekanismojn por fari pli akcepteblan socion.

Ekzistas, mi kredas, eksperimenta societo en Twin Oaks, Virginio, Usono, kie oni volas uzi la principojn de Skinner. Sed se ni uzos kelkajn el la multaj metodoj de Skinner pri edukado kaj psikiatrio, estas grave, ke ni ne forgesu, ke la plej grava homa trajto (kaj eble, kiu diferencigas la homojn disde ĉiuj aliaj animaloj), estas la kapablo transcendi la limojn de nia kondiĉado. Ni ĉiuj estas kondiĉitaj, kaj ni devas esti tiel. Estas grava eraro kredi, ke tio estas ĉio.

La procezo META (nia kondiĉado) ne estas ĉio.

La unueca perceptado povas konduki nin en nivelojn de neŭrofiziologia integriĝo, kun ĝiaj samtempaj statoj de konscio kaj inteligenteco, de kiuj ni povos agi laŭ nova maniero kaj krei adekvatan socion. Ne ekzistas metodoj (de Skinner aŭ de aliaj), kiuj povus anstataŭi la unuecan perceptadon en tiu individua kaj socia integriĝo.

## **9. Kerna stato kaj identiĝo.**

Demando : Ŝajnas al mi, ke la kerna stato, pri kiu vi par-

las, tre similas al la identiĝo kiel defendo, priskribita far S. Freud.

Respondo : La identiĝo estas laŭdifine nekonscia mekanismo por malpliigi la konflikton aŭ la ansiecon.

Ni jam diris, ke tio nekonscia, la unuagrada procezo kaj ankaŭ la duagrada konscia procezo, estas nur aspektoj de la procezo META. Kvankam ekzistas "kerna konscio", ni ne rajtas paroli pri kerna nekonscio. La nekonscio estas ĉiam parto de la procezo META, kaj la identiĝo estas parto de tiu nekonscio.

Demando : Ĉu vi povus klarigi tion per ekzemplo ?

Respondo : Mi kredas, ke ĉio, kio rilatas al la Kariopsikologio, estas pli bone komprenata, se oni forlasas la ekzemplojn ; la ekzemploj ĉiam limigas kaj distordas tion, kion oni deziras kompreni : tion kernan, ĉi-okaze. Tamen mi klopodos : Hodiaŭ, dimanĉon matene, mi promenis tra la bela kvartalo Miraflores (Limo). Mi estis certgrade malstreĉita kaj trankvila. Pasis tie aŭtomobilo, en kiu grandega hundo malmetis sian kapon tra la fenestro. La aŭtomobilo haltiĝis ĝuste antaŭ mi.

Tiam, dum momento mi vidis totale tiun hundon. Estis kerna vido. Ekzistis en la mondo nenio krom tiu grandega kapo, tiu hunda spirega ekscitiĝo, tiu malfermita buŝo, tiuj grandaj dentoj, tiuj brilaj okuloj. Entute, estis impresoj pri forto kaj gajeco, kvazaŭ la hundo ĝojus pro sia promenado. Tamen la hundo ne estis tio, kio gravis. La vortoj, kiujn mi uzas por priskribi ĝin, ankaŭ ne gravas. Ĉio tio estis dummomente unueca kaj objektiva perceptado, estis kvieteco kaj trankvileco en la observado, eble, ĉar la nocio pri "mio" ne okazis ĉe la observado. En la rigardo al la hundo estis kontakto kun totala energio, kiu estis trans la hundo, kaj kiu ampleksis tiel la hundon, kiel tiun, kiu observis elde cirkla konscio - por iamaniere nomi ĝin.

Ĉio ĉi neniel rilatas al la identiĝo kiel priskribita de Freud, kaj per tio ĉi mi ne volas diri, ke la identiĝo priskribita de Freud kiel nekonscia procezo ne estas realo.

## 10. La neŭrono kaj la mio.

Demando : Ĉu la neŭrono sendas energion al la mio ?

Respondo : Ni memoru, ke la mio estas produkto kaj samtempe parto de la strukturo de la procezo META.

La neŭrono estas la materia kaj energia substrato de la

nerva sistemo. La menso estas la integrita agado de tiu nerva sistemo. Ekzistas diversaj neŭrofiziologiaj aŭ "mensaj" statoj kun sia "psikologia" ekvivalento (konscia aŭ nekonscia)

1) V : mnemonika maldormo, la plej reliefigita de nia kulturo

2) VU : unueca maldormo, kie agas la inteligenteco

3) VK : maldormo karyon aŭ kerna maldormo, jam difinita kiel eble plej multe.

4) REM : dissinkronigita dormo.<sup>3</sup>

5) NREM (1-2) : sinkronigita dormo.

6) NREM (3-4) : sinkronigita dormo, maltrafe nomita "profunda" aŭ malrapida.

7) NREM (3-4) K : kerna dormo (ebla).

Ĉiuj ĉi statoj nepre bezonas energion, kiun provizas la neŭrono, kiu mem estas la unuo tiom anatomia, kiom funkcia de la nerva sistemo.

Ni diris ankaŭ, ke la neŭrono - pro tio, ke ĝi estas materio - posedas implicitan ordon, kaj estas parto de la holokinetiko. Ni diris, ke la realo estas la holokinetiko laŭ ĝiaj pluraj aspektoj, kaj ke la neŭrono (aŭ materio) kaj la menso estas nur du aspektoj de sama realo : la holokinetiko.

## II. Kompleta homo.

Demando : Ni kreis homon, kiu havas malplenan koron kaj teknikan menson, komputilan menson. Ĉu eblas ekde tie krei kompletan homon ?

Respondo : Mi komprenas la demandon kaj ni povus pasigi tutan vesperon, malkovrante kune kiuj estas la malveroj en tiu demando tiel plensenta kaj tiel vera. Ni povus eniri en la problemon de la semantiko de la lingvo, kiun ni uzas, ktp, sed eble ni perdus sur la vojo la naivecon kaj la intensecon de la demando mem.

Foje estas pli bone ne respondi demandon sed resti kun ĝi kaj mi sincere proponas, ke ni ĉi-nokte "kunkuŝu" kun tiu demando (por tiel diri).

Ĉiamaniere, en Kariopsikologio - kiel vi jam scias - ni diras, ke oni kreis kulturon, kiu moviĝas nur en la procezo META ; ke necesas krei edukadon, kiu ebligu la unuecan perceptadon, unue relernante vidi, aŭdi, gusti, ktp, seninkline antaŭ la objektoj de la sensoj aŭ antaŭ la mnemonikaj bildoj de la sensacoj.

Ekde tiu unueca perceptado, tute ne dualeca nek konfliktiga, povas aperi la vojo en la kernon, la karyon, la metanojon (agadon aŭ konscion de la karyon), kio estas fonto de ĉiu ordo, energio kaj sano.

## 12. La inteligenteco.

Demando : Ĉu tio, kion vi ĵus priskribis kiel "karyon", estas inteligenteco ?

Respondo : Ni memoru, ke la inteligenteco (unu aspekto de la unueca perceptado) ne estas intelekta koeficiento (IK), kiu estas unu aspekto de la racieco kaj eĉ de la ne-racieco de la procezo META. 4

En la Universitato de Stanford, Kalifornio, Lewis Terman komencis en 1921 studon pri infanoj kun alta intelekta koeficiento. Tiu ĉi studo plu daŭras, sub la gvidado de Robert Sears. Sears estas unu el la 1528 infanoj de la studo de Terman, kaj la registrado de konataĵoj finiĝos nur en la jaro 2010, laŭopinie de Sears.

Terman studis 1528 "etajn geniulojn", kiuj fine atingis la plej dezirindajn postenojn en nia socio laŭ la vidpunktoj de la edukado kaj de la situacio socia, labora kaj ekonomia.

Per tio ĉi senvalidiĝis la mito, ke la infanoj nomitaj "tre inteligentaj" (nur konsidere al iliaj IK-oj), estas misoj de la naturo, kiuj fine difektiĝas antaŭ ol atingi la adoltan aĝon. Tiu ĉi estis la falsa koncepto (aŭ falsa translokado de koncepto), ke "kio frue maturas, tio frue putras".

Tamen, estis inter la 1528 infanoj de Terman neniu, kiu fine estis kiel Einstein, Picasso aŭ Beethoven.

Tio ĉi inspiras iujn fundamentajn demandojn :

- Ĉu estas la vera geniulo tro rara por trovi iun en la grupo studita de Terman ?

- Multaj infanoj, kiuj ne havis tiel altan IK-n, atingis tamen la samajn edukajn, ekonomiajn, laborajn kaj sociajn nivelojn kiel la infanoj studitaj de Terman. Kio do markas la diferencon ?

- Ĉu estis la testo de Terman preparita tiamaniere, ke ĝi malebligis trovi la veran kreivan genion de la homo ?

- Ĉu la vera kre-povo, aŭ tio de ni nomita unueca perceptado, bezonas malsaman manieron de studado kaj mezurado ?

Ĉu eblas iel mezuri tian homan econ ?

- Ĉu ekzistas inter la infanoj de Terman iu, kiu kontribuis al la homaro ankoraŭ nerimarkeble aŭ ne tute kompreneble ?

- Ĉu ekzistas inter la infanoj de Terman iu kaŝita Jesukristo aŭ Budho ?

- Kaj se potenciale ekzistus ia Kristo inter la infanoj de Terman, ĉu estus liaj ecoj rimarkeblaj per ia testo ?

- Ĉu eblas transsalti kulturojn, generaciojn kaj jarcentojn por kompari la inteligentecon de Einstein kun tiu de Leibniz

aŭ Leonardo, aŭ la menso de Jesuo kun tiu de Krishnamurti? - Kiamaniere ligiĝas la vivo kaj la menso de ĉiu el tiuj esceptaj individuoj kun la komuna historio de iliaj propraj generacioj ?

La nombro da demandoj povas multobliĝi, se ni prikonsideras la rilatojn de variabloj, nome la aĝon de la infano kaj la morton (aŭ foreston) de la patro aŭ de la patrino. En la jaro 2000, oni prikonsideros ĉ. 4000 variablojn, rilate proks. 1000 infanojn de Terman, kio estas same kiel studi la interrilatojn inter kvar milionoj da informunuoj.

Ni povas demandi, ĉu estas necesa aŭ signifa por la homaro tia detalema analizo pri fenomeno (nome la IK), kiu estas eĉ tiel malfacile difinebla.

Diras al ni Renée Fuller en sia artikolo "**Ĉu estas la inteligenteco mito de la 20a jarcento?**" (1979) : "La testoj pri inteligenteco determinis tion, kio ni pensas, ke la inteligenteco estas, kaj ilia graveco haltigis la priedukajn teknikojn surbaze de modelo de la 19a jarcento. Tiuj ĉi testoj estis planataj por studi kaj disvastigi tute specialan edukon modelon. Tio ĉi okazis malgraŭ la renovigo de Montessori en 1930 kaj de Piaget en 1970 (kaj de multaj aliaj ekde tiam)". Inter tiuj multaj, estas la edukisto Krishnamurti kaj la lernejoj, kiujn li fondis kun siaj kunlaborantoj en Anglio, Hinda Unuiĝo, Usona kaj Kanado ekde 1970.

Ni konsilas legi la libron de Krishnamurti **La vekigo de la inteligenteco**.

### **13. Konflikto kaj nekonsciaj kaŭzoj.**

Demando : Ĉu estas necese, ke ni analizu la nekonsciajn kaŭzojn de la konflikto kaj de la maltrankvileco por malaperigi ilin ?

Respondo : Multaj psikoterapiaj skoloj koincidas, dirante, ke ne necesas analizi la kaŭzojn de la konflikto por malaperigi ĝin ?

Bedaŭrinde, la KP estas la unua psikologia "skolo" (se eblus nomi ĝin "skolo"), kiu enkondukis la koncepton pri kerno en la fakon pri mensa sano.

Por la KP ekzistas nur unu loko en la menso - se oni akceptas mian esprimon - kiu estas sen konfliktoj ; tiu ĉi loko estas la karyon aŭ kerno, kaj la nura enirejo al ĝi estas la unueca perceptado, kiu estas tio, kion ni emfazas en niaj prelegoj kaj kion ni klopodis rigardi elde diversaj vidpunktoj.



#### 14. Kariopsikoterapio.

Demando : Mi petas, ĉu vi ne povas doni mallongan ekzemplon pri kerna psikoterapio aŭ kariopsikoterapio por adoleskanto kun problemoj ?

Respondo : Bonvolu ni halti ĉe tiu ĉi demando. Ni vidu kviete serioze ĉion, kio estas implicita en ĝi, aŭ almenaŭ, kelkajn bazajn aferojn :

1) La vorto "mallonga" signifas, ke mi ne povas perdi multe da tempo. Mi aldonas : en ĉi tiu momento de la historio, la homaro kiel tuto ne povas perdi la tempon ; kaj ĉar ni rimarkas tiun urĝecon, do ekaperis la KP.

2) La vorto "ekzemplo" signifas, ke mi ne komprenis kio diable estas la Kariopsikologio kaj mi esperas konkretigi iun praktikan aŭ utilan aĵon, kvankam mi ne estas kompreninta la esencon de la afero. Nu, ekde nun mi diras, ke ne eblas vidi la utilecon kaj praktikecon de la KP, se oni ne vidas ĝian esencon, ĉion, pri kio mi parolis jam en la antaŭaj prelegoj.

3) Mi kuraĝas diri, ke tiu estas la demando, kiun povus fari persono, al kiu urĝas solvi personan problemon, ekzemple suferanta patro pro la konduto de sia propra adoleskanta filo. Ni diras dekomence, ke en la hodiaŭa mondo ne plu estas personaj problemoj (se iam estis). Miaj problemoj estas la problemoj de la mondo, kaj la problemoj de la mondo fakte estas miaj problemoj, ĉar ne ekzistas disigo (se iam, mi ripetas, tio ekzistis).

4) Ni nepre vidu nian tendencon kondamni niajn problemojn, kio esence implicas neglekti ilin aŭ, pli ĝustadire, rompi la rilaton de komprenemo, kiu devas ekzisti inter la individuo kaj ties propraj problemoj.

Ni devas komenci amante niajn problemojn, vidante, ke ne estas disigo inter ni mem kaj la kolero, ekzemple ; inter ni mem kaj la malamo.

Tiam oni komencas rilati al la problemo, ĉar oni estas la problemo.

Nur elde tiu unueco povas eliri la foresto de la granda baza konflikto (la disigo inter la "koncepto pri mio" unuflanke kaj ties "propraj problemoj" aliflanke).

5) Ĉio ĉi rilatas al la problemo de la rimedoj uzataj por atingi certajn celojn. Se oni metas bombon ĉe la domo de la ekspluatisto aŭ de la koruptito, ni nenion solvis, sed tute male, memvideble.

Kiam mi disigas min disde mia problemo, kondamnante

ĝin, komparante ĝin, pravigante aŭ uzante iun ajn el la dualaj mekanismoj de la procezo META, mi ne ebligas min esti unu kun la problemo, ami ĝin - por tiel diri - kaj do fini la problemon kaj ĝian konflikton por ĉiam.

## 15. Psikoterapio kaj socia adaptiĝo.

Demando : Se la psikologoj kaj psikiatroj helpas la individuon adaptiĝi al la ekzistanta socia modelo, kaj tie ĉi kaj en Miami kaj en Ĉinio, ĉu ili ne helpas subteni la kaŭzojn, kiuj kontribuas al la frustracio, la malĝojo kaj la detruo ?

Respondo : Mi kredas, ke la baza funkcio de la agento por mensa sano estas lerni kune kun la paciento, kiamaniere finigi la tutan konflikton.

Fini la konflikton neniel rilatas kun adaptiĝo al la mondo pli kaj pli koruptita kaj konstante kriza. Mi scias, ke kelkaj psikiatroj kaj psikologoj konfuzas ambaŭ aĵojn, kaj tiu konfuzo kontribuas al tio, ke la publiko ĝenerale ankoraŭ konfuzas multfoje pri la rolo, la funkcio kaj la celoj de la agento por mensa sano.

Se oni ne finas la konflikton, kies buljono situas en la META kaj en ties baza esenca dualeco, do la kerno kaj ties agado estas por ni ne pli ol nuraj simboloj, aŭ same, la kerno fariĝos eskapo el la konflikto, nova iluzio, nova **maya**, laŭdire de la Hindoj ; kaj **maya** signifas "mezuro". Tiu, kiu mezuras, komparas, taksas kaj pesas - ni jam diris - estas nenio alia, ol la penso, t.e. la procezo META.

Ni diris ankaŭ, ke la celo (aŭ la vojaĝo de ĉi tie ĝis tie, aŭ esti io malsama de tio, kio mi estas) estas parto de la dualeco de la procezo META, kiu kondukas en la fragmentadon kaj en la kontraŭstaron tiom interne, kiom rilate la aliajn homojn. Kiel memvidebla estas tio ĉi ! Ĉu ne ?

## 16. Drogaj kaj kerna stato.

Demando : Ĉu ekzistas ia drogo, kiu "okazigas" la kernan staton ?

Respondo : Eble iuj drogoj povas estigi kemiajn ŝanĝojn neŭronajn aŭ interneŭronajn, kiuj mem determinas staton de konscio egaligeblan al kerna stato.

Sed ni memoru, ke konscia stato estas nur unu flanko de mensa aŭ fiziologia stato, kaj tio ĉi implicas - laŭdifine - integriĝon de la tutorganisma agado, kaj komence per la integriĝo de la agado de la nerva sistemo tiel centra, kiel

aŭtonoma aŭ periferia.

Ni memoru, ke la alkoholo, la substanco plej uzata por estigi mensajn ŝanĝojn, efikas krude detruive al la neŭrono kaj al ĉiuj aliaj organismaj ĉeloj. Estas tre klare, ke la alkoholo komence tute forigas iujn mensajn (aŭ neŭrofiziologiajn) statojn normalajn, kiel la fazo 4 de la dormo S, maltrafe nomita "de malrapida aŭ profunda dormo". Tio ĉi estas komparebla al kio okazas al sanaj personoj nealkoholkonsumantaj, nur ĉe la dekadenco de la maljuneco - kiu komenciĝus post la 65a jaraĝo - kaj estas ĉiamaniere atendenda, sed mi ne kredas, ke ni devas akceli ĝin per alkoholo kaj toksoj.

Kvankam la drogoj estigus (se tio okazus) statojn fragmente similajn al kerna stato, ili perdigas al ni la oportuon ricevi la ĝeneralan organisman profiton de la mensa stato, kiun ni nomas kerna.

Tiu ĉi kerna stato ne estas stato de fragmentado sed, laŭdifine, stato de integriĝo.

Cetere, ĉiu drogo (medicina aŭ ne) havas pruvitan nocan agadon senescepte, al iu aŭ alia aparato aŭ funkcio de la organismo.

Kiam la drogoj ne determinas klarajn patologiajn - aŭ almenaŭ malplaĉajn - simptomojn, kiel okazas tiom da fojoj, ili okazigas statojn de ekscitiĝo aŭ nerva deprimado, kunigitajn aŭ ne per eŭforia aŭ emocia kvieteco. Kiam iuj el tiuj statoj - racionalisme konceptitaj kiel "mistikaj" far iuj - estas pli-malpli plezurigaj, ili lasas en la animo de la spertanto "sindromon de Tantaloo", karakterizitan per la intensa deziro reveni en tiun plezurigan staton (eŭforio, kvieteco, ktp).

Ĉiuj drogoj uzataj kun celoj hedonismaj kaj amuzigaj, sendube pli fortigis la linian konscion ol la kernan staton aŭ la cirklan konscion. Malmultaj drogoj stimulas fragmente la perceptadon, sed tiu stimulo neniam estas tio, kion ni nomas unueca perceptado.

## **17. Transcenda meditado kaj kerno.**

Demando : Ĉu estas la "transcenda meditado" maniero por atingi la kernon ?

Demando : Ni jam diris, ke ne estas teknikoj por atingi la kernon. Vi estas tie aŭ ne. Mi esperas, ke tio ne estas tre malfacile komprenebla. Ni parolis ankaŭ pri la vorto "meditado", kiu iĝis alia fonto de ekspluatado fare de memnomitaj psikoterapeŭtoj kaj improviziaj gurooj.

La fingrumado de la vorto "transcenda" ŝajnas al mi mal-feliĉa obscenaĵo.

En 1976, Beary kaj Benson skribis artikolon en *Psychosomatic Medicine* sub la titolo : Simpla neŭrofiziologia tekniko produktanta hipometabolajn ŝanĝojn en la reago de malstreĉado. La reago de malstreĉado estas por ili tio kontraŭa al la reago de eskapo aŭ lukto priskribita far Cannon en 1936. La hipo-metabola stato konsistas en malpliigo de la kardia frekvenco, la arteria tensio, la agado de la ŝvitonaskaj glandoj, la spirfrekvenco, la niveloj de lakta acido en la sango kaj la baza metabolo, kiu okazas ofte dum la dormo. Sed kurioze, multe pli malpliigas la metabolo per kelkaj teknikoj kiel tiu de ili priskribita : nur reguli la atenton, direktante ĝin al la propra spirado, dirante la vorton "unu" post ĉiu enspiro. Tiu ĉi estas la usona adaptado de kelkaj Zen-procedoj kaj de la ripetado de la fama mahamantra "aum" en la jogo. Ne mankis tiuj, kiuj uzante la **biofeedback**-n kaj per la nomo "elektronika jogo" klopodis sistemigi la memreguladon de tiu hipometabola stato. Sed eĉ kiam la hipometabola stato povus reguli sin helpe de novaj elektronikaj aparatoj aŭ de multekostaj kaj malgrandaj personaj mantroj, ĝi ne necese rilatas al la kerna stato.

En 1974, Hirai skribis sian libron **Psikofiziologio de la Zeno**, en kiu li parolas pri "malstreĉita rimarkado". Goleman kaj Schwartz, studante subjektojn, kiuj praktikis la t.n. transcendan meditadon, formulis la hipotezon, ke "ia transcenda meditado kondukas en pli grandan korteksan ekscitiĝon, kion oni spertus kiel pli grandan perceptokapablon kaj emocian ekscitiĝon samtempe reduktatan, kun avantaĝa reago antaŭ la streso".

Tio ĉi simple estas nur interesa hipotezo. Ni preferas paroli ne pri meditado sed pri unueca perceptado. Laŭdifine, neniu povas riĉiĝi, instruante unuecan perceptadon al la naivuloj kaj al la malesperantoj.

Krome, por la unueca perceptado ne necesas kompleksaj elektronikaj aparatoj: preskaŭ ĉiuj ni havas, naskiĝrajte, la kvin sensojn, precipe la vidan kaj la aŭdan. Se ni neadekvate uzas tiujn kvin sensojn, estas pro nia terura senkonscienco, kaj parte ankaŭ pro nia kreskanta senrespondemeco.

La verko, kiun Gary Schwartz skribis antaŭ nelonge en **American Scientist** pri "biofeedback kaj memregulado", kiu daŭrigas la eltrovojn de Neal Miller pri la lernado de la viscera memregado, nur konfirmas nian koncepton pri unueco de la procezo "mnemonika-eidetika-timika-aŭtono-

mika" (META). Pro tio ni kredas, ke la memregado tiel elektronika en la biofeedback, kiel la medita en la transcenda meditado, povus utili por hipertensiuloj kaj kardiaj malsanuloj (interalie), sed laŭdifine ĝi ne estas vojo al la kerno.

Tiu memregado estas plilongigo de la "procezo META" kaj ni jam parolis pri tiu procezo dum niaj prelegoj ĉi tie, en la Universitato de Kostariko (aŭgusto 1978).

En Limo, Peruo, iu junulino evidente engaĝiĝinta kun la transcenda meditado, faris al mi la saman demandon kaj mia respondo estis tre simila al la hodiaŭa. Tiu junulino ne ĉeestis miajn aliajn prelegojn, el la serio de konversacioj kaj dialogoj, kiujn mi faris en Limo por profesiuloj pri la edukado kaj la mensa sano. Kiam ni engaĝas nin kun allogaj fragmentoj de la vero, ni perdas la oportunon vidi la tutan veron rilate la problemon. Engaĝiĝinte, anstataŭ resti malfermitaj al novaj demandoj, ni serĉas nur la respondojn, kiuj pravigas nian engaĝiĝon.

Ni devas esti fleksiĝemaj en la serĉo, kaj neniam perdi la kapablon vidi iujn el la mensogoj, kiuj neeviteble filtriĝas en la esprimadon de ĉiu granda vero.

### **18. La kerna stato kaj ties efiko al la agado.**

Demando : Ĉu vi kredas, ke la kerna stato bremsas la agadon ?

Respondo : Ne, mi ne kredas, ke ĝi bremsas la agadon, sed ĝi transformas nian ĉiutagan agadon (nure mnemonikan-eiditikan-timikan) en agadon vere inteligentan ; en agadon, kiun ni ŝajne ne konas, kaj kiu integrigas la individuon kun si mem, kun la socio, kun la naturo kaj kun la kosmo.

Tiu inteligenta agado estas tio, kio baze distingas inter procezo META kaj kerna stato, almenaŭ inter procezo META kaj unueca perceptado.

La inteligenteco "scias" kiam uzi unu kaj la alian. La klerulo estas la inteligentulo, kiu metas la procezon META "en ĝian lokon" kaj la karyon "en ĝian lokon"

La karyon ne estas perturbita stato de konscio. La karyon estas natura psikofiziologia procezo, rajto nia ĝenerale neuzata, formo de mensa agado.

Nu, unu el la aspektoj de tiu mensa agado estas stato de konscio malsama, sed neniel perturbita.

### **19. La celo de la vivo.**

Demando : Ĉu oni povas diri, ke la celo de la vivo estas,

esti en la kerno ?

Respondo : La kerno ne povas esti celo. Sed, se ni volas malpliigi la signifon de la aferoj kaj fragmentigi la realon ĝis la ekstremo havi unu celon, mi dirus, ke ĝi estas jena : malpermesi al si partopreni en la agadoj de tiu parto de la homaro, kiu pli similas al porkaro ol al homaro. Alivorte : teni sin aparta disde la procezo de socia korupto.

La unueca perceptado povas helpi nin tiucele, kaj se ni povas fari almenaŭ tion, ni jam faras sufiĉe.

Memvideble, la unua paŝo al tiu perceptado estas rezigni nian ĉiopovon fari la bonon, transformi la mondon aŭ transformi aliulojn.

La unueca perceptado, kiel ni jam eksplikis diversmaniere en niaj prelegoj, estas el interna naturo (interna silento) kaj tiu ĉi interna naturo nepre okazigos, celite de neniu, grandan harmonion eksteran aŭ median en niaj interpersonaj rilatoj.

## 20. Hipnoto

Demando : Ĉu eble la hipnoto ebligas nin atingi pli facile la karyon aŭ kernon ?

Respondo : La sugestio kaj la hipnoto estas eblaj manieroj kondiĉi certan kvietigon de la menso kaj speciale de la procezo META.

William Krogerun, pasia defendanto de la hipnoto en Beverly Hills, asertas, ke la hipnoto estas iu "konvinkig-estiganto ; maniero programi aŭ kondiĉi staton de fido".

Tio ĉi neniel rilatas al la unueca perceptado, kiu aperas kiel produkto de intensa kaj spontanea sensa atento. Nur la unueca perceptado milde (aŭ subite) kondukas al la kerno (karyon) kaj tiu estas stato, kie ĉesas ĉiu kondiĉado, sugestio, programado aŭ plano. §

## 21. Malkondiĉado de la menso.

Demando : Kiom da tempo povas la menso funkcii sen kondiĉado ?

Respondo : Sincere mi kredas, ke la plej bona maniero respondi al vi estas peti de vi, ke vi vidu tute senpene kiel via demando rezultas de la mnemonika-eidetika procezo.

La mnemonika-eidetika procezo estas la nura, kiun nia eduko kaj nia tuta civilizo (inkluzive de la eklezioj) kulturas, kvankam tio ĉi lasta ŝajnas memkontraŭdira.

Tuj post kiam vi vidos la originon de via demando, mal-

kondiĉita inteligenteco komencos agi en vi, eble porĉiame.

## 22. La loko de Dio en la Kariopsikologio.

Demando : Kiu estas la loko de Dio en la Kariopsikologio?

Respondo : Estas kurioze, ke la verseto de la Evangelio de Sankta Johano ŝajnas esti skribita far kariopsikologo. Mi tion diras, ĉar tiu verseto, kiu estis tiel malfacila por ekzegezistoj kaj tradukistoj, diras : "En la komenco estas la logos".

Logos estas grekdevena vorto tradukita kiel "vorto", "Dio" kaj "signifo", far diversaj tradukistoj.

Mi kredas, ke ĝuste Dio povas esti simple vorto, kaj konsekvence parto de la malnova kaj duala procezo META, kun nula aŭ tre relativa influo al la vivo de persono.

Male, Dio povas esti sperto aŭ pli ĝustadire, mensa stato, integriga neŭrofiziologia ŝtormo, io vere plensignifa por uloj; io, kio vere aliformu lin.

En la Krista mesaĝo, kiu diras "Mi estas la vojo, la vero kaj la vivo", estas implicita preskaŭ la sama mesaĝo de la KP. La vivo estas la vojo, kaj tiu estas la vero de la unueca perceptado. Ne estas metodo aŭ vojo al la vivo. La vivo estas la vojo mem. Se vi pensas, ke tio ĉi estas nur mistika lingvo, tio okazas, ĉar vi ne perceptas unuece.

Karl Pribram diris, ke la vidado de la "homo farita de Dio laŭ Sia bildo kaj simileco" estas nur parto de holografia kosmovido.

La interkonsento kun personiĝinta Dio aŭ la akcepto de dia testamento estas esence dualeco, kiel memvideblas. Tiun ĉi dualecon de la procezo META aŭ linia konscio oni esprimas jene : "Mi kaj Tiu interkonsentas" aŭ "Tiu donis al mi testamenton". La unueca perceptado de la transcendantaj aspektoj de la realo, kiun oni atingas nevole pere de la totala perceptado de ĝiaj netrascendantaj aspektoj (perceptado sen ia distordo memora, emocia, ideologia, organisma, ktp), fine estigas "unuon" inter la observanto kaj tio, kion li perceptas en "altaj" aŭ, pli ĝustadire, "pli kompletaj" niveloj de perceptadoj. Ni jam diris, ke la transcendantaj aspektoj de la realo estas tiuj, kiuj transcendas la "mion" (aŭ la procezon META kaj ties konscion linitipan, spactempan aŭ komparan).

Ni ripetas, ke la vorto metanojo de la Kristana Evangelio kiu estis malbone tradukita kiel "pento", vere signifas "trans la nojo", kaj la nojo estas tio, kion ni nomas linia konscio aŭ procezo META.

"Vi devas atingi alian staton de konscio" estas la duala bazo de la religio de la fariseo, kiu povas eĉ mortigi - kiel ĝenerale okazas - la "sanktegan deziron" de la plej altaj (aŭ kompletaj) realoj, tiuj realoj, kun kiuj oni kontaktiĝas, kiam oni perdas la timon al la sendistorda perceptado de la realo, kaj la nuran deziron vivi, "vojaĝante" inter "tie ĉi kaj tie" (aŭ nun kaj poste) de la procezo META. La "vojaĝo" fine estas ne pli ol eskapo el la doloro, eĉ de la neevitebla doloro de la ekzistado, kaj konstanta serĉado de la plezuro aŭ komforto.

"Mi deziras atingi alian staton de konscio", malgraŭ ke subite tio ĉi enfermas dualecon inter la observanto kaj ties celo, ĝi estas la religio de Kristo. Tiu ĉi deziro estas reala, nur kiam oni atingis plenan komprenon de la realo. Estas la procezo META, kiu misinterpretas tiun ĉi deziron kiel nuran kapablon iri de "ĉi tie ĝis tie" je iu ajn nivelo : famo, riĉeco, efikeco, scioj, plezuro, ktp.

La plej grava funkcio de la homa cerbo estas la perceptado de la realo sendistorde kaj la ago spontanea kaj rekta, kiu rilatas al tiu realo.

Tiu ĉi perceptado de la realo, kiu tuj ĉirkaŭas la observanton - sen interfero aŭ distordado de la memoragado de la observanto en la ago mem de perceptado - estas la nura fidinda sojlo de pli altaj gradoj de perceptado (aŭ de pli kompletaj perceptostatoj, en kiuj la observanto kaj la observataĵo konsistigas unuon).

Kelkaj observantoj (eble nur la malplimulto), kiuj perceptis la realon tre komplete, tradukis en vortojn tiun plenan perceptadon en tion, kion oni konas kiel religian literaturon aŭ sanktajn librojn (Biblio, Korano, Bhagavad Gita, Sutroj, Tao-Te King, Vedoj, Dhamapada, ktp).

Tiuj vortoj estis rezultato de triangula aŭ cirkla konsciostatoj. Estas kurioze, ke la procezo META (linia konscio) interpretas tiujn sanktajn parolojn laŭ sia maniero (reduktiga aŭ duala) kaj pro tio aperas la ekzegezo, la konfuzo kaj la hipokriteco en la religio.

Nuntempe, la socie videbla kadro de la t.n. "religia" agado estas ne malpli sensignifa ol ĉiam ĝi estis, ĉar ni persistas enkonduki perforte okazaĵojn de la triangula konscio en konscion nur linian.

Elde tiu agado de la linia konscio, kiun ni nomas "religio", konstante aperas banalaj problemoj, kvankam ne ĉiam la samaj. Antaŭ longe oni klopodis kalkuli la nombron da anĝeloj, kiujn pinglokapo enhavis. Hodiaŭ ni demandas,



ekzemple, ĉu la virinoj povas esti pastroj. Sed ulo, viro aŭ virino, kiu vivas en unueca perceptado (triangula konscio) aŭ en kerna stato (cirkla konscio) estas pli signifa kaj grava por si mem kaj por la homaro ol pastro (viro aŭ virino), kiu ne estas tiel.

La grandaj religiaj organizoj, per sia ideologia propagando, siaj ritaroj kaj siaj pastraj hierarkioj, kontribuas fine al la esenca apatio de la ulo, kaj tiu ĉi neeviteble iĝas pli facile kondukebla.

La individuoj, kiuj komprenas la urĝecon de la hodiaŭaj homaj problemoj, renkontiĝos en malgrandaj grupoj sendependaj de ĉiu organizo politika, ideologia aŭ religia, ne nur por libere malkovri tion, kio estas valida kaj vera en la religiaj doktrinoj, sed ankaŭ por konservi viva la spiriton ĉiam pli mortantan de la amikeco. Ni parolas pri tiu amikeco, kiu ĉeestas en la momentoj de krizo kaj doloro, sed kiu ne interferas kun la necesa privateco individua aŭ familia.

Tia amikeco, kiu ŝajne estas malaperanta, havas enorman socian signifon :

- 1) ĝi estas la reto de reciproka helpo inter la individuoj de iu grupo ;
- 2) ĝi estas la plej bona profilaktika rimedo por la anomio(25) aŭ por la individua izoligo en socio ĉiam pli kompleksa strukture, kaj
- 3) ĝi estas la plej bona protekto kontraŭ la demostanazio(26) kaj ĝia fratino la kriptokratio(27), ĉu teknologia, ĉu ideologia.

C.S. Lewis diris en **La kvar amoj** : "La homoj, kiuj havas verajn amikojn, eble estas pli malfacile regataj ; estas pli malfacile por bona registaro korekti ilin ; kaj pli malfacile por malbona registaro, korupti ilin.

Se niaj mastroj kaj niaj aŭtoritatoj malebligis la privatecon aŭ la neplanitan distraĵon (same kiel la liberan esplorado sciencan, politikan aŭ religian), kaj fine ili eĉ atingus mondon, kie ĉiuj estus kamaradoj aŭ kunuloj aŭ fideluloj, sed ne ekzistus veraj amikoj, ili estus demetintaj de sia vojo kelkajn danĝerojn por si mem, sed ili estus ŝtelintaj nian plej potencon protekton kontraŭ la totala servado".

## LA PANO, LA ŜTONO, LA AKVO KAJ LA VINO

La sanktajn librojn oni povas kompreni nur laŭlitere aŭ male, kiel fragmentojn de profunda instruo je psikologia nivelo. Koncerne la Bibliion, ni trovas en la unua verseto de la Genezo la fundamentan ŝlosilon pri la signifo de ĉiuj 66 libroj (ni memoru, ke Biblio signifas "aro da libroj"). Tiu ĉi

signifo estas emfazita en sennombraj okazoj tra tiuj 66 libroj, ekzemple en Sankta Johano 3:30 kaj ĉefe en 3:31. En ambaŭ paragrafoj oni asertas, ke ekzistas du psikologiaj niveloj, unu nomita Tero kaj alia nomita Ĉielo, kaj ke ili ambaŭ estas neakordigeblaj. Pri tiu ĉi neakordigebleco oni insistas ofte tra la tuta Biblio. Ripete, en la diversaj libroj de la Nova Testamento, oni aludas pri malsamaj konsciformoj en la homo, ĉiam metafore aŭ simbole. Multaj el tiuj ĉi aludoj estas faritaj laŭ tre interesa maniero, kiel paraboloj aŭ rakontoj pri la t.n. "mirakloj". La vorto "pano" aludas ĝenerale la normalan vivmanieron de la homo, kio implicas ĉiun agadon ĉirkaŭ la nura fizika supervivado. La vorto "ŝtono" rilatas - almenaŭ plurfoje - al la instruado, kiu ebligas al la homo eniri en novan konscistaton, renaskiĝi kaj transformi sin en homon tute malsaman, en novan homon. La vorto "akvo" ĝenerale rilatas al la kompreno je profunda nivelo de tiu instruado ; kaj la vorto "vino" aludas transformiĝon de la konscio, tre profundan ankaŭ ; sendube tiu ĉi lasta komparo originas el efiko, kiun la vino kompreneble havas al tiuj, kiuj trinkas ĝin. Certe ekzistas aludo en Sankta Paŭlo (Romanoj 14:21), kie oni malpermesas la konsumadon de vino, konsiderante tiun ĉi vorton laŭlitere. La "vino" de la paraboloj kaj de la mirakloj tutcerte aludas profundan transformiĝon de la konscio.

Ni konsideros tie ĉi kelkajn ekzemplojn, kiuj subtenas la argumenton antaŭe prezentitan. Kiam oni parolas pri "ŝtono" en la Evangelio aŭ Nova Testamento, oni evidente parolas - ĝenerale - pri nivelo de sciado, konado, instruado kaj lernado de la vero laŭlitere aŭ laŭparole. Bedaŭrinde tiun veron oni konas, esprimas kaj lernas pere de certa lingvo, kiu ofte estas tre malnova rilate nian kulturon modernan tute transformitan, kiu havas tre malmultajn rilatojn kun tiu, en kiu disvolviĝis tiu ĉi esprimitipo de instruado de la vero. En la Nova Testamento oni uzas antikvan, simbolan lingvon, kaj tiom la vortojn, kiom la simbolojn oni tute ne uzas en nia moderna kulturo. Aliflanke, oni faris tradukojn multfoje erarajn, kiel ekzemple okazas pri la vorto metanojo, kiu estas tradukita kiel "pento", sed fakte signifas "iri trans la penson". Ekzistas kelkaj vortoj, kiuj estas vere netradukeblaj en la modernajn lingvojn. En la hispana, ekzemple, ne ekzistas du vortoj respondaj al la grekaj **filos** kaj **ágape**, kaj ambaŭ estis tradukitaj kiel "amo". La nuancoj, kiuj donas al ĉiu vorto (**filos** kaj

ágape) malsaman signifon, ne ekzistas en la hispana. Multfoje la antikva lingvo, per kiu oni esprimis la veron, iĝas tute nekomprenebla, ne nur pro senscio, pro mensa senkapa blo, pro realaj statoj de mensa malsano, sed plejpleje, kaj multe pli ofte, pro ofta indiferenteco pri la vero mem, aŭ pri tiu maniero esprimi la veron. Ĝenerale la moderna homo ne okupas sin pri la vero nek pri la antikva maniero esprimi ĝin, ĉar li estas tre laca pro la penoj, kiujn postulas la pluvivo en mondo ĉiam pli komplika.

Kiel ni jam diris, la vorto "pano" montras la nivelon, en kiu disvolviĝas la homo luktanta por sia fizika pluvivado. En la Patronia, kiam oni parolas pri "pano", oni aludas ĝuste por fari tion justan por ĉiutage pluvivi. Tio ĉi rilatas al la "Prediko sur la monto", kie oni aludas la malsaton kaj la soifon de justeco. Tio estas, kiam en la Patronia oni parolas pri pano, temas pri tio, kio satigas nian malsaton fari tion justan en nia lukto por pluvivado. La vorto "justeco" neniel rilatas al la justicaj kortumoj, sed al kapablo juste agi ĉiumomente. Bedaŭrinde, tian malsaton fari tion justan en la lukto por la pluvivado oni forgesas multfoje, kaj la homo luktas por pluvivi, uzante ĉiajn ĉemanajn rimedojn, aŭ etikajn aŭ ne.

La "ŝtonon" kiel konon kaj manifestiĝon de la vero aludas la unua libro de la Biblio (Genezo 11:3), kiam ĝi diras, ke la homoj ne atendas trovi la solidan "ŝtonon" - kiu estas la kono de la vero - por konstrui la domon aŭ la vojon, kiu kondukas en alian staton de konscio, sed urĝiĝinte, prenas brikojn anstataŭ ŝtonoj. Tiuj ĉi brikoj estas homfaritaj kaj ne necese interrespondas kun la vero mem. En la Genezo (ĉap. 11) oni diras, ke la homoj antaŭ ol trompiĝi per la brikoj faritaj propramane, "forlasas la Orienton" aŭ "vojaĝis elde la Oriento". La Oriento en la mapo, kiel ni scias, situas dekstre. Tio dekstra(28) hispane estas ĉiam tio adekvata, tio vera. Se ni iras Okcidenten, ni iras maldekstren, kio - kiel ni scias - estas tio sinistra, tio diabla, kaj ĉiam rilatigita al la mensogo. Kiam la Genezo parolas pri tio, ke la homo vojaĝis elde la Oriento, evidente ĝi aludas tion, ke la homoj malproksimiĝis de la vero, t.e. malproksimiĝis de la "ŝtono". La Babelturo ne estis konstruata per ŝtonoj sed per brikoj, kaj temas pri malproksimiĝo disde la vero kaj malkapablo ĉe komunikado, ne gravas kiom da vortoj ni scias aŭ uzas. Laŭ la Genezo "per ili, oni ne komprenos la vortojn reciproke". Malproksime de la vero, ni konfuziĝas. Nia destino estas tio,

ke "Dio dissemu nin en la fremdujon tra la tuta terglobo".

En la Evangelio de Luko (4:3-4) oni parolas ankaŭ pri la tento, kiun suferas Jesuo far la diablo, kiu ordonas Lin, ke Li transformu la ŝtonon en panon. Jesuo respondas, ke la homo vivas ne nur el pano, sed ankaŭ el ĉiu vorto de Dio. Memvideblas, ke la interrespondo temas pri tio, ke la homo bezonas ne nur pluvivi, sed ankaŭ daŭrigi la instruadon de la vero, kiu laŭ Jesuo - en Luko - estas ĉiu vorto aŭ ĉiuj vortoj de Dio. En la Evangelio de Mateo (16:18) oni diras, ke Simono estas rebaptata Petro, ĉar li estis samnivela al ŝtono: "Sur tiu ĉi ŝtono mi konstruos mian Eklezion". La vorto "eklezio" fakte aludas komunumon bazitan sur la vero, t.e. sur la ŝtono.

En la sekvanta verseto Jesuo diras al Petro (la ŝtono), ke Li donos al li la ŝlosilon de la regno de la ĉielo. Oni scias, ke la bildo de Petro kun la ŝlosiloj ĉe la pordoj de la ĉielo signifas, ke la nivelo de la ŝtono estas la nivelo litera aŭ parola de la instruado de la vero, kiu estas la ŝlosilo al la pordo al la ĉielo, formo tute nova de konscio, sed ankoraŭ ne estas la ĉielo mem.

Tio ĉi klare aperas ankaŭ en Sankta Johano 13, kie oni diras, ke la koko devas kokeriki trifoje antaŭ ol Simono, kiu estis en la nivelo de la ŝtono, vekiĝu je nova konsci-formo. La kokeriko fakte aludas novan manieron rigardi la ekzistadon.

Ankaŭ en Mateo 14:27 oni parolas pri la fakto, ke Petro alfundiĝis en la sama akvo, sur kiu Kristo piediris. Kompreneble, la akvo estas formo de kompreno de la vero, kiu estas pli ol litera kompreno.

Videblas en Sankta Luko 9:32, ke Petro estas dormanta kaj li devas vekiĝi por vidi la gloron de tiu, kiu vivas en tute malsama stato de konscio. La vorto "kredo" rilatas ĝeneralsence al la nivelo de ŝtono - litera nivelo - kaj la vorto "fido" (pistis) rilatas al certa kapablo, kiu iras longe trans la kredo, por vidi la veron en la instruado de la vero. Fidas nur tiu, kiu estas certa, ke la transformiĝo de la homo, kaj do de li mem, estas ebla. Fida homo estas tiu, kiu rimarkas, ke ekzistas nova vivmaniero, sed ne post la morto, sed en la tuja nuntempo, kaj por li mem.

Pri la niveloj de la "akvo" kaj la "vino", oni parolas precipe en la ĉapitro 2 de Sankta Johano, kiam Jesuo ĉeestas geedziĝfeston en Kana, kie estas ses ŝtonkruĉoj. La ŝtonkruĉojn, kiuj laŭdire estas la litera instruado de la vero per la vorto kaj la simboloj, oni plenigis per "akvo",

kiu signifas psikologian (internan) komprenon de la instruado. Poste oni parolas pri la "akvo transformita en vinon". Tio ĉi signifas, ke tiu interna kompreno estis prilaborita far certa tipo de laboro ĝis fariĝi io, kiu tute transformas nian kutiman tipon de konscio, same kiel faras la vino.

La "vino" de la ĉapitroj de Sankta Johano estas ekvivalente de metanojo, vorto tradukita kiel "pento" sed signifanta "iri trans la penson al formo de konscio tre profunda kaj tre diferenca".

En Sankta Johano 4:14, oni parolas pri "akvo, kiu mildigas la soifon kaj kiu estas fonto, kiu saltas ĝis la eterna vivo". La eterna vivo certe estas formo de konscio, kiu komprenas la konceptojn pri spaco kaj tempo sed kie tiuj konceptoj ne gravas.

En la ĉapitro 25 de Sankta Mateo, la "akvo de la vazoj" transformiĝas en la "oleon de la lampoj", sed la koncepto restas sama laŭ simbola vidpunkto. Ni devas memori, ke Moseo ĉerpas "akvon" el la ŝtonoj, ke la bapto mem prezentas la homon, kiu iras super la litera nivelo de la instruado ĝis diferenca formo de kompreno, kaj ke oni fakte parolas pri "homo naskiĝinta el akvo kaj spirito". La Evangelio parolas ankaŭ pri la "fiŝ-kaptistoj de homoj". Fiŝkapti signifas levi la homojn elde la "akvo", kiu estas tiu punkto, kie oni komprenas la instruadon de la vero (vd. Luko 5:10).

Ĉio ĉi kontinuas en la spirito de la Malnova Testamento mem, kiel ekzemple la mencio, kiun oni faras en Jesaja 41:17 pri la soifo kaj la akvo. Ni insistas pri tio, ke "ŝtono", "akvo" kaj "vino" estas nur malsamaj manieroj esprimi kaj kompreni la veron ĝis la ekstremo, ke la konscio tute transformiĝas laŭ maniero, kiun ne eblas koncepti per nia kutima konscio, kiu estas la konscio de la "pano"; la konscio, kiu vivas pensante kiel pluvivi.

Estas tre kurioze, ke la moderna Psikologio, per studado de la epilepsio kaj la dormo, kaj de la holografia modelo de la cerbo konceptita far Karl Pribram, kiel ankaŭ per la koncepto pri *holokinetiko* aŭ holomovo en Kvantum-fiziko, kunportas nin en la komprenon de tio, ke ekzistas tre diferencaj niveloj de konscio en la homo, science pruveblaj. Kompreneble, ni estas en nova erao, kaj la esprimado de la vero estas akiranta formon malsaman kaj samtempe pli komprenblan por la moderna homo, ene de lingvo, kiu neniel rilatas al tiu, kiun ni rigardis en la supraj paragrafoj.

Resumante kaj simpligante, ni povas diri, ke kion instruas

la nivelo "ŝtono", tio estas ke, kiam ni rimarkas ("akvo") tre klare pri kio okazas en la nivelo "pano", ekzistas ŝanco, por ke okazu en nia konscio speco de luma ebrieco, ene de kiu oni perceptas sendistorde la tutan realon. Ni vidas tiam, ke la kvar niveloj - "pano, ŝtono, akvo kaj vino" - ne estas senmovaj, sed partoprenas konstantan movadon en la homa menso.

## ŜLOSILLO POR LA SIGNIFO DE LA BIBLIO

La centra ŝlosilo. La ŝlosilo por kompreni tiun aron da libroj estas en la unua verseto de la unua libro (la Genezo) :

"En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron".

Oni tiel atentigas nin pri tio, ke laŭlonge de ĉiuj 66 libroj intime interligitaj, kvankam skribitaj far malsamaj aŭtoroj dum periodo, kiu etendiĝas dum 2000 jaroj, oni parolas al ni pri du malsamaj tipoj de psikologiaj spertoj: unuflanke, la sperto de la tero, de tio monduma, tio tempa tio netranscenda, tio imanenta, tio mekanika, tio ekstera, tio kondiĉita : "tempo difinita estas por ĉiu afero sub la ĉielo", diras al ni la Predikanto (3:1). Kaj aliflanke la sperto de la "ĉielo". La pluralo avertas al ni, ke tiu ĉi alia sperto havas multajn nuancojn, diversajn nivelojn, plurajn aspektojn. La frazon "regno de Dio" oni uzas precipe en la tri sinoptikaj Evangelioj, escepte de tiu de Mateo, kiu prefere uzas kiel ekvivalenton "regno de la ĉielo" (**basileia tou ouranon**). Tiu lasta sperto estas de tio ĉiela, tio sentempa ; tio, kio ne estas kondiĉata, ĉu de nia propra homa naturo, ĉiu de nia loko en tiu ĉi planedo aŭ en tiu ĉi punkto de la universo.

Tiu ĉi duobla psikologia konceptado ne komenciĝas en la aŭtoro (aŭ aŭtoroj) de la biblia Genezo. Ekzistas registroj pri tio, ke jam la antikvaj Sumeranoj konceptis la universon kaj la mensajn okazaĵojn kiel la An-Ki, kio laŭlitere signifas "ĉielo-tero". Eĉ la barbaraj Hunoj adoris la ĉielon kaj la teron kaj ilia ĉefo nomiĝis "la filo de la ĉielo".

Tiuj ĉi vortoj kaŝe enhavas profundajn sciojn pri la astroj kaj pri la efikoj, kiujn tiuj ĉi povas okazigi, se la homo ne okupiĝas "sin savi" de ili per la subordigado de siaj personaj deziroj al la kosma kaj dia "volo". Majmonido, aŭtoro de la Givdlibro por la vojerarintoj, diris : "Se paroli, pli bone fari tion kripte kaj enigme, same kiel faras mi mem, lasante, ke la reston komprenu nur tiuj, kiuj kompre-

nas min". Tiu ĉi enigma genio ne apartenas ekskluzive al Moseo kaj la rabenoj ; ĝi esta sinteno komuna al ĉiuj kleruloj de la homaro, precipe en Oriento. Moseo adoptas tiun stilon, same kiel poste faros Jesuo, kiu eksplikas, ke Li parolas parabole al la popolo, ĉar "vidante, ili ne rimarkas, kaj aŭdante, ili ne aŭdas nek komprenas" (Mateo 13:13). Ili ĉiuj diras ion por komprenigi alion multe pli vastan kaj kompletan.

En la Zend Avesta de Zoroastro, Mazda kaj Arimano prezentas ion similan al "ĉielo kaj tero". "Tiu ĉi speco de Genezo de la Persoj lokas la landon de ĉiuj plezuroj ('la ĉielo') en Irano, vere mirinda loko - diras al ni Charles Dupuis en **La originoj de ĉiuj kultoj** - kaj nomas ĝin Ereno, nomo de kiu la hebreaj doktoroj devenigis per koruptado Edeno, plej facile ĉar la d kaj la r, tio estas la deleth kaj la resch en ilia lingvo estas du literoj preskaŭ egalaj, tre facile konfuzebaj. Sed la analiza kaj detala esploro, ekzemple tiu farita de Dupuis, havas kelkajn riskojn, ĉar la malgrandaj detaloj povas kaŝi la pli gravajn aferojn.

Se verŝajne ĉiuj ĉi libroj parolas al ni pri naturaj kaj kosmaj okazaĵoj precipe rilate la Sunon kaj ties planedojn, ververe ili parolas lastasence pri mensaj aŭ internaj okazaĵoj de la homoj. La Egiptoj, en la smeralda tabelo (la Kybalion) mencias tiun ĉi identecon en unu el la fundamentaj principoj, la principo pri interrespondeco (dua hermetika principo) : "Same kiel estas supre, tiel estas malsupre". Tio ĉi sciigas al ni, ke same kiel estas la kosmo, estas nia menso ; kio okazigas la harhirtigan eblecon, ke grava transformiĝo de nia menso povus modifi la kosmon mem kaj la naturon. "Sed celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi" (Mateo 6:33).

Tiu ĉi instrutipo okazis ĉiam kriptite (de buŝo al orelo) kaj per duobla aŭ triobla lingvo.

Kaj eĉ tiel oni donas instruon al la lernanto, kiu firme petas tion, pruvante, ke li estas pretigita ricevi ĝin. Tiu estas esotera kaj kriptita instruado, sed ne ĉar ĝi estas kaŝita sed pro tio, ke neniu deziras ĝin tiel firme kiel por prepari sin intense por ĝin akcepti, kun totala transformado de la esto. En tiu ĉi instruado, fine la propra transformiĝo igas onin instruanto de si mem, kaj la vivon konstanta lernejo.

En la hebrea, **adam** signifas "homo". Adamo, kies nomo devenas de la vorto **adam**, estis farita el "polvo" (tero) kaj estas la unua homo en la tempa sfero (tera). Laŭ Paŭlo,

Adamo estas la unua homo tera aŭ tempa, same kiel Kristo estas la unua homo ĉiela, aŭ eterna, aŭ sentempa.

En ĉiu el ni "psikologie vivas" Adamo kaj Kristo ; la mensaj aspektoj nomitaj "tero" kaj tiuj nomitaj per la ĝenerala nomo "ĉielo" ; tio dependanta en nia interno, de la kronologia tempo, kaj tio rilatigita al "tio eterna" ; la arki- kaj la neoencefalo.

Ĉiu el ni estas homo kondiĉita kaj netrascenda ("la mallumoj"), kies psikologio havas la eblecon ŝanĝiĝi por disvolviĝi en la sentempa "spaco" sen limoj kaj sen kondiĉoj (la "lumo" de la Genezo 1:4).

En ĉiu al ni povas miksiĝi tio ĉiela kun tio tera, dum malaperas la normala kaj kutima paraleleco de tiuj du mensaj mekanismoj, kiuj preskaŭ neniam "intertuŝiĝas".

En la Psalmo 139 (vers. 15) oni legas : "Ne estis kaŝitaj antaŭ Vi miaj ostoj, kiam mi estis kreata en kaŝiteco, kiam mi estis formata en la profundo de la tero".

Ĉielo kaj tero laŭ la pitagoranoj, estis Krono kaj Rea. La radiko "Krn" (Krono) sugestas superecon, "potencecon", "povon", "kronon". Krono estis ankaŭ Saturno, kies astrologia loko estas en la sepa ĉielo aŭ Satya Loka ĉe la Hindoj. Krono regas dum la ora erao, t.e. la Satya Yuga, same kiel ni nun travivas - laŭ ĉiuj ŝajnoj - la Kali Yuga aŭ "malluman eraon".

"Krn" estas la bazo por la greka vorto "keraunos" (fulmo), subita lumo, kiu falas sur la altajn lokojn. Eble ĝi estus ankaŭ la bazo por "kornoj", tiuj de lumradioj, kiuj ekkreskas el la kapo de Moseo laŭ la skulptaĵo de Mikel-Anĝelo, kvazaŭ du armiloj, kiuj - deveninte el sia propra menso kaj apartenante al lia korpo - estus pretaj por la lukto kontraŭ la internaj malamikoj. Du eroj de lia "ĉielo", kontraste - akceptu la vorton - al lia interna "tero".

La krucsimbolo pretendas koncentri nian menson ĉirkaŭ tiu ĉi ŝlosilo kaj diras al ni silente, ke ekzistas punkto, kie ambaŭ spertoj (ĉielo kaj tero) kuniĝas : estas la nuna momento, ĉiumomente en nia vivo. La "vojo al la kruco" estas la vojo de la religiulo, la vivo de tia persono. De tiu persono, kiu vidas ĉiumomente kaj en ĉio, kion li faras, kiel ĉeestas tio eterna, tio nekondiĉita.

La vortoproblemo. Observante la enhavon de ĉiuj sanktaj libroj el la mondo, oni povas iom vidi la intencon esprimi la signifon de alia tipo de spertoj, de konsciaj travivaĵoj,



kies surpriza naturo disligas ilin disde la mekanismo de la homa parolo. Tie estas la kialo de la malfacileco, kiun en tiuj ĉi samaj libroj ni trovas, kiam ni ne "situas en la centro de la kruco".

Memvideblas, ke iu elstara kondukanto kiel Moseo, iu kuracisto kiel Luko, iu homo kiel Johano aŭ Paŭlo, kiuj montris altan inteligentecon dum siaj vivoj, ne povis verki (kaj precipe kiam verki estis io tre malfacila) pri aferoj banalaj aŭ memkontraŭdiraj sen iu profunda intenco latentata. Por legi tiujn ĉi antikvajn aŭtorojn, necesas havi la bonvolon situi en ilia loko kaj en ilia epoko. Kvankam ili skribis pri aferoj "eternaj", aferoj ĉiam validaj ĉar ne rilataj al la tempo, ili povis fari tion nur per la iloj kaj la lingvistikaj terminoj, kiujn ili havis. Ĉiuj ili intencis estigi en la leganto ribelema kaj ankaŭ inteligenta la pasian demandon : Kion ili volas diri al mi ?

Ĉar oni volas diri al ni ion vastegan, ion enorman, per ilo malforta, limigita kaj nefirma : la vorto. Estas pro tio, ke oni uzis la simbolojn, krome de la Librojn.

La simboloj. Simple kaj grafike, preskaŭ rekte, helpe pli de la intuicio ol de la rezono, ili ebligas al ni koncentri nian tutan eston en longa serio da ideoj, resummaniere, tuje, kaj - preskaŭ mirakle - senvorte.

René Guenon bedaŭras en sia libro **Simboloj fundamentaj de la sankta scienco** - verkita per nekutima klereco - pri la iompostioma perdo de la homa kapablo "legi" en la simboloj. Li kontraŭstaras la psikoanalizan koncepton, kiu malplivalorigas la fundamentajn antikvajn simbolojn, kaj kiu pretendas provizi individuan signifon por ĉiu simbolo.

Li esprimas en la ĉapitro 4 : "Ni ofte diris tion, kaj tio neniam estos tro ripetita : ĉiu vera simbolo entenas plurajn sencojn, kaj tio okazas ekde la origino, ĉar ĝi ne estas tia kauze de homa konvencio, sed danke al la leĝo de 'interrespondeco' (vd. La Kybalion), kiu interrilatigas ĉiujn mondojn, kvankam kiam iuj vidas tiujn sencojn kaj aliaj ne vidas ilin aŭ vidas ilin nur parte, tamen ili estas vere ene de la simbolo, kaj la intelekta<sup>6</sup> horizonto de ĉiu persono estas tio, kio estigas la tutan diferencon : la simbolismo estas ekzakta scienco kaj ne revo, kie la individuaj iluzioj povus libere okazi".

En la ĉapitro 5 li aldonas : "Do, kiam Freud parolas pri simbolismo, kion li tiel nomas maltrafe, estas nur iu simpla produkto de la homa imago - diferenca en ĉiu individuo - kaj sen io vere komuna al la aŭtentika tradicia simbolismo"


Kaj poste : "Ni rimarkigis la konfuzon inter la subkonscio kaj la suprakonscio. Ĉar tiu ĉi lasta ne apartenas, kaŭze de sia propra naturo, al la kampo, kie okazas la esploradoj de la psikologoj, tiuj ĉi neniam preterlasas - kiam ili havas la oportunon ekkoni iujn el la suprakonsciaj manifestiĝoj - atribui ilin al la konscio.

Ni zorgu distingi klare inter la simbolaro psikoanalize utila kaj la simbolaro rilate la sanktan aŭ funamentan sciencon, nomitan **sophia** far la Grekoj, **satwa** far la Hindoj, aŭ transcenda saĝo.

La simbolo de la kruco estis uzata de ĉiuj religioj (kvankam ĝi atingis sian plej gravan disvastigon pere de la Katolikismo) ĉar - kvankam unu el la plej simplaj simboloj - ĝi unuigas en si mem kompleksan serion da ideoj, preterlasante la nepraktikan mekanismon de la sono kaj de la lingvo. En nur unu momento kaj en la plej kreiva silento, ni povas prezenti al ni la krucon ĉiumomente kaj ĉiuloke. Eĉ far iuj muzulmanaj skoloj la krucocentro estis nomita "la dia stacio" (la maqamul-ilahi).

Tie renkontiĝas ĉiuj kontraŭaĵoj kaj solviĝas ĉiuj kontraŭdiroj, kiel en la pesilmontrilo. Ĝi signifas la ekvilibron, la harmonion, la justecon, ankaŭ la ĝustan mezon aŭ la konstantan mezon, kiun tiel ofte aludas Gaŭtamao, la Budho.

La simileco de la kruco al la homa formo komprenigas al ni, ke ĉiu el ni estas "stacio de Dio", ke en la centro de ĉiu el ni situas reflektio de la plej supera principo (holografia koncepto pri kosmo).



Se sur la horizontalon ni metas la numerojn 1, 2 kaj 3, kaj sur la vertikalon, de supre malsupren, la literojn A, B kaj C, ni vidos, ke 1 estas pasinteco, 2 nuntempo kaj 3 estonteco (la tempo, tio kondiĉita, la vivo, la "tero" de la Biblio prezentataj far la horizontalo). Sur la vertikalo (la eterneco) ni rekonas diversajn konsciŝtatojn, diversajn komprenmanierojn; la

religiecon, la "ĉielon" (A) kaj la "inferon" (C) de la Biblio. "B" estus nia hodiaŭa stato esti, en tiu ĉi momento. "C" diras al ni pri statoj deprimaj, malklaraj, malsuperaj aŭ malsanaj. "A" memorigas al ni, ke super ni mem, en la sama loko, kie pasas la nuntempa momento (la nuno mem), malfermiĝas antaŭ ni la ebleco de mensa stato "supera", transcenda, luma, sana, ĉiela, kaj nekondiĉita.

Se ni konsideras la krucon, la eterneco povus trapasi nin en "B", precize en tiu ĉi nuna momento (2). Ĉiumomente. Sen vortoj, sen bezoni iun rezonadon. "A" estas la Suno, la ĉielo aŭ la bono imanenta aŭ manifestiĝinta por la homoj. "C" estas la Luno. Se ni proksimiĝas al la Suno, kun ĉio, kion tio ĉi signifas simbole, la vivo (1, 2 kaj 3) trapasos tra malsama punkto supre de "B", la tuta vivo havos por ni signifon tute malsaman.

Ĉiaj ajn okazaĵoj estos spertataj kaj rigardataj novmaniere kaj tute nepriskribeble. La simbolo povas fari ne pli (aŭ malpli) ol komprenigi al ni la gravan fakton, ke ekzistas ebleco de io malsama, de io transcenda ene de ni mem, en tiu ĉi preciza momento. Ebleco, kiun ni kutime neglektas dum nia tuta vivo. La ĉielo de la Biblio estas tiu tuta porcio de eterneco, kiu "fluas" super la horizonto (la horizontalo) de la tempeco kaj la fenomeneco.

Estas multaj aliaj tradiciaj signifoj en tiu simpla kruco. Ĝia centro (**shin** aŭ **aleph** laŭ la Hebreoj) estas ankaŭ la realiĝo pere de la oferado, se oni konsideras la vorton "oferado" laŭ ĝia signifo : "sankta faro". Tiu ĉi ĉiumomenta oferado povas esti la simpla vivado, la tiel malfacila amo aŭ la escepta abnegacio de la Mesio ; depende de la distanco - se oni akceptas la vorton -, kiu estas inter la centro "B" kaj la Suno. Pro sia mensa mutacio, homo inversigos siajn valorojn (kiel sugestas al ni la paĝo 12 de la ege antikva sankta libro Taroko, kiu ankaŭ rilatas al la simbolo de la kruco) kaj li ĝojos, ke, laŭmezure kiel li proksimiĝas al la Suno, al la netempeco, al la ĉielo, lia tasko estos pli kaj pli malfacila, pli kaj pli nekonata; resume, pli kaj pli transcenda. Li perdos sin mem por esence "gajni". Ni bedaŭras nur pri la uzado de la vortoj "pli", "gajni", kaj ĉiuj tiuj, kiuj aludas la "distancon", ĉiuj el ili estas vortoj tro relativaj kaj kondiĉitaj. Tio ĉi plikonsciigos nin, eble, pri la neceso anstataŭigi per du krucaj linioj tutan longan serion da ĝenaj kaj konfuzaj vortoj. Sed tiu ĉi anstataŭado bezonas ankaŭ internan kapablon legi subite la simbolon kaj konduki ĝin en la propran internon. Neniel validas la daŭrado de la simbolo, se ni demetis ĝian "spiriton" aŭ signifon. Restas de ĝi nur malplena formo. Je la fino de la ĉap. 25 de la libro **Fundamentaj simboloj**, René Guenon demandas sin : "Ĉu oni devas malgraŭ ĉio konservi la esperon, ke tago alvenos, kiam tiu formo estos revigligata, kiam ĝi respondos denove la realon - kiu estas ĝia unua kaŭzo kaj la sola aĵo, kiu donas al ĝi ĝian inican karakteron?".

Eble interrespondas la malfacileco kompreni kun la neebleco klare ekspliki. "Ni havas dirotaĵojn multajn, kaj malfacile klarigeblajn tial, ke vi surdiĝis en aŭdado". (Hebreoj 5:11).

Estas tiel granda la malfacileco esprimi tiujn travivaĵojn per simplaj vortoj, ke la pasia deziro disvastigi ilin estis la kialo de tio, ke iuj faris tion eĉ per malmoralaj historioj. Ekzemplo estas la ĉap. 19a de la Genezo, en kiu oni ĉiam parolas al ni pri niaj psikologiaj modaloj, pri la rezultatoj (la filinoj de Loto) de tiuj kondiĉitaj aŭ tempaj modaloj, kiuj emas ripetiĝi porĉiame (la "ĝis hodiaŭ" de la fino) kaj eĉ senmovigas kaj blokas nin (la mineraligo de la edzino de Loto). Estas plensignifa la aludo pri la ekzisto de subtilaj fortoj (la anĝeloj de la verseto 15), kiuj instigas nin al "tio kondiĉita", "tio tera", supreniri sur "la monton". La monto estas tiu loko de la "tero", kien unue alvenas la lumo de la "suno". Ankaŭ la lasta loko, kie ĝi malaperas. Tiu ĉi suna lumo, kiu venas el la "ĉielo", estas la mensa klereco, la komprenemo aŭ la malfermo al tio transcenda. Tamen, multaj el ni preferas distriĝi en Coar - kiu en la origina biblia lingvo signifas "malgrandan lokon" - same kiel Loto faris (Genezo 19:20-22).

### **La interpretoj. Tradukproblemoj.**

Sed kompreneble, tiuj 66 libroj skribitaj dum 2000 jaroj estis legataj dum aliaj 2000 jaroj. La aferoj komplikiĝas, ne nur pro malsubtila kaj kruda mekanismo de la homa parolo, sed ankaŭ pro la fakto, ke tiu ĉi parolo entenas sennombrajn modalojn (la lingvojn). Fakte, se en la mondo estas kvar miliardoj da loĝantoj, ekzistas ankaŭ kvar miliardoj da lingvoj. Ĉiu parolas kaj komprenas siamaniere. Tio ĉi dependas unuavice de la sociokultura kondiĉado antaŭ ĉiu vorto. Kio estas ĝusta por iuj, tio ne estas tia por aliaj, depende de la loko, la epoko kaj la ekonomiaj vivkondiĉoj.

Tio estas, depende de la "horizontalo de la kruco". Krome, ĉiu ulo starigas rilate ĉiun vorton, refleksajn asociojn, kiuj ŝanĝiĝas ĉiumomente, kio estas la kutima maniero "manovri" de nia ordinara menso.

Se triavice, ni parolas pri aferoj, kiuj - kvankam realaj - neniel rilatas al ĉio konata de ni, kaj ni bezonas uzi la lingvon kaj la elementojn de tio konata por esprimi ilin (tion nekonatan), ni trovas gravan baron ĉe la komunikado, al kiu oni povas aldoni la maltrafajn tradukojn. Ni memoru ankaŭ, ke ekzistas grandegaj organizoj, kiuj disvastigas tiujn tradukojn de la sankta literaturo (Biblio, Korano, B. Gita,

Vedoj, Upaniŝadoj, la ĉinaj King aŭ Ĉing, ktp). Facilas konjekti, kiu estos la rezulto de la interagado de tiuj ĉi diversaj variabloj : totala konfuzo aŭ enorma konflikto inter "tio, kion oni komunikas" (aŭ kion oni komprenas) kaj "tio reala".

Eble ni nun komprenos, pli bonvole kaj neniel laŭlitere, la alegorion pri la Babelturo (Genezo 11).

Krom ĉio ĉi, la lingvo per kiu oni skribis la Malnovan Testamenton estas ege speciala. Ĝi entenas 22 literojn kaj ĉiu el ili povas rilati al ĉiu supera arkano de la libro de Tot (la Taroko). Ĝi estas lingvo, kiu interrespondas litere kun la antikva Egipta saĝo, kaj kiu hodiaŭ preskaŭ estingiĝas, same kiel ĝia similaĵo en objekto kaj signifo (la sanskrito), ene de civilizacio malsamiĝinta, duonbestiĝinta en la senfina vojo de la plezuroj kaj la komforto, la bruoj, la televido kaj la konfuzo. Ne nur ĉiu vorto havis diversajn signifojn dube-sencajn (ĉar ne ekzistis vokaloj), sed krome ĉiu litero havis signifojn interrespondajn kun ĉiu el tiuj ĉi tri niveloj : dia aŭ arketipa, natura aŭ kosmologia kaj homa.

Pro tio, en la plejmultaj okazoj la moderna homo ne kapablas legi flue la originalojn, eĉ se li faras la miraklon havigi al si tempon por fari tion.

Kelkfoje oni demandas ankaŭ kial nur en la hispana lingvo estis tiom da ŝanĝoj en la originala traduko de Casiodoro de Reina, farita en 1569. Tiu ĉi traduko estis kontrolita far Valera en 1602, kaj novajn ŝanĝojn oni faris en 1862, 1909 kaj 1960, sen konsideri la kronologion de la diversaj hispanaj versioj sendependaj kaj pro tio malpli konataj, ĉar ilia disvastigo estas aŭspiciata far neniu organizo.

Pro tio, eblas legi en la tiel diskutita unua verseto de la Evangelio laŭ Sankta Johano, skribita inter 67 kaj 92 jaroj post la morto de Jesuo, en la jaro 125 de nia erao kaj tradukita unuafoje en la hispanan preskaŭ 1500 jarojn poste : "En la komenco estis la parolo, kaj la parolo estis kun Dio, kaj la parolo estis de Dio". En alia traduko en la hispanan ni legis : "En la komenco (de la tempo) la signifo jam estis kaj Dio havis signifon kaj Dio estis signifo" (Johano, 1:1).

En la traduko, kiun Zamenhof faris en la internacian lingvon de li komencita, el la greka lingvo, li uzas anstataŭ la vorto "parolo" aŭ "signifo", la saman vorton uzitan en la angla verko (word), kiu esperante estas vorto. Do ni scias, ke la greka vorto **logos** estas tradukita kiel "vorto", "signifo" aŭ "parolo" laŭ la persono, la epoko kaj la religia ideo pli kutima en tiu regiono. Ni scias ankaŭ, ke la

greka vorto **logos** havas multajn ekvivalentojn nur en la hispana lingvo. Ni imagas, kompreneble, la malfacilecojn proprajn al la tradukado kaj al la Biblia interpreto, se unu sola verseto bezonis tiom da peno.

Plu pri la lingvaj malfacilecoj, kiujn prezentas tiuj 66 libroj, ni donos lastan ekzemplon : en la letero (epistolo) skribita far la apostolo Sankta Paŭlo al la Hebreoj (He.9:15) ni legas, laŭ la hispana versio de 1569 : "Kaj pro tio estas Kristo interulo de nova testamento". Oni uzas la saman vorton kiel en la versetoj 16 kaj 17 el la sama ĉapitro : "testamento". Kontraste, en la revizio de 1960 ni legas : "Kaj pro tio Li estas interulo de nova interligo", diference de la du sekvantaj versetoj, en kiuj oni plue uzas la vorton testamento. Oni diris, ke oni deziras konfirmi pere de la nova versio, ke la homo devas fari "interligon" kun viva Dio, kaj ne ricevi la testamenton de mortinta Dio. Persone ni kredas, ke la duonmortinta homo hodiaŭa kaj ĉiama ne kapablos ricevi eĉ la novan testamenton. La nova testamento estis heredigata al la homoj vivaj de hodiaŭ kaj de ĉiam, por ke ili faru la grandan interligon kun si mem, kun la interna Dio, kun la sentempeco latentă en ĉiu propra konscienco, kion ni rifuzas pro nescio aŭ pro timo, pro indiferenteco aŭ pro mallaboremo.

### **La kondiĉoj por legi : seriozeco, tempo kaj penetremo**

Nenio pli ol sankta libro postulas seriozecon por ĝin legi. Ni vidas, ke la vortoj havas relativan valoron, kiam ne ekzistas vera vitaleco, enorma interna energio, por rabi al ili la signifon, kiun ili kaŝas. Antaŭlonge la sanktaj libroj estis legataj nur en la originala lingvo, en kiu ili estis skribitaj (por ke ili ne estu senvalorigataj pro la tradukoj) kaj oni establis lernejojn aŭ monaĥejojn speciale por tiu legado. Tiujn ĉi lernejojn oni nomis metafore "vinberĝardenoj", kiuj donas ties fruktojn, la "vinberojn", kiujn ĉiu homo "ellaboras" per sia propra laboro kaj kompreno por ĉerpi la "vinon". Oni mencias tiujn ĉi vinberĝardenojn en la Alta Kanto 2:15. Estas multaj aludoj en la Malnova kaj la Nova Testamentoj pri la esenca aŭ transcenda vino, kiun produktas tiuj ĉi vinberĝardenoj. Tamen oni mencias ankaŭ la laŭliteran vinon (la alkoholon), klare abomenitan far ĉiuj religioj, kaj en la Biblio en paragrafoj kiel jenaj : "Estas bone ne manĝi viandon, nek trinki vinon, nek fari ion, per kio via frato ofendiĝas" (Rom. 14:21). "Ne estu inter la drinkantoj de vino, nek inter tiuj, kiuj manĝas vian-

don" (Sentencoj 23:20). En la sama ĉapitro de la Sentencoj (23:31-35) oni plu parolas pri la procezo de alkutimiĝo al la alkoholo. En Sentencoj 31:4 oni diras : "Ne al la reĝoj konvenas trinki vinon, nek al la princoj deziri ebrigaĵojn".

Helpe de tempo kaj penetremo, ni povas daŭrigi tirante vualojn flanken kaj farante tre interesajn eltrovojn : ni legas en la unua epistolo de Paŭlo al la Korintanoj (3:1-3) : "Kaj mi, fratoj, ne povis paroli al vi kiel al spirituloj, sed kiel al karnuloj, kiel al infanetoj en Kristo. Mi nutris vin per lakto, ne per manĝaĵoj ; ĉar vi ankoraŭ tion ne kapablis ; kaj eĉ nun vi ne kapablas. Ĉar vi estas ankoraŭ karnaj [de la "tero" kaj ne de la "Ĉieloj"], ĉar dum ekzistas inter vi ĵaluzo kaj malpaco, ĉu vi ne estas karnaj kaj iradas laŭ la maniero de homoj ?"

En tiu ĉi lasta demando, oni klare rimarkas la subtilan aludon pri tio, ke la religiulo devas forlasi ĉiun naturon, eĉ iafoje la propran homan naturon. Ankaŭ estas facile rimarki la signifon tute malsaman de la vorto "viando" en tiu ĉi ĉapitro de Korintanoj (signifo transcenda aŭ ĉiela) kaj en la ĉapitro 14 de Romanoj aŭ la 8a de Korintanoj (laŭlitera aŭ tera signifo). Pro ĉio, kion ni diris, kaj pro tio, kion oni ne povas diri, oni bezonas multe da tempo kaj specialan etoson por legi sanktan libron (ĉiun ajn). Necesas havi specialan internan sintenon por atingi la penetremon de rabisto antaŭ ĉiu vorto. Nepras havi delikatan kapablon por la sintezado. Kaj tiu ĉi kapablo por sintezado estas ne nur je intelekta nivelo, sed ĝi devas transcendi ĝis la kunfandiĝo "menso-koro" (penso kaj sento) por ke ĝi fine manifestiĝu aktive.

La religia ago estas grandega entrepreno. Tiom grandega ke ĝi iĝas neebbla por tiuj, kiuj ne kapablas, laŭ la alegoria biblia lingvo, "iri sen ŝuoj kaj sen pilgrim-bastono". Kaj, kurioze, la pilgrim-bastono estas bastono, kiun oni apogas sur la "tero", kie oni apogas ankaŭ la ŝuojn. (Vidu **The Mark** [La sago en la celtabulo] de Maurice Nicoll).

La konsekvencoj de religia konduto povas esti tiuj, kiujn Luko mallonge rakontas en 22:39-46. Ĉiu persono devos vivi, je sia propra konsciencnivelo, agonion de Getsemano, ekvivalentan al la kutima intenseco de siaj spertoj.

En Jesaja 30:20 oni parolas al ni tiel klare, ke foriĝas la neceso de komentarioj : "Kaj la Sinjoro donos al vi panon en la mizero kaj akvon en la premado, kaj ne plu kaŝiĝos viaj instruantoj, sed viaj okuloj vidos viajn instruantojn. Kaj kiam vi kliniĝos ĉu dekstren, ĉu maldek-

tren, viaj oreloj aŭdos vortojn diratajn malantaŭ vi ; Jen estas la vojo, iru laŭ ĝi". Videble, se ni estas vekigintaj, kun okuloj malfermitaj, ne mankos al ni la "instruantoj" de Jesaja. Tio ĉi signifas, ke ni ĉiam trovos instruistojn, kie ajn, eĉ en la uloj pli malsaĝaj kaj mallertaj.

## La homo kaj Dio

Ŝajnas tro strikta la divido, kiun la unua biblia verseto faras inter "la ĉieloj" kaj "la tero", inter tio karna kaj tio dia aŭ ĉiela. Tiu ĉi duobla aspekto de la kosmo, de la **logos**, de la Tuto, estas rimarkebla en ĉiuj sanktaj libroj. Estas klare videbla la aludo, en la versetoj 47 kaj 49 el la dekunua ĉapitro de la **Bhagavad Gita**, pri la manifestiĝo de la dia formo (Vishva-Rupa-Darshanam). Estas kurioza la simileco inter tiu ĉi ĉapitro de la **B. Gita** kaj la ĉap. 17 de Sankta Mateo, kiu aludas la transfiguriĝon de Kristo. En ambaŭ la dia ĉeesto perturbas la homon grandmaniere, malgraŭ ke en unu la homo nomiĝas Arjuna kaj en la alia Petro, Jakobo kaj Johano. En ambaŭ libroj la homo estas kvietigita far la dia peranto en Lia homa formo (Krishna aŭ Kristo). En ambaŭ libroj oni petas al la homo, ke li ne parolu pri "tiu lumo", kiun li vidis, pri tiu travivaĵo de plenscio, kiun li havis. La homo, tamen, parolas pri sia transcenda sentempa sperto per lingvo prudenta (la sanktaj libroj) kaj sen iu alia ebleco : simbola. Li faras tion pro instigo de sia amo aŭ sia deziro kunpartopreni tiun plenscion gigantan aŭ "senfinan". Ekzemplon ni havas en la libro de Habakuk 2:2 : "Kaj la Eternulo ekparolis al mi, kaj diris : Enskribu la vizion, kaj desegnu bone sur la tabeloj, por ke leganto povu facile tralegi".

Neeviteble, tiu, kiu estas en la mallumo, komprenos nur laŭlitere, kion oni deziras diri al li. Ne estas kontakto inter la mallumo kaj la lumo, kaj tiu estis la danĝero jam antaŭvidita far la grandaj iluminitoj. En Sentencoj 23:9 oni diras al ni : "En la orelojn de malsaĝulo ne parolu, ĉar li malŝatos la saĝecon de viaj vortoj". En Mateo 13:13, Kristo diras : "Tial mi parolas al ili per paraboloj, ĉar vidante, ili ne rimarkas, kaj aŭdante, ili ne aŭdas nek komprenas". Jam la profeto Jesaja estis dirinta antaŭ tre longe : "Ne vidu per viaj okuloj, kaj ne aŭdu per viaj oreloj, komprenu per via koro kaj rekonvertiĝu por saniĝi". Simila estas la paragrafo de Luko 16:31 kaj antaŭ tre longe oni estis skribinta en Ijob 14:14 : "Dum la tuta tempo de mia batalado mi atendas, ĝis venos mia forŝanĝo".



Ili parolas al ni, tute sendube, pri la urĝa neceso de totala mensa transformiĝo, ne nur por la propra ĝenerala individua regeneriĝo - kiun ni realigas sole, per niaj propraj energioj -, sed ankaŭ por la starigo (aldone) de nova formo de homaj rilatoj, nova socio (Aĝoj 4:31-37). Tiuj, resume, estas la realoj urĝaj, "praktikaj", kiuj koncernas ĉiujn, tie ĉi kaj nun.

Sed la iluminitoj sugestas ankaŭ la gravecon de realoj, kiuj transcendas nin, kiel diras al ni Johano 3:12 : "Se mi aferojn surterajn diris al vi, kaj vi ne kredas, kiel vi kredos, se mi diros enĉielajn ?".

La dua Vatikana Koncilio konfirmis, ke la Biblio estas la vorto de Dio. Akorde (aŭ malakorde) kun tio ĉi, ekzistos diferenca ekzegezo (interpreto) de tio sankta por ĉiu homo kaj por ĉiu konsciencnivelo, tra kiu ĉiu homo povas iri.

Agustino, en sia libro **De civitate Dei**, diras al ni, ke Dio parolas en la Biblio "pere de la homoj kaj en homa maniero". Ni scias, ke Moseo (ŝajne edukita en la unua monoteisma imperio konita en Egiptujo, tiu de Akhenaton aŭ Amenofis IV, inspirinto siafoje de la Psalmo 104 pere de sia himno al la suno aŭ "Himno al Aton" en 1362 a.K.) ne verkis la Pentateŭkon, nek Paŭlo la Epistolon al la Hebreoj. Estis kutime tiam subskribi per la nomo de famuloj de la pasinteco, kio ne estis konsiderata kiel fraŭdo, nek implicis malbonan intencon. Sed ni scias ankaŭ, ke Dio helpis sin per homoj, kiuj forneis sin en la anonimeco por nur komuniki la sentempan parolon, la Parolon de la Komenco, kies esenco estas nek la sono nek la vorto. Ĉiu libro (iufoje verkita far pluraj aŭtoroj dum tri aŭ kvar jarcentoj) montras la stilon de sia propra homa aŭtoro, kiu - ĉu Hebreo, ĉu Arameo, aŭ Greko - faris nenion pli ol esprimi la esencon de la aferoj siamaniere kaj sialingve.

La libro de profeto Jesaja enhavas 66 ĉapitrojn, el kiuj 22 estis verkita en la jaro 720 a.K. La aliaj estis aldonataj 150 jarojn poste, kio ebligis, ke Jesaja parolas "antaŭtempe" pri la reĝado de Ciro, sed nur en la ĉapitroj 44 kaj 45. Tio ĉi ne senvalidigas la fenomenon de la viziado aŭ antaŭdirado, klare eksplikitan por tiuj, kiuj esploras profunde en la simbolon de la Suno : cirklo centrita far unu punkto ; aŭ en la "eneagramo", klarigita de Ouspensky kaj Nicoll ; ankaŭ la holokinetiko de Bohm. (29)

En hebrea lingvo estas bibliaj literaturaj verkoj kiel la

libro de Ijob kaj kelkaj Psalmoj. Sed, ĉar la formo kaj la literaturo estis neĉefaj, la aliaj libroj ne estas belarte tre estimindaj. Sendube tiuj homoj tute ne intencis fari simplan literaturon. Ĉio ĉi rilatas al Eliro 3:14 : "Kaj Dio diris al Moseo : mi estas, kiu estas". La hebrea vorto Jehovo (Dio), litere skribita IHVH - la kvar literoj aŭ tetragramatono - en la antikva hebrea lingvo sen vokaloj, devenas de HHH, verbo, kiu signifas tiom "estiĝi", kiom "esti", de sono simila al la vorto "mi" de kelkaj lingvoj kaj dialektoj nord-eŭropaj. Emanuelo, unu el la nomoj donitaj al la Mesio, signifas laŭlitere "Dio en ni". Vidu Psalmaron 82 kaj Johanon, 19. Ĉu ne estas plensignife tiom da rilato inter la konceptoj pri Dio, Mesio, estiĝi, esti kaj mi ? (kaj ni!)

En la tria volumo de **La maskoj de Dio** de Joseph Campbell, nerekte temas pri tiu ĉi kvarobla rilato.

Apogpunkto tre interesa por la ekzegezo estas tiu, kiu konsideras la Bibliion kiel rakonton de ĉio, kio povus okazi en nia psiko. En nia propra psiko hodiaŭ kaj ĉi tie. En kiu ajn homo. La Biblio pritraktas la esencan naturon de la homa menso. Estiĝi kaj esti, t.e. esti en si mem por ekscii, ke oni vivas. Pro tio, interalie, ĝi daŭras. Sed, se la Biblio ne estas alia ŝlosilo por observi la agititan internon de nia menso - tiun lukton, kiu disvolviĝas inter niaj propraj emocioj kaj deziroj - estas pli bone, ke la jarmila polvo plu akumuliĝu sur ĝiaj fingrumitaj paĝoj.

### **Kelkaj ekzemploj**

La versetoj 13 kaj 17 de Eliro 20 kaj Readmono 5, respektive, diras nur du vortojn : "ne mortigu". Ni ne analizos la rilatojn inter la kvinpinta stelo (la pentagramo aŭ la homo) kaj la numero 5 donita al tiu ĉi Ordono. Se ni legas ilin nur hazarde, ili ne diras pli ol tio laŭlitere, sed se ni asimilas ilin pere de la kvarobla principo : "seriozeco, tempo, penetremo kaj kapablo por sintezado", ni nepre scios, ke ni mortigas ne nur per la manoj aŭ per armiloj. Ni povas mortigi ankaŭ per iu imanenta sento, per iu vorteto aŭ per silenta sinteno de malamikeco, de malestimo aŭ de suspekto.

Oni ofte emfazas en la Biblio la valoron de tiu ĉi sintezo, la valoron de tio interna, la grandegan signifon de tio, kio okazas en la intimeco de nia konscienco. Ekzemple, en Mateo 5:27-30 : "Vi aŭdis, ke estas dirite : Ne adultu ; sed mi diras al vi, ke ĉiu, kiu rigardas virinon, por deziri ŝin, jam adultis je ŝi en sia koro".

Li aldonas, ke estas preferinde forŝiri la okulojn aŭ la manojn anstataŭ "fali" kaj perdi la oportunon sperti la "ĉielojn", tio estas, la transcendantajn potencialajn spertojn latentajn en nia "konscienco". Ion similan esprimas Luko en 11:33-36 : li parolas pri la plenscio, kiu estas en vi, tio estas la lumo, kiu estas en vi.

Estas dirite al ni, ke super la kruco (aŭ **stauros**), kie mortis Kristo, oni skribis kvar literojn : "INRI". Por multaj, tio signifas (latine) : Jesuo Nazoreo Reĝo de la Judoj. Oni ankaŭ diras al ni, ke tiuj literoj havas diversajn signifojn, i.a. : In Nobis Regnat Iesus (en ni reĝas Jesuo). La vorto uzita ne estas "sur" ni reĝas Jesuo, sed "en" ni reĝas Jesuo, t.e. ene de nia propra esto estas la majstro, kiu instruas al ni la veron, montras la ni la vojon kaj donas al ni novan vivon. Nur ni mem povas koni nin mem.

Diras al ni Maurice Nicoll, brita psikiatro forpasinta en 1953, en **Living Time** (La viva tempo) : "Mi kredas, ke ni neniam povos ekscii pri la ekzistado de aliulo, reale kaj afekcie, se ni ne konscias unue pri nia propra ekzistado. Konscii pri la propra ekzistado kiel reala travivaĵo, estas konscii pri la propra esenca nedividebleco." En alia paragrafo li mencias la saman temon : "Por vi tio ĉi eble estas tre evidenta, sed ĝi estas tre malfacile kaptebla ; ĝenerale ni ne kaptas la fakton, ke ni estas nevideblaj. Ni ne rimarkas, ke ni vivas en mondo de nevideblaj uloj. Ni ne komprenas, ke la unua difino de la vivo estas tiu ĉi : la vivo estas dramo pri tio videbla kaj tio nevidebla."

En Romanoj 8:2 oni ripetas dufoje, ke la sama spirito, kiu transformis Jesuokriston, loĝas en la interno de ĉiu el la homoj.

En Mateo 8:22 oni mencias la homojn, kiuj estas mortaj dum vivas. Mortintoj dum vivo, kiuj kapablas nur enterigi siajn mortintojn.

En Johano 13, Kristo lavas la piedojn de siaj disĉiploj, ĉar ili estas la nuro, kio povas malpuriĝi ĉe pura homo. Tio, kio estas en kontakto kun la "tero", kun tio monduma. La piedoj, biblialingve, prezentas klare la kvin sensojn, kiuj rilatigas nin al la "ekstero", aŭ al la "tero".

En Luko 17:20 oni klare asertas, ke la regno de Dio estas "inter vi", kaj ke oni ne povos almontri ĝin per fingre, ĉar ĝi ne estas de la spaco. Ke tio tempa estas aspekto deveninta el nia mensa koncepto pri "spaco" ŝajnas klare esprimita ekde la unua ĉapitro de la Biblio (Genezo 1:14)

kaj konsekvence estas inkluzivita en la vorto "Tero", laŭ la signifo de "tero" sugestita en la unua verseto. "Kaj Dio diris : Estu lumaĵoj en la ĉiela firmaĵo por apartigi la tagon de la nokto ; kaj ili prezentu signojn, sezonojn, tagojn kaj jarojn". Tempo kaj spaco kondiĉas. La "ĉielo" estas tio nekondiĉita, tio eterna, tio sentempa, tio, kio transpasas la spacon kaj ĝiajn psikologiajn konsekvencojn : la tempo.

En la letero de Paŭlo al la Korintanoj (3:16) li diras, ke ni estas la templo de Dio, kaj ke la Spirito de Dio loĝas en ni. Oni plu emfazas la gravecon de nia interno. Iom poste oni rifuzas la saĝecon de tiu ĉi mondo, kiu sendube estas ankaŭ - ĉar kondiĉita - alia aspekto de la "tero" : nia memoro.

Mateo 6:25 reasertas la samon dirante, "ke la korpo estas pli ol vestaĵo kaj la vivo pli ol nutraĵo". Iomete antaŭe, en la sama ĉapitro, li admonas, ke oni provizu al si trezorojn en la "ĉielo" kaj ne sur la "tero".

En la mezo de la libro de Joel (2:13) oni diras al ni : "Kaj disŝiru vian koron, vian koron kaj ne viajn vestojn"... (estis kutime inter la Hebreoj, kiam ili aŭskultis sakraĵon kontraŭ Dio, aŭ infamion aŭ kalumnion, dispecigi siajn vestojn). En Mateo, 23:26, diras Jesuo : "Vi blinda Fariseo ! purigu unue la internon de la kaliko kaj de la plado, por ke ilia ekstero ankaŭ fariĝu pura". La samon ripetas Luko 11:37-40.

## Esti suna homo

En Johano 3, en la parabolo pri Nikodemo, oni eksplikas kion signifas naskiĝi denove, esti nova homo, sen pensi pri la eksteraj kaj supraĵaj aspektoj de la aferoj. Li ne parolas, kompreneble, pri ekstera naskiĝo, sed pri kompleta psikologia forŝanĝo, pri vera forŝanĝo de la interna esto. Kaj per serĉado eĉ pli profunda, li asertas, ke Moseo levigis la serpenton en la dezerto danke al tiu psikologia forŝanĝo.

Pri tio ĉi - "naskiĝi denove" (la tuta transformiĝo de nia maniero pensi, senti, paroli kaj rigardi la aferojn kaj la estaĵojn) - parolas al ni ne nur la Evangelio de Johano sed ankaŭ multaj libroj je diversaj epokoj kaj lokoj, emfazante la saman fakton, en siaj propraj lingvoj, foje per malluma sintakso de iu kodo tre sekreta. En la libro **Vendidad Sade**, el Persujo, ni trovas en la ĉapitro 10 tiun ĉi paragrafon : "La pureco post la naskiĝo estas la plej bona eco, kiun havas la homo. La pureco de la leĝo de la **mazda-yacnas**.

Tiu, kiu konservas sian purecon en siaj pensoj, vortoj kaj agoj, ne nur purigas sin mem, sed purigas ankaŭ siajn similulojn". En la Kodo de Manu, ĉap. 8, verseto 22, oni diras : "Regno senigita de loĝantoj dufoje naskiĝintaj, rapide pereos komplete, atakite de la malsato kaj la malsano".

Kaj pri kiom da "malsatoj" kaj "malsanoj" oni parolas en la sanktaj libroj ? (Vd. Mateo 5:6)

En la **Zend Avesta** (Vivanta parolo), kiu temas pri Ari-mano, ĉefo de la malbonaj genioj, oni nomas la serpenton laŭlitere la "serpento-astro". Tio aludas la konstelacion de la Serpento, kiu situas apud Pesilo, kiu estas "vizitata" far la Suno fine de septembro, monato, kiu en la norda hemisfero - kie ĉiuj ĉi sanktaj libroj estis verkataj - estas la heroldo de la malvarma jaruono ; de la detruo, kiun la aŭtuno kaj la vintro alportos sur la teron ; de la malbono mem, en kosmologia senco. Inverse okazas kiam la Suno "vizitas" la konstelacion de Ŝafo, komenco de la printempo kaj la regenerado de la naturo en la norda hemisfero, epoko kiam la Kristanoj festas la Paskon por rememori la ŝafon de Dio.

Dum la Suno pasas (ekde la 20a de septembro) tra Pesilo, Skorpio, Arkpafanto, Kaprikorno, Amforo kaj Fiŝoj, la malvarmo kaj la malbono, la mallumo kaj la pluvoj batas la teron kaj la homon en la norda hemisfero, kaj ĉion ĉi anoncas la serpento. La aliaj ses "domoj" aŭ konstelacioj (ekde la 20a de marto), Ŝafo, Taŭro, Ĝemeloj, Kankro, Leono kaj Virgo prezentus en la norda hemisfero la varmon, la bonon, la spikojn, la fruktojn, la vinberrikolt-ojn kaj la florojn, kaj ĉion ĉi anoncas la trapaso de la Suno tra la konstelacio de la Ŝafo (Paskotempo). La Kristanoj eĉ prezentis Kriston kiel ŝafon en malsamaj formoj ; tia ĉi kulto finiĝis en la jaro 680, sub la regado de Papo Agatono. Dum la sesa sinodo de Konstantinopolo oni ordonis, ke anstataŭ la ŝafo oni prezentu homon fiksititan ĉe kruco, kio estis konfirmita far Adriano la 1-a.

Memvideblas, ke la signo komuna al ĉiuj antikvaj teologioj estas la kulto al la Suno. Apolono, Bakko, Atiso, Osiriso, Horuso kaj Adoniso (greka vorto deveninta de la hebrea Adonai, unu el la nomoj de Dio en la Sefirot) estas diferencaj nomoj de la Suno - astro, kiun adoris ankaŭ la Aztekoj kaj Keĉuoj en Ameriko.

Kial Mitrao kaj Kristo naskiĝas je la sama tago ? Ĉar la 25a de decembro estas en la norda hemisfero la

vintra solstico, kiam la tagoj eklongiĝas kaj la lumo (la suna heleco) pliiĝas sur la tero.

La antikvaj astrologoj prezentis la Sunon kiel cirklon kun punkto en la centro.

Tiu ĉi simbolo rilatas ankaŭ al la oro de la alkemistoj kaj la magiistoj, al la konstelacio de Leono - de suna astrologia naturo - kaj al la koro, kiu - same kiel la Suno - estas ankaŭ centro, la centro de la homa organismo.

Tiu ĉi simbolo similas ankaŭ al rado rapide moviĝanta. Ni devus do identigi ĝin al la plensignifa hinda vorto **chakra** (rado), kiu estas ne nur la rado de la vivo aŭ "rado de la leĝo", laŭokaze, sed ankaŭ unu el la sep ĉefaj radoj, kiuj situas ene de la homo, en lokoj tre subtilaj de lia naturo - en tio, kion oni nomis "la astra korpo", kaj kiu en evangelia lingvo estas la "natura korpo", malpli densa ol la "karna" korpo (fizika) sed eĉ malpli subtila ol la "spirita" korpo. Tiu ĉi lasta, laŭ la Hindoj, estas la "mensa" korpo.

Estas pro tio, ke laŭ kelkaj aŭtoroj kiel Guenon, la vortoj "intelekta" kaj "spirita" estas sinonimaj.

Ankaŭ **Rota** (rado) kaj **Taroko** rilatas al la simbolo de la suno. La cirkonferenco estas tio, kio rotacias, tio, kio konstante ŝanĝiĝas, la ŝanĝo de la manifestiĝintaj aĵoj (la "tero"). La centro estas la senmova, sensanĝa punkto, la bildo mem de la eterneco (la ĉielo aŭ la suno). Ĝi estas tio, kio permesas ĉiujn ŝanĝojn malgraŭ sia senmoveco ; ĝi estas la "senmova motoro" de Aristotelo. Ĉio, kio moviĝas periferie, dependas de tiu ĉi sensanĝa Centro sen formoj kaj sen dimensioj. El ĝia disradiado konsistas ĉiuj aĵoj (ĉiuj punktoj de la cirkonferenco). Ĉiuj ĉi cirkonferencaj punktoj - kiuj estas de la tempo - estas simultanaj al la centra punkto, kiu estas la eterneco.

La pastroj de Zoroastro, la adorintoj de Mitrao, la magiistoj, donacas al la infano Kristo la tri aĵojn, kiujn li oferis al sia Dio (aŭ al la Suno) : oron, incenson kaj mirhon, metalon kaj parfumojn, kiujn la Kaldeanoj, la Araboj kaj eĉ la Hindoj kaj la amerikaj indiĝenoj konsekris al la Suno. Fakte, la suno estas en tiu ĉi loko de la universo, la fonto de ĉiu vivo. Kiam homo ricevas tiun mensan staton, kiun oni nomis tiel diversmaniere, nome "klerigita", "budha", "iluminita" aŭ "krista", tiam li atingas sunan staton de sia propra esto, tiam li posedas la Sunajn karakterizojn : li ne havas koncepton pri tempo, ĉar kiel povas li scii, ene de sia luma centro, pri tagoj kaj noktoj,

pri hieraŭ kaj hodiaŭ, pri planoj kaj memoraĵoj ? Li reĝeneras, kuracas, ĝeneras sian propran energion ; donas, sen peto, ion rekompence ; li estas varma, bonvola, kaj kapablas krei eide sia pasia silento. Lia lumo estas tiel intensa ke oni ne povas rigardi lin. Lia grandeco estas tiel forta, ke li povas plenumi sian rolon ĉe la rado de sia destino kaj sian enorman taskon, kaj oni ne rimarkus lian ĉeeston. La suna homo ĝenerale ne volas manifesti sin kaj preferas ne esti tro vidata.

La bildo kaj la faraĵoj de la sunaj homoj kutime ne estas eĉ rekonataj (kaj multe malpli komprenataj) far la ordinaraj homoj. La malmultaj okazoj, kiam tio ĉi okazas, estas kutime longe post kiam la homo forpasis.

Ni scias, ke tiu ĉi estas alia karaktero de la Suno. Ĝia lumo bezonas proksimume ok minutojn por atingi nian teran retinon. Tio estas, ke ni neniam vidas la Sunon ekzakte kiel ĝi estas, sed kiel ĝi estis antaŭ ok minutoj.

Tiamaniere, iel simbole, oni pretendas similigi al la kosmo la plej grandajn virtojn de la homo en tiu ĉi universpunkto. Ĉiu serioza religiulo havis kiel centran imagon tiujn ĉi menciitajn sunkarakterojn. Jenaj paragrafoj de Lao-Tse, ĉerpitaj el lia Libro de la vojeto (**Tao Te-King**) montras tion al ni :

2) "La perfektulo disvolvas sen objekto / leĝdonas sen vorto / agas sen impulso / kreas sen io / konceptas sen objekto / faras sen resti aŭtoro".

(Ni memoru, ke la latina vorto **perfectus** signifas "tiun perfektan", "tiun tute plenumiĝintan", "tiun komplete faritan").

7) "La perfektulo eklipsiĝante li imponas / malŝparante sin, li eterniĝas / malegoistiĝante, li individuigiĝas".

22) "La perfektulo estas individuo kaj iĝas modelo de la socio / nezorgema pri si mem, li estas atenta / nekontentigita kun si mem, li elstaras / retiriĝante en si mem, li kreas sian medion / sen komplezemo por si mem, li pligrandiĝas / sen deziro por si mem, li estas neatakebla".

## RAKONTOJ KAJ DEMANDOJ VEKANTAJ

Ŝajnas evidente, ke la intenco kunpartopreni specialan mensan staton de "supermaldormo" faris, ke multaj homoj manifestis tiun intencon plurmaniere : per libro t. n. sankta, heredigita al aliaj similuloj ; per grandioza muzika verko ; per iuj simboloj, per piedbato en la bruston de la disĉiplo en la ĝusta momento ; per kartludo ; per grandaj skulptaĵoj aŭ monumentoj ; per sia absoluta silento (eĉ kiam ekzistas vortoj en ĉiuj lingvoj, kiuj entenas ŝlosilojn je saĝo, kaj kiujn ni uzas ĉiutage) kaj - kial ne ? - eĉ per rakontoj. Sed ni ne parolas pri la alnomitaj "porinfanaĵ" rakontoj (kvankam ne ĉiuj t.n. plenkreskuloj komprenas ilin). Tiuj ĉi rakontoj estas multfoje entenataj en la forgesita folkloro de la rakontoj, ekzemple la feinrakontoj, iuokaze signifoplenaj. Aliffoje ili estas vaste konataj. Ni donas kelkajn ekzemplojn : 1) "**Pinocchio**", tiu marioneto, kiu atingas la staton de homo kaj ne plu havas konsciencan disigitan disde si mem, de kiam li pasis - same kiel la biblia Jonao - tra la ventro de granda fiŝo ; 2) "**Alica**", la knabino, kiu en Mirlando eniras en la mondon de la spegulo, tiu mondo, kiu respegulas ĉian realon fidele, sen reteni ajnan bildon, en Nuntempon kontinuan kaj absolutan, kaj 3) "**La princeto**", kiu venis el planedo sennoma kaj pri kiu li memoris nur unu floron.

Ni parolas pri veraj rakontoj por plenkreskuloj ; kaj por maturaj plenkreskuloj. Rakontoj ellaboritaj foje en unu momento, far klerigitaj homoj, kiuj - rektmaniere, foje emocie brutale - pretendis egaligi al siaj amikoj pli dormantaj, kvankam ne en la "dormo" sed en sia propra "vekiĝo".

Kvankam tiuj vekantaj rakontoj estas bonintencaj, ili estos komprenataj nur far tiuj, kiuj sentas grandegan naŭzon pri sia nuna mensa stato kondiĉita kaj duala, tiu stato de eterna interna kontraŭeco inter tio, kio ni estas, kaj tio, kio ni volus esti ; inter tio, kion ni faras kaj tio, kion ni volus fari. Elde tiu ĉi permanenta interagado inter niaj psikologiaj polusoj oni foje atingas - pro laciĝo, pro kompenso aŭ pro la pluraj eskapoj, kiujn ni sukcesas havi -



certain staton de neŭtraleco aŭ relativa tempa sato. Tiu ĉi, kompreneble, ne estas la stato, al kiu celas la klarigaj rakontoj, kiuj okupas nin. Tiuj ĉi pretendas agi kiel subita "mekanismo", kiu ŝetu nin trans ĉia poluso, inkluzivante ties neŭtralaĵojn. Kiel diras Teitaro Suzuki, al kiu oni donis la ateston pri Daisetz (granda malsaĝulo) : "Tiuj ĉi rakontoj intencas plenigi la menson per latentaj energio ĝis tiam eĉ ne songita, pere de kiu aperas penetranta vido de la internaj profundaĵoj de la konscienco kaj trairas en la fonton de nova vivo".

Ekzistas miloj da tiuj rakontoj : ni prezentas ĉi tie etan kolekton da ili, kiujn ni rekomendas legi po unu aŭ du ĉiufoje, por havi tempon ricevi la energion, kiun ili povus transmisii, aŭ - pli bone - liberigi en la interno de oni mem.

La unua estas la rakonto pri unu el niaj songoj, la dua estas persona travivaĵo, kaj la aliaj estas kompilaĵo sen ajna metodo.

### 1. Kristo ploris.

Petro demandis al Johano : "Kial Li ploras ?"

Johano respondis : "Ĉu vi kredas, ke vi povas havi iun ideon pri la kialo de la ploro de Kristo ?"

Petro ploris.

2. En iu televidstacio de Filadelfio, kien oni kondukis nin la someron de 1966, por ke ni parolu pri nia naskiĝa lando, ni konis japanan ĵudiston sepdekjaran, kiu estis tie samkiale, kaj kiu parolis pri sia filozofio, uzante nur unu tranĉilon kaj unu glason da akvo. Li asertis, ke la akvo ne estis vundita, kiam la tranĉilo tranĉis ĝin, sole ĉar la akvo estis lerninta esti fleksebla kaj vundebla. Post pruvo de lia nekredebla fizika lerteco kaj facilmoviĝemo, ni alparolis lin kaj diris al li kun nia mensostato de juna universitata stipendiito : "Ĉu vi povus diri al ni per malmultaj vortoj, kiu estas la esenco de via vivsistemo?"

Dum kelkaj momentoj li ne respondis al ni. Kredante esti neaŭskultitaj, kaj post pardonpeto, ni ripetis al li la demandon iel modifitan.

Subite, li apogis unu montrofigron sur nia nazo kaj kriis : "wu!"

Antaŭ nia surprizo, li diris al ni : "Se vi sukcesas daŭrigi tiun staton de surprizo kaj atento, vi komprenos tiun esencon sen neceso pensi pri ĝi".

3. Petro demandis al Johano : "De kie vi venas ?"  
 Johano respondis : "Mi venas de la monto".  
 Petro diris : "Rakontu al mi iom pri ĝi".  
 Johano respondis : "Io ajn, kion mi dirus, ignorus tion esencan".
4. Petro meditadis dum du sinsekvaj tagoj.  
 Johano demandis lin, pri kio li pensas.  
 Petro respondis : "Mi volas esti kiel Kristo."  
 Johano prenis ŝtonon kaj frotis ĝin kontraŭ la planko.  
 "Kion vi faras?", demandis Petro.  
 "Mi volas fari spegulon el tiu ĉi ŝtono", diris Johano.  
 Petro grumblis, dirante al li, ke li neniam povos fari spegulon tiel.  
 Johano diris : "Kaj vi neniam faros el vi iun Kriston, se vi daŭrigos tiel..."
5. Iufoje prezentiĝis antaŭ Budho iu monaĥo, kiu kunportis du donacojn, unu en ĉiu mano.  
 Kun iom da inhibicio kaj timideco li proksimiĝis al la Iluminiginto.  
 "Forĵetu ĝin!", kriis Budho.  
 La monaĥo forĵetis unu el la donacoj kaj restis stupora.  
 "Forĵetu ĝin!", kriis Budho.  
 La monaĥo forĵetis la alian donacon kaj ne plu sciis, kion fari.  
 "Forĵetu ĝin!", kriis Budho.
6. Johano diris al Petro : "Kiel vi farus por eltiri anseron el botelo sen rompi ĝin?"  
 Petro restis pensema longa tempon kaj fine rigardis Johanon venkitmiene.  
 "Tre simple, ĝi jam estas ekstere", diris Johano.
7. "Aŭskultu la sonon de unumana aplaŭdo".
8. Petro petis la tranĉilon al Johano dum la noktomanĝo.  
 Johano donis ĝin al li, prezentante la klingopinton, prenante ĝin per la tenilo.  
 Petro petis al li, ke li donu ĝin per la alia ekstremo.  
 Johano demandis lin : "Kaj kion vi faros kun la alia ekstremo?"
9. Petro demandis : "Ĉu vi scias, kiu estas la naturo de la egoismo ?"  
 Johano diris : "Kion vi diras, stultulo ?"  
 Petro rigardadis lin surprizite kaj iom kolere.

Johano almontris la nazon de Petro kaj diris : "Tiu estas la naturo de la egoismo."

10. Petro demandis : "Kiel mi povas sukcesi scii tiel multe, kiel vi?"

Johano diris : "Kiam estos nek mi nek vi."

"Kaj se estas nek mi nek vi, ĉu mi povos scii?", demandis Petro.

Johano respondis : "Kiam estos nek mi nek vi, kiu volos scii?"

11. Iu monaĥo kunigis ĉiujn en la monaĥejo kaj diris al ili : "Ĉu vi volas vidi iun morti kapomalsupren?". Kaj sen pli diri li apogis la kapon sur la planko, levis la piedojn kaj mortis.

Li tiel ĉeestis du tagojn kaj neniu sukcesis movi lin, ĝis fine unu el liaj kunuloj riproĉis lin : "Vi pasigis vian vivon en la humileco por morti ĉi-maniere kaj mirigi nin per vulgara ruzaĵo". Poste li puŝis la mortintan monaĥon, kiu falis planken kun granda bruo.

12. Johano kaj Petro trovis riveron dum sia pilgrimado. Petro trairis la riveron piedirante sur la akvoj.

Johano de la alia bordo observis lin kaj, prenante sian kapon, diris al si : "Se mi estus sciinta, ke li kapablas tion, mi estus puŝinta lin ĝis la riverfundo."

13. Diris bona disĉiplo de Budho : "Monto estas monto, la akvo estas la akvo, kiam mi malsatas mi manĝas, kiam mi dormemas mi dormas, mi ne serĉas la Budhon nek okupas min pri lia doktrino, sed mi ĉiam alkonformiĝas al la Budho.

14. "Mi kredas", diris Petro, "ke vi konservas profunde tion, kion vi scias, kaj ne volas kunpartopreni ĝin".

"Ĉu vi flaras tiun floron?", demandis Johano.

"Jes", respondis Petro.

"Ĉu vi vidis kiel mi konservas nenion?", diris Johano.

15. Demandis Petro : "Kiel forlasi la dezirojn, la malĝojojn kaj la internajn timojn?"

"Kiu malebligas eliri?", demandis Johano.

16. Demandis Petro : "Ĉu ekzistas loko, kie ne ĝenas la vintra malvarmo nek la somera varmo?"

"Jes", diris Johano.

"Kie estas tiu loko, Johano?", demandis Petro.

- Johano respondis : "Estas tiu loko, elde kie oni ŝvitas en somero kaj elde kie oni tremas en vintro".
17. "Kiel distingi inter la bono kaj la malbono?", demandis Petro.  
 Johano respondis : "Observante la vizaĝon, kiun vi havis antaŭ ol vi naskiĝis."
18. De kiam ni lernos uzi nian intelekton racie, kun intenseco kaj vasteco, ni kapablos rezigni ĝin.  
 Tie ĉi unu plia ekzemplo pri tiu ĉi "psikologia stato", kiu transpasas la intelekton mem kaj ĝian rudimentan produkton : la vortojn.  
 Iu monaĥo petis al sia majstro : "Instruu al mi la vojon sen uzi la vortojn."  
 La majstro diris : "Demandu al mi sen uzi la vortojn."
19. La saĝulo diris : "Ne haltu tie, kie estas Budho, kaj tie, kie li ne estas, vi preterpasu."  
 "Ĉu estas neniel bone adori la Budhon?", demandis la disĉiplo.  
 "Nenio estas pli bona ol tiò bona", respondis la saĝulo.
20. Du pilgrimantoj portis du statuojn de Budho ĵus skulptitajn el delikata ligno, al malproksima monaĥejo.  
 Unu el ili, en plena dezerto, sentis malvarmon kaj uzis kiel brullignon unu el la statuoj.  
 "Ĉu vi frenezas?", riproĉis lin lia amiko. "Kion vi faris, malsaĝulo?". Lia amiko ekmovis la cindrojn per bastono.  
 "Kaj kion vi faras nun, stultulo?"  
 "Mi serĉas la animon de Budho", respondis la malvarmuminto.  
 "Kaj ĉu vi esperas trovi la animon de Budho en tiuj cindroj, granda idioto?".  
 "Do donu al mi la aliajn statuojn por la fajro".
- Ĉu ne similas tiu ĉi dudeka rakonto (elprenita el la budhisma tradicio) al la famaj vortoj de Kristo post kiam li disdonis inter la malsatulojn la sanktajn panojn, la tagon de la sankta ripozo : "la homo ne estis farita por la sabato, sed la sabato por la homo" ?
21. "Mi ne havas ideojn, majstro, ĉu mi eble estus proksime de la sankteco?" demandis iu monaĥo.  
 "Forĵetu tiujn ideojn, kiujn vi havas", diris la majstro.  
 "Kion mi forĵetos, se mi ne havas ideojn?", demandis la monaĥo.

**Respondis la majstro : "Vi estas tute libera, kompreneble, por havi tiun senutilan ideon pri havi neniun ideon".**

22. Esti en la propra centro, esti klara spegulo, kiu reflektas la realon sen reteni ĝin, sen haltigi ĝin ; simple vidi ĝin kaj montri ĝin nevole, same kiel faras pura spegulo ; asimili ĉi-maniere la aliulon, kvazaŭ oni estus parto de li ; esti ĉiam tie ĉi kaj nun, trapasita de la sentempeco, atente kaj kviete ; tiu ĉi kvarobla konscio unueca kaj alte homeca estas tio, kion oni resumas en tiuj ĉi vekantaj rakontoj kaj precipe en tiu jena : Tie ĉi, tiu, kiu respondas, ne nur situas genie ene de si mem, sed ankaŭ ene de tiu, kiu faras al li falsan demandon, kaj eĉ ene de la hundo mem. Ni scias, ke nur vera demando povas havi veran respondon. Stulta demando neniam povos havi vastan respondon. Jen la rakonto, kiu solvas inteligente kaj subite tiujn ĉi problemojn.

Demandis Petro : "Ĉu ekzistas en la hundo io simila al tio, kion ni nomas religieco?"

Johano blekis : "boj!".

23. Kial "Kariopsikologio" ?

Demando : Kial la nomo "Kariopsikologio" ?

Respondo : Estas bone, ke la aĵoj havu ian nomon, tiel ni povas mencii ilin sen denove ekspliki detale ĉiufoje, kio ili estas. Estas same kiel esti nomata Rubén. Estas precipe, por ke oni estu rekonata per minimuma peno.

Post mia intervjuo kun Karl Pribram ĉe la Universitato de Stanford, kie li laboras kiel profesoro pri Neŭropsikologio, mi pensis, ke taŭga nomo por tiu ĉi nova disciplino povus esti "Psikologio neŭrofizika", emfazante la integriĝon de la Psikologio, la Neŭrologio kaj la Fiziko.

Per tiu nomo, tamen, ni ne rimarkigas pri tio, kion ni konsideras plej grava por la homo : la neŭrofiziologia koncepto pri holosintaksio, kun ties konsciformo, kiun ni nomas skeme "cirkla", kaj kiu estas la karyon aŭ kerno.

Tio ĉi lasta estas plej grava por la homo, ĉar menso, kiu funkcias en cirkla konscio, holosintaksio aŭ kerno, perceptas unuece la realon, la ulojn, ktp, sen iu ajn distordo.

24. La Metapsikio.

Demando : Kion vi opinias pri la Metapsikio ?

Respondo : Tre malmulte. Mi legis dekduon da libroj pri la

temo kaj mi kredas, ke mi havis miajn proprajn parapsikologiajn spertojn. Tamen mi kredas, ke pli grava ol la Metapsikio estas tio, kion ni faras per ĝi. Je alia nivelo, estas same kiel la atoma energio : ni povas uzi ĝin inteligente (se ni uzas la inteligentecon) aŭ ni povas memdetruiri per ĝi.

Estas pro tio, ke mi konsideras pli gravaj la inteligentecojn, la unuecan perceptadon kaj la kernon ol la tutan Metapsikion el la mondo. Mi eĉ kredas, ke la unueca perceptado kaj la inteligenteco povas avantaĝe anstataŭi la Metapsikion.

Alivorte, se mi uzas inteligente miajn du manojn, miajn du okulojn kaj miajn du orelojn, mi ne bezonas trian manon, trian okulon nek trian oreilon.

## 25. Centro "mio" kaj kerno.

Demando : Kiam vi diras, ke la mio estas la centro, ĉu tio ĉi implicas, ke la kerno ne estas tio ?

Respondo : Bonvolu ni kompreni dekomence, ke tiu ĉi estas psikologia terminologio. Necesas scii, ke en la Atomfiziko posta al la modelo de Niels Bohr, ankaŭ la kerno ne estas konsiderata kiel centro.

Ni diras, ke la mio estas la centro de la personeco, la centro de la persona identeco. Kontraste, la kerno estas kiel "spaco sencentra", mensa stato al kies funkciado kaj strukturo ĉiu koncepto estas fremda. Ni inkludas la konceptojn pri spaco (centro, periferio), tempo, ktp, kiuj estas produktoj de la procezo mnemonika-eidetika-timika, kiun ni jam difinis.

Mi esperas, ke vi ankaŭ ne neglektu la rilaton inter la kerno kaj la implicita ordo de la universo, tiel kiel la koncepton pri holokinetiko.

## 26. Unueca perceptado : ĉu cerbo dekstra aŭ maldekstra ?

Demando : Ĉu la unueca perceptado estas funkcio de la dekstra cerbo (aŭ dekstra cerba hemisfero) ?

Respondo : Oni diras, ke la maldekstra hemisfero agas en ĉio tempa kaj sekvenca. La dekstra agas en tio, kio estas spaca kaj holisma. La parolo kaj la skribo estus funkcio de la maldekstra cerbo ; kaj la muziko, de la dekstra, por iel ekzempligi.

En eksperimenta kirurgio kun ratoj, katoj kaj simioj, oni vidis, ke tiuj ĉi bestoj havas cerbajn hemisferojn "duobligitajn" kaj ne "specialecigitajn". Ni jam parolis pri Karl Pribram kaj la holografia modelo de la cerbo.

Robert Ornstein faris elektroencefalografiajn registrojn kaj li rimarkis, ke la ritmo  $\alpha$  en la dekstra hemisfero kreskas, kiam la ulo skribas (kio koncernas funkcie al la maldekstra cerbo).

Se iu persono aranĝas kubojn, la ritmo  $\alpha$  ekregas la cerbon maldekstran.  $\alpha$  prezentas la parton, kiu ŝajne "ripozas", laŭ Ornstein.

La ekvacio  $\frac{\alpha \text{ dekstra}}{\alpha \text{ maldekstra}} = 0,68$  kiam oni ludas per kuboj kaj 1,06 kiam oni skribas leteron.

La advokatoj kaj la ceramikistoj uzas siajn cerbojn malsame por iu sama mensa tasko, laŭ sia trejniĝo kaj okupo.

La maldekstruloj inversigas la "cerban specialecon", kaj iuj informoj estas ellaborataj en la hemisfero kontraŭa al tiu de la dekstruloj. La ambaŭdekstruloj ŝajne havas malmulte da "cerba specialeco" laŭ la menciita senco.

Fakte, la cerbo funkcias unuece : nur kiam estas lezo de la kalozo, kiu unuigas ambaŭ hemisferojn, la spertoj privataj de la dekstra hemisfero plu daŭras, dum ne ekzistas konscio pri ili en la maldekstra.

La sindromo de Gerstman (lezo ĉe la reganta parietala lobo) kaj la anozognozio(30) aŭ "unufanka malzorgo" (lezo ĉe la reganta parietala lobo) estas pliaj ekzemploj pri certa funkcia diferenco hemisfera. Sed en iu persono relative "normala" aŭ ne perturbita, kio interesas, estas la funkcia unueco de la nerva sistemo.

Tiu ĉi unueca funkcio de la nerva sistemo estas tio, kion ni nomas "menso" ; kaj tion pli esencan - laŭ la funkcia vidpunkto de tiu menso - ni studas en Kario-psikologio.

Ni ne akordiĝas kun tiuj, kiuj diras, ke la artisto aŭ la mistikulo uzas holisman inteligentecon ĉiukaze. Tio, kion li faras plejofte, estas uzi la imagon, kiu estas ankaŭ mnemonika ago (tempo-sekvenca). La produkto estis nekonata, sed ĝi rezultas de la reorganizado de elementoj jam konataj far la memoro. Ekzemple : la grandaj mistikuloj, kiuj diras esti vidintaj Kriston, havis kristanan edukadon, kaj la kondiĉado de la budhista mistikulo okazigas, ke li vidus Budhon. Neniam kristana mistikulo vidis Budhon aŭ male. En KP ni aldonas, ke la mistikaj vizioj neniel rilatas al la kerna konscio proprasence.

A.J. Gervins, esploristo ĉe la Universitato de Kalifornio

en San Francisko, ne sukcesis eltrovi diferencojn pri flankiĝo helpe de modernaj rekonsistemoj de muldiloj aŭ elektroencefalografiaj registroj. Gervins diris, ke liaj eltrovoj ne povas konfirmi nek kontraŭstari la teorion pri flankiĝo de iuj cerbaj funkcioj. Li kredas, ke antaŭaj studoj elektroencefalografiaj - kiuj pretendis subteni la teorion pri la "dividita cerbo" - estis neadekvataj, ĉar mankis la koncernaj kontroloj, kaj ili estigis senfundamentajn konkludojn, bazitajn sur la konfuzo de la sensomatora agado kaj la ekscitiĝo (arousal) pro la mensa konagado.

Tio ĉi havas tre seriozajn implicaĵojn pro tiuj, kiuj deziras tutan transformadon de la edukado. Ne eblas peti "edukadon de la dekstra cerbo" por ekvilibrigi ĝin kun pretendita (aktuala) "edukado de la maldekstra cerbo".

Sendube estas pli bone paroli pri ekvilibrigi edukadon de la procezo META kun edukado de la unueca perceptado.

## 27. Unueca perceptado kaj meditado.

Demando : Unueca perceptado kaj meditado ŝajnas al mi samaj.

Respondo : Per la vortoj ni anstataŭigas la realojn. Kaj fojfoje ni faras tion tiel bone, ke la vortoj fine kaŝas la faktojn. Jen malmultaj el milo da ekzemploj, kiujn ni eltrovis dum longaj konversacioj kun eta grupo da seriozaj amikoj.

Unueca perceptado : la vorto "fari" havas sian devenon el la vorto "plugi". "Plugi" estus la homa ago pli esenca. La unueca perceptado (medito, se vi preferas) estus, male, la homa ago neprofitdona plej esenca. La tuta senco de la meditado konsistas en tio, ke ni iru trans la penso al la promesita regno, nome la metanojo. Mediti estas esence neniigi ĉiun deziron, bildon, memoron, aŭ planon. Ni memoru, ke Nirvano signifas "neniigon", kaj ke la meditado oni konsideras kiel pardonon al tiu Nirvano, kiu estas fundamente la sama sankta promeso de metanojo sed per aliaj vortoj. Absurde estas uzi la penson por mediti, kiam mediti konsistas en esti trans la penso. Kaj ĉiuj meditmetodoj (senescepte) - pro la sola fakto, ke ili estas metodoj - estas produkto de la penso. Pro tio, kiam ni uzas meditmetodon (manieron), ni ne estas meditantaj. Ĉu ne ?

Kaj tiuj metodoj inkludas la sinkoncentradon, la mantr-ojn, ktp. Ni kredas, ke la vortoj "unueca perceptado" proksimigas nin al tio, kion la vorto meditado intencas vane



esprimi, pro tio, ke ĝi estas infektita far la konfuziĝo de la malsaĝuloj kaj eĉ far la ekspluatado de la ruzuloj. Kaj percepti signifas senti, kvankam ne senti emocisence, sed pure sense. Kiam ni sentas per niaj fizikaj sensoj, sen interveno de la penso kaj absolute sen ia penado, ni proksimiĝas - ĉiumomente kaj ne nur je la fino aŭ komenco de la tago - al la reala fakto mediti.

28. Kiel koni la mion ?

Demando : Ĉu vi povas plu paroli pri la mio kaj pri la maniero koni ĝin ?

Respondo : Kiam oni diras : "Mi estas tre sentema", aŭ "tre nervoza", aŭ "tre bela", "tre malbela", "mi estas 30-jara", "mi estas argentinano", "mi estas brita", "mi estas kolera", "mi estas ĵaluzema", "mi estas gaja", "mi laboras en oficejo", "mi apartenas al la verda partio"... ĉu estas tiu persono konanta sin mem ? Eĉ kiam oni diras : "Mi transformiĝos en personon nedualan, sentiman kaj sendeziran, kiu vivos en unueca perceptado", oni perfortas bildon de si mem. Kion oni faris, tio estas forĝi bildon de si mem, aŭ havi ideon, memoron aŭ planon, aŭ foti sin mem. Sed tio, kion ni atingas, kiam ni falas en tiun procezon pri "forĝado de bildoj" (tiel de oni mem, kiel de la aliuloj) estas malebligi al ni vidi la konstantan internan movon, kiu neniam ĉesas. Ekzistas tiuj, kiuj kuraĝas diri, ke ĝi ne ĉesas eĉ per la fizika morto. La konado pri oni mem estas do la interna perceptado pri kiel ni estas diferencaj ĉiumomente, malgraŭ ke kelkajn aĵojn oni ripetas pro kutimo aŭ kondiĉado pli ofte ol aliajn. Ekzemple, iuj koleriĝas oftege, precipe kiam iu "tuŝas" iun el la bildoj, kiujn ili forĝis per sia memoro, kaj kiujn ili klopodas protekti. Krome, tiuj, kiuj koleriĝas kaj diras : "Mi estas kolera" (kiam ili koleriĝas) perdis la oportunon vidi la tutan kolermovadon kun ĉiuj ĝiaj rilatoj kaj konsekvencoj. Ju malpli da "distanco" disde la fakto de la kolero, des malpli da kolero ekzistos.

Tiu ĉi konstanta vidado de la interna movo, kiu daŭras nur pro nuraj seriozeco, komprenemo kaj inteligenteco (tute senpene) estas tio, kion oni povas nomi vera memkonado. Kaj tiu ĉi konado ne havas celon aŭ objekton pro tio, ke kiam finiĝas, ĝi jam transformiĝis en fotografajon pasintecan, en vulgaran malutilegan bildon. Tiu ĉi unueca perceptado (moviĝema kaj silenta), sen memoroj, bildoj aŭ planoj, kun interfero de neniu vorto, estas vera mediti-

ado, estas vera konado. Eble estas la vorto "amo" mem, kiu malebligas al ni senti la amon. Eble estas la vorto "Dio" mem, kiu malebligas al ni senti realon transcendan.

29. Ĉesigi la avidecon, la timon kaj la malamon.

Demando : Mi scias, ke mi plu serĉados la manieron ĉesigi mian avidecon, miajn timojn kaj mian malamon.

Respondo : Ni estas serĉantaj sekurecon kaj plezuron, eskapante el situacioj, kiuj ŝajnas al ni nesekuraj, kaj el ĉio, kio, laŭ ni, kunportas doloron kaj malplezuron. Ni ne vidas la doloron, kiu rezultas el la serĉado por la sekureco, la mono kaj la plezuro. Ni timas precipe esti neniigitaj, "ĉesi esti", kvazaŭ ni fakte estus io, iumaniere. Ni timas esti neniigitaj kaŭze de tio, ke ni estas kondamnitaj, ekonomie ruiniĝintaj aŭ simple forlasitaj aŭ malestimataj. Ni timas esti neniigitaj, detruitaj, kaŭze de tio, ke ni ne atingis la sukceson. Kaj nome de la sukceso ni kondamnas, "piedopremas", malestimas kaj forlasas unu la alian, en civilizacio dekadenca kaj frenezigiĝinta. Sed foje ni parolas pri "serĉi alian aĵon". Estas la serĉado de "la vojo de Dio", de tio sublima, de io, kio "levu" nin spirite. La vortoj, kiujn ni elektas, kiel ekzemple "superi", "leviĝi", "supreniri", montras al ni kiel ni estas kondiĉitaj aŭ al kutimiĝintaj pensi laŭ la dualaj terminoj de spaco-tempo kaj hierarkio. Ni ĉiam deziras pli ĉiuflanke, inkluzive en tiu kampo, kiun ni nomas spirita. Kaj tiu "pli" estas tio, kion ni serĉas (sen scii kio ĝi estas). Pro tio, la serĉado komenciĝas, kiam ni intense rigardas la konstantan movon de tio, kio ni estas. Ĉar apenaŭ ni faras asertojn pri kio ni kredas esti, ni fiksas (aŭ imagas fiksi) procezon, kiu fakte estas pura ŝanĝo kaj movo. Ekzemple : kiam mi rimarkas, ke ni vivas ne donante amon, ne konsiderante la homojn, kiuj estas proksime aŭ malproksime de ni, tiam ni faras la unuan paŝon al la amo. La amon oni ne povas serĉi : ĝi ekzistas aŭ ne. La unua paŝo al la amo kaj la amikeco estas vidi niajn kritikojn kaj klaĉojn senkonsiderajn, nian envion al tiuj, pri kiuj ni kredas, ke ili pli bonstatas ol ni, kaj la absolutan indiferecon aŭ apation, en kiujn ni eniĝas, kiel plia rimedo por eskapi el la doloro aŭ la danĝero. Okazas jene : ni ekamas, kiam ni vidas nian indiferecon kaj nian envion, t.e. nian malamon. Ni amas, kiam ni vidas klare nian malamon. Komencante ami nian malamon, ni povas vidi ĝin klare ; tiam ĝi finiĝas kaj komenciĝas la amo.

### 30. Vortoj kaj realaĵoj.

Demando : Sed la vorto "amo" ne estas la amo, same kiel la vorto "Dio" ne estas Dio.

Respondo : La vortoj ne estas la faktoj mem. Same, eble, agas la vortoj "helpo", "amikeco", "servo", "honoro", "digno", "libereco", "revolucio" ; ĉiuj realaĵoj, kiujn aŭ ni ignoras aŭ altensvingas kiel flagojn de masiva movado, neniam mem konsciante pri ili.

Ni estas duarangaj homoj, kiam ni donas pli da graveco al la vortoj ol al la realaĵoj, kaj precipe kiam ni rifuzas vivi kontakte kun la realo per ni mem, sen iaj perantoj. La vorto nomas la fakton kaj disigas nin disde ĝi. La unueca perceptado ne titolas la fakton, sed metas nin en rekta kontakto kun ĝi.

### 31. Mensa silento.

Demando : Vi diris, se iumomente mi komprenis kion vi diris, ke la unueca perceptado estas perceptado de la "kunfanta flukso" de la stimulo kaj la reago, kaj ke tiu reago ne estas sole procezo META, kutime produkto de la memoro. La unueca perceptado implicas do ankaŭ perceptadon de la memoro, kvankam tiu ĉi ne interferu. Ekde tie estas silento, kiu estas triangula konscio (en via terminologio) kaj tiu silento povas rekonstrui la implicitan ordon de la kosmo kaj la holokinetiko, tiu movo de la tuto, kiu estas nur la realo mem. Ĉu tio estas, kion vi diris ?

Respondo : Mi pensas, ke vi faris bonan parolan resumon pri kio estas la unueca perceptado. Mi ne kapablas scii ĝis kia ekstremo vi vere komprenas ĉion ĉiumomente. Permesu, ke mi faru demandon al vi, por ke vi konservu dum kelkaj semajnoj sen klopodi respondi ĝin : Ĉu ekzistas observado de la mensa silento per la silento en la silento ?

### 32. Unueca perceptado kaj nutrado.

Demando : Ĉu vi kredas, ke la unueca perceptado povas esti favorata de ia speciala tipo de nutrado ?

Respondo : Io fundamenta estas la ritmo kaj la kvanto en la nutrado. Rilate la ritmon, ni diru, ke eble konvenas manĝi ĉiam malrapide kaj je la sama horo. Preterlasi iun manĝon, kiun oni ne povas manĝi trankvile kaj ĝustatempe, estus pli bone ol rompi la ritmon. Tia ritmo favorus neŭrofiziologian koordinaton akordigeblan kun iu kosmofiziologia integriĝo, kiu mem estas akordigebla kun la unueca percept-

ado kaj la cirkla konscio. Koncerne la kvanton, konvenas manĝi malmulte. La joganoj rekomendas la manĝaĵojn **satwa** : freŝajn manĝaĵojn, nome krudajn fruktojn, lakton, nuksojn, tritikon aŭ integran panon, integran rizon, malmulte da mielo kaj plurajn vegetaĵojn, preparitajn ĉefe en krudaj salatoj, sensale, senvinagre kaj sen kondimentoj aŭ spicoj.

Demando : Vi ne menciis la viandon nek la ovojn.

Respondo : Se vi aldonas la unuecan perceptadon ĉiufoje, kiam vi manĝas, al tio, kion ni diris pri la ritmo kaj la kvanto, vi scios pli bone ol ĉiuj, kion vi devas manĝi, kaj kion vi devas eviti. Vi zorgos ne nur nutraĵon sed ankaŭ la lokon kaj vian animstaton dum vi manĝas. Pli bone ol esti trejnata pere de respondoj aŭ ideoj rilate la nutradon, estas malkovri per si mem pere de la unueca perceptado de la realo. Iu amiko, kiu estas vegetarano, rekomendis al mi viziti bovobuĉejon, kaj helpe de tio decidi ĉu manĝi aŭ ne manĝi viandon. Nu, se vi penus plenumi la recepton de mia amiko - kio certe estas duba - la decido, kiun vi atingus, dependus precipe de la konscitulo, en kiu vi estas, vizitante la buĉejon. La decido estos malsama, se via konscio estas triangula aŭ perceptiva konscio (se vi estas en kontakto kun la realo tiam) aŭ estas nur linia aŭ mnemonika konscio, instigita de la scivolemo, de la intenco havi alian ekscitiĝon aŭ alian sperton. Se vi estus en cirkla konscio, en la momento kiam via amiko rekomendas al vi iri al la buĉejo, eble vi faros decidon adekvatan ĝuste tie, sen neceso iri al tiu loko.

33. La instinktoj konstantaj kaj relativaj de Marx : la komuna faktoro.

Demando : Ekzistas du tipoj de apetencoj, impulsoj aŭ instinktoj. Unue, tiuj konstantaj aŭ fiksaĵoj, kiel la malsato, la soifo kaj la sekso, kaj due, la apetitoj relativaj, kiujn menciis Marx - tiuj, kiuj ne estas integriĝa parto de la homa naturo, sed devenas de certaj sociaj strukturoj kaj sub certaj kondiĉoj de produktado kaj komunikado, kiel nome, la avideco, la serĉado de bonstato kaj la ekspluatado de la malriĉuloj far la riĉuloj. Ĉu la Kariopsikologio akceptas tiun ĉi dividon ?

Respondo : Nenio estas pli memvidebla ol la influo de la medio, tiom sur la direkto, kiom sur la objektoj de niaj deziroj. La infano deziras la dolĉaĵon, kiun li hazarde

vidas en la magazeno. La adoleskantinoj en Usono revas ĝenerale sukcesi iĝi cheerleaders (knabinoj, kiuj vestitaj alloge, stimulas la entuziasmon de la rigardantoj por siaj preferataj teamoj ĉe sportaj renkontiĝoj). La adoleskanto revas iri promeni kun iu cheerleader (ambaŭ fortigas tiel la tutan procezon). La laboristo de fabriko en komunisma lando revas, ke lia fotografaĵo aperas en la honorkadro de la laboristoj plej produktintaj dum la monato. La hinda monaĥo revas pri la Nirvano aŭ nenliigo de sia mio, por ne plu reenkarigi en mondo plena de militoj, malsanoj, malĝojoj, fizika doloro kaj izoligo kronata far la morto. La direktanto de granda entrepreno de kapitalisma lando revas plidikigi sian bankokonton, ĉar tio estas la nura rimedo atingi pli grandan influon en la medio, kie li agas, kaj ĉiujn plezurojn, kiujn li imagas dum siaj raraj momentoj de kvieteco kaj silento. Ĉiuj ili estas mense samaj, t.e. ĉiuj estas viktimoj de la duala movo de la procezo META. Ĉiuj havas celojn, metodojn por atingi ilin, ĉiuj neeviteble havas fortojn aŭ personojn, kiuj kontraŭstaros iliajn celojn. Ĉiuj estas engaĝitaj en psikologia vojaĝo (iri de ĉi tie, tien) anstataŭ percepti unuece la tutan movon de la realo. La deziro transformiĝi kaj transformi la socion estas parto de la procezo META kaj kondukas en la korupton kaj la esencan kontraŭstaron ene de la dualeco, kiu estas la esenco de la procezo META. Nur la unueca perceptado alportos la harmonion al la individuo kaj, pere de li, al la tuta mondo. Se ni komprenas la hologramon, ni komprenos kio estas la holokinetiko, kaj kiaj estos la implicaĵoj de profunda transformiĝo en la individua menso de la homo.

#### 34. Diferencoj kun Carl Rogers.

Demando : Foje ŝajnas al mi, kiam mi aŭdas vin, ke tio, kion vi diras, similas al tio de Carl Rogers, kaj mi kredas ankaŭ, ke mi rimarkas danĝeron identiĝi kun la paciento.

Respondo : Mi jam eksplikis la diferencojn inter identiĝo kaj unueca perceptado. Tamen permesu, ke mi klarigu vian konfuzon inter tio, kion mi diras, kaj tio, kion diras Carl Rogers. La metodoj en psikoterapio estas kiel la ceremonioj inter la politikuloj, kaj la ritoj inter la religiuloj : simplaj duarangaj movoj por reliefigi tion fundamentan, nome krei "resonon", "komprenon", aŭ "kunligon". Estas tiu kunligo, kiu kuracas, ĉar, por ke estu kunligo, devis ekzisti unueca perceptado.

1) La psikoterapeŭto kaj la paciento devas kompreni

sian mankon de kontakto kun la realo, sed ne nur je intelekta nivelo sed ekvidante la foreston de kontakto inter unu kaj la alia.

2) Ili kune ekkonscios la dualan aŭ fragmentan staton de siaj propraj mensoj.

3) La agado de la psikoterapeŭto ne estos aŭtoritatema, ĉar li ne estas posedanto de respondo, kiun oni ne serĉas. Kio ekzistas, tio estas konduto kunlaborema inter du individuoj, kiuj atingas iompostiome, kontakte kun la implicita ordo de tiu rilato, naturan "ekvilibron" aŭ "kuracivan harmonion".

Ambaŭ povas demandi unu la alian, sed ambaŭ restas longtempe silentaj, kviete atentemaj pri ĉiu demando, antaŭ la apero de la parola respondo, kiu multfoje estas nenecesa. Tiu ĉi estas la uzo 4) de pasiva-esplora penso, aŭ sojlo de 5), la inteligenta perceptado. Tiu ĉi inteligenta perceptado ne konscias, ke ekzistas kontakto kun la realo, ĉar ĝi kredas percepti sense per la polusoj de la objekto kaj la bildo. En la rekta, unueca-inteligenta perceptado ekzistas interdependeco de la objekto kaj la bildo, aŭ memoro, kiun ni havas de la objekto. Tiel, "vidi" iĝas pli grava ol "tio vidita". Vidi iĝas pli grava ol tio, kion oni estas vidanta. La ago vidi estas pli grava ol ideoj aŭ emocioj, kiuj rezultas de tio, kion oni jam vidis. La ago vidi iĝas tempeca ago. Sed kiam Carkhuff - eksponanto de Rogers - diras al ni : "Ju pli la paciento komprenas sin, des pli klara estos la direktado ; ju pli klara la direktado, des pli klaraj la celoj ; ju pli klaraj la celoj, des pli klaraj estos la paŝoj, kiuj helpas al ni por atingi la celojn" (volumo I de sia libro **Helpo kaj homaj rilatoj**), tre elmontriĝas la agado de la mnemonika procezo.

Ni vidas, ke Carkhuff ne distingiĝas de Skinner (escepte ĉe la metodo) en sia deziro rebonigi la mnemonikan procezon. Ni vidas ankaŭ, ke nia nova paradigmo estas la nura, kiu konsideras la eblecon elpuŝi la homon el tio, kion li simple konas (la procezon META). Tio, kion faras la aliaj "skoloj", estas rebonigi aŭ ornami la kaĝon (la procezon META). Sed, se la kaĝo iĝas tro komforta, ekzistos eĉ malpli da eblecoj foriri el ĝi. Sigmund Freud, iniciatinto de la unua paradigmo en Psikologio, maljuniĝinte tre seniluziiĝis pri la valoro de la psikanalizo kiel "terapijo" kaj emis prefere rigardi ĝin kiel "teorion de la homa naturo". La terapeŭtikaj sukcesoj de Freud estis nur la natura konsekvenco de lia unueca perceptemo. La celo de ĉiu psiko-

terapio estas ekvilibro aŭ ordo inter la diversaj polusoj de la procezo META, nome, aŭ "konstanteco" (Margaret Mahler), aŭ "integreco" (Erik Erikson), aŭ "sekseco" (Sigmund Freud), aŭ "memrealigo" (Maslow), ktp. Diras al ni Edgar A. Levenson, unu el la psikiatroj, kiuj partoprenis kune kun la aŭtoro en la kunsidoj en Novjorko kun la edukisto J. Krishnamurti en 1975 kaj 1976 : "Kvankam ni ĉiuj atingas klinikajn rezultatojn kun niaj pacientoj, ni ofte embarasiĝus, se oni devigus nin diri kio konsistigas la diferencon, kial la terapio "laboras" aŭ "sukcesas" ĉifoje pli bone ol alifoje" (Holografia modelo de psikanaliza ŝanĝo").

Kelkfoje estas intensa memoro, kio okazigas tiun "ŝanĝon" malfacile difineblan sed facile percepteblan tiel por la terapeŭto, kiel por la paciento. En aliaj okazoj, estas iu ekstrema emocia sperto for-reagiva (ploro aŭ ridego), iu akra psikodinamika formulado aŭ eĉ iu fulmo de afekcia reago flanke de la terapeŭto kiel parto de intensa kunligo. La paciento iam sentas sin inspirita aŭ iluminita, kaj meze de longa silento li eble eldiras "Aha!" kiel esprimon de sia subita kompreno, de sia reorganizado, de sia holosintaksio aŭ momenta integriĝo neŭrofiziologia (aŭ mensa). Pro tio, ke neniam okazis al la paciento en la pasinteco simila travivaĵo, ankaŭ ne ekzistas vortoj, kiuj simbolu tian sperton, kiuj prezentu ekvivalenton aŭ komparon de tia kompreno. La paciento revenas hejmen, klopodas rakonti parole sian sperton kaj surpriziĝas, ne nur pri tio, ke en lia familio neniu komprenas lin, sed precipe pri tio, ke li mem ne kapablas revivi parole la enorman travivaĵon, kiun li havis dum la seanco. Lia rakonto estas ne nur banala por lia familio sed, nekompreneble, iĝas nun banala por li mem. Kio okazis ? Se ni demandas tion ĉi al 50 pacientoj, kiuj estas travivintaj kunligite tian sperton, ni eble ricevas 100 malsamajn respondojn (efiko Rashomon).

Ni diras, ke tio, kio okazis, estas ago de unueca perceptado, kaj ke ĉiuj teknikoj estas nur ceremoniaj preparoj, kiuj povas aŭ ne konduki en tiun "agon" aŭ "staton". Ĉiu terapeŭto mezbone trejniĝinta (kaj malfeliĉe ne estas tiel multaj, kiel ŝajnas) povos distingi inter tiu "ago" aŭ "stato" kaj la "falsaj ŝanĝoj", kiel ekzemple la eskapo al la sano ; la kunlaboro aŭ neŭroza obeado ; la kaŝita akordiĝo tute nekonscia, en kiun falas (tiel ofte!) tiom la paciento, kiom la terapeŭto por lasi trankvilaj unu la alian

aŭ ne ĝeni sin reciproke ; aŭ la neŭroza sukceso de la "paciento obsedema-sintrudema", kiu penas montri sin pli malsana aŭ pli sana ol la terapeŭto esperas pri li. Estas tiu mezbona trejniĝo, kiun ne ĉiuj t.n. terapeŭtoj ricevas, kio ebligos uzi saĝe la tempo-problemon, ne nur por determini kiel longe daŭros iu terapio aŭ seanco, sed ankaŭ por scii kiam estas la plej bona momento por interpreti, kiel longe devos daŭri la interpretado mem, kaj kiom da tempo bezonos la paciento por tute kompreni tiun interpretadon, kiu estis kaj estos ripetata fojfoje diversmaniere. Sed estas nur la unueca perceptado de la terapeŭto, kio perceptas la subtilajn mensogojn ekzistantajn en ĉiu vero, kaj la subtilajn verojn, kiuj estas en ĉiu mensogo.

Ne gravas, kiam oni faras ĝin, neniu interpretado estas "ekskluzive vera", ĉar ĉiu interpretado partikularigas kaj fragmentigas nedivideblan totalon (ĉi-kaze neŭrozan strukturon). Tial, ĉiu interpretado estas simultane vera kaj nesufiĉa.

M. Kahn diris en 1974, en sia libro **La privateco de la mio**, iel moke, ke "ni esperas, ke la pacientoj kapablu diri al ni siajn verojn, por ke ni interpretu iliajn malverojn".

J. Lacan diris en 1972, en publikaĵo de Tavistock en Londono, ke fine de iu terapio la paciento devas esti lerninta tion, kion la terapeŭto scias, sed ankaŭ, ke tio estas nenio, kion la pacientò ne antaŭsciis.

Temas ne nur pri organizado de la aferoj por la paciento laŭ ordo, kiun li ne vidis antaŭe, sed ankaŭ okazigi, ke la paciento resonu ĉe la komunikado, aŭ ke tio, kion diras la terapeŭto, resonu ĉe la paciento kune kun tio jam konata de la paciento, sed reenfokusigita, reordigita aŭ reintegrigita en procezo, kiu - je la neŭrofiziologia vidpunkto - estas eble unu paŝo al la holosintaksio.

Eblas, ke iu terapeŭto, kiu agas en unueca perceptado (aŭ, en kiu la unueca perceptado agas), vidas en iu fragmento el la klinika materialo la tutan psikologian strukturon de la paciento.

Kiel jam dirite, li vidos laŭ sentempa maniero, kiu povas inkluzivi ne nur la pasintecon sed ankaŭ la estontecon (subtila formo de "natura saĝo", nenio mistera, kaŝita aŭ neatingebla, nenio inda je pompa nomo). La "implicita ordo" en 20 minutoj de terapia seanco povas esti "disvolvita" dum tuta terapio tri-, dekdu- aŭ pli monata. La ordo "implicita aŭ envolvita" en nur unu sonĝo povas elmontri al terapeŭto en unueca perceptado la tutan historion de la neŭrozaj mal-



facilaĵoj de la paciento. La inteligenteco - kiu estas parto de la unueca perceptado - estos tio, kio kapablos distingi inter la tekniko fari nenion kaj la foresto de tekniko, kiu estas la inteligenta ago.

### 35. Kion vi faras en psikoterapio ?

Demando : Ĉu vi povas diri al mi, D-ro Feldman Gonzalez, kion vi faras konkrete, kiam vi faras psikoterapion ?  
Respondo : Unu el niaj malfacilaĵoj estas, ke ni ne konsistigas homogenan grupon. Ni estas okupitaj profesiuloj kaj ne ĉiuj ĉeestantoj partoprenis en ĉiuj prelegoj, kaj eĉ hodiaŭ en tiu ĉi kunveno supoze klariga pri tiuj ses/sep prelegoj, per demandoj kaj respondoj, oni vidas novajn vizaĝojn. Ni diris, ke ni elstarigas la unuecan perceptadon, malkovrante kune kun la paciento, kio malebligas ĝin per la penso negativa-nerekta aŭ esplora. Por tute kompreni tiun ĉi terminologion vi devas ne nur esti aŭskultinta ĉiujn prelegojn sed ankaŭ esti vivinta tion, kion oni diris, almenaŭ dum la prelegoj.

En psikoterapio, ene de nia konsumsocio, ekzistas la ofertado kaj la mendado. La psikoterapeŭto ofertas sian servon (terapio) kaj tiu simpla fakto kreas mendon, kaj la mendo estas : "Sinjoro, vi mildigu mian suferon". Kion oni nur implicas, tio estas, ke oni petas la finon de la suferoj por plu vivi en mensa stato, kiu estas la fonto mem de la sufero (la procezo META). Ene de tiu polareco (aŭ dualeco) la servo transformiĝas en nuran mildigadon de la sufero, fragmente kaj intertempe. Tiu ĉi estas la maniero, kiel la psikoterapio tute perdas sian sencon. Nia psikoterapio devas esti ĝisfunda tiel, ke ĝi devas mildigi la psikologian doloron (la malĝojon, la avidecon, la timon, la malamon) komplete kaj porĉiame. La psikoterapio devas tute liberigi la individuon kaj ne nur mildigi lian suferon. Alivorte, la psikoterapio estas ago de kunligo (ne malpli ol tio), kiu ebligas al la individuo vivi en unueca perceptado. Kiam tio ĉi okazas, dependas de la individuo, ĉu li deziras vivi en tiu unueca perceptado, aŭ reveni en la suferon.

### 36. Aŭtoritateco kaj povo en psikoterapio.

Demando : La dependema paciento postulas, ke oni estu aŭtoritatema, kaj - ĉar oni estas psikoterapeŭto, kiu laboras sola kaj kelkfoje izolita - oni devas solvi sian propran senton de senpoveco per sinteno patrisma kaj

aŭtoritatema, tute uzante la povon, kiun donas al ni tiu situacio.

Respondo : Ĝus aperis la libro de D-ro Jerry Lewis, direktoro pri esplorado kaj trejnado en la Fondaĵo Timberlawn pri Psikiatria Esplorado, titolita **Esti terapeŭto, instruado kaj lernado**, Novjorko, Brunner-Mazel, 1978. Lewis konceptas la empation(31) kiel iun **continuum** kun du ekstremoj : 1) la kona empatio, kiu estas la kapablo (facile instruebla kaj lernebla) de iu terapeŭto registri la emociojn de sia paciento kaj konigi al li tion, kion li registris, kaj 2) la afekcia empatio (kiu estas eble tio, kion la ekzistencialismaj terapeŭtoj nomas "ĉeesti" aŭ "esti"), kiu konsistas en tio, ke la terapeŭto konsciu pri la propra afekcia stato. (Lewis konsideras, ke tio ĉi estas pli malfacile komunikebla kaj lernebla).

Fakte, ne ekzistas eĉ unu afekcia stato, tra kiu la paciento povas pasi en psikoterapio, kiun la terapeŭto neniam estis travivinta. Sigmund Freud mem akceptis, ke li sentis sin terure "stranga", kiam li ne sukcesis kompreni la alian kompare kun si mem.

Diras Lewis, ke ekde tiuj empatiaj statoj, estas necese movi alterne al stato de "objektiva seninklinemo", elde kiu eblu la formulado (ripeta) de la malfacilaĵoj de la paciento, la kontraŭstaroj, klarigoj kaj interpretoj. Lewis kredas, ke tiu malrigida movado inter empatio kaj intelekta objektiveco estas la atesto pri la kompetenteco de iu psikoterapeŭto. Mi esperas, ke jam povas esti klare por ni, ke ambaŭ statoj apartenas al la sama procezo (la procezo META).

Krome, diras al ni Lewis mem : "La dua stato de la egoo (de la terapeŭto) estas la stato de seninklinemo (aŭ objektiveco). La terapeŭto observas la pacieron kiel objekton kaj distance". Ni jam diris, ke tiu ĉi estas la fragmenta perceptado de la linia konscio, kiu disigas iun "observanton" disde "tio, kion li observas" kaj estas fonto de duala izoligo en ĉiu rilato.

Diris Luborsky en sia libro **Psikoterapio sukcesa** (Novjorko, Brunner-Mazel, 1976), ke ekzistas du ĝeneralaj tipoj de psikoterapia rilato : 1) la kunlaborema, kaj 2) tiu de subteno. Ni pensas, ke tiu ĉi estas alia disduigado de la procezo META. La plej grava subteno por la paciento estas la kunlaboro mem, kun li kaj lia vekigo al la stato de maksimuma kunlaboro en la rilato, kiu okazas en unueca perceptado.

Mi volus traduki aŭ modifi belan frazon de la tre respektinda profesoro J. Lewis. Li diris : "Sen la starigado de kunlaborema rilato, en kiu oni dividas la povon, ekzistas pli malgranda ebleco starigi tiun psikologian intimecon, de kiu aperas la vundobleco kaj la fido". En kerna Psikologio, ni estus dirintaj same, sed tiel : "Sen la starigado de kunlaborema rilato, en kiu la povo forestas, ekzistas malebleco starigi la unuecan perceptadon, de kiu aperas la vundobleco kaj la fido kiel gravaj elementoj de vera kaj totala rilato".

Kiam oni rezignas la povon, malaperas la terapeŭtoj (aŭ personoj) ĉiopovaj, kaj ankaŭ la terapeŭtoj (aŭ personoj) senpovaj, kaj ĉesas la fundamenta kialo (kune kun la timo, kiu akompanas ĝin) de la distordo ĉe ĉiu homa rilato.

37. Praktika utileco en kliniko. Kiuj kaj kiom da ili pliboniĝas ?

Demando : Kiel psikologo, mi ne vidas ankoraŭ kiamaniere tio, kion vi diras, povas utili al ni praktike en kliniko. Kiel povas ĝi helpi al mi profesie por helpi deprimiton, psikopaton, toksigemulon, alkoholiston, deliktulon, samseks-emulon, hiperaktivan infanon, ktp ?

Respondo : Ni parolas, kompreneble, pri io tre nova, kaj estas malfacile ne miksi tion, kion ni diras, kun pasintecaj konceptoj, ĉu konceptoj religiaj, psikologiaj, filozofiaj, medicino-biologiaj aŭ aliaj.

Miksi tion ĉi kun tio malnova estas maniero rezisti tion novan, rezisti konscie kaj aktive. Ni povas rezisti ankaŭ konscie kaj pasive, aŭ nekonscie. Tiuj ĉi tri manieroj estas manieroj ne voli kompreni, estas manieroj enfermiĝi.

Kiam vi ne vidas kiel tio, kion ni diras, povas esti aplikata en la rekta agado en la ĉiutaga vivo, ĉiumomente, estas simple, ĉar vi ne aŭskultis aŭ ne komprenis tion, kion ni diris dum niaj prelegoj, aŭ ĉar vi ne deziras kompreni.

Estas tre simple kaj samtempe tre terure.

Demando : Ĉu vi faris kalkulon pri la rezultatoj de la kariopsikoterapio ? Kiom da kaj kiuj estas la pacientoj, kiuj pliboniĝas ?

Respondo : Mi ne volas peni klopodi por kompreni la vorton "pliboniĝi" nek la mensan mekanismon, kiu subtenas ĝian signifon : iri de tie ĉi ĝis tie supozante, ke tie estas pli bone ol tie ĉi.

Mi pensas, ke nenio estas pli bona ol tio bona, kaj ke ne

ekzistas pli granda pliboniĝo ol la ripeta movo de tio bona. Mi komprenas ankaŭ, ke nenio estas tiel bona, kiel la unueca perceptado.

La aplikado de la statistika metodo je la taksado de la rezultatoj de ĉiu psikoterapio implicas konsideri almenaŭ tri variablojn :

- 1) la terapeŭton,
- 2) la pacienton (aŭ kiel ajn vi volas nomi lin), kaj
- 3) la terapan metodon.

Ĉiu el tiuj ĉi tri variabloj influas la du aliajn en la psikoterapia procezo ; kaj faktoroj, kiel la grado de trejniĝo de la t.n. terapeŭto, la tipo de tiu trejniĝo, kaj ankaŭ lia sperto influos la rezultatojn el la statistika vidpunkto.

La plej gravaj faktoroj rilate la pacienton estas : la sociekonomia stato, la aĝo, la sekso, la eduknivelo kaj la diagnozo. Adoleskanta viro, kiu apartenas al malriĉa familio, kaj kiu ne finis sian bazan edukadon, havas malpli da statistikaj eblecoj atingi bonan rezultaton en psikoterapio ol iu mezklasa sinjorino 35-jara, kiu kompletigis sian mezgradan edukadon. Precipe se la menciita adoleskulo estas kronika skizofreniulo kaj la sinjorino suferas de priman reagon ĵuskomencitan.

La metodinfluo en ortodoksa psikoterapio - ne kerna - (kaj se oni ĉiam parolas nur el la statistika vidpunkto) dependas de tio, ke oni uzu ĝin solan aŭ kombinitan kun medikamentado, media aŭ konduta manipulado, enhospitaligo, familia terapio, ktp.

Ĉiuj ĉi variabloj kaj faktoroj interagas komplekse, kiam ni konsideras la rezultatojn de la psikoterapio el la simpla statistika vidpunkto.

Sed ni jam parolis pri la teknikoj kaj metodoj rilate la konscitipojn (tion oni devas kompreni tre bone). Cetere estas tre malfacile uzi la statistikan metodon por taksu la konscistaton (aŭ movon) tiel de la paciento kiel de la terapeŭto dum la ago nomita "psikoterapio".

La unueca perceptado, kiun ni klopodis priskribi tiel multfoje, estas la plej grava faktoro tiel en la paciento kiel en la terapeŭto, kaj ĝi estas tio, kio determinas la profundan agon de rilato ne fragmenta, kies naturo mem estas kuraciva. La unueca perceptado, for kaj ene de la psikoterapio, estas la ripetema movo de tio bona, kaj (kiel ni jam diris) estas nenio pli bona ol tio bona.

### 38. Transcendeco : Freud kaj Marx.

Demando : Ŝajnas al mi, ke vi parolas pri transcendi determinitan mensan staton (aŭ konscistaton), kiu iĝis plej grava kaŭzo de la esenca strukturo de nia civilizacio tra la tuta planedsupraĵo.

Tamen vi donas gravecon al Sigmund Freud, kiu estis nur persono, kiu izolis sin mem kun sia socia klaso, eskapante el la politiko-historia partopreno al la intelekta introspekto, konata kiel psikanalizo.

Male, vi ne mencias Karl Marx, kiu kapablis transcendi sian propran kulturon, sian propran socian klason. Se vi konsentas, ke mi denove uzu la vorton "izoliĝo", mi diras, ke Marx izoliĝis disde sia propra socia klaso por eniri en novan tipon de partopreno politiko-socia. Ĉu tiu ĉi ne estas iu transcendentformo ?

Respondo : Vi povas uzi la vorton "trancendeco" kiel ajn vi deziru. Ĉiu vorto havas altan signifkomponenton, kiu estas idiosinkrazia aŭ partikulara por ĉiu individuo. Estas tio, kio okazigis, ke oni diras, ke ekzistas kvar miliardoj da lingvoj (po unu por ĉiu individuo). Sed se ni intencas reciproke kompreni nin sincere, anstataŭ fari prozelitismen favore al niaj propraj konvinkoj (veraj aŭ malveraj), tiam ni bezonas akordiĝi pri la signifo de la vortoj, kiujn ni uzas. Foje, tio ĉi postulas multe da pacienco kaj seriozeco, kaj sufiĉe da tempo por amikeca konversacio. Ni parolas pri "transcendi" tion, kion tiel Marx kiel Freud havis komune, kion ni ĉiuj homoj havas komune : la mnemonikan procezon. Facilas vidi la esencan dualecon de la mnemonika procezo aganta tiel en Marx kiel en Freud.

Karl Marx verkis sian **Komunisman Manifeston** en 1865 kaj li parolas tie pri enkondukado en la povon (meti en lumon) de la proletaro (kiu estas la kaŝita klaso). Sigmund Freud verkis sian **Interpretado de la sonĝoj** kaj li parolas tie pri enkondukado de la nekonscio (tio kaŝita) en la konscion (la lumon).

La komuna faktoro inter ambaŭ, kiel memvideblas, estas, ke "la realo kaŝas subkuŝantan streĉon". Laŭ Freud, estas la streĉo inter la ego kaj la id\*; laŭ Marx, estas la streĉo inter la burĝaro kaj la proletaro.

Uzante la lingvon de la teorio pri la ĝeneralaj sistemoj

\* vidu noton (36).

de Bertalanffy, ni povas diri, ke la homo - kiel sistemo malfermita (aŭ negentropia) - kiu interŝanĝadas kun sia medio, subtenos laŭ sia malfermecgrado al tiu medio diversajn gradojn de organizado aŭ komplekseco.

Baze estos nivelo de nura homostato aŭ ekvilibro kun la medio (kibernetika nivelo, se plaĉas al vi). Sed ju pli pli-grandiĝas la malfermo de la sistemo (kiu ĉi-kaze estas la homo), des pli pli-grandiĝas la kompleksecniveletoj de tiu malferma sistemo, kaj fine tiu kompleksa ento determinos iun ekologisferon, aŭ median sistemon, kiu estas tutharmonia kun sia propra interna sistemo. Tie aperas la problemo de la teleologio aŭ "fina celo" de la vivantaj organismoj, priskribita far Teilhard de Chardin, Abraham Maslow kaj aliaj. Bertalanffy mem distingas inter "teleologio" kaj "teleonomio". Li diras, ke science la teleologio estas nedemonstrebla, kaj ke tio, kion la scienco povas atingi, estas nur studi la proprecon de la malfermaj sistemoj (kiel la homo) pligrandigi sian propran kompleksecon (teleonomio).

Por kiu ajn komprenanta la esencon de tiu ĉi problemo memvideblas, ke akorde kun la homa mensostato estos la stato de la socio kaj eĉ de la naturo (ekologisfero). La mnemonika procezo, kies naturo estas esence duala, konfliktema kaj kontraŭstarema, senĉese (en la tempo, kiun ĝi mem kreis) serĉos unu celon. Tiu procezo kreas socion, kiu ankaŭ posedos ĉiujn karakterojn de dualeco, konflikto kaj kontraŭstaro ; kaj eĉ kiam aperus politiko-socialaj reformoj, kiuj transformus la socion, la sama procezo rekreus la antaŭajn kontraŭstarojn (novmaniere) kaj la novajn reformojn (permanentan celon). Se vi deziras havi bonan grafikan ideon pri tiu ĉi procezo, observu zorgeme la desegnaĵojn de la nederlanda artisto Maurits Escher: Rubando de Moebius, Pli Malgranda, Domo de ŝtuparoj, Akvofalo, Alia mondo, Supreniro kaj malsupreniro, kaj ceteraj. Ni diras, ke la nura plensignifa transcendo estas la transcendo de tiu procezo mnemonika-duala, kiu anstataŭ ekkontakti vere kun la realo, prefere kreas ĝin akorde kun sia propra naturo.

Ni jam parolis pri la rilatoj inter la vortoj "manfakturo" kaj "realo". La homo bezonas rektan perceptadon de tiu realo (sensen reedukadon). La rekta perceptado estas la unuo de unueca perceptado, kiu estigos tutan transformiĝon en la strukturo de la malferma sistemo, for de la mnemonika procezo, kaj tiu strukturo nepre estigos novan soci-

tipon senkontraŭstaran kaj senkonfliktan je ĉiuj niveloj. Ene de tia socio la eblecoj de la homo estas nur apenaŭ imageblaj. Ĝu socio konsistanta ne nur el "komunistoj" sed el individuoj en "vera kunligo", havigos al ĉiu homo senfinajn eblecojn, kaj tiuj ĉi senfinaj eblecoj neniel rilatas al ia tipo de mnemonika celo.

39. Procezo META kontraŭ unueca perceptado :  
Ĉu nova dualeco ?

Demando : Kiam vi distingas inter la procezo META kaj la unueca perceptado, vi kreas novan dualecon. Ĉu vi ne vidas tion tiel ?

Respondo : Ne malfacilas vidi tion. Ankaŭ ne malfacilas vidi kiel la procezo META - kiu estas la sola aĵo, kiun ni konas, kaj ene de kiu, tio konebla moviĝas - fagocitas kaj glutas ĉion potencie. Tial gravegas, ke la unueca perceptado ne estu nur ideo, nur parto de skemo, ĉar do apartenas al la dualeco, al la procezo META. La propra interna intenseco, kiu kreiĝas, kiam oni vidas tiun ĉi evidentan fakton, faros, ke la unueca perceptado iĝos realo en la agado, fakto moviĝanta, kaj ne alia senmova bildo de nia memoro.

40. Ĉu tiu ĉi estas erao de malespero ?

Demando : Ĉu vi kredas, ke ni estas en la erao de la malespero ?

Respondo : En la ĵus aperinta psikiatria kaj psikologia literaturo oni multe ripetas, ke la jardekoj inter 1930 kaj 1950 aŭ 1960 estis la "jardekoj de la anksieco". Tiam, granda parto de tio, kion oni verkis, rilatis al la anksieco, kaj oni proponis malsamajn manierojn alfronti ĝin, inter la ekstremoj de la psikanalizo kaj la kondutismo aŭ behaviorismo. Tia zorgo fruktis eĉ ĉe la farmakologia kampo, per la apero de la trankviligaĵoj, kiel la meprobatoj kaj la benzodiazepinoj (ekzemple la fama **Valium**).

Oni diras ankaŭ, ke la lastajn jardekojn de nia jarcento oni konas kiel la jardekojn de la malespero aŭ deprimado, kaŭze de la ŝajne ega plimultigo de tiuj ĉi kazoj. Tiu ĉi nova zorgo fruktis ĉe la farmakologio per la apero de la t.n. antideprimaj medikamentoj, kiuj komence estis simplaj stimuloj kiel la amfetaminoj kaj la metilfenidato, sed kiuj cedis sian lokon al la ĉesigiloj, de la monoamino-oksidaso kaj precipe al la "triciklaj" antideprimiloj, kiuj estas la plej uzataj (kiel la **Elavil**).

En la Biblio-oni mencias, ke Davido sukcese kuracis deprimon de Saul. En la Katolika Eklezio estis teologia movado, kiu klopodis plimultigi la nombron de la sep mortomeritaj pekoj, inkludante la **acedia**-n (kiu greke signifas "mankon de zorgo") kaj la **tristitia**-n, kiuj estis du malesperformoj ĉe la monaĥoj. Preskaŭ ĉiuj monaĥordenoj akordiĝis tiam, ke la tri plej bonaj traktadoj estis la purecoj persona kaj ĉambra, la intensa permana laboro kaj rigida fasto aŭ likva dieto, kiu apartenis al "savkvaranteno".

Ni ne plu parolas pri **acedia** kaj **tristitia**, sed ni ja diras malesperon, melankolion, **mal de siècle**, **Wetschmerz**, **Angst**, **ennui**, anomio, ktp.

Freud asertis, ke la seksa bridado estigas la malĝojon kaj la anksiecon. Hodiaŭ en Usono, unu el la landoj sekse plej senordaj el la planedo, la malespero, la enuo kaj la deprimado suferigas 80 procentojn el la personoj, iun momenton, dum iliaj vivoj.

Ni devas vidi, ene de la unueca perceptado la egan tendencon reduktigan de la procezo META (aŭ procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika), tiu procezo, kiu - por simple ĝin diri - entenas en unu funkcia unuo la memoron, la ideon, la ideologion, la bildon, la emocijon kaj la ĉiam rilatantajn reagojn muskolajn, glandajn kaj viscerajn.

Ankaŭ elde la unueca perceptado ni vidas, ke meti diagnozajn etiketojn al la diversaj formoj de persona turmento, estas ankaŭ agado de la procezo META. La procezo META estas ne nur tiu, kiu suferas, sed ankaŭ tiu, kiu nomas tiun suferon. La procezo META, kiu estas memoro, ideo, kaj mensagado, serĉas la suferkialon kaj trovas milon da eksplikoj kaj teorioj (ĉiuj fragmente senerarajn).

Studante la deprimon, Freud, Bowlby, Margaret Mahler, Bhurrus Skinner, Erik Erikson, Konrad Lorenz, Harry Harlow (ĉe la simioj), Goodall (ĉe la ĉimpanzoj), Paul Scott kaj John Fuller (ĉe la hundoj), rimarkis kiel la rompiĝo de la ligoj de korinklino kreas la malĝojon, la melankolion kaj eĉ la malesperon. Tamen, perdo kaj disigo ne estas ĉiam aŭ sole la deprimkialoj. Eĉ se ni konsideras la perdon aŭ disigon nekonscian aŭ simbolan, nur kvarono el la klinikaj deprimoj montras tiun devenon. Cetere, ne ĉiuj, kiuj suferas de perdo aŭ disigo, deprimiĝas.

Memvideblas, ke ni longatempe evitis la kontempladon de la vera deveno aŭ de la vera radiko de la homa problemo, sendepende de ĉiuj etiketoj, kiujn ni uzas por fragmenti, studi kaj eĉ - kaŝe - ignori ĝin.



Gerald Klerman, aŭtoro de la artikolo "Vundebila junularo, espero, malespero kaj renovigo" (Universitato de Ĉikago, aprilo 1978), diris : "En la moderna vivo, la ĉefaj fortoj, kiuj elĉenigas la deprimon, estas la minacoj al la sento pri la mio". Estas precize tio ĉi, pri kio ni parolas en niaj prelegoj, kiam ni aludas ĝenerale la procezon META kaj ties produkton, "la mion".

En sia libro **Severe and Mild Depression** (Novjorko, Basic Books, 1978)\* Silvano Arieti kaj Jules Bemporad analizas (ne uzante nian lingvon) la muldeblecon de la esenca dual-eco de la procezo META, ekde la koncepto pri la "superreganta aliulo". La "superreganta aliulo" estas unue la patrino, poste iu amantino aŭ la edzino, ktp, en kiuj la paciento serĉas amon aŭ aprobon diversmaniere (donante, postulante, kondutante bone). Sed la "superraganta aliulo", kies malapero okazigas al ni malesperon, povas esti ne nur persono, sed ankaŭ institucio, religia grupo, politika partio, ideologio, kiuj estas la "superreganta celo" (inkluzive de la deziro ricevi la Nobelpremion, esti prezidento, aktoro aŭ fama sportisto, ktp).

Facilas vidi en la konceptoj pri "superreganta aliulo" kaj la "superreganta celo", de Arieti, la esencon mem de la dualeco de la procezo META. La naturon kaj la enhavon de la polusoj de tiu dualeco oni povos modifi alterne tra la tempo, sed la dualeco ĉiam moviĝos inter du psikologiaj polusoj.

La identiĝo de la memoro, la ideo kaj la emocio en tiu ĉi procezo META, estas denove klarigita per la malkonsento inter Aaron Beck, kreinto de la "koniva terapio" - kiu asertas, ke la deprimado ekestas pro la nura ekzisto de malagrablaj pensoj, kiuj estas plene konsciaj - kaj Miguel de Unamuno, kiu diris, ke niaj emocioj antaŭas niajn pensojn. Arieti mencias la kazon de deprimema pacientino, kiun li sendis al la kinejo por vidi gajan filmon, post ŝia plendo, ke ŝi estis vidinta filmon tre malgajan, kiu tro deprimis ŝin. Vidinte la gajan filmon, la pacientino diris : "Vidante, kiel bela povus esti la vivo, mi deprimiĝis pli ol antaŭe."

Nekredeblas, post ĉiu evidenteco, kiu prezentiĝas antaŭ niaj sensoj, ke ni persistu fragmenti la homan problemon per kaŭzeco, diagnozoj kaj terapeŭtikaj metodoj. Ĉio ĉi malproksimigas nin de la problemo, de ties totalo, de ties esenco mem.

La paciento venas al la konsultejo kiel konsumanto de diagnozo kaj kiel konsumanto de traktado. La psikiatria

kuracisto, invadita far la reklamoj pri la komercigitaj antideprimaj drogoj, scias, ke li havas "la traktadon" kaj multfoje la diagnozo estas sugestata nur per la ekzisto de "specifa" traktado. Ne nur la malsano trovas sian kuracilon, sed ankaŭ la kuracilo trovas sian malsanon. Tion ĉi ni menciis iomete malsame en alia okazo, kiam ni parolis pri "la modeloj de kaŭza rilato" ¶ (kiuj prezentas alian el la maskoj de la dualeco de la procezo META).

Tiamaniere, tiel la t.n. "paciento" kiel la t.n. "terapeŭto" evitas la respondecon konsideri serioze la dualecojn de la procezo META (inkluzive la etikedadon de iu problemo kaj la serĉon de eblaj kialoj). Ambaŭ ili tiamaniere nepre evitos konsideri la solan veran solvon, kiu estas la unueca perceptado, kiun ni klopodis ekspliki plurmaniere.

41. Kiel ĉesigi la totalan seniluziiĝon.

Demando : Mi vivas en stato de seniluziiĝo. Ĉi ne estas malespero nek totala deprimado. Mi havas bonan laboron, ĝuas miajn manĝojn kaj sekson, mi ĝuas la kunestadon kun miaj filoj kaj geamikoj, sed... kiel do eliri el tiu totala seniluziiĝo ?

Respondo : Vi parolas, permesu, ke mi esprimiĝu per muzika terminologio, pri io sama kiel la supera okono de la enuiĝo.

La diferenco estas, ke via seniluziiĝo estas, eble, pli konscia kaj komprenema. Komprenema, ĉar oni komprenas pli bone la naturon de la emocio aŭ de la reago ; kaj ankaŭ kunprenema, ĉar ĝi ĉion ampleksas en via vivo. Ĉu ne ?

Ni devas ne nur scii, sed ankaŭ kredi, ke nenion oni povas fari kontraŭ tiu seniluziiĝo. Ĉio, kion oni faros, determinos la revenon en la fonton de la seniluziiĝo.

Sed sciado ne sufiĉas, kaj oni ĉesas kredi, ke eblas fari nenion. Tiam la procezo META, per sia "penso", sia linia konscio kaj sia bildo, kiun ni nomas "mio", nepre denove "ĉirkaŭkaptas" la mensan agadon kaj ties trivialajn aŭ gravajn agadojn. La seniluziiĝo mem estas subtila agado de la mio.

Resti en ĝi, sen "kapitulaci" antaŭ ĝi, ebligas, ke la unueca perceptado alvenu, kun sia spontanea kaj simultana agado ; ago sen la reago de la plezuro aŭ la malĝojo. Tiu ĉi agado neniel rilatas al la proteaj kaj sennombraj agadoj por eskapi al la seniluziiĝo.

42. La ĝermo de la mio.

Demando : Ĉu vi povas plu paroli pri la ĝermo de la mio?

Respondo : Ni jam parolis pri epigenezo (aŭ disvolvo laŭ stadioj) de la dualeco ĉe la persona identeco (aŭ mio) ekde la naskiĝo ; sed estas evidente, ke nia memoro estas lotumita je genetika nivelo.

La nefirma nerva sistemo de la feto (observanto) jam estigas dualan rilaton kun la amnia likvaĵo (medio) je pure homostata nivelo de komplekseco. Tiu homostato (baza ekvilibro inter la organismo kaj ĝia medio) integriĝas je arkiencefala nivelo (la malnova cerbo), kie estas la neŭroanatomiaj strukturoj, kiujn ni havas komune eĉ kun la rampuloj, kaj estas facile vidi, ke tiu homostata integriĝo estas memoro de ĉiu animala speco, daŭrigita far la genoj.

Tiel la unua agado de la centra nerva sistemo estas mnemonika (de la memoro) agado kaj estas granda disekvilibro (ekde tre frue en nia vivo) inter memoro kaj perceptado je la malutilo de la dua (multe da memoro kaj malmulte da perceptado). Ni jam parolis pri tio, kiam ni pri-traktis la epigenezon.

Nu, se ni priatentas la studojn de Konrad Lorenz pri **patterning** (frua modlado de la konduto), ni rimarkos plian kialon por kompreni nian grandegan malfacilecon (eĉ kiam ni estas plenkreskuloj, kun centra nerva sistemo matura) vivi en iu konsciritipo (triangula), kie la perceptado superregas la memoron.

La mio originas el tiu memora agado kaj el tiuj variaj rilatoj de la individuo kun la medio. Kvankam la infano ne lernas diri "mi" signife ĝis multaj monatoj post la naskiĝo (24 ĝis 36 monatoj), la "ĝermo de la mio" (kiel vi diras) ĉeestas jam en la feto tiom genetike, kiom homostate.

Ĉiufoje pli memvideblas, ke la tuta potencialo de lernado motora, kona kaj emocia de la homo (kion ni nomas unueca procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika) estas enhavita en la genetika informo de la embria morulo (la unuaj ĉeloj, kiuj estigas la feton post sia akcelata reproduktiĝo).

La unueca perceptado (mensa agado, kiun oni pli facile preparolas ol travivas) lokos la mion en ties ĝustan rolon en la vivo, igos ĝin nure funkcia (nur kelkajn minutojn ĉiutage) kaj malebligos, ke la mio kaj la memoro (kiuj samas), kun siaj agadoj de izoligo, fragmentado, celo (funkcia aŭ ne), kontraŭdiro, kontraŭstaro kaj intrapsika kaj interpersona konflikto superregu ĉe nia ekzistado.

Estas ja klasika la priskribo de lia propra mio farita de Montaigne antaŭ pli ol 400 jaroj : "Ĉiuj kontraŭdiroj

estas en mi : timida kaj insolenta, ĉasta kaj lasciva, babil-ema kaj silentema, kruda kaj delikata, inteligenta kaj stulta, prudenta kaj afabla, mensogema kaj honesta, senklara kaj klara, liberala kaj konservativa, avara kaj mal-avara."

Kontaktado, konsistenco kaj kontingenco. La nura ebleco de konsistenco kaj vera digno por la homo estas en tiu konscitipo, kiun ni nomas "triangula" aŭ unueca perceptado. Ni jam diris, ke ĝi ankaŭ estas la nura ebleco eliri el nia izoligo kaj komenci kontakti vere kun la medio kaj kun la ceteraj estuloj.

Plie, ĝi estas la nura ebla vojo al la kerno (aŭ "cirkla" konscio), kiu estas konscio sen mnemonika enhavo, kie ekzistas reflektajo aŭ rekonstitudo ne distordita de la movo de la realo.

Ĉi tiu lasta tipo de konscio (aŭ perceptado) ne estas rezultato de la unueca perceptado sed nur ebla kontingenco. La rilato interpersona (inkludante la t.n. "psikoterapian" rilaton) devas reliefigi la sensan retrejnadon de la individuo cele al la unueca perceptado, kiu estas nenio alia ol totala vekigo de la sentemo homa.

43. Unueca perceptado kaj molekula modifo de la neŭrono.

Demando : Mi ne komprenas kiel tiu mensa agado, kiun vi nomas unueca perceptado, aŭ la stato de kerna aŭ cirkla konscio, povas determini modifon je nivelo de la neŭrono, kiu mem rilatus al la procezoj de regenerado de la tuta organismo. Ĉu vi povus paroli plu pri tio ?

Respondo : Sinjoro, estas tre klara, kio okazas al la infano aŭ knabo havanta nekorektitan strabecon. Se ne ekzistas adekvata vidpercepto, okazas manko de stimulado je molekula nivelo en la neŭrono, kiu okazigas la degeneron de tiu lasta, kio okazigas akiritan blindecon (ambliogecon aŭ anopsion).

Same, nova kvalito de perceptado, kiel okazas ĉe la unueca perceptado aŭ stato de "triangula konscio", estigas stimulon ĝeneraligitan aŭ holografian en la neŭronoj, ĉiam je molekula nivelo kompreneble, kaj komenciĝas tie stato regeneriga laŭlonge de la tuta nerva centra sistemo. Tial ke la nerva sistemo (centra, periferia kaj aŭtonomia) kontaktas ĉiun ĉelon de la restanta organismo, kio regeneriĝas tio estas ĝuste la tuta organismo. Malgraŭ ke la neŭronoj ne reproduktiĝas, la cerbo-amplekso kreskas ĝis la plen-

disvolvita adoleskanteco. Tio ĉi okazas pro almenaŭ du kialoj: 1) la formiĝo de kapsuloj de mjelino kaj 2) la disvolvo de novaj dentritaj kontaktoj.

La aksona kondukado de la nerva impulso estas sufiĉe funkcie limigita. Ne estas malsame ĉe la malsamaj animalaj specoj nek ĉe la diversaj nervaj funkcioj (eĉ ne ĉe la malsamaj sensacoj).

Kio igas malsama la nervan impulson ĉe la diversaj specoj kaj ĉe la malsamaj sensacoj, tio estas precize la disvolvo de dentritaj konektoj.

La histologiaj teknikoj ekzistantaj ebligas tinkturi (por ebligi la mikroskopan observadon) la ĉelajn korpojn de la neŭronoj, la aksonojn, la mjelinon kaj la glion(32) ; tamen estis tre malfacile distingi perturbojn ĉe la dentritoj, eĉ per la elektrona mikroskopo.

En 1974, Huttenlocher pruvis, ke malpliigo de la nombro de dentritoj rilatas al la mensa malfruiĝo severa, eĉ se ne estas aliaj anatomiaj ŝanĝoj.

Westrum estigis cerbajn epilepsiajn fokusojn per alumina ĝelo kaj tiel elmontris diversajn ŝanĝojn ĉe la dentrita strukturo (ekzemple perdo de dornoj).

Kiel ni jam kelkfoje diris, niaj konceptoj rilatas al la lastaj esploroj en Neŭrologio kaj Kvantumfiziko. Tiuj ĉi esploroj alportas konitaĵojn, kiuj klarigas tre subtilajn aspektojn pri la funkciado de la homa nerva sistemo.

En niaj konferencoj ni klopodis (pli ol klarigi) veki la atenton pri la laboroj de Karl Pribram en Neŭrologio, kaj de David Bohm en Fiziko. Tiuj ĉi laboroj kaj aliaj - kiuj, kvankam sendependaj, estas rilatigeblaj - povas helpi nin respondi vian demandon.

La holografia modelo en Neŭrologio estas neŭrofiziologia modelo, kiu asertas, ke la cerba funkcio estas potenciele disigita tra la tutaj cerbaj ĉeloj, malgraŭ ke difinitaj regionoj de la cerba anatomio emfazas certajn funkciajn aspektojn, kiuj restas nur latentaj en aliaj regionoj. Tio ĉi enhavas la eblecon veki tiujn latentajn funkciojn en cerbaj regionoj, kiuj eskapis el difekto aŭ malsano troviĝantaj en aliaj regionoj.

Evan Harris Walker (Universitato de J. Hopkins, Usono) - specialisto, kun kiu mi havis la plezuron kunpartopreni la centran podion en la Internacia Simpozio pri Scienco kaj Konscio, okazinta en 1979 en la Teknika Universitato de la Ŝtato (Santiago, Ĉilio) - asertas, ke se elektrono povas "forĝi tunelojn" tra baro, same povus okazi en la presinapsa

membrano de la sinapsa plato en la centra nerva sistemo, kio komencus grandan fluon de elektronoj de kiam la delikata elektra potencialo estis perturbita tiunivele, kie la elektraj impulsoj propagiĝas ene de spaco de 200 anstromoj. Estus mirige, se tie ne okazus la t.n. "kvantum-mekanika tuneligo", tiom de mallonga, kiom de longa atingebleco. Longa atingebleco en la cerbo signifus "kelkajn centimetrojn". Mi tenis multajn interesajn konversaciojn kun Doktoro Walker pri lia teorio, kiun sincere mi trovas malfacile valora totale. Mi interesiĝis pri ĝi, kiam li diris al mi, ke li matematike formulis la ekzistadon de tri statoj de konscio ; sed mi emas kredi, ke tiuj tri "statoj" pli precize estas "gradoj" de abstraktado aŭ organiza hierarkio ene de tio, kion ni nomas "linia konscio" aŭ procezo META.

La merito de Walker konsistas en tio, ke li aplikas la principojn de la Matematiko kaj de la Kvantuma Fiziko al la fenomeno de la konscio. Li konkludas, ke la cerbo estas instrumento, kiu uzas fizikan procezon en la procezado de konitaĵoj, kaj ke tiu procezo povas esti priskribita adekvate nur per terminoj de Kvantumfiziko. Plie, li parolas pri "kaŝita variablo", kiu estas pli alta ordo de cerba agado (komparebla al la konscio), kiu regas la cerbajn okazaĵojn.

David Cohen, en sia artikolo "Magnetaj kampoj de la homa korpo" (Physics Today, aŭgusto 1975) asertas, ke la homa korpo estas elektromagneta kampo fluktuanta kaj flugema (aŭ serio de kampoj enfermitaj en aliaj kampoj. Tial estas facile rimarki kiel do la subtilaj fizikaj proprecoj de la konscio povas perturbi la interagon menso-korpan kaj determini profundajn efikojn sur la organismaj procezoj ĝenerale.

Ni jam menciis, ke laŭ Karl Pribram la cerbajn hologramojn oni povas "konstrui" laŭ infinitezimaj tavoloj kaj tiel, sinsekvaj holografiaj bildoj kunmetitaj sur unu simplan kaj dikan fotografan plakon amasigos milionojn kaj milionojn da "informopecoj" ene de loko ne pli granda ol unu kuba centimetro. Pribram priskribas la "trans-formojn de Fourier" por ekspliki la fenomenon de mnemonika ĉifrado kaj deĉifrado.

Laŭ Paul Pietsch la aranĝo de la cerba histo havos nur relativan valoron ĉe la cerba funkcio, kaj konsekvence ĉe la konscio. Tio ĉi plifortigos la holografian modelon. En sia artikolo "Cerbo kartmiksita" (Harper's Magazine, majo 1972), Pietsch priskribas siajn spertojn kun salamandroj, kies konstanta apetito por vermoj estas regata de la antaŭ-

bulba cerbo. Pietsch eliris tiun cerbopecon, distranĉis ĝin en tre etajn pecojn, kiujn poste li intermiksas laŭhazarde, same kiel faras kuiristo, kaj denove metis tiun histon tiel "karmiksitan" en la cerbon de la salamandro. Post malmultaj semajnoj, la salamandro daŭrigis manĝi vermojn. La funkcio persistis, malgraŭ la tuta dislokigo de la hista substance.

Potencialoj de malrapidaj ondoj. La holografia modelo de la centra nerva sistemo konsideras du bazajn agojn de la neŭrono : 1) unu impulso intraĉela nekontinua, kiu malŝargiĝas binare : JES - NE ; JES - NE ; kaj tiel plu ; kaj 2) unu impulso interĉela kontinua (la potencialoj de malrapidaj ondoj), kiu alterne pliigas kaj malpliigas sian intensecon : JES - jes JES - jes JES - jes, kaj tiel plu. Tiuj ĉi lastaj, kiuj estas faktoro teorie tre grava por Karl Pribram, povas esti influataj de infinitezimaj kvantoj da energio, kio provizas (liveras) eksplikon por la subtilaj ŝanĝoj de la konscio je spertnivelo.

W.R. Adey verkis artikolon en **Annals of New York Academy of Science** (28. Feb. 1975) titolitan "Efikoj de la elektromagneta radiado sur la nervan sistemon". La libro de G. Luce **Biologiaj ritmoj en fiziologio homa kaj besta** (Novjorko, Dover, 1971) kaj la studoj de R.O. Becker (1975) pri parta regenerado de membroj ĉe mamuloj pere de elektraj stimuloj, kurioze rilatas en sia esenco al la novaj teorioj, kiuj eksplikas la konscion laŭ la vidpunkto neŭrofiziologia aŭ holografia.

La elektraj impulsoj kontinua kaj nekontinua ĉe la centra nerva sistemo rilatas al la "principo pri komplementeco" de Niels Bohr, kiu supozas la ekzistadon de nekontinua okazoj (statoj de partikloj) kaj kontinua okazoj (ondofunkcioj) por ekspliki fenomenojn en Kvantumfiziko.

En nia lingvo, ni havas nekontinuaajn aŭ dualajn okazojn (linian konscion aŭ procezon META) kaj kontinuaajn aŭ ĝeneralajn okazojn (triangulan konscion aŭ unuecan perceptadon).

Kiam ni memoras, ke la spaco inter du neŭronoj (sinapsa plato) ne estas pli granda ol 200 anstromoj, kaj ke unu anstromo egalas al  $10^{-8}$  de unu centimetro (1/100 000 000), ni vidas, kial esploristoj kiel Harris Walker asertas, ke ne eblas ekspliki la fizikan fenomenon de la cerbo ekster la kvantumfizika kampo, kiu funkcias precipe surbaze de konitaĵoj statistiko-matematikaj.

**Scientific American** aperigis specialan numeron pri la homa cerbo (sept. 1979).

#### 44. Psikozo de la normala persono.

Demando : Mi trovas malfacilaĵon kun via koncepto pri "psikozo de la normala persono".

Respondo : Ĉu ĝi estas koncepto aŭ realaĵo ? Post tio, kion ni diris pri la difino de psikozo, vi eble komprenas, kial ni diras "statoj prototaksiaj" kaj ne "psikozo", klopodante komenci per neŭrofiziologia koncepto pri la menso. Ni ankaŭ ne parolas pri normala persono. Ni diras, ke la diskonekso disde la realo estas kurioza fenomeno, en kiun senescepte ĉiuj el ni falas, kaj estas terure, ne ke la ordinara homo rifuzas vidi tion ĉi, sed ke tion faras la profesiuloj, kiuj studas la menson.

Tiu ĉi rezisto vidi kiel funkcias fakte la homa menso havas - niaopinie - sian radikon plej potenca kaj profunda ĉe la "mio" mem, tiu produkto de la procezo META. La "mio" bezonas la reciprokan izoligon, en kiu ni ĉiuj vivas, por doni al si mem kontinuecon, por doni kontinuecon al sia konstanta distordagado. Tio, kion ni nomas "rezisto", originas el la deziro ("neceso") doni kontinuecon al iu bildo (aŭ aro da bildoj), kies ekzistado estas esence iluzia, nura produkto de la memoro.

La supera funkcio de la cerbo estas reflekti (aŭ percepti) la realon tia, kia ĝi estas. Tio ĉi estas unueca perceptado, kaj eventuale, cirkla konscio.

Tiu ĉi supera cerba funkcio estas distordata de la procezo META kaj ĝia produkto, la mio.

Ni bezonas 180-gradan rotacion en la direkto, kiun ni nun sekvas. De menso, socio kaj Psikologio, kiuj emfazas la mion, la memasertemon, la konkuremon, la agresemon kaj la sekvadon de gvidantoj, oni bezonas transpasi al menso, socio kaj Psikologio, kiuj vidu la mion tia, kia ĝi estas, tute sendistorde ; kiuj faciligu la kunlaboron kaj la partopreneman gvidadon.

Kompetenteco estas, fari bone la aĵojn (triangula konscio en unueca perceptado) ; konkuremo estas la deziro fari la aĵojn pli bone ol aliaj, kaj la timo malsukcesi (linia konscio de la procezo META).

#### 45. La nova psikologia paradigmo kaj la klasifiko de la mensa malsano.

Demando : Ĉu estas en la nova psikologia paradigmo iu nova aŭ malsama klasifiko de la mensa malsano ?

Respondo : Mi ĝojas, ke tiun ĉi demandon faris psikiatro.



La Amerika Asocio Psikiatria validigis la **Manlibron de statistiko kaj diagnozo** n-ran 3 (DSM-3). Tiu ĉi nova pri-diagnoza manlibro eble utilas pli por kontentigi la "pagantajn triulojn" (asekuraj kompanioj, mutualaj societoj, ktp) ene de determinita sistemo de servoprovizo. La DSM-3 klasifikas la mensan staton laŭ kvin aksoj, sed tio estas ankoraŭ supraĵa laŭ la fiziopatologia vidpunkto, kio ja el-montras nian persistan bazan nescion pri la baza funkciado kaj pri la rilatoj inter la cerbo kaj la mensaj agoj (sendepende de kiel ni difinas "menson").

La diagnozaj aksoj de la DSM-3 estas : 1) psikiatria malsano, 2) perturboj de la personeco (ĉe la plenkreskulo) aŭ epigeneza stadio de la evoluo (ĉe la infano), 3) fizika malsano. Ekzistas du pliaj aksoj opciaj (por ke oni uzu ilin en esplorado/instruado) : 4) faktoroj psikosociaj kaj socioekonomiaj, kaj 5) la plej alta nivelo je adaptiĝo kaj efikeco de la konduto (akademia, interpersona kaj/aŭ labora) dum la lasta jaro antaŭ la diagnozo.

Ekzemplo : Johano Pérez, 27-jara, akso 1) kronika skizofrenio paranoja ; akso 2) personeco neadekvata skizoida ; akso 3) neebleco teni sin sidanta(33) kaj generila impotenteco iatrogenaj, kaj reŭmatisma artrito ; akso 4) kaj 5) li loĝas sola en malmultekosta ĉambro, senofica, helpata de la Ŝtato (ĉekoj de Sociala Asekuro) ; neniu akademia agado dum la lastaj dek-du monatoj ; ĉestrata intermita vendado de ceramikaĵoj, kiu ne sufiĉas por plenumi liajn vivtenajn bezonojn ; mankas familia kaj amikeca apogo. Tiu ĉi estas ekzemplo pri la nova diagnozotipo laŭ kvin aksoj.

La diagnoza procezo, kiel funkcia agado de la procezo META, estas historie kondiĉita de la dualeco aŭ baza dikotomio de tiu ĉi lasta procezo.

La granda observanto Kraepelin estis farinta la prognozan dikotomion inter la mania-deprimiĝa malsano kaj la skizofrenio (dirante - kvankam li poste ŝanĝis sian opinion) - ke la unua estis "pli bona" ol la dua en prognoza senco).

Nuntempe persistas multaj diagnozaj dikotomioj : la sindromon organisma-cerban oni prognoze dividas en akutan kaj kronikan, konsiderante ne ĝian daŭradon, sed la fakton, ke ĝi estas returnebla aŭ nereturnebla respektive. Laŭ la klinika vidpunkto ni diras, ke la sindromo organisma-cerba povas esti psikoza aŭ ne psikoza. Tio kurioza estas, ke la saman difinon de psikoza oni povas fari laŭ du malsamaj kriterioj :

1) psikozo kiel diskonekso rilate la realon kaj la personojn (tion ĉi oni vidas en la nova psikologia paradigmo kiel parton de la menso de ĉiu individuo), kaj

2) psikozo kiel nekapableco ; la malebleco plenumi la ĉiutagajn taskojn laborajn, akademiasajn kaj interpersonajn.

En la Universitato de Harvard D-ro Blumer klasifikas topografie la sindromon organismo-cerban laŭ : 1) difuza kaj 2) fokusa.

D-ro Woods (ankaŭ en Harvard) intencas fari etiologian klasifikon, sed en la praktiko la sindromon organismo-cerban oni traktas plejofte kiel sindromon, kies kauzojn oni ne konas.

Kahlbaum, kiu priskribis la katatonion, aludis en 1882 la "ciklotimion", kiu estas ĝuste la malsano mania-deprimiĝa. Kahlbaum vidis unu solan malsanon, kiu povis prezentiĝi laŭ du malsamaj manieroj, kiel ekscitiĝo aŭ kiel deprimio, aŭ povis trapasi du sinsekvajn periodojn (ekscitiĝon kaj deprimon).

Pli poste la deprimio ricevis la etiketojn (ĉiam ene de la dikotomio) "ekzogena" aŭ "endogena". Donald Klein pruvis, ke ekzogenaj faktoroj povis elkateniĝi "endogenan" deprimon (kun senapetiteco, mallakso, dormoperturboj kaj anhedonio [manko de seksa deziro] kaj solvis la dikotomion, nomante "endogenmorfa" la deprimon kun la menciitaj simptomoj, kiu estas deprimio farmakologie kuracebla per antideprimiloj.

Plue pri la afekciaj problemoj ni diru, ke Leonhard en 1959 dividas ilin en dupolusajn kaj unupolusajn. Tiu ĉi klasifiko supervivis pli ol 20 jarojn, ĉar ĝi havas certan fundamenton en genetiko, terapeŭtiko kaj en la aferaĝo. Estus eble certa seksa komponanto.

Genetike, Winokur diris, ke ekzistus certa rilato inter la kromosomo X kaj la dupolusa malsano (kio estas akceptita far ĉiuj esploristoj).

Farmakoterapie, la dupolusa malsano reagas pli bone al la litio kaj al la elektroŝoko (elektrokonvulsa terapio).

La dupolusa malsano komenciĝas je pli frua aĝo ol tiu unupolusa.

Plu parolante pri la dikotomioj, Winokur klasifikis la unupolusan unuarangan deprimon laŭ 1) pura kaj 2) spektra.

Pura : kiam atakas virojn pli ol 40-jarajn kun deprimiĝaj parencoj sen genetika rilato al la alkoholismo kaj la delikt-eco (la sociopatio).

Spektra : kiam atakas virinojn malpli ol 40-jarajn, kies

viraj parencoj suferis de alkoholismo aŭ sociopatio.

Post tiu ĉi peza priskribo de niaj diagnozmanieroj, permesu al mi resumi, dirante, ke kiam ni uzos la unuecan perceptadon en Psikologio, ni havos tre malsaman ideon pri la menso kaj, konsekvence, aperos eble klasifiko (se estus necese) tre malsama kaj pli reala de la mensa malsano.

#### 46. La signifo de la ekzistado.

Demando : Kiu estas laŭ vi la signifo de la ekzistado ?

Respondo : Nu... (paŭzo kaj ridoj ĉe la publiko). Mi esperas ke tiu, kiu demandas, ne estas deprimita... (ridoj ĉe la publiko). Vi eble ridos, sed mi ne ĉesas paroli serioze.

Mi kredas, ke ekzistas tri demandotipoj :

- 1) la simplaj demandoj, kiuj serĉas kaj meritas facilan respondon ;
- 2) la bonaj demandoj, kiuj meritas respondojn iel malprecizajn, en la senco, ke estas respondoj, kiuj ebligas vastan interpretadon aŭ diversajn interpretadojn, kaj
- 3) la demandoj tre bonaj, kiel tiu, kiun vi ĵus faris. Tiuj ĉi estas la demandoj, kiujn oni ne devas respondi. Necesas resti kun tiuj demandoj, mi dirus porĉiame, por formuli ilin fojfoje dum la tuta ekzistado.

Kiam vi faras tion kun tre bona demando, aperos malsamaj kaj tre diversaj respondoj tra la tempo. Vi rifuzas neniun respondon, sed ankaŭ ne akceptas ilin, tiel ke nenia respondo fariĝu la respondo fina.

Periode vi povos kontempli inteligente :

- 1) la realon de la demando, kiun vi subtenas ;
- 2) la realon de la pluraj respondoj dum longa tempo, kaj
- 3) la realon de la demando kaj de la pluraj respondoj (kiel totalon).

Vi povas transformi la demandon kaj diri : "Kia estas la kvalito de mia ekzistado ? Ĉu mi faras tion, kion mi volas fari ? Kion mi faras ? Kie ? Kiel ? Kun kiu ? Kial ?

Tamen plej grave por la kvalito de mia vivo estas demandi min en kia mensa kadro (aŭ konscistato) mi laboras kaj rilatas. Tio ĉi signifas, ke eventuale la demando mem ne estas tio, kio gravas. Temas ne nur pri la fakto, ke ene de la demando estas la respondo, sed ankaŭ, ke la demando celas, ke ni perceptu rekte kaj unuece iun implicitan mensan ordon, en kiu la penso (aŭ procezo META) en sia tuto estas la ordo eksplikita, disvolvita kaj

eĉ, foje, mezurebla.

#### 47. Danĝero de apatio aŭ demostanazio.

Demando : Ĉu tio, kion vi proponas, ne kreos pli grandan apation, pli grandan partoprenon de la individuo en la sociaj procezoj, kio favoros ĉiajn diktatorecojn ?

Respondo : Kaj kion vi kredas, ke ni havas en la nuno ? La termino "demostanazio", kiun oni pli kaj pli uzas, aludas la "apation de la amasoj", sed signifas "morton de la popolo". La demostanazio ne eblas sen la homo "kvadrata" aŭ la homo, kiu "funkcias" nur per linia konscio. La homo, kiu moviĝas inter la kvar hejmanguloj kaj la televidilo, la avida konsumado, la grimpema ofico kaj la multaj pasivaj amuzoj (en la plej bonaj okazoj). La partoprenado de tia persono estas sole imaga pere de la simboloj de la procezo META (aŭ penso). Tia persono ne estas en kontakto kun la kosmo, nek kun la socio, nek kun si mem.

Ni jam diris, ke tia konscio (la nura, kiun emfazas nia edukprocezo) konservas nin diskonektitaj disde la realo. Iu persono diskonektita disde la realo estas preskaŭ mortinto, kun la diferenco, ke li estas multe pli danĝera, ĉar li moviĝas kaj havas ideologiojn, dezirojn, frustraciojn, timojn, ĵaluzojn, malĝojojn, envion, konfuzon, zorgojn, metodojn, celojn, kaj ĉion alian pri kio ni tiom insistas. Persono diskonektita disde la realo ne havas eĉ respekton al la vivo (ĉu propra ĉu aliula) kaj estas facile dispoziciita mortigi. Se ni observas tiun ĉi problemon tiel profunde kiel ĝi meritas, ni vidas, ke la lastajn 200 jarojn realiĝis tra la tuta planed-supraĵo la rezultato de jarmiloj da superregado de la procezo META sur la homvivo : la ekologia limigo, la psikologia alieneco (kies ekstremo estas la manko de respekto al la vivo) kaj la tutmonda atoma danĝero, estas nenio alia ol la rezultato de jarmiloj de la dualeco META, kun ĝia blinda avideco, ĝiaj timoj kaj ĝiaj neeviteblaj kontraŭstaroj kaj konfliktoj. Ĉio ĉi estas nenio alia ol la rezultato de partopreno nur mnemonika de la individuo en la socio. Vi kredas je partopreno kaj vi kredas, ke vi partoprenas, sed fakte tia afero ne okazas antaŭ ol vi vivas en unueca perceptado.

#### 48. Kariopsikologio kaj esplorado.

Demando : Ĉu ekzistas esplorcentroj pri Kariopsikologio ?

Respondo : Ni enkondukis la plej gravan koncepton de la Psikologio (la koncepton pri **karyon**) kaj ĝian "sojlon", la

unuecan perceptadon, dum la dua duono de la 20a jarcento. Estas tasko por ĉiu el ni kompreni la gravecon, en nia propra ĉiutaga vivo, de la unueca perceptado kaj de la **karyon**. Ankaŭ estas tasko por la estontaj Psikobiologio kaj Neurofizologio, kompreni la gravecon de la unueca perceptado sen klopodi intermiksi ĝin kun la pasintecaj konceptoj, plirapidigi la esploradojn tiucele kaj taksu ĝian utilecon por la homo. Eblas, ke la **karyon** estas tio plej grava en la vivo de la homo.

Bedaŭrinde, ekzistas problemoj kaj multaj variabloj ĉe la esplorado : Kiu esploras ? Kian planon oni uzas ? Kiajn instrumentojn oni uzas kaj sub kiaj cirkonstancoj ? Kial ? Kion oni faras pri la atingitaj konitaĵoj ? Boulding raportis pri la "entropia enfalilo" de la specialigita kono en nia erao. Estos tiom multaj la konitaĵoj kaj la sciiĝoj atingitaj en ĉiuj el la sennombraj sciencaj kaj esploraj fakoj, ke ne plu eblos transdoni ilin al la sekvanta generacio. Estas memvideble, ke oni bezonas ekirpunkton (eĉ misan) por orienti kaj kunordigi nian esploradojn pri homa Psikologio. Ni bezonas tiun klaran orientadon kaj kunordigadon je internacia nivelo por malgrandigi la kreskantan akumuladon de sciiĝoj kaj eĉ ankaŭ la konfuzon pri metodoj, kodoj kaj simboloj.

Ni ripetas, ke per la enkonduko de nova paradigmo bone fundamentita sur la sciencaj progresoj de nia erao, ni kontribuas havigi novan signifon, novan orientadon kaj eĉ novajn manierojn esplori la homan Psikologion.

#### 49. Akcepto de la nova paradigmo en Psikologio.

Demando : Kiel oni akceptis la novan paradigmon en Psikologio en viaj universitataj prelegoj ?

Respondo : Kun malfermitaj brakoj en ĉiu universitata centro, kie oni invitis min prezenti la temon. Ne povis esti alimaniere, pro tio, ke ni prezentas novan sciencajn paradigmon en Psikologio, kiu helpas solvi la homajn problemojn per totaliga vido kaj faciligas la bezonatan kaj tujan integriĝon de la scienco kun la aliaj homaj agadoj.

Mia problemoj ne estis manko de akcepto, sed la grandega entuziasmo, kun kiu oni ricevis min. Diversaj universitatoj de Azio kaj Eŭropo invitis min, sed mi ne povis akcepti pro tiu simpla fakto, ke mi min vivtenas per mia laboro. Mi prokrastis nedefinite invitojn el Japanio kaj Germanio, ĉar mi ne parolas tieajn lingvojn, preferinte akcepti intertempe prokrastitajn invitojn de Latinameriko,

de Hispanio kaj Usono, nur ĉar tie estas pli facile al mi komuniki rekte kun la publiko, sen tradukistoj.

La scienco estas alia agado bezonanta internacian lingvon kiel Esperanton. Mi prelegis en Esperanto por malgrandaj aŭdantaroj, sed la internacia lingvo meritas eĉ pli bonan disvastigon.

La ĵurnalistoj, dum ili laŭdirinde penis por rapide diskonigi la novaĵon de mia mesaĝo, faris kelkajn erarojn anekdote tragikomedieskajn, sed tio ĉi povas alporti konfuzon nur al kiuj sufiĉas la ĉiutaga aŭ ĉiusemajna literaturo, kies pritrakto de la temo neniam povas havi la vastecon nek profundecon sufiĉajn, eĉ se la ĵurnalistoj estas tiel preparita kaj vigla kiel por deziri plene kompreni nian paradigmon.

La televido, pro sia propra naturo, povas utili nur por atentigi pri la nova paradigmo aŭ por komplementi la studadon de la literaturo kaj por la taskoj diskuti kaj esplori ĉe malgrandaj grupoj.

Kiam ni studas kial iu teorio estas aŭ ne akceptita de la sciencista komunumo, ni trovas serion de interesaj fenomenoj : unue konvenas distingi inter la institucioj, kiuj ŝirmas sin per la etiketoj sciencaj, kaj tio, kio estas la baza metodo de la scienco.

Tiun ĉi metodon oni difinis kiel "la intencon validigi aŭ senvalidigi intersubjektive sistemajn konjektojn rilate la empirian mondon (aŭ mondon de la realo)".

Se la scienca scion oni difinas pli laŭ ĝia formo ol laŭ ĝia enhavo, kaj se la "pseŭdoscienco" estas scienco metodologie distordita, ne devas mirigi nin, ke granda kvanto da "pseŭdoscienco" englitas kiel "legitimeca" en scienca komunumon.

Marcelo Truzzi, de la Universitato de Michigan, farante la sociologian analizon de la diversaj kredsistemoj, ordigas ilin taksonomie laŭ **continuum**, kiu iras de la normala scienco ĉe unu ekstremo al la mistika okultismo ĉe la alia ekstremo.

Unu sama teorio, disciplino aŭ scienca propono povas esti ricevata diference far diversaj sciencaj "subkulturoj". La akupunkturo (kiu ankoraŭ ne pruviĝis scienca) estis pli bone akceptata de la dentistoj kaj bestkuracistoj ol de la kirurgoj.

Propono kriptosciencia estas tiu, kiu supozas la ekziston de neordinara variabla (kiel la unukornulo). Propono paraosciencia starigas neordinarajn rilatojn inter ordinaraj vari-

abloj (kiel la kunrilaton inter la astroj kaj la vivo sur la tero). Kvankam ŝajnas strange, proponoj kriptoj kaj parasciencaj okazas dise ene de ĉiuj sciencoj kaj estas tio, kion Isaac Asimov nomas "endoherezoj". Ekzistas ankaŭ "ekzoherezoj", proponitaj far individuoj fremdaj al la scienco aŭ al iu aparta "sciencia subkulturo". Bona ekzemplo estas Alfred Wagner, kiu formulis la teorion de la kontinentaj translokiĝoj. La fakto, ke li estis meteologo, kiu eniris en la kampon de la Geografio kaj de la Geologio, kontribuis al tio, ke lian teorion oni rigardis kiel akcepteblan nur 40 jarojn post kiam ĝi estis proponata. Alia ekzemplo estas tiu de Immanuel Velikovsky, kiu estis punita kaj izolita pro sia prezento de historiaj kaj astronomiaj teorioj. Velikovsky, ĉar psikanalizisto, estis ankaŭ "ekzoherezulo", tamen malpli respektinda ol Wagner.

Alia el la dualecoj, kiuj bezonas konsideradon rilate la fenomenon de la akcepto aŭ rifuzo de sciencia teorio, estas tiu prezentita de Joseph Agassi en la ĉapitro sesa de lia libro **Scienco en fluo** (Dordrecht, 1975). Agassi asertas, ke estas okazoj, kiam konvenas ignori la evidentajn favore al hipotezo. Tiu ĉi ideo, kiu eble ŝajnas "barbaraĵo", havas seriozajn defendantojn. Etikedi disciplinon aŭ proponon nekonvenciajn kiel "pseŭdosciencajn", sen profunde kaj adekvate taksi la evidentajn, estas "pseŭdosciencia" ago en si mem.

Etikedi kiel "malsanulojn", "frenezulojn" aŭ "pseŭdosciencistojn" la renovigantojn ĉe la sciencia kampo, faras neniun bonon al la scienco, precipe se ni memoras la sciencohistorion, kiu montras la ni la multvaloran gravecon de la kontribuoj de multaj individuoj iam tiamaniere nomitaj. Tio nekonvencia ĝenerale ne estas akceptata bonvole far tiuj, kiuj profitas la apogon aŭ la konformecon al la starigitaj ŝablonoj.

Estas tre interesa la maniero kiel iu el la plej grandaj fizikistoj nuntempaj difinis la Fizikon. Werner Heisenberg faris tion jene : "La Fiziko estas la formala priskribo de la interkonekso de perceptoj".

Memvideble, kion faras la sciencisto, tio estas priskribi formale la logikajn interrilatojn, kiuj okazas ene de li (la observanto), sed li falas en la antaŭjuĝon, la esperon aŭ la preferon, kiam li adoptas rilatojn de kaŭzo-efiko, tiom en la tempo, kiom en la spaco, inter la fenomenoj, kiujn li observas (la observataĵo).

Nia sinteno antaŭ la personoj, la aferoj kaj la ideoj dependas de simplaj antaŭjuĝoj, esperoj kaj preferoj. Kiam ĉi tiuj malaperas, ne plu estas sinteno sed vera kontakto, kaj potencie, vera interrilato inter la observanto kaj tio, kion li observas.

Ekzemplo de nesciataj problemoj. Ĉiam pli memvideblas, ke estas multaj ekstersciencaj faktoroj, kiuj efikas sur la akceptadon (aŭ rifuzon) de nova scienca teorio. La Historio, la Filozofio kaj la Sociologio de la scienco studas ĝuste tiujn faktorojn.

Estas tre interesa la fenomeno okazinta en Eŭropo la jardekon de 1925 ĝis 1935 rilate la kvantum-mekanikon senkaŭzan, de Werner Heisenberg. Heisenberg estis fizikisto de Sommerfeld, Germanio, kiu estis ricevinta grandan influon de la junulara movado de la **Lebensphilosophie**. Tio ĉi estis parte la rezultato de la pesimismo de Oswald Spengler, kiu estis antaŭdirinta la dekadencan de la okcidenta civilizacio kune kun la disciplinoj kulture rilatintaj al ĝi, eĉ la Fiziko kaj la Matematiko, kiel ni konas ilin. Heisenberg prezentis tiam revolucian eksplikon pri la problemo de la kaŭzeco en sia verko **Reinterpretado en la kvantumteorio de la rilatoj kinematikaj kaj mekanikaj**. La ideoj de Heisenberg estis rapide akceptataj en Anglio sed ne en Germanio, kie ili devis alfronti pezan kaj preskaŭ traŭmatizan sciencan diskutadon.

Evidente la diferencoj ĉe la ricevado de la ideoj de Heisenberg dependis pli de sociokulturaj ol de strikte sciencaj faktoroj. La kaŭzeco-problemo ne estis impresinta la britan epistemologion, same kiel ĝi estis farinta kun la germana Filozofio ĉe la komenco de la jarcento. La lukto inter deterministoj kaj nedeterministoj en Germanio estis daŭrinta jam kelkajn jarojn, kiam Heisenberg konigis siajn ideojn.

Io simila okazis pri la akupunkturo. Post la komunisma revolucio en Ĉinio en 1947, la partio energie plivigligis la restarigon de la tradicia ĉina medicino, kombinante ĝin kun la uzo eklektika de la moderna okcidenta medicino. Tiu ĉi decido estis determinita malpli per sciencaj faktoroj ol per faktoroj sociokulturaj, ekonomiaj kaj historiaj.

Iu hazarda evento kaj iu simpla miskompreno estigis amasan ondon de intereso pri la akupunkturo en Usono kaj eĉ la asignadon de grandaj monsumoj por ĝia esplorado.



Kiam Richard Nixon vizitis Ĉinion en 1972, fama ĵurnalisto, kiu akompanis lin (James Reston) bezonis urĝan apendicektomion. Post la operacio Reston suferis malstreĉon, kiu pliboniĝis kiam oni aplikis al li akupunkturaron.

La novaĵo fulmorapide disvastiĝis, kompreneble ĉar oni supozis, ke la plibonigon kaŭzis la akupunkturo (la abdomena malstreĉo ĝenerale cedas per malmulte da terapeŭtika helpo). Krome, disvastiĝis en Usono laŭdiro, kiu asertis, ke Reston estis operaciita helpe de akupunktura anestezo, kio ne estis vera.

La sekvintan jaron, medicina delegacio de Usono vizitis Ĉinion oficiale (junio-julio 1973). Inter la multaj raportoj, kiujn faris tiu ĉi delegacio, estis unu, kiu agnoskis "rimarkindan pliboniĝon je la nerva surdeco ĉe 8 % el la pacientoj traktitaj per akupunkturo kaj ioman pliboniĝon ĉe 11 %". Oni poste konis la surprizigan detalon, ke la objektiva aŭdometrio ne estis uzita por la efikotaksado. Nuntempe oni faras esploron per aŭdometrio.

La kuracistoj delegitoj studis la anestezon per akupunkturaron kaj en sia raporto ili asertis: "Sendube la analgezio per akupunkturo estas efektiva kaj ebligas operaciojn ĉe iuj pacientoj alte selektitaj".

Estas klare, ke necesas konsideri la fame konatan stokecon de la ĉina popolo, krom faktoroj pli rekte mezureblaj, kiel la ega interago inter la akupunkturpraktikanto kaj la paciento, kiu plej ofte estas trejnita dum du aŭ pli da semajnoj antaŭ la operacio. La fido al miljara metodo aldoniĝas al la aplikado de 6-volta kurento ĉe la pingloj kaj mekanikaj vibriloj.

La fenomeno de la akupunkturakceptado en Usono (kaj landoj kulture satelitaj) klariĝas ankaŭ kaŭze de la politiko de la ĉina komunisma partio unue, kaj, ekde 1972, kaŭze de la pliboniĝo je la rilatoj diplomatiaj kaj kulturaj inter Ĉinio kaj Usono.

Antaŭ nelonge (1979) komenciĝis la esplorado de la akupunkturofikoj sur la cerbajn endorfinojn, substancojn similajn al la morfino, kiuj ŝajne malpliigas la dolorricevadon en la cerbo (kaj eĉ la psikologian suferon?)

La akupunkturo estas malpli efika ĉe bestoj, el kiuj oni eltiras la hipofizon, ĉar la endorfinoj amasiĝas precipe en tiu subcerba glando (B. Pomeranz, profesoro pri Neurobiologio ĉe la Universitato de Toronto). La naloksono(34), kuracilo antagonisma al la morfino, ankaŭ malpliigas la efikon de la akupunkturo en la anestezo.

Profesoro Ma Lin, de la Universitato de Hongkongo, malkovris, ke la akupunkturo pliigas la sekreciaron de ACTH-hormono, kiu favoras la reagon kontraŭ la streso.

La scienco proprasence komencis interveni antaŭnelonge en la fenomeno de la akceptado de la akupunkturo, sed ĝi sendube ludis rolon minimuman aŭ negravan en tiu akceptado ĝis nun.

La nova paradigmo en Psikologio, kiun mi prezentis kun granda akceptado far parto el la profesia publiko en multaj universitatoj de Usono, Eŭropo kaj Latinameriko, devas esti protektata kontraŭ la menciitaj danĝeroj.

Ĝuste kaŭze de sia granda vasteco, amplekso, profundeco, kaj de la multnombraj subtilaĵoj, kiujn ĝi enhavas, la nova paradigmo en Psikologio meritas zorgan kaj detalan esploradon por ke oni komprenu ĝian verecon, same kiel la eblajn malverojn, kiuj povus kaŝiĝi senaverte en tiu vero.

## APENDICO

### BAZAJ FAKTOROJ EN PSIKOTERAPIO<sup>1</sup>

Pli ol konsideri la esencajn faktorojn de la malsamaj psikoterapeŭtikaj skoloj, ni taksos la bazajn komunajn faktorojn, kiuj igas sukcesa kiun ajn psikoterapion. Unua-vice, estas necese, ke ambaŭ, la terapeŭtiko kaj ĝia kliento (aŭ paciento) kunpartoprenu miton, kaj ke tiu mito estu socie akceptebla. La fakto, ke ambaŭ tie kunpartoprenas lokon kaj momenton, devas esti konsiderata bona far la tuta kulturo. Alivorte, ambaŭ kunpartoprenas tiun kosmovidadon, kiu faras, ke la teorio, modelo aŭ kredo (kaj ne nur intuicio, impulso) donas sencon racie akcepteblan al tiu fakto nomata psikoterapio. Cetere estas necese, ke la paciento aŭ kliento kedu aŭ fidu la aganton de la psikoterapia ago. Tiu ĉi aganto estas la nomata psikoterapeŭto, malgraŭ ke ambaŭ partoprenas en la procezo. La fido de la paciento aŭ kliento havas sian ekvivalenton en la fidindeco aŭ respondeco de la psikoterapeŭto.

La kunpartoprenita sociokultura mito kaj la fido de la t.n. paciento devos esti pli fortaj ol la parapsikoterapeŭtikaj problemoj. Bedaŭrinde, nuntempe tiuj ĉi parapsikoterapeŭtikaj problemoj akaparas la atenton de la psikoterapeŭto kaj de ties paciento, tiel ke ili endanĝerigas la rezultaton kaj la signifon mem de la psikoterapio. La imperativoj de la fiksa burokrataro kaj la ekzisto de sistemoj de medicina asekuro, kiuj postulas rezultatojn aŭ rapidajn kaj objektivite videblajn "sukcesojn", estas neatendita faktoro de distordo krome de la klasikaj problemoj kaj distordoj propraj al ĉiu ago de la homa rilato, ĉi-kaze de la ago de la psikoterapio. Cetere ekzistas distro - kaj distro signifas tiron en kontraŭajn direktojn - de leĝa, ideologia tipo inter tio, kio estas provizado de kvalitaj servoj flanke de la profesio kaj la bezonoj de la paciento unuflanke, kaj tio, kio konsistigas la rajtojn de tiu paciento, aliflanke. Ni insistas pri tio, ke la parapsikoterapeŭtikaj faktoroj

(ekonomiaj, leĝaj, politikaj kaj ideologiaj imperativoj) devas esti malpli gravaj, almenaŭ en la menso de la paciento kaj de la psikoterapeŭto, ol la pacienta fido kaj la reciprokaj akordo kaj kompreno pri kio signifas la psikoterapio. Ekde tie, la psikoterapeŭto nepre komencas transdoni al la t.n. paciento novan informotipon. Tiun ĉi transdonon oni faros per la regulo, la ekzemplo, la psikoterapeŭtikaj teknikoj, kiuj postulas tre specialan trejniĝon, kiel ankaŭ per aliaj parolaj kaj neparolaj formoj, kiuj transdonas ankaŭ specialan tipon de **sophia** (saĝo), kiuj en la nova psikologia paradigmo, kiun ni estas prezentantaj, estas tio, kion ni nomas unueca kaj unuiga perceptado - la ago de la psikoterapeŭtika kunligo, alivorte.

La fundamenta objekto de la transdono de tiu ĉi informotipo estas la transformado de la pacientaj esperataĵoj. Ĝenerale, la paciento venas ĉe la psikoterapeŭton kun la celo solvi ian konflikton, kun la intenco atingi mildigon. La psikoterapeŭtika kulturo, kiun la psikoterapeŭto ricevis, kondukas lin ekstrakti vertikalan konflikton inter tio, kio estas la koscia enhavo, kaj la enkoscia enhavo, kiel ankaŭ ekstrakti la kondutojn lernitajn de la paciento, kiuj estas neeviteble determinitaj por estigi suferon. La psikoterapeŭto bezonas komprenigi al la t.n. paciento, ke la mildigo ne estas ĉio, kion la paciento bezonas, kaj ke li bezonas ankaŭ eliri el la primitivaj reagoj kaj el la troa inklino pensi neracie.

Tio ĉi determinas ĉe la paciento procezon de matureco, kiu varias de la narcisismo de la buŝaj stadioj ĝis epigenezado (rapida aŭ malrapida), kiu transformas tiun ĉi infanoidan mensan staton en personecon kapablan rilati profunde kun la aliaj laŭ intima maniero, harmonie kun la distanco; kiu iras trans la izoligo kaj la memabsorbo (trograndigita absorbo en la propraj problemoj, projektoj, rememoroj, ktp).

Ekde tiu ĉi matureco kaj integriĝo de la mensaj fenomenoj en neeviteble nova ordo, la paciento decidus inter adaptiĝi al sia nova medio aŭ transformi tiun ĉi novan medion, tiel ke ĝi iĝu pli "loĝebla" por la homo ĝenerale. Estas tre memvideble, ke la psikoterapeŭto neniam povos decidi tion anstataŭ la paciento. Sed inter la celoj de la psikoterapio, kiuj ne estis ankoraŭ konsideritaj kaj pro tio neniam povos esti parto de la esperataĵoj de la paciento, estas tio, kion en la nova psikologia paradigmo ni nomas metanojo. Metanojo implicas novan kosmovidadon, ĉar ĝi signifas iri trans la penso. Iri trans la penso (aŭ procezo mnemonika-eidetika-

timika-aŭtonomika) estas la nura maniero fini la horizontalan konflikton, kiu estas la baza konflikto, de kiu dependas eĉ la vertikala konflikto kun siaj sennombraj varioj. La horizontala konflikto estas esence la distordo, kiun okazigas la observanto ĉe preskaŭ ĉio, kion li observas.

En la ĵargono de la nova psikologia paradigmo aŭ kerna Psikologio ni diras, ke la mnemonika procezo (procezo META) estas neakordigebla kun la unueca perceptado, kiun ni jam aludis, kaj kun la kontingenco de tiu ĉi unueca perceptado, kiu estas tio, kion ni nomas kerna stato. Tiu ĉi estas ĝuste la mensa stato, kiu iras trans la dualeco de la penso, kaj kiu implicas perceptadon de la realo tute sen ia distordo. Unu el la plej grandaj malfacilaĵoj, kiun la psikoterapeŭto trovos en la komunikado de tiu ĉi nova informo, estas la malfacilaĵo de la paciento konsenti, ke li distordas la realon kaj ĝis estigas eĉ akorde kun siaj propraj nevideblaj aŭ memvideblaj deziroj, baziĝante sur siaj propraj planoj, siaj propraj problemoj, siaj propraj ideoj aŭ ideologioj, siaj propraj afekciaj reagoj, sia inklinoj pensi neracie, kaj eĉ per la seksaj, visceraj aŭ muskolaj reagoj de sia propra organismo. La unueca perceptado kaj ĝia kontingenco, la kerna stato, estas perceptado, kiu nek korektas nek ĉesas korekti tion, kion ĝi aŭdas aŭ vidas, kaj pro tio, ke ĝi estas perceptado sen distordo, perceptado unueca kaj unuiga kun la medio, temas pri perceptado de la kunfandita fluo de la media stimulo kaj de la neŭrologia reago. Temas pri perceptado de la centripeta kaj centrifuga nerva agado kaj vidado de tio, ke tiu ĉi agado (kiu estas reago) estas kutime nenio pli ol produkto de la memoro, aŭ pli bone, produkto de unueca procezo, kiun ni nomas META. La unueca perceptado implicas do ankaŭ la perceptadon de la memoro funkcia, malgraŭ ke tiu ĉi funkciado ne interferas nun tiun perceptadon. Ni diras ankaŭ, ke ekde la mnemonika procezo - kiu estas nur tiu procezo de memabsorbiteco, en kiu la observanto estas enmetita, kaj kies produkto li estas - la observanto vidas, pensas kaj asimilas la realon pere de la komparivaj dualecoj de la analizo kaj sintezo. Tio ĉi, plenbonkaze, kiam oni venkas la naturan inklinon pensi neracie. Ekde la unueca perceptado, male, la observanto tuj perceptas nedivideblajn tutaĵojn ĉiumomente en la konstanta movo de la realo. La fundamenta emocio de la homo, kiu estas parto de la memoro mem, de la individuo kaj de la speco, estas la timo. Estas tiu ĉi timo, kiu determinas la esencan neeblecon profunde rilati al alia homo. Tiu ĉi reala rilato povas okazi nur en

stato de unueca perceptado, en determinita konscimaniero, kiun ni nomas triangula konscio, ĉar ĝi implicas la perceptadon de la medio, kiel ankaŭ la perceptadon de la reagoj de la procezo META kaj eventuale la kompletigaĵon de nova mensa stato, kie ne ekzistas la horizontala konflikto. La paciento, sed antaŭ ol la paciento, la psikoterapeŭto mem, devas kompreni, ke necesas forlasi ĉion, kion li scias aŭ kredas scii por povi profunde rilati al alia homo.

Ankaŭ ne temas apliki ian teknikon, sed simple permesi, ke la menso disvolviĝu en nova konscistato. Psikoterapeŭto kaj paciento devos kompreni la esencan timon al tio nekonata, la esencan timon al nova stato de konscio, kaj la timon devenintan de tio, ke oni forlasis la kampon de la konflikto kaj de la sufero, kio estas precize la kialo, pro kiu la paciento venis al la psikoterapeŭto. La kompreno de tiu ĉi esenca paradokso estas la komenco de la kariopsikoterapio aŭ kerna psikoterapio. La psikoterapeŭto kaj la t.n. paciento devos vidi en kunliga ago, ke la origino de ĉiu sufero, la naturo mem de la konflikto estas la procezo META kaj ĝia produkto la "mio", la koncepto pri identeco, tiu koncepto, kiun nia kulturo kaj nia edukado neeksplikeble emfazas. Parto de la nova psikoterapio estas vekti en la ago de unueca perceptado, kun ĝia speciala inteligenteco, la kapablon distingi inter tiuj momentoj, kiam la procezo META estas funkcia kaj necesa, kaj tiuj momentoj (la plej multaj), kiam la mnemonika procezo stimulas kaj nutras la danĝeran iluzion de la mio. Parto de tiu ĉi iluzio de la mio estas la nekapablo tute liberiĝi de la sufero naskiĝinta de la propra mio, de la propra memoro. Cetere, estas la nekapablo liberiĝi de la stranga deziro reveni al la propra horizontala konflikto, fojfoje, ĉiutage. Temas pri rimarkado de tio, ke la sufero venas manprenite de la emocio : de la transiroj inter la deziro kaj la malĝojo, la timo kaj la malamo, la avideco kaj la envio, ktp. La psikoterapeŭto kaj la paciento devos vidi kune kiel ambaŭ rezistas tion novan. La necesa transformo de la konscio estos rezistata konscie kaj aktive, per atako al la novaĵo aŭ ĝia integriĝo en malnovajn konceptojn ; aŭ konscie kaj pasive, per ignoro al tio nova, kvazaŭ ĝi ne ekzistus por povi daŭri alkroĉitaj al tio malnova. Tio ĉi estas trans tio, kion Freud priskribis per la nomo nekonsciaj defendoj, kiuj estas nur formoj de la mistera kaj profunda inklino de la homo pensi neracie. La psikoterapeŭto kaj la t.n. paciento devos vidi kune, ke ili estas tie por interrili kaj nepre por profunde interrili. Estas necese, ke ambaŭ vidu, ke la unuagrada transiroj, kiuj eliras el la memoro, la rememoroj, la

ideoj, la emocioj aŭ la generilaj aŭ muskolaj reagoj ne estas profunda rilato. En la unueca perceptado, en kiu ambaŭ partoprenas, elmontriĝas la plej alta formo de inteligenteco. Tiu ĉi inteligenteco estas tiu, kiu distingas (aŭ legas interlinie) inter la tekniko fari nenion kaj la foresto de tekniko, kiu estas inteligenta agado, kaj ankaŭ profunda rilato inter du homoj aŭ pli. Ne estas simpla hazardo, ke la vorto korupto estas etimologia sinonimo de la vorto dual-eco, ĉar korupto signifas rompon en du pecojn. Tiu ĉi korupto aŭ fragmentiĝo rezultos el la serĉado de persona celo (sen la unueca perceptado de la tuto), el aparteno al disigitaj grupoj (landoj, distriktoj, ktp) kaj el reciproka kontraŭstaro sen la unueca perceptado de la identeco de la individuo kun la homaro. La bazo de la socia korupto kaj la persona turmento, rezultantaj el la serĉado de celo, la aparteno kaj la kontraŭstaro, estas en la mio. La mio estas tiu produkto de la mnemonika procezo (META), kiun la memoro kreis por doni al si kontinuecon en la pasinteco kaj daŭrigon en la estonteco. La mio eĉ transformiĝas en la iluzion resti konstante egala, ignorante la sekvencajn ŝanĝojn en si mem, kaj la konstantan ŝanĝon de la tuta realo. La mio estas parte, maniero ŝpari penon, ĉar la unueca perceptado postulas por ekzisti, konstantan inter-ŝanĝon de energio, same kiel oni bezonas pli da energio por filmi filmon ol por simple fotografi.

Piaget priskribis la konivan plifirmiĝon de la konceptoj pri spacoj, tempo kaj kaŭzeco, inter la 4a kaj la 7a viv-jaroj, per tio, kion li nomas "intuicia fazo". Tiuj ĉi tri konceptoj estas formoj de la dualeco en ŝajne malsimilaj dimensioj :

1) ĉi tie, 2) tie ; ĉi tie kaj tie devenigas la koncepton pri spaco.

1) nun, 2) antaŭe aŭ poste. Nun kaj antaŭe aŭ poste devenigas la koncepton pri tempo.

1) kaŭzo, 2) efiko. Kaŭzo kaj efiko devenigas la koncepton pri kaŭzeco.

La novaj progresoj de la esplorado en Fiziko kaj Neŭrologio pravas la esencan sengravecon de la konceptoj pri spaco kaj tempo (escepte por ekspliki tre fragmentajn aspektojn de la realo). La trivialecon de la koncepto pri kaŭzeco oni pravas per la multaj ŝablonoj de kaŭza rilato, kiujn uzas la procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika :

1) La koncepto de kaŭza ĉeno, tio estas, ke el unu

kaŭzo sekvas unu efiko, ekzemple, ke la tuberkulozo devenas el la Koch-bacilo.

2) La koncepto pri polideterminismo aŭ kaŭza reto, kiu konsistas ekspliki iun okazaĵon per kunfluiĝo de kaŭzaj ĉenoj.

3) Kaŭza retrofleksio, kiu estas la interagado de la kaŭzo kaj la efiko ; ekzemple, la ekzerco kaj la sano, la skizofrenio kaj la malriĉeco, la psikozo kaj la senkomunikado. Alivorte, ĉu la psikozo estas rezultato de la senkomunikado, aŭ la senkomunikado tiu de la psikozo ? Ĉu la malriĉeco estas la kaŭzo de skizofrenio, aŭ la skizofreniulo malriĉiĝas pro sia vivostilo ?

4) Kaŭza interagado, koncepto, kiu baziĝas sur la ideo, ke du elementoj de unu rilato estas la rezultato de reciproka kaj konstanta transformado.

5) La ŝablono de kaŭza rilato nomita "sinkroneco" far Carl Jung. La vorto "sinkroneco" ne havas laŭ Jung la saman sencon kiel ĝi havas laŭ René Spitz, sed ĝi aludas la nekaŭzan rilaton inter du faktoj, kiuj okazas samtempe.

Tiuj ĉi ŝablonoj de rilato inter kaŭzoj kaj efikoj estas nur relative utilaj (pro ĉiuj limigoj, kiuj aperas en ilia konsiderado) por tio, kion ni nomas funkcia penso - penso, kiu estas utila, kaj kiun oni bezonas uzi dum ne pli ol 40 minutoj ĉiutage. Tiu ĉi funkcia penso, kiun ni nomas racieco en nia lingvo, estas la kapablo rezoni logike, la funkcio de saĝa memoro, kaj oni pretendas ĝin mezuri per la intelekta koeficiento, atingita per la taksado de serio da lertecoj, kiel la kapablo sin esprimi parole en kohera maniero, la spaca perceptado, la analogia rezonado, la manipulado de serioj kaj sekvencoj, la memoro, ktp, kiuj - kiel memvideblas - estas ĉiuj kvalitoj apartenantaj al la procezo META. Kiam ni parolas pri racieco, ni tre bone zorgas diferencigi ĝin disde la inteligenteco de la unueca perceptado. Tiu ĉi inteligenteco estas esence senkondiĉado de la memoro, liberigo de la individuo el la memabsorbo kaj el la izoliteco en la propra memoro. Kaj absolute ne ekzistas ebleco de totala kontakto kaj kompreno de la realo kaj la personoj, sen tiu ĉi senkondiĉado. En la procezo de provizado de nova informo al la paciento, tio ĉi devas esti ĉefe grava, kaj ĝi estas unu el la unuagradaĵoj aspektoj de la psikoterapio, kiun la paciento devos kompreni. La novajn leĝojn de la Fiziko oni formulas ekster



la modelo de la karteziaj koordinatoj, kiuj, kiel la pesilo kaj la lenso, nin helpas interpreti la mondon surbaze de la dualeco, la komparo kaj la estigo de interrespondoj inter objekto kaj bildo, objekto kaj mezuro, la baza interrespondo inter la observanto kaj la observataĵo. Ni diru, ke ekzistas interna konscio kaj observebla realo. Akorde kun la naturo de la konscio, kiu agas en la menso en iu momento (kaj en la nova psikologia paradigmo ni konsideras tri eblajn tipojn de mensagado kiam ajn), tia estos la aspekto de la realo, kiu sin manifestos al tiu konscio. La linia konscio, kiu estas sole nia memoro, estos kondamnita pro sia naturo esence duala, ellabori ilojn kaj priskribojn, kiuj ankaŭ estos dualnaturaj, kaj kiuj registros (iloj) aŭ interpretos (teorioj aŭ priskriboj) nur fragmentajn aspektojn de la faktoj, la personoj kaj la realoj.

La paciento, kaj antaŭ ol la paciento la psikoterapeŭto, devos kompreni, ke kiam la objekto determinas memoragon kiun ni nomas imago, ideo aŭ emocio, la ago mem vidi finiĝis, la rekta kontakto kun la realo finiĝis.

Eĉ plie, la procezo META (procezo de la memoro) kaj ĝia nepra produkto, la mio, estas unueca realo, kiu havas la specialan kapablon sin reflekti, kvazaŭ ĝi estus nova realo. Tiu ĉi estas la plej subtila formo de funkciado de la mnemonika procezo por doni al si kontinuecon, kiu sendube estas ne funkcia, ne necesa.

Sen la starigo en psikoterapio de kunlaborema rilato, en kiu la povo forestu, ne eblas interrilati en unueca perceptado - tiu tipo de perceptado, de kiu devenas la kunligo, la vundebleco kaj la konfido, kiu devas esti reciproka, kiel gravaj elementoj de vera kaj totala rilato. La povo kaj la timo, kiu ĉiam ĝin akompanas, estas la bazaj kialoj de la distordo en ĉia homa rilato. La vorto "aŭtoritateco" kurioze rilatas en sia populara signifo al la vortoj "kompetenteco" kaj "konkuremo". Kompetenti estas fari bone la aĵojn kaj estas parto de sana individua respondeco, sed tio ne signifas, ke la kompetentulo estu supera al alia (tio, kion oni konas kiel aŭtoritatecon), aŭ ke li devas vetbatali kontraŭ alia por superi lin (tio, kion oni konas kiel konkuremon).

En psikoterapio necesas favori la komunan saĝon kaj la eksteran kaj la internan ordojn, tre simplan kaj saĝan vivstilon. La freŭda psikanalizo individua aŭ grupa (kaj la devenintaj teknikoj, kiel la kompromis-analizo), la Gestalta

terapio de Perls, la aganta kondiĉado de Skinner kaj eĉ la medikamentado en ekstremaj okazoj, estas kelkaj el la manieroj enkonduki la saĝon kaj la simplecon en la vivon de persono. Tamen tio ne estas ĉio, sendube. Estas baze doni al la paciento la ŝancon vidi kaj aŭdi novmaniere, totale kaj rekte, plej nature. Tia nova maniero percepti estas la unueca perceptado, kiu neniam estis konsiderata en psikoterapio. Ni diras ankaŭ, ke la unueca perceptado estas la nura ebleco starigi realan kontakton kun la personoj, la ideoj, la loĝejo, la manĝaĵo, la vestaĵo, la naturo kaj la kosmo. Kvankam psikofarmakologia medikamentado povas alporti harmonion al persono kun perturboj de la penso-procezo, neniu drogo aŭ kuracilo povos okazigi la staton, kiun ni nomas unueca perceptado aŭ triangula konscio. Ne temas nur pri kompreno de la kaŭzoj de la homa konflikto kaj modifado de la konduto malsaĝa kaj detruiva, sed ankaŭ pri lernado vivi en konscistato (unueca perceptado), kiu estas la nura, kie la turmento kaj la persona konflikto ne ekzistas. La nova signifo de la psikoterapio estas do komuna lernado, kiu ne baziĝas sur la memoro, la kono, la metodo kaj la sperto, sed sur la ago percepti. La memoro kaj ĝia produkto, la mio, estas la fonto de ĉiu konflikto, kaj tiu procezo de memoro kaj de mio estas tiu, kiu etikedas, kondamnas, komparas kaj juĝas la konflikton, naskinte ĝin. Pere de tiuj ĉi mekanismoj, la memoron kaj la mion (kiuj estas unu sama afero) oni rigardas kiel disigitajn de la konflikto, anstataŭ alfronti ĝin en unueca perceptado, kiu estas la nura maniero transcendi ĝin. Ekzemple, tiel longe dum ni ne vidos klare la malamon, kiun ni sentas por la homoj - pri kiuj ni diras, ke ni ilin amas - sen etikedi tiun senton, sen kondamni ĝin, sen kompari ĝin, sen juĝi ĝin, ne eblos fini ĝin. Por ke finiĝu la malamo, estas necese ĝin vidi klare kaj nature, ĉiutage en unueca perceptado, en la momento, kiam la malamo aperas.

En la nova psikoterapio, kiun ni nomas kariopsikoterapio, oni klopodas vidi tion, kio vere elŝprucas : unuavice, ĝenerale, la rezistoj aktivaj, pasivaj kaj nekonsciaj de la procezo META, kiu simple estas nia memoro, kaj la reagoj kiujn la memoro okazigas. Estas necese, ke tiel la paciento, kiel la psikoterapeŭto, okazigu tiun novan triangulan konscion, kiun ni nomas unueca perceptado. Necesas vidi la foreston de reala kontakto unuavice dum la seanco. La fuĝo de la paciento al la sano aŭ saĝo, la neŭroza

aŭ kunlaboro, la kaŝa interkonsento konscia aŭ nekonscia, en kiun tiel ofte falas la paciento kaj la psikoterapeŭto por reciproke lasi sin trankvilaj aŭ ne ĉagreni unu la alian, estas ordinaraj manieroj uzataj en psikoterapia seanco por eviti la totalan rilaton, kiu estas la nura resaniga ago (pro tio, ke ĝi estas ago de saĝo kaj plena perceptado). Necesas, ke en iu rilato ĉiuj membroj de tiu rilato vidu la dualan kaj fragmentan staton de la menso (de ĉiu menso). Necesas vidi la veron de ĉiu malvero kaj la subtilajn malverojn de ĉiu vero. La paciento devas ĉesi serĉi respondojn kaj pli bone permesi la aperon de kelkaj demandoj bazaj pri la ekzistado, kiujn anstataŭ respondi oni devas asimili en absoluta kreiva silento. Se estas necese, tio ĉi devas okazi ripete, kaj tiu ĉi penso - kiun ni nomas pasiva-esplora, kaj kiu neniel similas al la aktiva kaj difinita penso - estas tipo de penso (eble la nura), kiu povas okazigi la unuecan perceptadon aŭ inteligentan perceptadon. La ago vidi kaj aŭdi devas iĝi pli grava ol la perceptita objekto kaj la bildo, kiun oni havas pri ĝi. Alivorte, la perceptado estas pli grava ol la objekto kaj la memoro. Ne estas direkto nek celoj en psikoterapio, estas nur serena esplorado kune aŭ en kunligo, pri la multaj interferoj al la unueca perceptado. Ne sufiĉas rebonigi la mnemonikan procezon, necesas lerni la kapablon fini ĝin vole, kiam ĝi ĉesis esti funkcia. La mildigo de la sufero, kiun ĝenerale la paciento serĉas, kaj la personecmaturigo, kiun ĝenerale la psikoterapeŭto serĉas por sia paciento, estas psikoterapiaj aspektoj, kiuj okazas ĉe la kampo de la memoro. La fino de la horizontala konflikto, kiu estas la fino de ĉiu konflikto, okazas nur trans la memoro (konscia aŭ nekonscia) kaj ties sennombraj kaj Proteaj reagoj.

## INDIVIDUA INTERPAROLO

Rimarko. Estis persono, kiu deziris koni kio estas la unueca perceptado, kaj sekve la horizontala konflikto, trans ĉia koncepta ellaborado. Li komprenis la konceptojn kaj ilin trovis tre saĝaj sed ne sukcesis ekscii, kio estas la rekta travivado de tiu afero. Salutinte amikece unu la alian, ni sidiĝis vidalvide sen io intermetita inter la du seĝoj. Post silenta momento, li ridetante diris :

Alparolanto : Mi venas por, eltrovi la misteron.

R. Feldman Gonzalez : La nura mistero estas, ke ni parolas pri misteroj, dum estas neniu mistero en tio ĉi.

(Ni ambaŭ ridetis ; estis intensa okulkontakto kaj la etoso ŝajnis malpeza kaj amikeca, malgraŭ la seriozeco de ambaŭ por vidi kune).

A : La mistero, almenaŭ por mi, estas, ke vi ŝajnas kelkfoje vivi plena de energio, kvazaŭ en alia dimensio, sed neniel malproksima ; kontraŭe, tre simple, vigle kaj amikece, kaj precipe, ege interesiganta (preskaŭ pasiema) komuniki ion al la aliaj. Mi konfesas, ke tia kvalito ŝajnas enviinda al mi.

RFG : Ĝi ne estas kvalito.

A : Kio ĝi estas, do ?

RFG : Estas kvazaŭ esti en mensa spaco, kie ĉio moviĝas, tiom tio interna, kiom tio ekstera ; kie ĉiu afero estas perceptata interferante en neniu alia, kaj subite malaperas la disigo inter tio interna kaj tio ekstera, inter la mio kaj la alia, kiel ankaŭ la sento de la spaca kaj tempa limo.

A : Mi bedaŭras diri al vi, ke ĉio ĉi ŝajnas al mi aro da senencaj vortoj.

RFG : Mi estas kontenta pri tio ; kaj pro tio, ke ni povas kunpartopreni ĝin. Ni vidu nun, se ni povas ankaŭ kunpartopreni rekte tiun spacon aŭ tiun movon, pri kiu mi parolas. Ĉu vi aŭdas tiun birdeton ?

A (subite surpriziginte) : Jes.

RFG : Ĉu vi aŭdas ankaŭ la vibrantan sonon de tiu buso kaj la kornon malproksiman ?

A : Jes (Longa paŭzo, dum kiu ambaŭ aŭskultis silente).

RFG : Ĉu vi povas aŭskulti ĉiujn sonojn samtempe, sen ke iu fariĝu pli grava ol la aliaj ?

A (Longa paŭzo) : Ne, fakte mi koncentriĝas sur la kanto de la birdeto kaj kiam li ĉesas kanti, mi restas, esperante, ke ĝi denove faru tion. Tiel, enfokusiĝinta - aŭ koncentriĝinta - sur la birdeto, mi perdas la aliajn, la buson, la kornojn el la strato, kion ajn.

RFG : Ĉu ni povas aŭdi koncentriĝinte sur nenio speciale ?

A (Longa silenta paŭzo dum 3 aŭ 4 minutoj proksimume) : Nun jes, mi kredas aŭskulti ĉion kune. Ĉu estas tio ĉi, kion vi nomas unueca perceptado ?

RFG : Mi petas, ni momente forgesu, ke ekzistas la unueca perceptado. Ni iras nenien. Ni simple estas tie ĉi kaj sen moviĝi de niaj seĝoj ni kune vidas la lumon de tiu fenestro kaj kune aŭskultas ĉiujn sonojn. Senmove kaj silente ni perceptas la tutan movon de tiuj multnombraj sonoj, kiuj nin atingas ĝuste nun el la kvar kompaspunktoj. Se ni vere faras tion, kreiĝas spaco de kunligo kun ĉio, kiu plilarĝiĝas laŭmezure kiel ni aŭskultas, vidas kaj sentas. Ĝuste nun.

A (Longa silenta paŭzo) : Mi ne povas krei tiun spacon. Mi aŭdas la buson kaj la birdeton kvazaŭ liniojn kaj punktojn en ekrano lokita antaŭ mi.

RFG : Vi kreas neniun spacon. Tio, kion ni faras, estas ekpercepti spacon, kiu estas pura movo, al kiu ni kutime estas senkoneksaj. Tiu senkonekso estas la horizontala konflikto. Meti ĉion sur ekranon estas la maniero, kiun oni instruis al ni por vidi kaj koni ; fiksi la aferojn en la tempo, en la plata spaco, senmovigi la tutan kaj konstantan movon de la realo per ideoj, nuraj konceptaj substantivoj, rememoroj, planoj, imago, ktp, kiuj utilas dum kelkaj minutoj sed la plimultan tempon interferas en la perceptadon de tiu ĉi movo sencentra.

A : Mi ne povas ĉesi vidi ĉion sur la plano kaj nomi ilin : omnibuso, birdeto, martelbatoj, varmo de tiu hejtforno, lumo de la fenestro, malproksimaj kornoj...

RFG (aŭdante omnibuson, kies sono iĝas ĉiufoje pli laŭta kaj proksima) : Ĉu vi povas senti tiun ĉi vibradon de la spaco, kiu vin atingas de malantaŭ via kapo ?

A (Paŭzo ; rideto ; longa silenta paŭzo ; poste, malrapide, malstreĉite kaj mallaŭte) : Mi vidis la spacon.

RFG : Ni estas ĝin vidantaj, aŭskultantaj, sentantaj, ĉu ne?

A (ridetante) : Jes, ja.

RFG (Longa silenta paŭzo, dum 5 minutoj proksimume) : De tiu ĉi vasta kvieteco, kie la korpo sin malstreĉas kaj kvietigas per neniuj tekniko de malstreĉigado, koncentrigado aŭ meditado ni povas ekvidi (ĝuste nun) tion, kio okazas en nia interno.

A (Paŭzo) : Mi sentas intensan angoron ĉe la komenco de la stomako. Ŝajnas al mi, ke mi perdiĝas en la senfinan spacon. Mi ne volas perdi la regadon, perdi miajn kutimajn referencajn punktojn : spacon kaj tempon.

RFG : Kio okazas, se vi ne nomas angoro tian internan sensacon ? Ni plu vidu, sentu kaj aŭskultu ĉion, kio okazas.

A : Estas intensa streĉeco en la tuta ventro ; io, kio ŝajnas koncentriĝi foje ĉe la stomakkomenco, ĉe la pinto de la koro...

RFG (Paŭzo) : Ni rigardu tion kune, kun tiu ĉi grandega trankvileco kaj irante nenien. Ni havas la tutan tempon de la mondo. (Longa kaj silenta paŭzo). Ni vidu kiel tia viscera streĉeco ankaŭ moviĝas kaj transformiĝas. (Longa paŭzo).

A : Jes, nun ne estas streĉeco, ĝi estas kvazaŭ multe da punktoj, kiuj tiklas.

RFG (Longa paŭzo) : Kaj nun aŭskultante la vibradon kaj moviĝante en ĝi (omnibuso plirapidis en la strato ĝuste tiam), vidu kiel la viscera streĉeco malaperas.

A (Longa paŭzo ; li ridegas, rigardas la plankon dum kelkaj momentoj, ni intense rigardas unu la alian kaj tre kviete kaj tre mallaŭte, nun kun serioza mieno, li tre malrapide diras al mi) : Tio ĉi estas absoluta beno. Nun mi scias precize, kio estas vivi en tiu spaco kaj movo, kie ĉio okazas samtempe : tio ĉi estas la unueca perceptado (longa silenta paŭzo ; tiam-tiam ekaperas kelkaj ridetoj meze de la trankvileco). Ĉu vi permesos al mi instrui tion ĉi, D-ro Feldman Gonzalez ?

RFG : Ĉi tio ne estas mia nek via. Ĝi estas io, kion oni travivas kaj perceptas, kaj tiu travivaĵo kaj perceptado, kiam ĝi estas reala kaj ne nura koncepto aŭ imaga mito, kreas spontane sian propran agadon kaj oni kunpartoprenas ĝin kiam tio eblas, sen peno. Ĝi ne estas teknikigebla. Se vi ellaboras metodon por instrui unuecan perceptadon, vi ĝin detruas. La metodo taŭgas por la aferoj de la penso, ene de la linia konscio. Se iu vin diras, ke estas metodo por elirigi vin el la kutima linia konscio kaj vin "enirigi" en la triangulan konscion, kiu estas unueca perceptado, ja tiu persono trompas vin, jen li konscias pri tio, jen ne.

A : Jes, sed iamaniere vi min alportis ĝis tiu ĉi bona, trankvila spaco, kie ne ekzistas doloro, deziro nek konflikto. Mi povas memori ĉiujn miajn problemojn, eĉ klopodi ilin solvi, senĝene kaj senpene.

RFG : Ni travivas kune ĉi tiun spacon kaj ĉi tiun movon de rekta, totala kaj malstreĉa perceptado, nur kiam ni iras nenien, neniacelen. Apenaŭ ni kreas celon, ni ektransformas tiun ĉi perceptan movon sencentran en vojaĝon (ni iras de ĉi tie, tien, sed ni ne moviĝas interne de tiu tuto, kiun vi nomis "beno").

A : Mi ŝatus ĉiam vivi tiel, mi ŝatus, ke tio ĉi estu porĉiama.

RFG : Do vi transformas la movon en senmovan punkton, same kiel vi faris kiam vi aŭdis nur la birdeton, aŭ vi koncentriĝis nur en tiu viscera streĉeco, kiun vi nomis "angoro" aŭ same kiel okazis kiam vi vidis ĉion en plano kaj ne en mova sencentra spaco.

A : Sed se ĉi tio estas reala, ĝi devas daŭri.

RFG : Ĝi ne daŭras en la tempo, sed okazas intima transformado de la molekula naturo de la neŭrono, kiu atingas la implicitan ordon de la materio, kiel eksplikas David Bohm,

kaj kiel vi aŭdis hieraŭ en nia prelego.

En tiu implicita ordo de la materio, la movo (holokinetiko) estas grava, sed la tempo kaj la spaco ne estas tiaj. Vi perceptas la movon, kiu iras de ĉi tie tien.

Ekde tiu implicita ordo (se tiu ĉi sperto estis reala) remanifestiĝos tiu "beno" sen konflikto, post kvin minutoj, kvin tagoj aŭ kvin jaroj, kaj ĝia ofteco kaj daŭrado en la tempo dependos tiel de via sano kaj de via energio, kiel de via seriozeco por kompreni ĉion.

Vi vidis ĉiumomente pli ol ĉiun enhavon, la konstantan movon, kiu ekzistas inter iu enhavo kaj alia. La movo de tiu interna streĉeco, kiu - kiam ĝi ne estas nomata - transformiĝas en aliajn aferojn kaj eĉ malaperas kiel streĉeco kaj sin perdas en la silenta movo, kiu estas inter omnibuso, birdeto, kornò, angoro, malamikeco, varmo el hejtforno, timo, anksieco, ktp.

Post longa periodo, eble 30 aŭ 40-minuta, kunpartoprenita en absoluta silento, tute ne intence, kun la korpoj mirinde senmovaj, malstreĉitaj kaj vitalaj, ni disiĝis.

Ni ambaŭ sciis, sennecese tion diri, ke io senfine profunda ekkomenciĝis, inkluzive de nia amikeca kunligo, malgraŭ ke en la sekvanta tago mi devos foriri al alia hemisfero.

Tiu ĉi tipo de okazaĵo kompreneble ne estas io ofta. Niaj rezistoj vidi la tutan movon de la vivo en nia menso estas konsciaj kaj nekonsciaj, krudaj kaj subtilaj, kaj ĝenerale tre enradikiĝintaj.

Kiam ni malfermiĝas por "vidi la totalan movon", la mondo mem komencas transformiĝi.

## INTERPAROLO KUN STUDENTINO DE PSIKOLOGIO

Rimarkigo. Ŝi estis tre juna. Ŝi sidiĝis antaŭ mi kaj, salutinte min, ŝi restis en silento foje interrompita per streĉaj kaj konvenciaj vortoj. Iom post iom ŝi sin lasis kontagi de nia trankvileco, kiu estis la sama trankvileco de la malvarma kaj griza mateno sur la Andaj Kordileroj, la plafonoj kaj la malproksimaj pinoj, kiujn ni vidis tra la fenestro. La oftaj kaj plimultiĝantaj sonoj de la strata trafiko frue en la mateno ne interrompis la trankvilecon sed ili ŝajnis subteni ĝin.

Alparolanto : Interesas min enprofundiĝi en la koncepton kaj la spertadon de tio, kion vi nomas unueca perceptado.

R. Feldman Gonzalez : Heraklito jam parolis pri la Pantha-

Rhea aŭ "fluo aŭ totala movo". La homo ofte rimarkis en sia historio tiom individua kiom kolektiva, ke la realo estas pura konstanta movo. Determinita maniero aĝi de la centra nerva sistemo, kiun ni nomas linia konscio aŭ spac-tempa konscio (procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika), kaj kiu bezonas malpli da energio por sia funkciado, izolas nin disde tiu totala movo de la realo.

La intelekta penso povas esti, kiel ni jam diris en la trihora prelego, kiun vi partoprenis : 1) racia, 2) heteroracia (kiel la kvantumfiziko) aŭ eĉ malracia (kiel en la psiko kaj la ĉiutagaj neŭrozoj). Tiu maniero de linia konscio, aŭ penso, emas fiksi la totalan movon de la realo en la spaco, en la tempo, per nomo, per adjektivoj, per la starigo de la rilatoj kaŭzo-efiko inter la okazaĵoj. Tiu ĉi linia konscio, kiel ni vidas, estas fiksema kaj ĝia funkcio estas haltigi la totalan movon (kaj konsekvence, izoliĝi de ĝi). Tiun ĉi fiksadon ni nomas horizontala konflikto. Sed tiu konscio, kiun ni nomas triangula (aŭ unueca perceptado) estas la agmaniero de la centra nerva sistemo, aŭ menso, kiu nin kontaktigas kun tiu movo nomata holokinetiko far David Bohm, kaj kiun Heraklito nomis, kiel ni jam diris, Pantha-Rhea.

A : Ĉu vi ne faros hipnoton kun mi por atingi la unuecan perceptadon ?

RFG : Trankviliĝu, en Kariopsikologio okazas malhipnotigo, malkondiĉado. Vi ne atingas la unuecan perceptadon. Vi estas tie aŭ ne estas. Transformiĝante en parton de la realmovo, vi ekliberiĝas.

A : Mi ekliberiĝas de kio ?

RFG : Tiu movo estas la libereco mem. Io, kio ne haltas, kio ne finiĝas (Longa paŭzo). Kiam vi aŭskultas tiujn omnibusojn, sen nomi ilin ; kiam vi aŭskultas tiun kantaŭtan birdeton ; kiam ni vidas la montaron kaj la ĉielon, kaj ni sentas la kreskantan varmon de tiu ĉi ĉambro sen flankelasi la enhavon de tiu ĉi konversacio, sen koncentriĝi en io, sen peno, vi vidas aŭ sentas mensan spacon ĉiuforte pli grandan, ene de kiu vi ĉiam pli malstreĉiĝas fizike. (Paŭzo)

A : Ĉu tio implicas ian formon de masaĝo ?

RFG : Ne, nek masaĝojn nek gestaltajn(35) aŭ meditajn teknikojn, neniun trejnadon el kiu ajn spaco por iri ien. Ne temas pri mistika tranco nek oni bezonas iun aparaton kiel en la **biofeedback**. Vi bezonas neniun drogon, aŭ medicinan aŭ nemedicinan. La nura kunligo inter ni, vi sidanta tie kaj mi ĉi tie, kviete, kaj pli silente ol parolante, tiu



kunligo en unueca perceptado estas la natura agado de la homo, kiu estas ne nur sana sed ankaŭ kuraciva. Vi ne devas tiom multe timi tion.

Charles Tart mencias la okazon de sinjoro, kiu, toksiginte per LSD, diris : "Vi kaj mi, ĉiuj ni, ĉiuj estas unu, ne ekzistas apartaj mioj".

En unueca perceptado vi vidas tiun realon sen toksigi per iu drogo, sen interŝanĝi masaĝojn kun iu. Vi konfirmas en la faktoj, per via propra sperto, tion, kion Leibniz nomis "la monado" (la ento, kiu reproduktas la informon de la tuto).

Vi komprenas la hologramon de Denis Gabor en via propra sperto. Vi komprenas la matematikan teoremon de Bell eĉ ne komprenante Matematikon. Bell demonstris matematike en 1964, ke ĉio en la universo estas intime kaj rekte komunikita. El tio ĉi rezultas, ke nia perceptado de la realo estas absolute fragmenta kaj neperfekta.

A : Mi ne havas specifan problemon por prezenti al vi. Mi nur sentas min pli nervoza ol mi pensis, malgraŭ ke laŭmezure kiel la tempo pasas kun vi, mi sentas min pli kaj pli trankvila. Mi estas edziniĝonta kun viro, kiun mi amas kaj ni planas havi gefilojn.

RFG : Ĉu vi ne prezentas tion kiel problemon ?

A (ridante) : Ne. (Ŝi ridas, paŭzo). Mi ne scias. (Ŝi ridas ankoraŭ plu ; longa paŭzo). Vi diris en via verko "**La Psikologio de la 21a jarcento**", kiun mi legis hieraŭ, ke la paciento kaj la terapeŭto evitas la totalan rilaton, kiu - pro tio, ke ĝi estas saĝa ago de totala perceptado - estas la nurŝ sana kaj kuraciva ago. Kio estas tio, pri totala rilato ?

RFG : Ne estas tio, kion vi timas. Ne temas pri masaĝoj, hipnoto, interpretadoj, kaj kompreneble ankaŭ ne pri generila interŝanĝo, kiu estas tio, kion - inter adoleskantoj - oni konas kiel "totalan rilaton". Vi tie kaj mi ĉi tie, ambaŭ sidantaj sur niaj seĝoj kaj ne moviĝantaj, kaj kompreneble ne tuŝantaj unu la alian, ni povas eniri en kunligon, en rilaton, kiu povas esti tre signifa por ni ambaŭ. (Longa paŭzo). La demando, kiun mi faras, tamen, estas jena : Kial ni ne estas en totala rilato ĝuste nun ?

A : Mi sentas streĉecon en mia **guata** ("guata" : loka idiotismo, kiu signifas "ventro").

RFG : Mi kredas, ke vi ege esperas atingi ion, kaj vi timas forlasi ion : kiuj estas tiuj aĵoj ?

A : Mi simple pensas, ke se mi eniras en unuecan percept-

adon, mi povas eniri en mensan staton, kiu povas esti neakordigebla kun la rilato, kiun mi havas kun mia fianĉo (kunulo, amiko aŭ amanto).

RFG : Vi timas alfronti la neeviteblajn homajn paradoksojn. La paradokson ami kaj samtempe malami lin (aŭ alterne ami kaj malami). La paradokson deziri sendependecon kaj samtempe bezoni dependi de iu, kaj ankaŭ la fakton trovi, ke la honesteco estas absolute necesa por plifortigi rilaton, sed samtempe ĝi povas iĝi serioza kondiĉanta faktoro de disiĝo. Tiuj paradoksoj, kaj multaj aliaj, ne povas solviĝi en sia propra kampo. Vi devas eniri en unuecan perceptadon kaj ekde tie vi vidas, ke la paradokso ekzistas sed ne ĝenas.

A : Sed vi diris en viaj prelegoj, ke la procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika kaj la unueca perceptado estas neakordigeblaj.

RFG : Certe, ĉar la procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika estas la nura, kiun ni konas, kaj tiu procezo interferas ĉiam la "eniradon" en unuecan perceptadon. Sed estante en unueca perceptado vi ne necese devas ĉesi pensi aŭ agi en tiu procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika. En unueca perceptado vi povas vidi viajn idiosinkraziojn, viajn kvalitojn, la homajn paradoksojn en vi mem, sen ke ili ĝenas, sen ke ili trenas vin transformi ilin en agadon. Vi estos trans la ĉasteco aŭ la volupto, la komplezo aŭ la malrespekto, la racieco aŭ la malsaĝeco. Via ago iĝos spontana, la ago de la unueca perceptado.

A : Kio estas tiu ago ?

RFG : Vi ne povas pensi ĝin. Vi ne povas plani tiun agon. Vi povas nur observi ĝin, dum vi realigas ĝin, dum ĝi estas tio. Estas klara ago, kiu permesas vin vidi vian propran mallumon kaj la malverojn de la aliaj (tiuj, kiuj nomiĝas politikuloj, religiuloj, instruistoj, lernantoj, profesiuloj, gepatroj, gefiloj, geedzoj, ktp).

A : Kion vi konsideras mallumo aŭ malvero ?

RFG : Estas la diskonekso de la realo disde la homoj, deveninta de la horizontala konflikto. Kiel ni jam diris tiel ofte en niaj prelegoj, horizontala konflikto estas la esenco de la distordo en nia percepta kontakto kun la realo kaj ĝi estas, samtempe, la deveno de ĉiu alia konflikto, inkluzive de la konfliktoj - kiujn ni nomas vertikalaj -, kiujn Freud priskribis kiel la kontraŭstarojn ekzistantajn inter la id(36) kaj la supermio, ekzemple.

La horizontala konflikto estas la disigo, kiun vi faras de kia ajn kategorio, nomo aŭ difino pri vi mem, same kiel kiam vi diras : "mi sentas angoron, mi estas nervoza..." kaj la horizontala konflikto estas ankaŭ la disigo, kiun vi faras, kiam vi gradigas, nomas aŭ difinas kiun ajn realon, al kiu vi rilatas kiel observanto. Kiam vi diras : "Mi vidas floron", same kiel kiam vi diras : "Mi sentas angoron", vi pensas pri iu realo (jen la "floro", jen la "angoro") pere de la nomo "floro" kaj de la nomo "angoro". Tio, kion ni diras, estas, ke en unueca perceptado vi vidas la realon kiel tion, kio ĝi estas, kaj ne pere de parola aŭ neparola simbolo. Pro tio ni diras, ke la realo estas vidata kiel tio, kio ĝi estas kaj ne kiel io, pri kiu vi povas nur pensi. Alivorte, estas necese ĉesi pensi pri observado kaj komenci observi rekte. En tiu stato de observado vi vidas kiamaniere via angoro aŭ via nervozeco transformiĝas ĉiam en ion malsimilan. En tiu stato, la tempo, la spaco, la nomo kaj la rilatoj de kaŭzoj kaj efikoj iĝas negravaj.

Vidi la esencon de tiu horizontala konflikto, la krudan distordon de la demando "kiel?" kaj de la respondo "tiel" (la metodo, la tekniko, ktp) estas la komenco de la unueca perceptado. Mi povas demandi kiel fari aviadilon aŭ kiel prepari manĝaĵon, sed kiam mi demandas kiel eniri en unuecan perceptadon, mi ankoraŭ pensas pri la observado, ne komencante vere observi. La distordo de la horizontala konflikto estas ne nur kona, ĝi estas ankaŭ emocia, kaj povas esti la fonto de multaj organismaj malsanoj.

La sciencistoj en Nuklea Fiziko kredis, ke eblis observi ion objekte, ne ŝanĝante nek transformante ĝin. Nun ni scias, ke la observado mem estas movo, kiu partoprenas en la konstanta movo de tio observata. Tio ĉi estis studata de David Bohm en la Universitato de Londono, estas parto de la epistemologio de Jean Piaget kaj ankaŭ parto de la ideo de Jung kaj Rorschach pri tio, ke "la observanto konstante kreas la realon, kiun li observas".

Ni kredis, ke ĉio estis determinata far alia aparta afero, kiu estas ; aŭ far alia aparta afero, kiu estis ; sed nun ni parolas pri metadeterminismo ; ni pensas, ke "nur povas esti tio, kio estas". Ni bezonas revizii ankaŭ nian ideon pri la libervoleco, kiu povas esti alia iluzio de nia memoro, ĉar se vi (sen la ideo pri la mio) moviĝas vere kun tio, kiun vi observas, ni povas demandi : sur kion oni aplikas la libervoleco ? aŭ : kiu ĝin aplikas ?

La termoregulilo, ekzemple, estas aparato kondiĉita por moviĝi ene de certaj limoj kaj respondi al certaj variabloj (la temperaturo). La homo, en unueca perceptado, povas moviĝi kune kun la resto de la realo senlime.

La ebla kontingenco de tiu percepta holokinetiko estas tio, kion ni nomas kerna konscio aŭ cirkla konscio, kiu estas ĝuste kontakto kun tio, kio estas, kun plej malmulte da ebla distordo.

A : Do, pli ol cirkla konscio ĝi estus sfera konscio, kie oni perceptas ĉiun movon, en tiu sfero, kaj vi estas la centro de tiu sfero.

RFG : Mi dirus pli ĝuste, ke ĝi estas kiel sfera konscio, sed kie ne ekzistas centro kaj ekzistas nur movo sen centro, ĉar vi estas nur parto de tiu totala movo.

A : Tio ŝajnas tre interesa, sed vere mi ne povas pli ol koncepti ĝin ; ne eblas al mi travivi ĝin. Sed antaŭ ol daŭrigi, permesu al mi malantaŭeniri kaj demandi al vi : Kiam mi diras al mia fianĉo (amanto) "mi amas vin", ĉu mi falas en la horizontalan konflikton ?

RFG : Vi povas esti sincera, sed plejofte tiuj vortoj, same kiel multaj aliaj, enfermas konceptojn, esperataĵojn, kredojn, stereotipajn imagojn de tio, kio devas esti persono (oni mem aŭ la alia) kaj de tio, kio devas esti rilato, kaj ni konfuzas ĉion tion kun la reala rilato, kun la rilato mem kiu estas konstanta ŝanĝo kaj movo. Ni ne povos toleri la ambiguaĵojn, la necertecojn kaj la ŝanĝojn de tiu movo de rilato ; ni ne povos toleri la homajn paradoksojn en ĉiu el ni mem dum ni ne estos en unueca perceptado (kaj rilato).

A : Do, ĉu vi kaj la alia estos kontentiĝintaj kaj feliĉaj en tiu rilato ?

RFG : Ne, vi kaj la alia iros trans la plaĉo kaj la malplaĉo trans la kontentiĝo aŭ malkontentiĝo. La unueca perceptado sole, aŭ en la rilato, estas la nura aĵo, kiu valoras. Al vi ne gravas, ĉu la ĉielo estas blua aŭ nuba. Tio, kio gravas, estas : esti en kunligo kun la ĉielo (aŭ blua aŭ nuba).

A : Ĉu estas kvazaŭ vivi rezignaciante ?

RFG : Ne. Rezignacii estas akcepti la neeviteblaĵon (la indiferentan forlason far signifoplena persono, la kanceron aŭ la morton). La unueca perceptado estas la kunligo kun la realo mem, kiu estas en konstanta ŝanĝo kaj movo.

A : Mi timas tiel rilati, esti vundita, forlasita ; mi timas, ke la rilato finiĝu.

RFG : Dum vi ne serĉos sekurecon en la rilato, ne nutros

vin per bildoj kaj esperataĵoj, aperos (se vi havas bonŝancon) la kunligo. Ĉu vi klopodos fini rilaton, kie ekzistas kunligo ?

A (Ridego ; paŭzo) : Estas nekredebla tio, kion ni faras kun ni mem. Ni konstante forrifuzas la feliĉon vivi plene. (Paŭzo). Mi pensas nun, ke eĉ se mi estus forlasita, estas eble vivi sola, sen priokupi min por ĉesi esti tiel.

RFG : Se vi vere faros tion, vi fine demandos vin : Ĉu ekzistas afero tia, kia la soleco ?

A : Tio implicas, ke la soleco ĉesas ekzisti, kiam vi ĉesas bezoni la iluzion sekurecon, kiun alportas la akompano ; kiam vi ĉesas serĉi protekton, respekton, socian prestiĝon apogon, varmon, kormolecon, galantajn vortojn aŭ laŭdojn, ktp. Vi komencas lumigi vian propran vojon.

RFG : Estas ĝuste tiel. Kaj tiam vi komencas vere rilati kun la aliaj. Rilato libera de timo kaj deziro. Vi samtempe liberiĝos malrapide kaj subite de ĉio, kio estas malvera. (Longa silenta paŭzo).

A : Mi sentas la neceson piediri sola dum kelkaj horoj.

RFG : Antaŭen, ne estas kialo por interferi tion. (Mi starigis, ni premis reciproke la manojn kaj ridetante ni disiĝis).

Iomete post mia alveno hejmen, en Kalifornio, mi ricevis leteron, en kiu ŝi diris, ke ŝi kaj ŝia kunulo transformis komplete la naturon de sia reciproka rilato. La plano de geedziĝo kaj filoj iĝis duavica kaj ili konsideris kune la kreadon en sia lando (aŭ kie ajn eblus) de pluraj unuagradaj lernejoj, kie la infanoj lernu vivi sentime, kompreni la paradoksojn de la ekzistado (tiujn konajn de la nova scienco kaj tiujn emociajn ĉiutagajn) ekde iu mensa dimensio de totala rekta perceptado, kaj kie la infanoj lernu ankaŭ liberiĝi de la peza socia kondiĉado, kiu manifestiĝas ĉiumomente, kaj kiu forĝiĝis - jarcenton post jarcento - pro la timo de ĉiu individuo etendita al la socio. Ili ambaŭ rimarkis klare la staton de profunda korupto, en kiu estas ĉiuj homaj agoj, senescepte, en la tuta planedo, kaj de tiu rimarkado mem ŝprucis la energio kaj la pasio, kiujn ili bezonis por agi kaj fondi la lernejojn. Ili konsciis, ke ili devas esti tre simplaj kaj sobraj. Ili ne sciis, ĉu ili ĉiam povos vivi en unueca perceptado kaj transdoni ĝin al la instruistoj, sed ili sciis, almenaŭ, kio estas la horizontala konflikto.

Rimarki la horizontalan konflikton en ili mem, ĉiumo-

mente, jam estis bona komenco por ilia grava entrepreno. Ŝi petis al mi la adreson de la poreksperimentaj lernejoj : la unuagrada lernejo Oak Grove, Kalifornio, kaj la mezgrada lernejo de Brockwood Park, proksime de Londono. La letero finiĝis jene : "Vidante la staton de la mondo, mi scias, ke por mi estas unu sola ebla ago : donaci mian tutan tempon, ĉion, kion mi havas, kaj ĉion, kio mi estas, por klopodi novan homon kaj tutmondan saĝan socion, kie oni respektu senkondiĉe la **vivon kaj la liberecon** de ĉiu individuo. Mi scias, ke kun tiu ĉi mensa sinteno, la mono, la lernantoj kaj la kunlaboro alvenos per si mem, same kiel la problemoj, kiuj solviĝos laŭmezure kiel ili aperos, en la holokinetiko (totala movo) de la vivo (kiu estas ne pli ol la unueca perceptado)".

### **HOMOSTATO, HOMODINAMIKO KAJ TOTALA MOVO**

Kiam la homaro povis akcepti, ke la sango moviĝas en la interno de la organismo, de kiam pluraj individuoj estis oferitaj, la sciencistoj komencis sin demandi kiel la sango daŭrigas ĉiam sian saman ĉelan, biokemian komponproporcion, sian alkalecan gradon aŭ pH.

Tiam aperis la koncepto pri homostato, kiu estas la studo de tiu "stato" (stasis) de konstanteco en la kombinado de la organismo kaj de la multaj mediaj variabloj, la ingestado kaj la ekskreciado, ktp, kiuj kontribuas al tiu konstanteco aŭ "stabileco" tiom struktura, kiom funkcia.

La koncepto pri homostato implicas "staton" ; staton de ekvilibro ; adaptiĝon de la individuo al ties medio kiel rezultaton de la interago de diversaj fortoj aŭ variabloj.

Antaŭ nelonge oni komencis paroli pri la homodinamiko kaj ĝiaj leĝoj. Tiu ĉi koncepto celas kompreni la movojn inter la organismo kaj la medio, sed la vorto mem implicas la ĉeeston de fortoj, t.e. konflikton inter energioj, kiuj renkontiĝas dum ili moviĝas en malsimilajn aŭ kontraŭajn direktojn.

La homodinamiko havas siajn leĝojn kaj oni priskribis almenaŭ kvar el tiuj leĝoj : reciprokecon, sinkronecon, helicecon kaj resonancon.

La reciprokeco estas funkcio de la interrilato kaj interago inter la homa "kampo" kaj la mensa "kampo". Kiel ni vidas, anstataŭ adaptiĝo al malsimilaj fortoj aŭ variabloj, ni parolas tie ĉi pri interrilato kaj interago inter la organismo kaj la medio, kie ĝi disvolviĝas.

La ekvacio por esprimi reciprokecon estas jena :

$$R = f(H_1 \rightleftharpoons A_1)$$

Ni komencas akcepti kaj klopodi kompreni koncepte la ekzistadon pli de movo (homodinamiko) ol de stato. Ni rimarkas tie ĉi, ankoraŭ, la kronikan rezistadon vidi la realon kiel totalan movon (ĉiudirektan aŭ neniudirektan), ion, kion oni priskribis per la nomo holokinetiko, kiu greke signifas simple tion : "totala movo".

Pro tio ni bezonas analizi aŭ fragmentigi tiun movon kaj vidi ĝin kiel malsimilajn sinergiajn aŭ kontraŭajn fortojn.

Sinkroneco : Tiu ĉi dua leĝo de la homodinamiko aperigas la konceptojn pri spaco kaj tempo.

$$\text{La ekvacio : } S = fE - T_1 (H_1 \rightleftharpoons A_1)$$

povas esti jene tradukata : la sinkroneco estas interagado inter la homa kampo kaj la media kampo en determinita momento de la kampo kaj endeterminita loko de la spaco.

Sed Teilhard de Chardin kaj Abraham Maslow parolas pri iu celo de la vivantaj organismoj.

La teleologio estas la studo de tiu celo aŭ objekto.

Bertalanffy ne akceptas la fakvorton, konsiderante ĝin ne sufiĉe scienca, esence nepruvebla, kaj ĝin anstataŭas per teleonio, kiu estas nur la tendenco de la vivantaj organismoj pligrandigi sian kompleksecon laŭgrade kaj iompostioe.

La tria homodinamika leĝo estas la heliceco, kiu implicas tiun ĉi tendencon al la komplekseco en la du antaŭaj leĝoj pri reciprokeco kaj sinkroneco.

La ekvacio :

$$H = ET_1 (H_1 \rightleftharpoons A_1) \overset{***}{\rightarrow} c - ifET_n (H \quad A)$$

signifas, ke la heliceco estas funkcio de la interagado inter iu organismo kaj ties medio, sed ne nur en iuj precizaj momento kaj loko, sed ankaŭ sinsekve en la tempo kaj la spaco, tiel ke tiu interagado kondiĉas intermite sinsekvajn biologiajn renoviĝojn orientatajn al pli granda adaptiĝo kaj komplekseco de tiu organismo.

La telos aŭ biologia celo ne estas do nur la homostata adaptiĝo, sed ankaŭ tiu komplekseco pli kaj pli granda.

Laste, la kvara homodinamika leĝo estas la resonanco.

La leĝo de la resonanco implicas harmonion, unuigon (moviĝantan) inter la organismo kaj la medio.

Bernard Rensch, en sia libro **La evoluo super la nivelo**

de la specoj (Columbia University, 1960) asertas, ke en la geologia eocena epoko aperis 19 novaj ordoj de mamuloj kaj 102 novaj familioj. Tiun ĉi fenomenon, same kiel la malaperon de la dinosaŭroj kaj la maraj amfibioj, oni povus ekspliki pro grandegaj stelaj eksplodoj, kiuj determinis grandan interŝanĝon de energio je intra- aŭ inter-galaksia nivelo (precipe "subtila" radioaktiveco).

Tiu radioaktiveco (kiun la tero konstante ricevas) eksplikus kiel la biologia evoluo de la teraj bestoj okazas pli rapide ol tiu de la maraj bestoj (ĉi-lastaj estas pli protektataj far la akvo, ol tiuj far la gasa atmosfero). Tiu ĉi estas unu el la aspektoj de la homodinamika resonanco : grandaj kosmaj eksplodoj (aŭ movoj) determinas grandajn modifojn ĉe la strukturo de la vivantaj organismoj (eksplodoj aŭ biostrukturaj movoj).

Sed tiu ĉi ideo pri resonanco estas - ankoraŭ - timema konceptado de la realo.

La esenco de la realo estas la totala movo (la holokinetiko). Tiu movo ne estas nur la holodinamika resonanco inter la homo (la organismo) kaj ties apuda medio (ekologia, socia, ekonomia, ktp) aŭ malproksima (la kosmo mem). Ĝi estas pli ol tio.

Ĝi estas ankaŭ la movo inter : 1) la implicita ordo de la materio kaj la energio (esenca ordo de unueco inter ĉiuj formoj de energio kaj materio), kaj 2) la eksplikita ordo de la realo, tiu ordo sense perceptebla pere de la multobleco de energiaj esprimoj (lumo, varmo, elektro, ktp) kaj de materiaj esprimoj (elementoj, molekuloj, ktp).

La totala movo (holokinetiko) estas la movo, kiu ekzistas inter ambaŭ ordoj de la realo. Tiu movo estas perceptebla nek sense, nek eĉ ekstersense.

Laŭ la psikologia vidpunkto, ĝi estas identigebla nur en tiu modalo de perceptado, kiun ni nomas unueca perceptado, kaj kiu estas la nura maniero estigi rektan kaj totalan kontakton kun la realo (la personoj, la naturo, ktp).

La holokinetika Psikologio emfazas precipe la studadon kaj la spertadon de la unueca perceptado en la homa vivo.

## ENHAVO, PROCEZO KAJ MOVO

La studo de la kompromisoj en familia terapio montras al ni, ke estas eble formuli ilin surbaze de iliaj diversaj enhavoj en determinitaj procezoj kun certaj karakteroj.

La izomorfeco de tiuj procezoj estas unu el la plej rava



kaj utilaj karakteroj en familia terapio : izomorfeco signifas, ke la kompromisoj inter du personoj el familio povas evidentiĝi kaj oni eĉ povas ilin antaŭdiri kaŭze de iliaj karakteroj de intermiteco kaj simileco en iliaj naturo kaj formo.

Tiuj izomorfaĵaj kompromisoj foje eĉ konformigas, do, antaŭdireblajn procezojn ĉe la familia rilato. Ĉar ili estas antaŭdireblaj, oni povas ilin nomi "rigidaj". Tiuj procezoj estas parto el "disfunkcia familia strukturo" kaj ili estas destinataj subteni ekvilibron ŝajne misteran (aŭ disfunkcian homostatton).

Iu ekzemplo estas la knabino, kiu danĝerigas sian vivon per sia rifuzo nutri sin adekvate, kun la preteksto "plu havi la plej bonan pezon". "Havi plej bonan pezon" estas nur enhavo kaj tiel ĝi havas signifon nur laŭ la kunteksto aŭ procezo, en kiu ĝi aperas kaj transformiĝas (aŭ ne).

La knabino povas esti uzanta tiun specialan enhavon, celante (ĝenerale nekonscie) daŭrigi kunigitaj siajn gepatrojn. En familia kunsido la knabino manĝas nur kiam la patro kunlaboras parole aŭ neparole kun la patrino en la nutrado duonperforta de la knabino (kiu estas, kompreneble la "identigita paciento").

La infanino uzas sian danĝeran "senapetitecon" por daŭrigi siajn gepatrojn en "trudita kontakto". Pli ol kontakto ĝi estas proksimeco, kiu malplaĉas, sed kiu "iĝas necesa".

Kiam la knabino komencas manĝi regule, la gepatroj eksedziĝas. La eksedziĝo justigas la enhavon (aŭ simptonon de senapetiteco kaj konfirmas sian historian utilecon por daŭrigi kunligita la familion, kvankam nur fizike, en la sama domo.

La knabino subtenis izomorfan procezon (ripetitan sammaniere aŭ samforme en ĉiu manĝo), kiu esence subtenis la homostatton aŭ disfunkcian ekvilibron de tiu aparta familio.

Enhavo (aŭ simptomo, ĉi-okaze) kaj procezo interrilatas intime ; ili iras - por iel diri - manenmane, kaj ambaŭ estas parto de nia fragmenta mensa funkciado (la procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika) ene de linia konscio baziĝinta sur la parametroj tempo-spaco kaj kaŭzo-efiko, kiujn ni uzas por formuli aŭ pensi la realon.

Tiu ĉi konstanta formulado de la realo, kiu kondukas neeviteble al izomorfeco aŭ kompromisa rigideco, estas neakordigebla kun la holisma aŭ unueca perceptado de

la realo ĝuste kiel ĝi estas.

La unueca perceptado ne estas pli ol la movo de la menso inter ĝia implicita ordo kaj ĝiaj diversaj eksplikitaj aŭ manifestiĝintaj ordoj (kiel la memoro konscia aŭ nekonscia, la ideoj, planoj, rememoroj, emocioj, ktp).

En la strukturo de tiu familio, estigita far enhavo (simptomoj, ekzemple) kaj procezoj izomorfe ripetitaj, troviĝas la historio de la problemo, kiun la familio prezentas origine al la terapeŭto.

Ne estas necesa la linia penso (spactempa aŭ kaŭza), ekzemple scii, ke la frato de la knabino danĝere senapetita foriris al universitato ĉi-jare kaj tio elĉenigis (penso, kiu serĉas la rilaton kaŭzo-efiko) la fakton, ke la patrino pli bonis la patron emocie, kaj tio manifestis (ne malplibonigis) la konflikton aŭ foreston de vera rilato, kiu ekzistis de longe inter ili.

La strukturo, kiun estigas diversaj mnemonikaj enhavo, moviĝante rigide en certaj procezoj identigeblaj kaj antaŭdireblaj, komencas esti parto de la totala movo de la realo nur per la unueca perceptado far la anoj de tiu familio. La unueca perceptado komenciĝas per la rimarko, ke ni disiĝas de la holokinetiko kaŭze de la horizontala konflikto (procezo META, aŭ funkcia aŭ ne) kaj ĝiaj pluraj manifestiĝoj.

La taŭga familia terapio ne serĉas la plibonigon aŭ resanigon de unu membro de la familio, eĉ ne de simptomo aŭ enhavo, aŭ eĉ ne de iu disfunkcia procezo. Temas nur pri la perceptado de la naturo de la horizontala konflikto en ĉiu kompromiso. Tio estas la komenco de la unueca perceptado. Tio estas la komenco de la fino de ĉiu konflikto en tiu familio.

La familia grupo devas esplori tion, kio la unueca perceptado ne estas. La individuo eltrovos poste tion, kio la unueca perceptado estas.

Estas tre certe, ke la familio estas la deveno de multaj psikologiaj malsanoj ĉe la individuoj. Tio ne estas kontraŭa al la koncepto, ke la familio estas sistemo de homostato kaj ekvilibro, kie estas kompensataj, en la familia tuto, la diversaj individuaj distordoj.

Tiu homostato, tamen, povas esti :

- 1) La regeneriva homostato de la unueca perceptado, aŭ
- 2) La degeneriva homostato, kiu havas sian radikon en la horizontala konflikto.

La terapeŭto ne devas peri nur por prezenti alternativ-

ojn en la reformulado de la realo por tiu familio aŭ individuaro. Ne temas pensi denove la realon novmaniere. Temas vidi nian rezistadon konscian (aktivan aŭ pasivan) aŭ nekonscian. Esti en rekta kaj totala kontakto kun la realo en unueca perceptado, nun kaj ĉi tie, ĉiumomente.

En kelkaj skoloj de familia terapio oni akceptas nekaŝe, ke kiam li montras alternativan formuladon de la realo, la terapeŭto vendas la esperon, ke per tia reformulado, per tia nova modelo de la realo, la familio trovos mildigon.

Tamen, ne ekzistas mildigo nek foresto de konflikto ekster la unueca perceptado, kiu estas la kontakto kun la holokinetiko.

La unueca perceptado estas la nura mensa kaj kompromisa situacio, kie la enmiksiĝo - en enstrudiĝo - de la terapeŭto en la familian sistemon kun lia propra estinteco, lia propra ideologio, liaj propraj estetikaj kaj etikaj preferoj, ne estas ebla.

Iu ajn formulado aŭ reformulado de la realo ne povas esti tute libera de la enmiksiĝo de la procezo META ; kaj tiu ĉi procezo META estas la deveno de la konflikto kaj de la distordo : la horizontala konflikto.

Konduki estas "sekvi la procezon".

Diri, ke la terapeŭto estas la kondukanto, ĉar li sekvas la familian procezon, estas tre certe ; kaj tio implicas, ke neniam estos ia ajn ŝanĝo en tiu familia procezo, kvankam ĝi estu reformulata centfoje.

Ŝanĝi estas "moviĝi kun la movo"

La terapeŭto estos agento de ŝanĝo profunda kaj reala de la naturo de la homaj rilatoj, nur kiam li mem komprenos tion, kio estas la unueca perceptado fakte kaj ne kiel alia ideo.

Pro tio en holokinetika Psikologio ni diras, ke la terapeŭtoj ĝenerale estas nuraj kondukantoj de procezoj, kaj ne - kiel oni supozas, ke ili estas - agentoj kapablaj estigi profundan transformon, ĉar ili lernis kontaktiĝi kun la totala movo de la ekzistado kaj de la realo.

Ne temas stimuli, faciligi, bloki, limigi, alĝustigi, rearanĝi, reorganizi kaj manipuli kompromisojn (enhavojn kaj procezojn) baziĝintajn sur la procezo META.

Temas moviĝi. Tio estas - simple - vidi, aŭdi kaj senti kune, en unueca perceptado, la movon de la realo, tia kia ĝi estas, ĉiumomente.

Ne temas starigi interligojn, sed trovi nenion alian ol la perditan kunligon inter la homoj.

Tio ne povas okazi sen iu ĝisfunda transformiĝo en la tuto de la menso de la terapeŭto. Kaj, ĉar tiu transformiĝo estas reala - se ĝi estas reala - , ekzistas ebleco, ke totala transformiĝo okazu en aliaj homoj proksime de li.

**Ideo kontraŭ percepto.**

Kiam iu familio intencas identigi malsanulon por transformi lin en pacienton, oni devas determini, ĉu tio estas pravigebla, ĉar foje la individuoj vere malsaniĝas organisme, metabole, ktp.

Se tio ĉi ne estas tiel - kaj malofte estas tiel - ne temas kredigi al la anoj de tiu familio, ke ili ĉiuj estas enmiksitaj en la sama problemo de la membro, kiu estas (aŭ intenca esti) identigita kiel paciento.

Temas vidi kaj percepti kune, ke tio estas vere tiel.

La ideo, ke la individuoj apartenas al granda familia planeda unuo, la homaro, ne multe helpas nin.

La unueca perceptado, ke tio estas vere tiel, estas la nura solvo al individuaj kaj kolektivaj problemoj de la homaro.

## DIALOGO PRO LA MOVADO DE LA IDENTECO

**Alparolanto :**

Mi ne scias antaŭ kiom da jarcentoj Aristotelo formulis la leĝon pri la identeco, dirante, ke A estas A, kaj ke io povas esti nur aŭ A aŭ ne A (tiu ĉi estas la dua leĝo de Aristotelo, aŭ leĝo de la ekskludo). Li diris ankaŭ, ke io ne povas esti tiom A, kiom ne A, kaj ĉi tiun trian leĝon de Aristotelo oni konas kiel la leĝon de la nekontraŭdiro.

Leginte vian artikolon "La naturo de la memkontraŭdiro" 2 , mi komprenis kiel tiuj ĉi leĝoj povas esti alte limigaj por la procezo de saĝa penso.

R. Feldman Gonzalez : Ja. La scienco estis aristotela dum multaj jarcentoj. Nun ĝi komencas ne esti tia. Krome la aristotela penso okazigis serion da idealismoj kun la konsekvencaj frustracioj kaj senkuraĝiĝoj, al kiuj kondukas ĉiuj idealismoj. Se mi havas centdolaran ĉekon, per tiu ĉeko mi povas aĉeti terpomojn, mi povas pagi viziton al kuracisto, mi povas forvojaĝi, mi povas atingi kontantan monon aŭ oron valorantajn cent dolarojn. Tio signifas,

ke la centdolaro ĉeko fakte egalas al multaj aĵoj. Aliflanke (kaj mi konscias, ke ĉi tiu estas tro fragmenta ekzemplo), se mi havas tri kuvajn laŭvice, ĉiujn entenantajn akvon je malsama temperaturo - la unua je 15°, la dua je 37° kaj la tria je 60° - kaj se mi enmetas mian maldekstran brakon en la kuvon je 15° kaj mian dekstran brakon en la kuvon je 60°, kaj poste ambaŭ brakojn en la centran kuvon je 37°, mi eltrovos, ke mia maldekstra brako sentas la kuvon je 37° varma, kaj ke mia dekstra brako sentas ĝin "malvarma".

Kiel vi klare vidas, la leĝo de la nekontraŭdiro disfalas antaŭ tiu ĉi fakto tiel simpla.

Antaŭ multaj jarcentoj, la ĉina filozofo Mencio diris, ke "la menso funkcias laŭ sia propra teorio pri kiel ĝi devas funkcii".

Robert Carmichael, en la libro **La logiko de la eltrovo** diris, ke la "universo estas la kuna fenomeno de la observanto kaj de la observataĵo".

A : Sed la observado estas kondamnita realigi abstraktadon de la realo, kiun li observas.

RFG : Iu difinis la procezon de abstraktado, dirante, ke ĝi estas persona, ne detalema, privata, projekciiva kaj memkorektiva.

La projekcio, kiu aperas de la abstraktado de la realo, estas procezo tiel ordinara, kiel spiri. Tiel la projekciado, kiel la spirado estas neŭrologiaj agoj (de la procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika aŭ procezo META).

La trouzo de la projekciado (kaj de la spirado) povas esti detruiva. Ankaŭ la sciencisto konscias, ke li projekcias sed li avertas al la aliaj, ke li faras tion, kaj aldonas post iu observado : "Tio estas laŭ mia opinio. Ĉu vi vidas tion tiel ?". Estas same kiel la optika iluzio de Müller-Lyer, kie du linioj samlongaj, paralelaj - la unua finiĝanta per du internen direktataj sagoj - ŝajnas, ke la unua linio estas pli mallonga ol la dua. Trompebla ulo diris, ke la dua linio estas pli longa. Scienca opinio estus jena : "Laŭ mia opinio, la dua linio estas pli longa. Ĉu vi vidas tion tiel ?".

Alivorte, kiam ni diras, ke unu dividite per unu egalas unu, ni ne parolas pri vero sed pri konvencio.

A : Kiam feministo diras, ke la amo samas al tio, ke "unu plus unu egalas unu", ni ankaŭ parolas pri konvencio, ĉu ne?

RFG : Estas tre facile fali en la konfuzon, kiam ni proponas solvojn bazitajn sur supozoj aŭ konkludoj, kiuj estas

simplaj, absolutaj kaj bazitaj sur la dualeco, ke io devas esti tiel aŭ tiel.

Kiam iu diras : "Ĉiuj problemoj estas ekonomiaj", aŭ kiam alia persono diras : "Ĉiuj problemoj estas psikologiaj", ni troviĝas antaŭ aserto tiuspeca.

A : Epimenido el Kreto diris antaŭ tre longe, ke "ĉiuj Kretanoj estas mensogemaj". Do ni povas demandi nin, ĉu Epimenido estis sincera aŭ mensogema.

"La vortoj 'neniam' kaj 'ĉiam' estas du vortoj, kiujn ni devas memori ĉiam por uzi neniam". Ĉi tiu estas alia aserto tre paradoksa, kiu aludas frazon, kiu enhavas - evidente - du nivelojn de abstraktado malsamajn.

Nu, D-ro Feldman Gonzalez, kiam vi diras - kaj ripetas - ke pere de la unueca perceptado ni kontaktas rekte kun la realo, kiun realon vi aludas ? Tiu vorto "realo" estas tro relativa kaj varias laŭ la kunteksto kaj laŭ la nivelo de abstraktado, en kiu vi uzas ĝin.

En la antaŭa frazo, la vorton "neniam" oni uzas dufoje, en du malsamaj niveloj de abstraktado, kiel ni jam diris. Se oni ne vidas tiun simplan fakton, la frazo iĝas konfuza. RFG : Ni parolas pri la nova paradigmo en Psikologio. Paradigmo estas aro da teorioj. Teorio estas simpla maniero, eble la plej simpla maniero ekspliki aron da realoj.

Bona paradigmo supoze eksplikas la realon laŭ kiel eble plej multaj kunteksto kaj niveloj de abstraktado. Se ne estas tiel, ni ne povas paroli pri bona paradigmo.

Guste tion intencas la nova paradigmo en Psikologio. Ĝi montras al ni la psikologian manieron plej adekvatan por starigi kontakton kun kia ajn realo (persono, aĵo, ideo, naturo, ktp) kun minimumaj konfuzo kaj distordo.

A : Sed Pilato mem demandis : "Kio estas la vero?", kaj eĉ Jesukristo mem ne povis respondi al li !

RFG : La vorto "vero" havas signifon semantikan kaj filozofian malsimilan al tiu de la vorto "realo". Tiu ĉi konversacio estas realo kaj povas ne esti vera, laŭ la filozofia vidpunkto.

Tio, kion ni diras en la nova psikologia paradigmo, estas, ke la realo de ĉi tiu konversacio povas esti vivata aŭ spertata aŭ travivata elde du psikologiaj kadroj de tute malsama naturo :

- 1) La procezo META kaj la horizontala konflikto, kun ĝia produkto, la mio, kaj la ideoj de kaŭzo, tempo kaj spaco, kaj
- 2) la unueca perceptado, pri kiu ni jam tiel multe parolis. Nur en unueca perceptado vi estos en vera kontakto

kun tiu ĉi aktuala realo, nia konversacio.

Se vi konversacios kun skizofreniulo, vi vidos, ke lia parolado estas simbole senkoneksa disde la neparola nivelo de la sperto. Tamen, la vortoj, kiujn li uzas, ŝajnas en alta nivelo de abstraktado, kaj trompeblulo - aŭ malsaĝulo - povas kredi, ke li aŭskultas veran filozofon.

La skizofreniulo, inversigas la parolan procezon : la vortoj estas pli gravaj ol la realaĵoj. Se la vortoj ne reflektas realaĵojn, do diablen kun la realaĵoj !

Estas same kiel piediri sur mapo, kredante ke oni vere vojaĝas.

Sed ĉi tiu sinteno ne estas ekskluziva al la skizofreniaj pacientoj. La personoj nomataj normalaj vivas surbaze de kredoj aŭ ideoj, kiujn oni neniam elprovis en la realo mem. Multaj vortoj sen iu referencpunkto en la realo gvidas niajn vivojn.

A : Laŭ vi, la horizontala konflikto aperas ĉiufoje kiam ni nomas, gradigas, adjektivigas, ĝeneraligas pri io ; sed estas neeble vivi sen tio.

RFG : Tutcerte. Ni devas nomi, ĝeneraligi, klasifiki, gradigi, ktp, por organizite agi sur la medio, kaj tio implicas, ke ni devas alĝustigi al certaj lingvaj kutimoj, kaj eĉ al certaj reguleco kaj kondutkohero por vivi saĝe kaj organizite.

Ekzemple, estas bone havi akuratajn trajnojn kaj omnibusojn, kaj respekti la regulojn pri veturado.

Sed vi konsentos pri tio, ke tiuj nomoj, gradigoj, ĝeneraligoj, ktp, ne ĉiam estas adekvataj aŭ fidindaj ; pri tio, ke ili povas esti plibonigataj, almenaŭ kelkokaze.

Krome, ili reflektas aŭ oni uzas ilin en determinitaj cirkonstancoj. Sed la cirkonstancoj mem varias aŭ ŝanĝiĝas (la esenco de la realo estas la ŝanĝo, la movo, la holokinetiko), kaj do denove la vortoj, klasifiko, ktp, iĝas maladekvataj.

Estas moda spritaĵo, kiu diras, aludante faman politikiston : "Li havas tre malpuran menson, li neniam ĝin renovigis dum la lastaj kvindek jaroj".

Ni bezonas renovigitan kontakton kun la realo, almenaŭ intermite, kaj tiu kontakto estas pli kompleta en unueca perceptado, eĉ la unueca perceptado de la horizontala konflikto, la unueca perceptado de nia kutimo nomi la realaĵojn, adjektivigi ilin, etikedi ilin, ktp, aŭ adekvate kaj racie, aŭ ne.

Vi estas kompleksa asocio de realaĵoj moviĝantaj. Kiam vi diras "mi estas kolera", "mi estas samseksemulo" (se vi estas), "mi estas feministo", "mi estas komunisto", "mi estas argentinano aŭ ruso" aŭ "katoliko", ktp, vi ĉesas percepti, aŭ esti justa - se vi preferas - rilate tiun kompleksan movon de realaĵoj, kio vi estas.

Vi povas esti inteligenta aŭ stulta, ekzemple, en mal-similaj okazoj. Tio ne faras vin inteligenta aŭ stulta por ĉiam.

Ni devas esti raciaj kaj diferencigi la vortojn disde la objektoj aŭ realaĵoj (emociaj, sociaj, ekonomiaj, konaj, ktp), kiujn tiuj vortoj aludas.

Ni devas distingi inter priskribo kaj inferenco.

Sed, por ekkontakti la realon tiel, kiel ĝi estas, ni devas iri - trans la vortoj kaj la racieco mem (sen perdi ĝin) - al la "psikologia kampo" de la unueca perceptado.

Nia eduko kontaktigas nin kun vortoj antaŭ ol ni kontaktas kun la bestoj, objektoj kaj aliaj, kiujn ili prezentas.

Dum la unua grado de la mezgrada lernejo oni diris al mi, ke "Budho estis sanktulo de Hindujo". Mi ne sciis, kio estas Hindujo kaj mi ne sciis, kio estas sanktulo. Neniu iam diris al mi, kio estas sanktulo, aŭ oni evitis la taskon per konvenciaj frazoj, ekzemple : "Sanktulo estas iu, kiu faras la bonon".

En la tria klaso (mi estis naŭjara) mi eltrovis la vorton "ornitorinko" (aŭstralia marsupialo). Nun mi estas kvardek-jara kaj ankoraŭ ne vidis eĉ unu ornitorinkon.

Sed, plej malbone, ni estas trejnataj por ripeti vortojn kiel "Dio", "honoro", "virto", "respondeco", "honesteco", sen enprofundiĝi en iliajn signifojn, kaj ni pasigas la vivon, ripetante ilin sen scii, kio ili estas, nek kion ili fakte implicas.

Kiam vi koleriĝas kun via edzino kaj nomas ŝin "stultulino", vi projekcias enhavon de via memoro post asociado kaj komparado de tiu enhavo kun aliaj. Vi priskribas nenion.

Vi faras inferencon. Via parola reago ne estas io absoluta ; ĝi estas io relativa kaj dependa de via propra emocia stato. Vi falis en la dualan kvaliton de la procezo META : la komparo de tiu ĉi "stultulino" kun aliaj stultuloj, aŭ de la stulteco kiel kontraŭa al la inteligenteco.

La matematikaj indicoj, la datoj kaj la esprimo kaj tiel plu montras al ni klare (per la lingvo), ke la aferoj ŝanĝiĝas, kaj ke estas malfacile diri ĉion pri io.



Ikso (X) estas indico kaj povas signifi numeron aŭ substantivon, ekzemple :

$X_1 = 9$	$X_1 = \text{Mia domo}$	$X_1 = \text{Rubén}$
$X_2 = 118$	$X_2 = \text{Via domo}$	$X_2 = \text{Petro}$

La indicoj ne havas identecon, sed la numero 9, mia domo kaj Rubén havas identecon.

La datoj nin memorigas, ke la tempo ne estas grava, sed ekzistas malsamaj tempoj (aŭ ke la tempo ŝanĝiĝas) kaj ne ekzistas du tempoj (datoj) samaj.

La indicoj, la datoj kaj la esprimo "kaj tiel plu" povas esti mnemonikaj sojloj al la unueca perceptado.

Cassius Keyser, en sia artikolo "La Matematiko kaj la semantika scienco" diras, ke ni parolas pri "spaco", "tempo", "emocio" kaj "inteligenteco", kvazaŭ ni scius, ke ili estas aferoj perfekte disigitaj aŭ disigeblaj.

En la nova paradigmo en Psikologio ni scias, ke la kvar konceptoj estas la produkto de la agado de sama procezo (la procezo META).

En la realo, ne eblas disigi tiujn kvar terminojn : eblas nur fari tion je nivelo de abstraktado nur parola.

Alfred Korzibsky, en sia libro **Scienco kaj saĝeco. Enkondukon en la ĝeneralan semantikon kaj la nearistotelajn sistemojn** asertas, ke estas "sekurekrimedo" uzi la streketon en tiuj okazoj, tio estas, ekzemple : evoluo (aŭ problemo intelekta-emocia).

Ankaŭ la uzo de citkomoj, kiel ekzemple kiam ni skribas : evoluo "emocia", nin memorigas, ke la procezo ne estas nur (aŭ fragmente) emocia.

La fakto, ke ni ne povas vidi "ion" en iu momento kaj en iu loko, montras al ni, ke la tempo ne povas esti disigita disde la spaco. Laŭ Wendell Johnson, ĉiuj lingvaj devenintaĵoj el la verbo "esti" devus esti inter citkomoj.

Tio ĉi helpas nin ne vidi la aferojn "tro identaj al si mem".

En la komunikado inter vi kaj mi devas esti memvideble, ke la vortoj estas indicitaj kaj datumitaj, foje disigitaj per streketoj aŭ apartenantaj al unuopaj komencliteroj, kaj kvankam ni ne diru "kaj tiel plu", vi jam scias, ke "ne ĉiam estas ĉio dirita", kaj ke "ne ĉion oni povas diri".

Tiel, kvankam ni ne modifu la lingvon (kun ĉiuj ĝiaj difektoj), ni modifas almenaŭ nian sintenon kaj favoras la komunikadon.

Tiu sinteno estas la sojlo de la unueca perceptado.

Ekster tiu psikologia sinteno la malakordoj, vundoj,

traŭmoj, koleroj kaj ĉagrenoj inter la homoj, kaj eĉ inter la nacioj, estas neeviteblaj.

A : Ĉu vi povas doni al mi konkretan ekzemplon pri tiu maniero pensi kaj komuniki ?

RFG : Bone, kiam vi diras "Petro estas bona", la vorton "Petro" oni devas indici, ĉar ekzistas Petro, kaj Petro, ktp, en malsamaj momentoj, kun malsamaj karakteroj.

Vi jam datumis vian aserton, ke "Petro estas bona", kiam vi scias, ke Petro estas malsama en malsamaj momentoj, tagoj, jaroj, k.c. Vi scias, ke kiam vi diras "bona", vi ne diris ĉion pri Petro, kaj kvankam vi ne diras "kaj tiel plu", vi scias, ke oni povas diri multe pli pri li (kaj ne ĉiam "bona").

Estus konvene, se vi estus skribinta, ke vi metus la vorton "estas", en la frazo "Petro estas bona", inter cit-komojn, ĉar ĉio, kion ni ĵus diris, montras al ni, ke la verbo "esti" mem estas ne io senmova sed moviĝanta.

Niaj "fiksaj" ideoj malebligas al ni vidi la realon moviĝantan. Kelkaj amikoj de Galilejo rifuzis rigardi la lunojn de Jupitero per lia teleskopo, ĉar ili ne volis ofendi Aristotelon, kiu diris, ke Jupitero ne havas lunojn (aŭ satelitojn).

Kiu estis Galilejo por ofendi la grandan Aristotelon ? Nur herezulo de la Eklezio !

La unuaj individuoj, kiuj rigardis spermatozoon en la mikroskopo, ĵuris esti vidantaj etan homon "envolvitan" ene de la kapo de la spermatozoo, ĉar ili estis influataj de la ideo pri la "homonkulo" (la homonkulo estis eta mikroskopa hometo, kiu kreskis elde la utero mem por estiĝi la maturan homon).

Tiuj ĉi personoj ne akceptis la transformiĝon de ovo en homon laŭ diversaj stadioj (epigenezo).

La ideoj, eĉ kiam ili estas tre raciaj, iĝas neutilaj - kaj eĉ malutilaj -, kiam ni pretendas starigi kontakton kun la movo mem de la realo. Tiu ĉi kontakto eblas nur en unueca perceptado.

## DIALOGO PRI LA MEDITADO

La patro kaj lia filo turnsvingis turbon. Kiam la turbo rotaciis rapidege kaj perdis siajn kolorojn kaj ŝajnis mistere kvieta kaŭze de sia movo, la infano haltigis ĝin inter siaj fingroj kaj ĝis proksimigis al siaj okuloj. La patro demandis : "Kial vi haltigis la turbon?".

La infano respondis : "Ĉar mi volis vidi, kiel ĝi moviĝas".

Alparolanto : Estimata Doktoro Feldman Gonzalez, mi legis vian artikolon pri "La Psikologio de la 21a jarcento", kiun oni disdonis dum unu el viaj prelegoj universitataj en Karakaso. Mi konfesas al vi, ke min okulfrapis la supraĵeco, per kiu vi pritraktas la temon de la meditado, analizante ĝin nur laŭ la lingvistika kaj etimologia vidpunktoj. Aŭskultinte vin paroli dum tri aŭ kvar horoj en la Centra Universitato de Venezuelo, montrantan energion kaj entuziasmon enviindajn kaj manifestantan egan kapablon sintezi, mi iel seniluziigis, kiam vi malembarasiĝis je la grava temo de la meditado, dirante, ke la vorto devenas de la latina "mezuri", kio estas "kompari kun ekstera ŝablono", kaj vi diras, ke en sanskrito **dhyana** signifas "reflekti", sed vi neniel enprofundiĝas en tiun lastan signifon.

R. Feldman Gonzalez : Mi ŝatas la fervoron de via kritiko ; mi vidas, ke vi donas al tio - la meditado - la gravecon, kiun ĝi meritas.

Sed, unuavice, vi devas akcepti, ke mi diras ion alian pri meditado en tiu artikolo.

A : Jes, sed ĝi ne estas - eĉ minimume - sufiĉa. Mi estas certa, ke vi scias pli pri la temo, ol tion, kion vi diras en tiu artikolo.

RFG : Eble, sed ne forgesu, ke la artikolo nomita (far kelkaj bonaj amikoj kaj iu ĵurnalistino en Karakaso) "La Psikologio de la 21a jarcento" estas simpla klopodo resumi la libron, kiun mi preparas pri "La nova paradigmo en Psikologio".

Ĝi estas nur tio : resumo. Mi proponas al vi, ke ni sonbende registru tiun ĉi dialogon, kiu estos tiel longa, kiel plaĉos al vi, por ĝin inkluzivi en mian libron.

A : Ne interesas al mi, ĉu vi publikigos ĝin aŭ ne, sed ja interesas al mi serioza dialogo kun vi.

RFG : Mi vidas, ke ni parolas la saman lingvon... Dum iu el la pluraj personaj kontaktoj, kiujn mi tenis kun Jiddu Krishnamurti, dum kelkaj horoj, mi diris al li, ke estas bedaŭrinde, ke li uzas la vorton meditado, ĉar ene de la kunteksto de la mesaĝo de Krishnamurti "meditado" estas io tute malsama al tio, kion ĉiuj interpretas kiel "meditadon". Krishnamurti ridis sincere kaj ripete diris : "Quite, quite". Tio, en la angla lingvo parolata en Anglujo, estas neformala maniero de konsento kaj akordo.

A : La meditado, kiun proponas Krishnamurti, estas "riceviva meditado".

RFG : Kaj tio signifas, ke vi bone klasifikas al Krishnamurti.

Nun mi demandas, ĉu vi legis lian verkon vere serioze. A : Eble ne tiom longe kaj serioze, kiel Krishnamurti meritas. Sed mi venis por paroli ne pri Krishnamurti sed pri meditado ĝenerale.

RFG : Nu, ni komencu per viaj difinoj kaj klasifikoj de la vorto "meditado". Mi divenas, ke vi havas ion en via menso kaj se vi tion kunpartoprenas, ni povus ekiri de tie.

A : Bonvole. Mi kredas, ke se ni studus ĉiujn sistemojn de meditado en la mondo, ni povus saĝe klasifiki ilin laŭ sistemoj de koncentriviga meditado kaj sistemoj de riceviva meditado.

La sistemoj de koncentriviga meditado sin bazas sur enfokusiginta atento, sur la diskursiva penso, sur la disiĝo inter subjekto kaj objekto. Ekzemple : la **koans** de la **za-zen** en Zen-budhismo, emfazitaj far la Zen-skolo **rinsai**.

Oni supozas, ke la koncentriĝo sur objekto determinas malaperon (eventuale) de la disiĝo inter la observanto kaj la observataĵo, ĉar la meditado estus absorbata de la objekto, pri kiu li meditas. Ekzemple : la hinda **samadhi**, la budhisma **jhana**, la kristana ekstaza meditado, la "enstato" de Mircea Eliade en lia libro **Jogo, senmorteco kaj liber-eco** (Universitato de Princeton, 1969) kaj la libro de Feuerstein titolita **La esenco de la jogo** (Grove Press, 1974) RFG : Kiel vi legis en nia artikolo kaj aŭdis en niaj prelegoj, en unueca perceptado ne ekzistas disiĝo inter subjekto kaj objekto, kaj neniu el ili iĝas grava.

La sensa bildo aŭ la psikologia prezentado de la objekto ne estas gravaj. Ankaŭ ne la objekto estas tio, kio gravas.

En unueca perceptado, vidi estas pli grave ol la observanto kaj tio, kion li vidas.

A : Bone, sed kiel diras Robert Ornstein en **Psikologio de la konscio** (Freeman Press, San Francisko, 1972) : "Kiam vi koncentriĝas, vi fermiĝas al la stimuloj, sed la rezultato estas malfermo de la konscio". Tiu ĉi malfermo estas la riceviva meditado.

RFG : La procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika (META), kreinto de la "mio", estas esence la linia movo de la menso kiel konsekvenco de la interrilatoj de la organismo kun ties medio ekde la utero mem. La procezo META, kiel vi - espereble - aŭdis min diri, estas la kreinto de la paradokso.

La unueca perceptado inkluzivas (aŭ ampleksas) la paradokson, kaj tiu mensa movo (kiu estas konsekvenco de la

respegulado de la baza universa naturo kaj la plej natura mensostato) estas la nura, kiu povas kompreni (kaj transcendi) la paradokson.

La paradokson oni ne transcendas je ĝia propra nivelo ; necesas perceptiva transformiĝo de la menso (aŭ transformiga percepto), por ke tio okazu. Tiun transformiĝon ni nomas triangula konscio aŭ unueca perceptado, en holokinetika Psikologio.

Tiu triangula konscio de la unueca perceptado ne estas perturbita konscistato sed, ni ripetas, temas pri la plej natura mensostato.

A : Sed tiu transformiĝo okazas en la Zeno per la uzado de la **koan**. Ekzemple la **koan** : "Aŭskultu unumanan aplaŭdon" estas tiel malklara por nia racia kompreno, ke tiu ĉi ekspensas diskursive, linie - kiel vi diras -, sed baldaŭ la raci-eco vidas sian propran senutilecon kaj komencas agi la riceviviga meditado, aŭ tio, kion vi nomas unueca perceptado, kiu estas - esence - atento daŭrigata sed ne enfokusigata.

Ĉu vi akceptas la paralelecon ?

RFG : Tiu estus la nura difino akceptebla por egaligi vian terminon "riceviviga meditado" al la unueca perceptado, kvankam unueca perceptado estas eventuale pli ol la atento daŭrigata kaj malenfokusigata (aŭ pasiva atento), per kiu ĝi komenciĝas.

La atento sen fokuso, aŭ pasiva gardo, estas nur la unua paŝo de la unueca perceptado.

A : La atento sen fokuso estas la unua paŝo kaj la lasta paŝo.

RFG : Tiun frazon mi multe ŝatas. Ĝi enhavas sanan perceptadon de paradokso.

A : Alia sama maniero vidi tion ĉi estas, vidi la du meditmanierojn, pri kiuj mi parolas, ne kiel kontraŭajn, sed kiel komplementajn.

RFG: Mi ne estas tiel certa, kiel vi ŝajne estas.

Mi klarigas en miaj verkoj, kiuj elmontras nur tion, kio estis detalege pruvita de mia propra sperto, ke la "riceviviga meditado" (uzante nun vian lingvon) favoras la koncentriĝon, sed mi neniam vidis, ke estas inverse.

Estas tre facile fali en diversajn formojn de iluzio kaj hipnoto, kiam vi praktikas la koncentrivigan meditadon aŭ fokusigintan atenton. Mi diris kaj skribis ripete, ke la unueca perceptado estas grava faktoro de ekvilibro kaj mensa regenerado, kiuj favoras ĉiujn mensomovojn, inkluzive

la koncentriĝintan atenton, la memoron, la emocian ekvilibron (ataraksion(37) ) kaj eĉ la visceran agadon mem.

La unueca perceptado estas, cetere, la fruktodona grundo por la apero de la sendistorda perceptado, tio, kion ni nomas sfera aŭ kerna konscio, la menso aganta kiel spegulo plata kaj bone polurita.

A : En la Zeno oni parolas pri tiuj okazaj aperoj de sendistorda perceptado per la nomo **satori**.

RFG : Min ne kontentigas la komparprocezo, kiam ni parolas pri unueca perceptado. Eltrovi la ekvivalenton de la unueca perceptado (se ĝi ekzistus) ne helpas nin esti vere en unueca perceptado.

Vi ripete aludas tiun allogan formon de Budhismo, kiu estas la Zen-budhismo, sed, ĉu vi estis en rekta kontakto kun Zen-lernejo ?

Kie estas iu Zen-instruisto ?

Ĉu vi bezonas iri al Japanio ?

Aŭ ĉu vi atendas, ke li venu tien ĉi, al Karakaso kaj vin ekspluatu: finance kiel kompenso pro la **satori** ?

Kiel vi rekonas sinceran instruiston ?

Kaj, laste, ĉu vi fakte bezonas instruiston ?

Temas nur vidi kiel moviĝas nia propra menso !

Kiam ni komparas la observadon de la tuta movo, kiu okazas en unueca perceptado, kun iu ajn alia parolo aŭ disciplino de la pasinteco, aŭ de la Oriento, ni falas en simplan intelektan amuzon, ĉar anstataŭ observi, ni pensas nur pri la observado.

A : Sed, pensante pri la observado, ni povas lerni observi pli bone.

RFG : Ni observas en unueca perceptado aŭ simple ni ne faras tion (ne ekzistas pli bona unueca perceptado).

Ni povas fari du aĵojn, kiel amikoj, kiuj serioze esploras :

1) Eltrovi tion, kio la unueca perceptado ne estas (kaj mi verkis artikolon pri tio, kun tiu titolo)<sup>3</sup> , sed ankaŭ

2) ni povas vidi kune en unueca perceptado.

Ĉu ni kapablos fari tion ĉi hodiaŭ ?

A : Kiel ni faros tion, se ni ne havas metodon, kaj se vi rifuzas uzi kiujn ajn metodojn ?

RFG : Ekzistas maniero, sed ne metodo aŭ tekniko. La primeditaj metodo kaj tekniko rezultas el la sama mensa movo kiu igas vin klasifiki la meditadon laŭ koncentriviga aŭ riceviviga.

Laŭ maniero klasifikiga (mnemonika) aŭ duala, ambaŭ meditmanieroj iĝas parto de la "menso" kiel propeco deven-

inta de interagado inter la organismo kaj ties medio. Ambaŭ meditmanieroj iĝas (en tiu duala mensa agado) simplaj movoj inter la observanto kaj la observataĵo.

Vi ankoraŭ ne estas en tiu alia mensa movo, kiu estas "la movo en la spegulo", se vi preferas, la movo de la totalo perceptata unuece (aŭ en unueca perceptado). En unueca perceptado estas mensa rekonstituo de la baza kosmonaturo, tio, kion David Bohm nomas honokinetiko (totala movo).

En unueca perceptado la menso ne estas nur interagado sed rekonstituo; estas ne nur eluzado sed ankaŭ regenerado de energio; estas ne nur multobleco (de mnemonikaj enhavoj) sed ankaŭ unuo (perceptiva).

En unueca perceptado vi estas la totala movo de la menso kaj medio, de la individuo kaj la homaro, sen disigo inter ambaŭ.

En unueca perceptado vi ne disigas la menson disde la medio, nek la individuon disde la homaro.

La interagado - riceviva aŭ koncentriva - estas ankoraŭ la kredo aŭ la supozo, ke la observanto ne estas iluzio (funkcia aŭ ne).

La totala movo (holokinetiko) estas la foresto de la procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika (META) kaj de ĝia produkto en la tempo, la "mio" aŭ "egoo" (supera aŭ malsupera).

Mi preskaŭ dirus, ke "foresto" ne estas tie ĉi la taŭga vorto, ĉar la enhavoj de la procezo META povas aperi kiel parto de tiu totala movo, kvankam tiuj enhavoj baldaŭ perdiĝas denove en tiu ordo unuiga kaj moviĝanta, kiun ni nomas unueca perceptado.

La enhavoj de la procezo META, la mediaj stimuloj kaj la mensa totala movo (holokinetiko) formas unuon, do, kaj pro tio ni parolas pri "triangula konscio", kie la tri elementoj interrilatas sendepende de tempo kaj spaco, t.e. ne sinsekvas linie, sekvence, unu la alian.

Stimulo, memoro kaj unueca perceptado estas partoj de unu sola rivero (la holokinetiko). En tiu rivero elŝprucas la kirloj, kiuj estas la enhavoj de la mnemonika procezo. Tiu ĉi estas mensa procezo, kiu disiĝas disde la totala movo (same kiel la kirlo en la rivero) kiel identeco aŭ "mio", sub formo de kaŭzo aŭ efiko, tempo, spaco, ktp, sed la fragmenta mnemonika movo eltiras sian energion ankaŭ el la totala movo de la rivero (la unueca perceptado de la holokinetiko).

La rivero estas la unueca perceptado, kie vi kaj mi ne rigardas unu la alian kiel disigitajn, vi ne vidas vin kiel disigitan disde la homaro ; tio ekstera kaj tio interna estas unu sola movo.

A : Kaj en tiu totala movo de la unueca perceptado eblus ankaŭ ke la persona nekonscio subpremata iĝu atingebla por la konscio, ĉu ne ?

Nia konduto dependas grandparte de faktoroj konsciaj (ĉu mediaj, ĉu aŭtogenaj), nekonsciaj kaj arketipaj agantaj simultane. En unueca perceptado ekzistus konduto pli spontana, malpli dependa de la pasinteco proksima, aŭ malproksima, tiom de la individuo kiom de la specio.

Mi kredas, ke tiu estas almenaŭ unu el la kialoj de tio, kion vi nomas "nia normala stato de aŭtismo", kaj de tio, ke ni bezonas tro krudajn stimulojn por reagi antaŭ la realo, ĉar ni estas kaptitaj, duondormantaj kaj stultigitaj en tiu granda kvanto da enhavoj de individua aŭ kolektiva memoro, proksimaj aŭ malproksimaj.

Pro tio estas tiel grave koncentri la energiojn en la meditado (ne gravas kia ĝi estu) kaj ne sin distri aŭ dormiĝi per la mondumaj aferoj.

RFG : Se vi diras "sin distri per la mondumaj aferoj", vi ankoraŭ falas en la dualecon de la mnemonikaj enhavoj (inkluzive de nia eduko), kiuj kredigas al ni pri la disigo inter tio interna kaj ekstera, mondo kaj psiko, kaŭzo kaj efiko, hieraŭ kaj morgaŭ, ni kaj ili, kaj cetere.

Unu el miaj pacientoj - trompote de komerca entrepreno pri meditado kaj de ĝiaj gvidantoj aŭ improvizitaj guruoj - plendis, ke li dormiĝis aŭ distriĝis, kiam li klopodis koncentriĝi sur mistera sono magia kaj "alte individuigita", kiun li aĉetis tro multekoste, kaj kiun li devis ripeti. Tiu paciento, kiu klopodis eskapi de kaosa situacio familia kaj labora kaj de sia propra reaga deprimio, montris nenion alian ol paradoksan saĝon, kiam li dormiĝis aŭ distriĝis.

La procezo META, kiu estas ĉio, kion ni ŝajne konas pri la homa menso, lacigas kaj enuas per siaj propraj projekcioj kaj siaj banalaj celoj. Post ĉio, subtilmaniere, la observanto konas tiujn celojn kaj projekciojn multe da tempo antaŭ ol imagi kaj multe da tempo antaŭ ol "alveni".

Kiam mia enuanta kaj deprimita paciento komprenis la naturon de la horizontala konflikto (dum malpli ol 10 horoj da psikoterapio), lia konflikto kaj lia deprimio finiĝis, la familiaj problemoj finiĝis, kaj ankaŭ li porĉiame liberiĝis de la ekspluatado de la guruoj kaj de iliaj multekostaj



metodoj nomitaj "primeditaj".

Aliflanke, la teknikoj de koncentriĝo sur objekto, sono, bildo kaj aliaj, estas parto de la sama unudirekta movo inter du punktoj de dualeco. Tiu unudirekta movo estas la linia konscio de la procezo META. La malsupera "mio" (numero unu), kiu koncentriĝas sur la supera "mio" (numero du). Ekde tie ĉi (numero unu) mi iras tien (numero du). Mi estas tio ĉi (numero unu) kaj mi devas esti tio (numero du). Tio ĉi (numero unu) estas konsekvenco de tio (numero du), k.c.

Ĉu vi vidas la trivialan dialektikon de la linia movo de la procezo META ?

Koncentri la atenton sur nur objekto impresas nin (kelkfoje) kvazaŭ la intelekta agado estus finiĝanta. Ne okazas tiel ; kion vi faris, tio estas alporti (en la koncentriĝo) la tutan intelektan agadon ĝis ĝia funkcia unuo - kiu estas la intelekta agado inter iu parto, kiu estas la observanto, kaj alia parto, kiu estas la observataĵo.

Por reveni al la komenco de tio, kion ni ĵus diris : tiu procezo META estas tiel konscia kiel nekonscia. Rimarki la enhavojn de la nekonscio estas simple perdi la teruran timon vidi, kiun oni sentas. Simple vidi. Vidi sendepende de tiu, kiu vidas kaj sendepende de tio, kion li vidas.

Mi esperas esti esprimanta klare tion ĉi, kiu estas la nura sojlo de tio, kio konstituas la veran transcendecon. "Transcendeco" estas "iri trans" la peza kondiĉado de nia memoro, nia imago, niaj ideoj pri Oriento kaj Okcidento (dualeco), niaj emocioj, ĉu "pozitivaj", ĉu "negativaj" (alia dualeco), kaj niaj reagoj visceraj, generilaj, atakemaj, ktp.

A : Tio, kion vi diras, havas grandegan signifon kaj mi vidas, ke ĝi ne estas simple io memore lernita. Sed mi praktikis la **shikan-taza**-n de la Zeno, kiun instruis al mi serioza disĉiplo de la Soto-skolo, kaj ĉiuforte kiam finiĝis seanco de "simpla sidiĝo" (**shikan-taza**), mia sensa perceptado estis pli intensa. Vi povos ĝin nei, sed por mi tio estis realo. RFG : Mi ne povas tion nei, ĉar mi scias (laŭ propra sperto), pri kio vi parolas. Simple, mi deziras klarigi, ke la sensa perceptado estas simultana al la unueca perceptado, sed eĉ sensa perceptado tre intensa (kiel intensa orgasmo) povas perfekte ne esti unueca perceptado.

A : Mi vidas, ke tio estas pli ol simpla argumento aŭ obstino, sed vi persistas en la senvalidigado de la signifo de la koncentriviga meditado.

RFG : Ĝi havas malgrandan valoron ene de la agado inte-

lekta (aŭ linia) de la procezo META, ĉar igas tiun procezon iom pli orda aŭ malpli senorda.

En unueca perceptado vi estas en totala ordo, kiu bezonas neniun malgrandan intencan ordon pere de la koncentriĝo.

A : Ĉu vi konsideras la teknikon de la "mensa **stop**" kiel koncentriĝmanieron ?

RFG : Kion vi kredas ?

A : Mi kredas tion, kion mi vidas en mi mem : kiam mi praktikas la "mensan **stop**", mi surprize trovas, ke mi estas en la "procezo" formuli koncepte la aferojn (ĝenerale laŭ la sama ripetita maniero), mi ĉion kolorigas per miaj konataj emocireagoj, gepatrahejme lernitaj ; mi konstruas - unuvorte - la realon miaplaĉe aŭ laŭ programo, trejnado, libreto aŭ hipnoto, surbaze de kiuj mi vivas, pensas kaj agadas.

Per la "mensa **stop**" konscie praktikata mi vidas la tutan mekanismon de mia nerva sistemo vere funkcia kaj estas - mi kredas - plia oportuno liberiĝi de tiu mekanismo mal-aŭtomatigi min, almenaŭ iomete.

RFG : La "mensa **stop**" povas empirie konigi al vi la "funkcian enfalilon" de la procezo META.

Tamen, sufiĉas momento de unueca perceptado, por ke vi vidu la enfalilon kaj ne tuŝu ĝin, kiam ne estas nepre necese.

Necesas tion fari nur 20 minutojn ĉiutage, intermite.

Vi ne bezonas halti ripete ĉe la enfalilo (per la "mensa **stop**") por vidi ĝian naturon.

Tio, kion ni ĵus diris, estas esence (esprimita alimaniere) tio, kion Sigmund Freud postulis, formulinte siajn unuajn psikoanalizajn konkludojn.

Bedaŭrinde, Freud mem pruvis je la fino de sia vivo (kaj skribe ĝin lasis), ke tio ĉi ne necese estas tiel. Vi povas koni ĉiun stangon el via kaĝo sen esti libera de la kaĝo. Ĉiuj trompaĵoj, metodoj aŭ ruzaĵoj de ni skizitaj, devenas de tiu kaĝo kaj apartenas al la kaĝo.

Ni devas kompreni, ke ni profunde timas la unuecan perceptadon, tion, kion vi nomas "riceviviga meditado" aŭ sensa malfermiĝo aŭ nekoncentriĝinta atento, ne enfokusiĝinta.

La Eklezioj diras al vi : "Ne malfermiĝu mense, ĉar vi estos invadita far la diablo". Tio estas parto de la malnova homara timo "forlasi tion konatan" (sen vidi, ke forlasi tion konatan estas alia iluzio).

Mi aŭskultis prestiĝajn meditmajstrojn dirantajn, ke la meditado povas forigi la "nekonsciajn defendojn" (laŭ la Freŭda lingvo) kaj, malfortigante la kontraŭ-kateksion, multe da nekonscia materialo (sekse, atakema, ktp) povas invadi la konscion kaj "perforti" la malzorgeman meditanton al nekonvenaj agoj aŭ teruraj statoj de anksieco.

Tio ĉi estas simple la timo al la diablo moderne esprimita, nenio alia ol la timo - naskita de la "mio" - al la unueca perceptado, kaj kiu timas malaperi.

La esenca funkcio de la "mio" estas la kontinueco, kaj - ĉar la energio de la "mio" devenas de la totala movo (mensa holokinetiko) - estas kvazaŭ intuicia kono de la memfino (de la "mio") en unueca perceptado.

La timo (de la "mio") subtenas sian funkcion pludaŭri (kiel "mio"). Tiu "mio" intencas konfirmiĝi ĉiupaŝe, krude aŭ subtile, kaj ĝi rezistas la unuecan perceptadon, rezistas sian memfinon.

Ni memoru, ke - kurioze - "Satano" en sia origina lingvo signifas "digon" aŭ "reziston".

Bedaŭrinde, ni ne rimarkas, ke estas nenio timinda en unueca perceptado, kie la konsciaj kaj nekonsciaj enhavoj de la procezo META malmergiĝas en tipon de konscio aŭ mensa movo el tre malsama naturo.

En tiu sama totala movo mem (sencentra) de la unueca perceptado perdiĝas ĉiuj enhavoj mergiĝintaj. Estas kvazaŭ la stangoj de la kaĝoj dissolviĝus, kvankam ili remergiĝus iam, kiam la menso decidus moviĝi denove en la linian (dualan) movon de la procezo META.

A : Pli ol decido ĝi estas kutimo.

RFG : Ĝi estas ambaŭ aferoj. Vi decidus aŭ elektas fari ion, kion vi fakte ne povas ne fari.

Kelkajn aĵojn oni faras kutime, kaj ili estas neutilaj aŭ detruivaj : trinki alkoholaĵojn, fumi tabakon, uzi psikostimulajn drogojn, helpi sin per fantazioj aŭ seksaj strangaĵoj - inkluzive de la masturbado - , rutinoj de emocia reago, nutraj kutimoj, aŭ modoj, ktp.

La kutimoj, same kiel la nekonsciaj aŭtomatismoj, originas de la neŭrologia skizo mem, kies celo estas ŝparigi al ni energion, sed Freud mem jam divenis la paradokson, ke la psiko povas aranĝi energion nur kie ĝi estas necesa, inversrilate la numeron de nekonsciaj aŭtomatismoj, kun kiuj ĝi kompromisis.

Alivorte, ju pli nekonscie vi agas, des malpli da energio vi povos movi por tio farenda.

La unueca perceptado transformas la aŭtomatan rigidicon de la procezo META kaj de ĝia produkto, la "mio", en moviĝantan flekseblecon.

La unueca perceptado transformas la unudirektan movon (dualan aŭ linian) en sencentran totalan movon. Tion ĉi oni perceptas objektive kaj konscie kiel plian mensan kaj fizikan energion uzeblan.

La unueca perceptado estas libera energio pli ol energio moviĝanta en neŭrologiaj cirkvitoj (genetike kondiĉitaj), kiuj direktiĝas en muldiloj de reago profunde enradikiĝintaj en la pasinteco.

Elde tie, povas aperi la mensa kerno (vorto, kiun oni elektis, ĉar la kerno estas malofte la centro) kaj tio estas rekta perceptado de la realo tute ne distordita de la pasinteco. Kelkaj nomas ĝin kreiveco, sed la kreiveco estas nur minimuma aspekto de la kerna aŭ sfera konscio.

Ekzistas esprimoplena figuro, kiu asertas, ke "kiam vi iĝas unuo kun la vojo, vi atingas la celon de la meditado".

Mi kredas, ke estas pli bone ĝin forlasi kaj uzi tiun ĉi : la unueca perceptado estas areo sen vojo kaj sen celo. A : Tio estas malfacile komprenebla, sed... ankaŭ deziri kompreni povas esti kutimo aŭ inklino, ĉu ne ?

RFG : Ekzistas inklinoj (aŭ kutimoj de rilato inter la observanto kaj la observataĵo) al personoj, aĵoj, ideoj, povo, prestiĝo, profito, stimuloj kaj plezuro.

Pli subtila inklino estas, tamen, la inklino kompreni. Kompreni la aferojn estas, ĝenerale, kompari ĉiun malmergiĝantan enhavon kun tiuj aroj da enhavoj, kiuj estas niaj formuladoj de la realo, nia kosmovidado konscia aŭ nekonscia.

Se ni komparas la malmergiĝantan enhavon kun kredo, kosmovidado aŭ formulado, kiu iĝis nekonscia, tiam tio, kion ni havas, estos nur afekcia reago (aŭ enhavo) laŭ pravigo aŭ kondamno de tiu unua enhavo, kiu malmergiĝis.

La konscio de la totala movo (aŭ unueca perceptado) estos, ĉi-kaze, rimarkado de la unua enhavo, de la afekcia reago kaj de la ebleco kompari ĉiun enhavon aŭ reagon kun tiu aro da enhavoj (la kosmovidado aŭ la formulado). La kosmovidado aŭ la formulado povas esti intermite kaj nedaŭre funkciaj. Necesas distingi inter kompreno en unueca perceptado kaj laŭkompara kompreno.

Subtila maniero de rezisto al la unueca perceptado estas la ideo (kiam oni apenaŭ eniras en la unuecan sperton), ke "mi ne scias kion diable signifas nenio"

La sento de izoliteco, soleco, deprimo kaj anksieco (ĉio kune), kiu povas akompani tiun ideon, estas unu el la lastaj rifuĝejoj de la procezo META por serĉi la komparon, la direkton (kiun ajn tipon de dualeco), ktp, kiuj ne ebligas la totalan movon.

Tiu ĉi totala mensomovo (holokinetiko) estas rekonstitudo de la realo.

La "mio" simple konstruas la realon siaplaĉe aŭ laŭ siaj timoj, kiel prave asertis Piaget kaj Rorschach interalie. A : Plaĉas al mi esti parolinta kun vi pri meditado, kiel ni faris. Mi kredas, ke vi igis min mediti.

RFG : Vi alportis la temon, kaj farinte tion tiel honeste, vi faciligis tion, ke ni vidis kune iel profunde.

Se vi estas serioza, t.e., se vi ne serĉas la kvar "P" (povon, prestiĝon, finanĉan profiton aŭ nur plaĉon), vi vidos, ke la du primeditaj metodoj (koncentrividaj aŭ ricevividaj) - pro tio, ke ili ne entute ampleksas la bazan supozon, ke "fakte ekzistas 'mio' " - naskiĝas kaj finiĝas en tiu "mio" laŭ maniero preskaŭ masturbeska. La primeditaj metodoj devenas de iluzio.

Tiu ĉi iluzio estas funkcia, tamen, en certa kunteksto sociekonomia kaj kultura, dum kelkaj minutoj ĉiutage, intermite.

Ĉar ili rilatas al tiu iluzio, la **telos** (aŭ supera celo) de la primeditaj teknikoj estas ankaŭ neŭroasociiva fantazio kun certa nuanco vegetativa kaj emocia de trankviliĝo, kiam ili ne kondukas la disĉiplon al tiu stranga formo de timema apatio, kiun oni konas ĉe la Zen-skoloj kiel la "grandan mortintan malplenen", mensan staton ne krizan, kiu igas nin pli influeblaj far la kultura, eduka kaj politika hipnoto de nia maljusta kaj absurda strukturo socia kaj ekonomia.

La unueca perceptado estigos tiun novan homon, kiu konstruos novan socion, novan kulturon kaj novan edukon.

## LA NATURO DE LA MEMKONTRAŬDIRO

Difino pri paradokso.

- 1) Paradokso estas aserto, kiu memkontraŭdiras.
- 2) Paradokso estas ŝajna memkontraŭdiro.

Konaj paradoksoj

La partiklo-ondo. Louis Victor de Broglie antaŭdiris en 1923 ke la materipartikloj montros proprecojn de ondoj.

Tiu ĉi teorio pri la partiklo-ondo estis eksperimente konfirmata en Usono far C.J. Davisson kaj L.H. Germer en 1927.

Erwin Schrödinger ellaboris - kiam li estis 19jara - dum periodo pli-malpli sesmonata, la teorion pri la kvantum- mekaniko. Schrödinger, kiu forpasis la 4an de januaro, 1961, verkis la libron **Mia bildo pri la mondo**, post kiam li sekvis Max Planck ĉe la Universitato de Berlino (kie li kunlaboris kun Albert Einstein). Tamen, li forlasis tiun ĉi prestiĝo- plenan postenon, ĉar li decidis - malgraŭ ke li estis katoliko - ke li ne povas vivi en lando, kie oni faris tiel aĉan kuel- aĵon de persekutado kaj rasekstermo kontraŭ certan aron da homoj, la jardekon de 1930.

La kona paradokso, konjektita de Louis de Broglie, Edwin Schrödinger, Niels Bohr kaj Werner Heisenberg, aperas, kiam ni pensas, ke partiklo estas bone "lokalizita" en la spaco, sed ondo estas "disvastiĝinta" laŭ maniero mal- preciza kaj "sfera" en diversajn lokojn de la spaco.

La konduton de tia sistemo priskribis Schrödinger mate- matike per sia konata ondo-ekvacio. La solvo al tiu ĉi ekvacio distingiĝas de la neŭtonaj ekvacioj pro tio, ke la ondo-funkciojn oni povas rilatigi nur al la probabla okazo de fizikaj okazaĵoj.

La difinita sekvenco de okazaĵoj ĉe la planedaj orbitoj de Newton estas facile videbla, sed en Kvantum-mekaniko tio ĉi interrespondas (se oni povas paroli tie ĉi pri "inter- respondeco") kun la tre abstrakta nocio pri "probableco".

La konceptoj pri spaco, tempo kaj kaŭzeco en tiu ĉi alta ordo de scienca abstraktado, perdas - kompreneble - sian gravecon.

Eksperimentaj paradoksoj.

Dormo samtempe malpeza kaj peza. La dormoesplorado montras interesajn paradoksojn : la dormotipo "S" (sinkron- igitaj) - malprave nomita profunda - prezentas altan pro-

centon (25 %) el malrapidaj ondoj en la elektroencefalogramo.

La 80 procentoj el la nokta dormo estas dormo "S" kaj konsistas el 4 fazoj.

La dormo "D" (dissinkronigita) estas pli longa ĉe la karnovoroj kaj konsistigas 20 ĝis 25 procentojn de la nokta dormo post la unua vivjaro. Tamen, antaŭ la unua vivjaro, ĝi konsistigas 80 ĝis 85 procentojn de la dormo (dormo de la ĵusnaskito).

Tial oni rilatigas la dormon "D" al la primitiva agado de la nerva sistemo nematura.

La dormo "D" estas dormo de sonĝoj (sonĝaj imagoj). Oni nomas ĝin "paradoksa", ĉar - kvankam ĝi estas malpeza laŭ la elektroencefalografia vidpunkto (pro tio, ke ĝi prezentas aktivad-ondojn teta similajn al la elektroencefalografiaj ondoj, kiujn oni atingas dum la maldormostato) - ŝajnas profunda kaj peza en la elektromiogramo, kiu registras atonion aŭ malstreĉiĝon de la dugastra muskolo de la kolo, similan al tiu, kiun oni vidas en la muskola kolapso de malsano konata kiel narkolepsio (aŭ atako de subita dormo), kiun oni rigardas kiel la sekretan respondecaĵon pri multaj aŭtomobilo-akcidentoj.

La dormo "D" estas ankaŭ "profunda", ĉar oni bezonas pli grandan stimulon por vekti la individuon, dum li trapasas tiun ĉi dormofazon (en eksperimenta lingvo oni diras, ke la sojlo de ekscitiĝo estas alta).

Tamen, estas la fazo kvara de la dormo "S" tiu, kiu ĝenerale ricevas la nomon "profunda dormo".

Cerba tavolo kreskanta kaj neŭronoj malplimultiĝantaj. Bennett, Diamond, Krech kaj Rosenzweig desegnis jenan eksperimenton :

Aro da ratoj ricevis grandan stimuladon per ludoj, muziko kaj problemsolvado - kiel labirintoj, kiuj kondukis al la manĝaĵo, kaj same.

Alia aro da ratoj ricevis minimuman stimulon, en medio silenta, malluma kaj relative senmova.

Komparante la cerbojn de tiuj ĉi bestoj breditaj laŭ malsamaj kondiĉoj, oni trovis, ke tiuj de la stimolitaj ratoj prezentis mezureblan dikaĵon ĉe la tavolo, almenaŭ ĉe certaj areoj rilatintaj al la ricevitaj stimuloj. Pro tio, ke la neŭronoj ne reproduktas sin, tia dikaĵo disvolviĝis (kiel oni pruvis per mikroskopaj esploroj) per plimultiĝo kaj kreskado de la dendritaj dornoj kaj plimultiĝo de iliaj

ĉeloj. La neŭronoj mem devis morti grandkvante por ebligi tian plimultiĝon, ĉar estas malmulte da spaco - aŭ eble neniom, kiel sugestas la elektrona mikroskopo - inter neŭrono kaj neŭrono. La cerba nerva histo estas preme "enpakita".

Karl Pribram, aŭtoro de **Lingvoj de la cerbo**, distingas inter : a) cerbaj mekanismoj, b) psikologia funkciado, c) modifado kaj kontrolo de la konduto, kaj d) lingvistikaj kaj simbolaj komunikoj.

Tiu, kiu interesiĝas pri iu el tiuj ĉi kvar areoj, interesiĝos ankaŭ pri la tri aliaj, aŭ devos esplori ilin. La problemo estas, ke ĉiu el tiuj ĉi areoj funkcias per lingvoj aŭ simboloj malsamaj kaj diskoneksaj.

Kondutaj paradoksoj.

Ĝui la penon (aŭ celoj, kiuj iĝas rimedoj). En la futbalo, la celo de la ludo estas meti la pilkon en la golejon de la kontraŭa teamo. Tiu ĉi celo estas la rimedo por atingi la veran celon de la ludo : ĝui la penadon, kiun implicas venki la sennombrajn barojn por meti tiun pilkon en la golejon de la kontraŭa teamo.

Vivi por mortigi. Hejmigita kato, bone prizorgata kaj nutrata, ne nepre vivas trankvilan vivon, dormeman kaj retireman. Ĝi eliras kaj mortigas musojn kaj birdojn. En la naturo la kato mortigas por vivi. La hejmigita kato povas vivi por mortigi. Ekzistas homoj bone pagataj kaj nutrataj, kiuj vivas por mortigi. Oni nomas ilin "teroristoj". Ili diferencas de la kato per tio, ke la kato ne mortigas individuojn de sia propra katespeco ; male, teroristo estas homo, kiu mortigas precipe aŭ ekskluzive aliajn homojn.

Tiun ĉi aberacion pravigos tiuj, kiuj kredas, ke "la celo pravigas la rimedojn", kaj ne vidas, ke ne estas tia vera disigo inter rimedoj kaj celoj. Same kiel estas la rimedo, tiel estos la celoj, kaj la perforto ne sukcesos alporti la veran pacon, sed nur paŭzon supraĵan kaj nedaŭran.

Emociaj paradoksoj.

En la ĉiutaga vivo ni rezistas konsideri - kaj eĉ plie, vidi aŭ percepti rekte - la emociajn paradoksojn, kiuj pli precize estas paradoksoj mnemoniko-eidetiko-emociaj, parto de la unueca procezo, kiun ni nomas "penso"

Amo. Estas malfacile eĉ konsideri (kaj multe pli malfacile senti aŭ kompreni) la fakton, ke ni intermite malamas la



saman homon, kiun ni pretendas ami. La rilato amo-malamo okazas al la homoj pli plensignifaj kaj komenciĝas ekde la rilato kun la propra patrino, poste kun la patro, la amikoj, la edz(in)o kaj eĉ la gefiloj.

En tiuj rilatoj okazas aliaj paradoksoj, kiuj - kvankam ĉiutagaj - estas tre intensaj kaj doloraj.

En mia psikoterapeŭtika konsultejo mi kunpartoprenis la konfesojn de uloj, kiuj helpis elkore siajn edz(in)ojn (pro pura amo) atingi la sukceson ĉe siaj profesiaj aŭ financaj karieroj. Tamen, kiam "la celo estis atingita" kaj la sukceso kronis longajn kaj pezajn penadojn, "la helpanto" sin sentis plenigita de la plej profunda envio kaj eĉ de la plej perturbiga malamo.

Eĉ etaj psikozaĵoj povas okazi antaŭ la "minaco" de la sukceso de la edz(in)o (perceptita kiel streso) ĉe individuo, kiu kontribuis solidare, longatempe, al tiu sama sukceso.

Sendependeco. Ne estas nekutime, ke ulo diras, ke li bezonas sendependecon, sed tiu ĉi sendependeco "ne estas ebla" kiam ne ekzistas persono, kun kiu li starigis rilaton de intensa emocia dependeco, kiu ŝajnas ofte "amo".

Honesteco. Iam pacientino plendis : "La sama honesteco, kaŭze de kiu mi estis tre proksime de mia edzo kaj ni havis tre bonan rilaton, estis la kialo, kiun li invokis por ekседziĝi disde mi. Mi volus malkovri la limon inter la honesteco, kiu unuigas, kaj la honesteco, kiu disigas".

La problemo kuŝas ĉe la mensa kunteksto de kie oni estas honesta. La unueca perceptado estas la nura mensa faktoro, kiu povas transcendi tiun ĉi kaj aliajn paradoksojn.

Sociaj paradoksoj.

Grupoj, kiuj "protektas". Serĉante sekurecon kaj protekton, ni starigas grupojn aŭ komunumojn, kiuj supozeble garantias tion. Serĉante sian sekurecon, la judo kreas nacion (Israelon) kiu estas unu el la plej malsekuraj lokoj sur la planedo. Sennombraj nacioj kaj grupoj kun malsamaj (kaj eĉ antagonymaj) ideologiaj enhavoj kontraŭstaras tiun nacion, kun kruela malamo. Oni ŝcias, ke registaroj tiel faŝismaj, kiel komunismaj, kontraŭstaras egale la ekzistadon de Israelo.

Serĉante sekurecon aŭ protekton, iu persono atakas la **Maffia**-n, kaj fine estas detruata far tiu sama organizo.

La nacio, kiu donas sekurecon kaj psikologian grandecon

postulas, ke ĝiaj civitanoj (preskaŭ matematike periode) mortigu kaj mortu por ĝia pludaŭrado (por la pludaŭrado de la nacio mem).

La lastaj statistikoj pravas, ke la plejmultaj krimoj okazas hejme, fare de iu familiano kontraŭ alia membro de tiu sama familio, en la hejmo mem. Almenaŭ laŭ la statistika vidpunkto, la hejmo estas unu el la plej malsekuraj lokoj.

Terapeŭtikaj paradoksoj.

Iu psikologo konsilis al vidva maljunulo tre deprimita, ke li restu kelkajn tagojn por ripozi en la urbo Miami. Antaŭ ol mortigi sin, la paciento skribis noton, kiu diris, interalie : "La ekstrema soleco kaj la absoluta senaktiveco, kiujn mi travivas, elmontris al mi la ekstreman kaj absolutan mankon de signifo de la ekzistado".

Iu psikiatro sendis sian deprimitan pacienton vidi komikan filmon por infanoj. La paciento plendis, vidinte la filmon : "Kiam mi vidis kiel bela povus esti la vivo, mi eĉ plie deprimiĝis".

La naturo de la paradokso.

La paradokso estas la plej supera malsukceso de la racia penso (eĉ kiam tiu ĉi malsukceso povas havi la konan funkciecon), t.e. "malsukceso", kiu certgrade "sukcesas" (kaj tie ĉi ni havas novan paradokson neeviteblan). La paradokson oni ne povas solvi racie, ĉar determinis ĝin ja la esenca rezonmekanismo.

La dualeco aŭ la polareco estas la esenco de la procezo mnemonika-eidetika-timika, kaj konsekvence - eventuale - okazigas la kontraŭstaron, la konflikton, la antagonismon kaj la korupton, tiom en la psikologio de la persono, kiom en la funkciado de iu rilato inter individuoj aŭ grupoj.

Kiel ni vidas, la paradokso estas la neevitebla rezultato de la enhavoj mnemoniko-eidetikaj, kaj la naturo de tiuj enhavoj estas kona, emocia kaj aŭtonoma aŭ vegeta.

La menso - kun la kulturo kaj lingvo, kiujn ĝi kreis - la emocio kaj la korpo "konspiras" kune por krei enhavojn konsciajn aŭ nekonsciajn, kiuj laste iĝas paradoksaj.

La esenco de la procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika, kiun oni nomas ankaŭ "penso", kaj ĝia produkto la "mio", estas ĝuste la dualeco. T.e., ke la dualeco estas la komuna denominatoro de la penso. Tiu ĉi realo klare elmontras sin sen ia racia peno al individuo en unueca

perceptado. Ni povus diri, ke la "mio" moviĝas en sekvencaj spacoj aŭ dualecunuoj, kiuj fine konsistigas la penson racian, supraracian aŭ malracian.

La "mio", ekzemple, serĉas la sukceson. La sukceso estas ne nur celo de la "mio", sed ĝi psikologie estas - ankaŭ - malvasta spaco, kiu ampleksas de tie ĉi (tio, kio mi estas nun) ĝis tie (la sukceso, la venko, la povo, la riĉeco, ktp). Tio ĉi estas nepre stato de kontraŭstaro (inter tio, kio mi estas kaj tio, kio mi volas esti), kaj ankaŭ fragmenta maniero percepti la ekzistadon.

La "mio", kiu serĉas la sukceson, estas kondamnita renkonti iam la frustracion, kiu estas parto kaj enhavo de tiu serĉado, kiu estas sekvenco de la sukceso-serĉado.

Tiamaniere, kiel ni diris, la "mio" moviĝas inter dualecunuoj kaj iras kvazaŭ "de spaco al spaco" : pasas sekvence de iu dualaĵo al la sekvanta... kiel, ekzemple, en la kazo de la "mio", kiu - frustraciita dum la sukceso-serĉado aŭ tedita de ĝia signifikado - nun dediĉas sin al nova celo, la serĉado de la sankteco, la mensa paco, la transcenda meditado aŭ kio ajn.

Tiu ĉi mekanismo kreas ne nur novan spacon aŭ dualecunuon (de tio ĉi, kio mi estas -1-, mi iras al la sankteco -2-) sed ankaŭ kontraŭdiron - aŭ kontraŭstaron - kun la celo de la antaŭa serĉado, kiu estis la monduma sukceso.

Tia estas la esenco mem de la maniero, kiel ni implikas nian ekzistadon pere de la pensagado - aŭ procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika -, kies rezultato estas aro da bildoj aŭ mnemonikaj enhavoj, kiun ni nomas "mio". La mnemonika dualeco - kiu, laŭ kelkaj, havas molekulanan devenon de la neŭrono - estas iu unuo kun la celo, la kontraŭstaro kaj la fragmentiĝo. T.e., ke celo, kontraŭstaro kaj fragmentiĝo estas precize la mnemonika dualeco mem.

La celo estas nur formo de kontraŭstaro (inter tio, kio oni kredas esti kaj tio, kio oni kredas, ke oni devus esti).

Faciliĝas vidi kiel la celo, la kontraŭstaro kaj la fragmentiĝo estas samaj, kiam ni pensas pri konkretaj dualaĵoj kiel, ekzemple : arabo kontraŭ judo, bonulo kontraŭ malbonulo, venkinto kontraŭ venkito, katoliko kontraŭ protestanto, religiulo kontraŭ mondumulo, ruso kontraŭ usonano, ktp.

Tio ĉi estas la maniero fragmenta kaj reduktiga, laŭ kiu moviĝas nia pensostrukturo, kiu estas la fonto de niaj senfinaj konfliktoj.

La etimologia deveno de la vorto pensi samas al tiu de la vorto pesi. La ago "pesi" implicas komparon inter la du

pesiltasoj, kaj tiu ĉi komparo (kiu simple estas alia dualaĵo) estas - kiel ni diras - la esenco mem de la penso.

Nia pretendo esti en kontakto kun la realo baziĝas sur la penso (aŭ procezo META) kaj ties esenca dualeco.

La instrumentoj mem, kiujn ni uzas, kaj la sistemoj por priskribi la realon devenas de tiu procezo : kiel videblajn ekzemplojn ni havas la pesilon, la karteziajn koordinatojn kaj la lenson, kaj ankaŭ la komputilon.

La dualeco de la procezo mnemonika-eidetika kreas konscitipon de la realo, kaj ankaŭ apartan tipon de instrumentoj kaj priskriboj, kiuj subtenas aŭ apogas tiun konscitipon, kiun ni nomas linia.

La vorto "korupto" kurioze signifas (laŭ la etimologia vidpunkto) "rompiĝon en du", kiu estas plensignifa sinonimo de la vorto "dualeco").

La procezo mnemonika-eidetika estas tempo, estas spaco, estas celo kaj estas la fragmentiĝo mem ; pro tio, ĝi prezentas la nuran interferon al la unueca perceptado de la tuta mensomovo, kaj estas neakordigebla kun ĝi.

La procezo mnemonika-eidetika estas - kiel ni diris - tio, kio deziras starigi rilatojn inter kaŭzoj kaj efikoj, kaj ĝia agado kondukas neeviteble al la kontraŭstaro kaj devenas de ĝi.

La dualeco, la kontraŭstaro, la spaco, la tempo kaj la celo rilatas al la ideo, ke ni bezonas "ŝanĝiĝi". T.e., ke mi estas kolerema aŭ kolera kaj mi devas trankviliĝi kaj paciĝi. Ekde tie ĉi mi vole ŝanĝiĝas ĝis tie ; de tio, kio mi estas, mi iras al tio, kio mi deziras esti. Mi timas esti sola aŭ malsekura, do mi vivas serĉante la iluzion de la sekureco. Dum tiu serĉado mi min izolas for de la aliaj kaj de mi mem, kvankam mi vivas konstante kun iu en la sama hejmo.

En la civilizacio kreita de la homo en la tuta planedo, kiam iu unuiĝas kun aliaj por fari ion, tio okazas ne nepre pro amikeca kaj spontana kunlaboro, sed ĝenerale cele al iu objekto, kaj plejofte temas pri objekto ideologia, idola aŭ imaga, kion en nia lingvo ni nomas "eidetika" celo.

Se kelkaj personoj organiziĝas kun ideologia celo, ili neeviteble disiĝas kaj fine kontraŭstaras aliajn organiziĝintajn ulojn. Tiu ĉi kontraŭstaro atingas, kiel ni vidas, la ekstremon perdi la respekton al la vivo kaj mortigi unu la alian. Estas tiel do, kiel la penso kaj ĝiaj ideologiaj produktoj iĝas absolute sensignifaj.

Ni kredas, ke ni elmontris, laŭeble, ke la paradokso ne

povas esti solvata ene de sia propra kampo. La paradokson, kiu estas la produkto de la racieco, oni solvas nur en la unueca perceptado, kiu "enkondukas" fakte novan mensan faktoron : la percepteman inteligentecon aŭ la perceptadon de movo, kiu fine estas nur perceptomovo de tio, kio okazas en la tuta menso. La perceptadon de tiu ĉi movo (aŭ la movon de tiu ĉi perceptado), je koscia nivelo, priskribas parole tiuj, kiuj spertis ĝin, senescepte, kiel "totalan silenton kaj mensan kvietecon".

Tio ĉi pravas, ke ne ekzistas parola aŭ simbola maniero esprimi la intiman naturon de tiu eksterordinara kaj "iluminiga" movo de perceptado, kaj do oni uzas paradokson - denove - kaj priskribas ĝin kiel "totalan kvietecon".

Tiu ĉi kvieteco estas la ago mem de observado en unueca perceptado ; observado tiel intensa, ke tiom la observanto, kiom la observataĵo, iĝas negravaj. Tio ĉi estas la movo de la totala kvieteco.

La psikologia ekapero de la observanto, kiu difinas aŭ taksas la observataĵon (ene de si aŭ ekstere) detruas la observadon mem en unueca perceptado, kaj tiu ĉi transformiĝas en nuran observadon sensan kaj mnemonikan.

La aŭtoro verkis - inter 1966 kaj 1973 - longan kaj pezan libron, kiun li nomis **La mensmilito**. Tiu libro estis neniam aperigata (escepte de kelkaj fragmentoj), ĉar en 1975 la aŭtoro faris la grandegan eltrovon, ke la antagonismo de la memorenhavoj (aŭ la mensmilito) estas nur parto de pli vasta kaj profunda movo, kiu okazas ene de la homa psiko. Tiu ĉi alia totala movo estas la fino de la milito en la menso. En la kazo de la aŭtoro, ĝi estis la fino dusence.

Kiam ni demandas nin : ĉu mia menso, tiom koscia, kiom nekoscia, povas eniri en staton de absoluta kvieteco kaj silento ?, eble okazos la unueca perceptado de la mensa movo (totale), se ni ne respondas la demandon per kiu ajn el la sennombraj enhavoj de nia memoro, kaj se ni ne timas sperti "mensan kvietecon aŭ pacon", kiu povas esti la origino de novaj kaj pli ampleksaj perceptoj, kaj de profunda kaj integra komprenemo de la homo.

## TIO, KIO NE ESTAS LA UNUECA PERCEPTADO

Klopodo difini la unuecan perceptadon. La unueca perceptado estas la plej grava koncepto de la moderna Psikologio. Realigite - t.e. spertite trans la koncepto, en la faktoj mem - la unueca perceptado estas la faktoro plej grava en la vivo de la individuo kaj de la socio.

Unuavice, la unueca perceptado ne estas tiu ĉi klopodo por difini ĝin. Tra la antaŭaj paĝoj ni difinis ĝin diversmaniere, kaj pritraktis la temon laŭ malsamaj perspektivoj.

Interalie, ni diris, ke la ago observi finiĝas, kiam aperas observanto, kiu difinas, taksas, komparas aŭ klasifikas "objekton" "situantan" ene de li aŭ ekster li. Tiu ĉi procezo estas nomita horizontala konflikto.

Per la etikedado de okazaĵoj, personoj aŭ observataĵoj, la observanto pretendas fiksi la movon totalan de la vivo (holokinetikon). Tiu ĉi estas movo, nek interna nek ekstera, kiun la observanto kredas esti kapabla limigi tiom en la tempo, kiom en la spaco. Ekzemplo : "La unueca perceptado estas same kiel tio, kion Freud (aŭ Jung, aŭ Budho, aŭ Kristo, aŭ Marx) nomis XXX".

Komparante la unuecan perceptadon kun "XXX" ("XXX" estu kio ajn) kaj, kvankam la komparo estis racia kaj bone fondita, la observanto forlasis la observadon aŭ konsideradon puran de la fakto de la unueca perceptado, pretendante fiksi tiun fakton per substantivo, adjektivo, ktp, situanta en la tempo aŭ en la spaco (aŭ en ambaŭ, kartezi-maniere).

Movo kaj enhavo. Iu maniero proksimiĝi al la problemo estas, distingi inter movo kaj enhavo. La unueca perceptado estas la kontakto kun la totala movo (holokinetiko). Se ni aldiras, ke ĝi estas la kontakto kun la totala movo de la menso, ni jam fragmentigas la problemon, ĉar tio dirita implicas, ke ekzistas iu mensa movo (interna) kaj alia ekstera movo (media, socia, kosma ktp).

Tiu ĉi disigo inter tio interna kaj tio ekstera estas unu el la sennombraj manieroj fragmentigi la totalan movon, klopodante "haltigi" aŭ fiksi ĝin en la koncepto pri "interna" (mensa) kaj "ekstera" (socia). T.e., ke ekzistas movo (unueca perceptado), kiun oni ne povas fragmentigi aŭ haltigi (malgraŭ ke ni imagu, ke ni faras tion), kaj serio da enhavoj (konceptoj, ideoj, imagaĵoj, emocioj, rememoroj, planoj ktp).

La unueca perceptado povas esti enhavo, kiam ni kontentigās nur paroli pri ĝi, aŭ male, ĝi povas esti reala kontakto

kun la totala movo (holokinetiko).

Nia prefero por la enhavoj (nur memorproduktoj) akiris grandegan amplekson, tiom en la historio de la homaro, kiom en nia ĉiutaga vivo. Tiu ĉi prefero (konscia aŭ nekonscia) estas fine tio, kion ni nomas horizontala konflikto, kiu estas la fonto de ĉiuj konfliktoj, distordoj, timoj kaj malĝojoj en la homa vivo (inkluzive de la milito).

La horizontala konflikto estas la manko de rekta kontakto kun la objektoj, personoj kaj faktoj, kun kiuj ni interrilatas nur (fragmente) nerekte per simboloj parolaj aŭ neparolaj.

La kontakto rekta kaj reala implicas partoprenon en la totala movo. La kontakto nerekte aŭ fragmenta (kiu ne estas kontakto) estas la malmergiĝo de la memorenhavoj, kiuj imagas fiksi la totalan movon. Tiuj ĉi enhavoj ĉiam rilatas al "tempo", "spaco", "mio" kaj la rilatoj "kaŭzo-efiko".

Tiu ĉi kontakto simbola, nerekte kaj fragmenta estas funkcia. Sed ne necesas, ke ĝi daŭru pli ol 20 aŭ 30 minutojn intermite dum unu tuta tago.

La tuta socio baziĝas sur la interŝanĝo de tiuj enhavoj (same kiel la scienco mem, kiel ni ĝin konas).

Werner Heisenberg difinis la Fizikon mem kiel "la formalan priskribon de la interkontakto de perceptoj".

Ne eblas havi ideon (enhavon), pri kio estas starigi kontakton kun la totala movo en unueca perceptado. Ni ankaŭ ne povas havi ideon (enhavon) pri kiaj povus esti la socio kaj la scienco baziĝantaj sur tiu kontakto kun la totala movo (holokinetiko).

La koncepto pri ondofunkcio, formulita de Louis de Broglie kaj plivastigita far la Kvantumfiziko, estas la komenco de scienco surbaze de la kontakto kun la totala movo.

Unu el la enhavoj estas la aro da ideoj kaj bildoj, kiuj determinas la koncepton pri "mio". Tiu ĉi koncepto estas tio, kio determinas la malmergiĝon de observado, kiu siavice determinas la finon de la ago de tiu maniero observi, kiun ni nomas unueca perceptado.

La enhavo (observanto) finas la movon (unuecan perceptadon). Tial ni diras, ke la unueca perceptado estas la observado de la totala movo ekzistanta inter enhavo kaj enhavo. Kiel kontingenco de tiu ĉi observado (unueca perceptado) povas ĉesi la malmergiĝo de la manemonikaj enhavoj, kaj restas nur la totala movo. Tio ĉi estas kion ni

nomas kerno aŭ kontakto kun la realo (holokinetiko) sen la distordo de la memorenhavoj (memoroj, planoj, ideoj, imago, emocio ktp).

La kerno ne estas nova kontakto kun la realo (kiu estas la totala movo). La kerno estas la nura ebla kontakto kun la totala movo. Alivorte : la kerno (aŭ **karyon**) estas la nura ebla kontakto inter la observanto kaj la realo.

La tempo kaj la spaco estas konceptoj aŭ enhavoj, per kiuj ni imagas fragmentigi la tutecon de la movo.

Ĉar teruras min la ideo (aŭ la enhavo), ke mi povas partopreni en la tuteco de la movo aŭ esti unu kun la movo, t.e. esti la movo mem, tiam mi imagas, ke mi iras ("mi", io disigita, la observanto) de tie ĉi ĝis tie (sole) tiom en la tempo, kiom en la spaco. Ĉar mi timas esti la fluo de la movo mem, tiam mi kreas enhavojn (aŭ izolitajn punktojn de iu movo) kiel jenajn : "mi", "vi", "tie ĉi", "tie", "nun", "poste", "interna", "ekstera", "individua", "socia", "orienta", "okcidenta" ktp.

La difino pri la unueca perceptado, kiu diras : "...la unueca perceptado estas la observado de la kunfandiĝo de la stimulo kaj la reago, rigardante la reagon ĝenerale, kiel memorenhavon" estas sufiĉe bona, sed en unueca perceptado - ni devas aldiri - la stimulo kaj la reago estas parto de unu sama movo.

Psikoza malorganizo. La unueca perceptado ne estas la stato, kiun - en holokinetika Psikologio (aŭ Kariopsikologio) - ni nomas "malracia prototaksio" (kiel, ekzemple, la skizofrenia psikozo).

La elementa aŭ unuagrada organizado (proto-taksio) de la procezo META - aŭ penso - povas esti racia (kiel en la sana infano) aŭ malracia (kiel en la psikozo).

Laŭdire, en kelkaj psikozaj statoj ne eblas distingi adekvate inter la limoj de la "mio" (aŭ egoo) kaj tiuj de la medio. "Ankaŭ tie ĉi ekzistas movunuoj, kie oni perceptas ĉion sendiference", diris al mi partoprenanto en unu el miaj prelegoj.

Ekzistas granda diferenco inter tia perturbo de la "sento pri la realo" observebla ĉe la psikoza malorganizo, kaj tio, kion ni nomas unueca perceptado.

La sento pri realo kaj ĝiaj perturboj. En la Psikologio de la mio oni asertas, ke la sento pri realo estas : 1) la kapablo distingi inter stimuloj internaj kaj eksteraj, 2) la adekvata sensa perceptado (ne unueca perceptado), kiu estas faktinterpretado, kiel ankaŭ spactempa orientiĝo. La sento



pri la realo estas la kapablo estigi ŝajnajn rilatojn inter kaŭzoj kaj efikoj, kaj ĝi ebligas korekti perturbojn.

En nia lingvo, tiu ĉi estas tre grava kaj necesa funkcio de la procezo META. La memestimo mem - fundamenta por estigi adekvatajn interpersonajn rilatojn por aktivi sincere kaj fide kun la aliaj - devenas de la sento pri la realo kiel "funkcio de la mio".

Perturboj de la realo-sento estas la fiksjaj ideoj (tromp-iĝoj), halucinoj, sensoriaj perturboj (spactempa misorientiĝo), malkapableco pripensi kaj interpreti la konduton propran aŭ aliulan (surbaze de aro da ideoj aŭ teorioj, ekzemple), diskonekso kun la propra stato afekcia aŭ emocia, malkapableco reagi antaŭ la subtilaj signoj de la vegeta sistemo (kiel la sato, la laciĝo, la muskola streĉiĝo ktp).

Aliaj perturboj estas la fenomenoj hipnagogiaj(38) kaj hipnopompaj(39) (semihalucinoj je la komenco aŭ fino de la dormo), **déjà-vu** (mi jam vidis), senpersoneco, trancostatoj, eskapoj histeriaj aŭ epilepsiaj, histeria disiĝo, difuzo aŭ distordo de la propra identeco, ktp.

En la unueca perceptado ekzistas atento neniupunkten koncentriĝinta sur ĉiujn sensajn stimulojn, kiu venas elde la medio. Tio ĉi ne estas simple atento neinteresata pri la objektoj de tiu atento. Estas atento, kiu komprenas precipe la regeneripovan valoron de la atento mem. Se vi preferas, la unueca perceptado estas formo de atento, kies intereso estas la atento mem. Tio ĉi determinas plenan perceptadon de ĉiuj stimuloj far la kvin sensoj (tuŝosenso, flarado, gusto, kaj ĉefe la vidado kaj la aŭdado).

Tiu ĉi plena perceptado, rekta aŭ "unueca" ne estas simpla sensa perceptado, en kiu ankoraŭ ĉeestas la enhavo de la observanto, kaj kiu ebligas muskolan malstreĉiĝon ĉiam pli grandan, kiu okazas sen ia volado aŭ tekniko. La volado kaj la tekniko estas nur enhavoj aŭ serioj da enhavoj.

El tiu korpa kvieteco de la unueca perceptado povas ŝpruci memorenhavoj (inkluzive de la multaj bildoj de la koncepto pri "mio", kiel aĝo, nomo, sekso, nacienco, okup-iĝo, titoloj, memoroj, ideoj, planoj aŭ emocioj ĉiuspecaj), sed ĝia kvanto kaj ofteco estas ĉiam pli malgrandaj.

La malmergiĝon de tiuj enhavoj ene de la movo de la unueca perceptado oni identigas inteligente kaj racie. Tiuj ĉi enhavoj ne estigas konfliktojn (se oni ne permesas, ke iu enhavo invadu la tutan konscikampon).

En la disintegriĝo (fragmentiĝo) psikoza, la malsanulo estas invadita ĝuste far sennombraj memorenhavoj. La en-

havo "mio" identiĝas kun kelkaj el tiuj enhavoj ; la enhavoj kontraŭstaras unu la alian (ekzemple, la ambivalenco, la projekcio, la enkorpiĝo, la malfarado, la disdivido kaj aliaj "nekonsciaj defendoj", majstre priskribitaj far la psikologoj kaj psikiatroj de la freŭda skolo).

Meze de mnemonika pandemonio, kiu estas "enhavo pura", la unueca perceptado ne eblas. Tial, la unueca perceptado kaj la psikoza malorganizo ne havas, nek povas havi, ian kontaktopunkton.

Identiĝo. La unueca perceptado ne estas identiĝo, se oni rigardas la identiĝon kiel "nekonscian defendon", laŭ la maniero priskribita de Sigmund Freud.

La identiĝo estas nur simultana supermetado de mnemonikaj enhavoj.

La enhavo "mi" unuiĝas kun la enhavo "paĉjo" (aŭ iĝas parto de la enhavo "paĉjo", ekzemple). Tiel la persono ("mio") komencas agi, senti, paroli, pensi, ktp, same kiel sia patro. La identiĝo (kaj ĝiaj variaĵoj, kiel la kontraŭ-identiĝo) estas normala stadio en la evoluo de la racia memoro, sed povas fariĝi malracia ĉe la psikoza disintegriĝo.

En la kontraŭidentiĝo la "mio" volas esti ĝuste la malo de tio, kio estis ĝia patro (en la antaŭa ekzemplo), sed memvideble temas nur pri paradoksa variaĵo de la identiĝo mem. Ĉar tiu ĉi estas nekonscia, la subjekto "ne rimarkas" la mensan procezon.

En la unueca perceptado la observanto estas la movo mem de ĉio, kio fakte okazas en tiu momento. La observanto estas unu kun tiu movo, sed, se ni ne lasas nin trompi de la lingvo, ni ekscias, ke la unueca perceptado ne estas identiĝo, t.e. simpla supermetado de enhavoj

Dialektiko. La unueca perceptado ne estas dialektiko. Ni konsilas legi nian "Dialogo kun profesoro pri Filozofio", en kiu la profesoro koncize klarigas al ni, ke la dialektiko estas la transformado de koncepto, ideo aŭ enhavo, kiu ne nur estas kondamnita kontraŭstari aliajn konceptojn (subtenite far la sama subjekto aŭ far aliaj), sed ankaŭ, la sama koncepto aŭ enhavo, en sia senĉesa transformiĝo, fine neeviteble kontraŭdiros (aŭ kontraŭstaros) sin mem. Tiel naskiĝas la paradoksoj, kaj tiel la enhavoj neas sin mem.

En unueca perceptado oni plene rimarkas la transformadon (dialektikon) de la enhavoj, sed la unueca perceptado

estas sendependa de tia dialektiko, malgraŭ ke ĝi estas la movo (holokinetiko) mem.

Burĝa individuismo. La unueca perceptado ne aperas kiel koncepto deveninta de la klaslukto, sed de la baza demando : ĉu la homo estas en kontakto kun la realo ?

Aliflanke, diference de tio, kion pensas kelkaj marksistoj, la pura individuismo ne akceptas la uzadon de la individuoj por la bonfarto de aliaj individuoj, kiel okazas en kia ajn formo de ekspluatado malpersoneciga (ekonomia, edzeca, religia, ktp). La valoroj de la individuismo estas : la memfido, la rajto je la individua privateco kaj la respekto por la aliaj. Pro tio, izola ermito ne estas "unu individuo". Kelkaj konfuzas la individuismon kun la avideco por la pligrandigo de la privata proprietaĵo, sed individuismo kaj avideco estas teorie neakordigeblaj. Egoismo (avideco) ne estas individuismo. Rajto je la privateco ne estas rajto je la privata proprietaĵo.

La individuismo favoras la liberigon el la Ŝtatkontrolo sur la individuojn, kio - kvankam kelkajn misinformitajn marksistojn tio ĉi surprizos - estas la celo mem de la marksisma socialismo sub la nomo "komunismo".

Fakte, individuistoj kaj komunistoj murdas unu la aliajn, malgraŭ ke (paradokse) iliaj realaj celoj estas tre similaj. Ne estas do la procezo META kun ĝiaj ideologiaj enhavoj, kiun ni bezonas por solvi la problemojn de la homo kaj de la socio sur tiu ĉi planedo, sed transformiĝo ene de la konscio de la observanto (la unueca perceptado).

Pro tio, ke ĝi estas enhavo (ideologio), la individuismo estas submetita al la dialektikaj leĝoj de la enhavoj: transformiĝo, paradokso, memkontraŭdiro kaj fine, memneado.

La individuo ne devas esti je la servo de la socio, nek male. La unueca perceptado montras al ni alian vivmanieron. La individuo en unueca perceptado rigardas sin kiel parton de totala movo, tiom kaŭzo, kiom efiko de la socio (ĝuste tial, individuon kaj socion oni ne povas rigardi kiel disigitajn).

La atomisma vidado de la individuo estas tro fragmenta por postvivi la konajn akiraĵojn de la homaro, interalie la Gestaltpsikologion kaj la Kibernetikon, kiuj emas kontempli la socion ne atomisme sed organisme.

La alveno de la Kvantum-mekaniko kaj la hologramo en Fiziko, kaj la koncepto pri holokinetiko kaj la holokine-

tika Psikologio (kiel konsekvenco) devigas nin transformi nian sintenon eĉ plie.

Makroekonomio holokinetika naskiĝos kiel tuja konsekvenco, surbaze de la kompreno far la individuo, ke li ne estas disigita disde la socio kaj la homaro en ĝia tuto.

En ekonomio, kiu respektas la kontakton kun la movo de la tuto (holokinetiko) ne povas ekzisti la amasigo de riĉaĵoj far la individuoj.

La individuo devas esti edukata por respekti la socian holokinetikon, kiu komenciĝas per la individuigo de la persono. "Individuo" signifas "ne disduigitan" : kiel du kontraŭstaraj deziroj, kaj pensoj, kiuj kontraŭdiras agojn. Krome, la individuo ne dividas aŭ disigas la socion disde la eroj, kiuj ĝin konsistigas (la homoj). En la ero (kaj tie ĉi denove novmaniere) estas la tuto.

Eĉ se oni vidas la homon kiel negentropian sistemon, kiu kreas ekosferon (aŭ median sistemon), estas sendube, ke ne povos ekzisti homostato aŭ harmonio (individua aŭ socia) dum la "enhavoj" (nialingve) de tiu ekosfero ne harmonios kun la "enhavoj" de la interna sistemo (aŭ individua psikologio).

Sed la socia homostato baziĝinta nur sur la akordigebl-eco de enhavoj ne povas daŭri, ĉar la enhavoj estas ĉiam fragmentaj, historiaj, kaj do esence maladekvataj.

Pro tio, ke la unueca perceptado estas la komenco de vasta kaj ne distordita kontakto kun la realo, ĝi estas la nura faktoro, kiu povas alporti permanentecon al la socia homostato (kiu estas mem konstanta movo de ekvilibro).

Gestalt. La Kariopsikologio aŭ holokinetika Psikologio ne estas gestalta Psikologio. La Kariopsikologio ne senvalorigas, tamen, la eltrovojn de la Gestaltpsikologio.

En Gestalt la tuto estas io malsama kaj pli granda ol la simpla sumo de la eroj. Tio ĉi estas sendube tia, sed en Kariopsikologio ni diras, ke la ero enhavas la tuton (kiel evidente okazas en la hologramo, kiu estas la registro de la negativo de la tridimensia senlensa fotografio). La hologramo estis antaŭigita de Leibniz en 1780, per lia koncepto pri "monado" kaj la diferenciala kaj integrala kalkulo, kiujn uzis Denis Gabor en 1947 por ĝin formuli teorie.

La unueca perceptado estas la sentiveco kaj inteligenteco mem, kiujn ni bezonas por kompreni la mensomovon.

Tiu ĉi inteligenta sentiveco - kiu estas pura movo - diferencas de la emociaj aŭ intelektaj enhavoj, inkluzive de la imageco kaj la fantaziado, kiujn tiel multe uzas la gestalta psikoterapio (**shuttling**-tekniko, ktp).

Eĉ la tekniko fari nenion - kiun uzas kelkaj gestaltaj psikologoj - diferencas de la teknikforsto en unueca perceptado.

Fritz Perls asertis, en la unua paĝo de sia libro **The Gestalt Approach**, ke ĝi estas nur aro da supozoj de la komuna saĝo, facile kontroleblaj per la sperto.

Kion ni diras, tio estas, ke ekzistas tri manieroj radikale malsamaj eksperimenti, kaj ke nia kulturo emfazas nur unu el ili : la procezon META kun ĝia konscio linia, komparema, spactempa aŭ kartezia.

Kiam ni parolas pri kontrolado, ĝenerale ni starigas interrespondojn ene de tiu konscitiĵo, ignorante la aliajn du tipojn : la unuecan perceptadon (triangulan konscion) kaj la kernon (sferan konscion).

Kiam Fritz Perls asertas, ke "la baza premiso de la Gestaltpsikologio estas tia, ke la homa naturo estas organizata laŭ ŝablonoj aŭ totaloj, ke ĝi povas esti spertata far la individuo surbaze de tiuj kriterioj, kaj ke ĝin oni povas kompreni kiel kunfandiĝon de la ŝablonoj kaj totaloj, kiuj ĝin konsistigas", li majstre difinas unu el la aspektoj de la procezo META aŭ linia konscio, sed same kiel Freud, Berne kaj (siamaniere) Skinner, li ne foriras el la spaco de tiu procezo. Li simple helpas observi tiun saman procezon laŭ malsama vidpunkto.

Perls mem en sia libro **Gestalt Therapy Verbatim** parolas pri la "danĝero alĝustigi la realaĵojn al la propraj teorioj, hipotezoj kaj fantazioj". "Similas al Prokusto, kiu bezonis alĝustigi ĉiujn al lito de determinita amplekso ; se ili estis altaj, li distranĉis al ili la gambojn, kaj se ili estis malaltaj li disstreĉis ilin".

Ni devas eviti alĝustigi la Kariopsikologion (holokinetikan Psikologion) ene de la Gestalt. Estas bedaŭrinde, ke Perls ne povis koncepti aŭ sperti kontakton kun la realo, ne entenanta enhavon, kaj estantan nur movo (unuecan perceptadon). Kiam ĉe la unua ĉapitro de **Gestalt Therapy Verbatim** Perls parolas pri **awareness** (rimarki), li asertas dogmeme, ke "oni ĉiam rimarkas 'ion' ". Plie, li kritikis saĝe la liberan asociadon de Freud kiel la salto de sperto al sperto (nialingve, pli precize, estus : de mnemonika enhavo al mnemonika enhavo), kio malebligas la sperton

mem. Tamen li uzas la larĝan fantaziadon pri unu enhavo, kio estas ankaŭ diskonekso de la nuna realo - nuna realo, kiun ni povas nomi holokinetiko.

Estersensa perceptado. La koncepto pri takio ekaperis por ekspliki kontaktojn pli rapidajn ol la lumo inter diversaj punktoj el la universo. Tiu ĉi koncepto modifas ankaŭ tiujn pri spaco kaj tempo originintaj el niaj kontaktoj je lumaj rapidoj.

La libro **Mind al large** de la Instituto de Elektroingĝenieroj (1977) igis pli respektindaj la fenomenojn ekstersensajn aŭ metapsikajn.

Eblas ekspliki tiujn ĉi fenomenojn per la konceptoj pri "negentropio" de Ilya Prigogine (Nobelpremiito pri Fiziko en 1977) ; pri la multoblaj universoj de John Hasted (Universitato de Londono) ; pri la ondoj de ekstermalalta frekvenco, de Michael Persinger (Laurentian University) ; aŭ pri la implicita ordo en la holokinetiko de David Bohm (Universitato de Londono).

La holokinetika Psikologio estas la nura, kiu povas ekspliki la metapsikiajn fenomenojn, sed la telepatio (legi aliulajn enhavojn) kaj la klarvidado (percepti forestantajn enhavojn), kaj ankaŭ la t.n. "mistikaj vidoj", ne estas perceptoj de la tuta movo (holokinetiko), same kiel okazas en unueca perceptado, sed - kiel memvideblas - eksterordinaraj perceptoj de enhavoj.

Eĉ pli, persono, kiu vivas en unueca perceptado, kiu - komprenante ĝian valoron - simpligas sian vivon ĝis ekstremo, kio ebligas al li kunigi la grandegajn energiojn bezonatajn por subteni tiun ĉi perceptotipon, preskaŭ neeviteble spertos metapsikiajn fenomenojn. Tiuj ĉi estas primitivaj kaj maladekvataj "mekanismoj" por kontaktigi nin kun la realo, malpli precizaj ol la kvin sensoj. Krome, kiam persono ne tute individuigita (nedividebla) kontaktas enhavojn aliulajn aŭ estontajn aŭ forestantajn, li povas emocie reagi kun ekstremaj kolero, timo, teruro kaj, precipe, deprimiĝo, kaj fali en diversajn gradojn de memdetruiga konduto, eĉ la memmortigo.

Ni diris ripete, ke ni spekulativas pri psikologiaj fenomenoj dubvaloraj kaj eĉ danĝeraj, kiam ni ankoraŭ ne estas en integra kontakto kun la realo simpla (aŭ kompleksa), kiu ĉirkaŭas nin.

Introspekto. La unueca perceptado ne estas introspekto. Introspekto estas vorto deveninta de **introspicere**, kiu signifas "rigardi internen".

Unueca perceptado estas rigardi (nek internen nek ekstere), simple rigardi kaj aŭskulti, kaj senti samtempe la tutmovon. Observanto kaj objekto estas negravaj. Rigardi, ekzemple, estas grave, sed sen la enhavoj "internen", "ekstere", "antaŭe", "poste", "kaŭzo", "efiko", ktp.

Oni povas introspekti rilate enhavon, sed tio ne estas unueca perceptado. La unueca perceptado estas totala movo, en kiu ekaperas, transformiĝas kaj malaperas la mnemonikaj enhavoj.

Intuicio kaj indiferenteco. La vorton intuicio oni difinis kiel "rektan scion senpere de la inferenco, la sperto kaj la rezonado".

Tiu ĉi difino similas al la koncepto pri kerno aŭ **karyon**, sed ĝenerale oni interpretas la intuicion - ekzemple, okaze de la frazo "virina intuicio" - kiel asertojn aŭ antaŭdirojn rapidajn kaj trafajn pri konscienhavoj, inkluzive pri okazaĵoj, objektoj, personoj, ktp.

Kiel eblas distingi "supozon" laŭŝance trafan, tute hazarde? Kiel distingi inter tiu ĉi tipo de "intuicio" kaj iu nekonscia aŭ kaŝita inferenco?

Oni difinis la inferencon kiel "la akceptadon de tiu parto de la realo, kiun oni rigardas konvena por la propra sekureco aŭ komforto aŭ plezuro".

La inferenco estas parto de la procezo META aŭ linia konscio. Tial, en la procezo inferenci (procezo, kiu okazas konscie aŭ nekonscie) interrompiĝas la fakto rigardi, percepti aŭ konsideri integre aŭ unuece la realon, sendepende de ĉiuj reagoj konaj, emociaj aŭ ideologiaj, kiuj okazas samtempe kun tiu unueca perceptado.

Bedaŭrinde, tiujn reagojn oni rigardas kiel determinitajn far la unueca perceptado, kaŭze de la neceso de la procezo META trovi rilaton kaŭzo-efikan inter la okazaĵoj.

Kiam la perceptado estas vere unueca, neniu enhavo kona, emocia aŭ biologia estas perceptata interferanta tiun perceptadon. Percepto, kiu ne kompletigis aŭ integriĝis, estas obstrukcata per inferencita percepto, aŭ pli precize per inferenco (mnemonika enhavo, pri kiu oni supozas, ke ĝi kompletigas aŭ unuigas la fragmentan percepton). Tiu ĉi percepto nur inferencita estas unu el la bazoj (kune kun la funkciado de la nerva sistemo vegeta

aŭ aŭtonoma) de la pensoprocezo, aŭ procezo META.

Kiam ni interkomunikas parole pri realaĵoj aŭ okazaĵoj, la vortoj estas partoj de tiuj inferencitaj perceptoj, kaj estas parte pro tio, ke nia necesa parola interkomunikado estas nur kontakto nereakta, fragmenta, preskaŭ iluzia.

La procezo META direktas nin linie (tial la nomo linia konscio) de inferenco en inferencon, evitante la rektan perceptadon, la kontakton totalan, sentivan kaj inteligentan kun la okazaĵoj, la personoj, la naturo, ktp.

La kontakto kun la realo ne eblas, ĉar al la provoko de la realo ni reagas per spitado inter la observanto kaj la observataĵo.

La nura fakto alfronti la realon (kio implicas parte, ke oni ekfunkciigis la inferencoprocezon) signifas ne estigi kontakton kun tiu realo. Ne temas pri alfrontado de la realo per inferenco, paroloj ks. ; temas pri tio, ke oni moviĝu kune kun ĝi en unueca perceptado.

Epigenezo. Epigenezo estas la evoluo de la enhavoj ekde la koncipado ĝis la morto. Epigenezo estas la stadioj, kiujn trairas la memoro, laŭmezure kiel ĝi strukturiĝas kaj evoluas.

Sigmund Freud parolis pri la stadioj buŝa, anusa, pripenisa kaj generila dum la memorevoluo. Erik Erikson faris sian propran epigenezon, emfazante tion psikosocian, kaj Jean Piaget studas tiun epigenezon, emfazante la konan aspekton.

Tiu ĉi vorto "epigenezo", deveninta de la embriologio, prezentas al ni alternativon al la teorio pri la homunkulo kaj similaj, kiuj asertis, ke ĉio, kio ni estas, estas jam antaŭformita ene de la utero, kaj ke ĝi simple devas kreski en amplekso.

La mikroskopio (esence la lenso) pruvis al ni, ke ni ne estas antaŭ-formitaj, sed ni formiĝas pere de sinsekvaj ŝanĝoj (aŭ epigenezo).

Interalie, la epigenezo elmontras al ni, ke se unu stadio de tiu evoluo ne kompletiĝis, ĉiuj sekvontaj stadioj estos trafataj geometrie, kaj eĉ eblas, ke ili ne okazos. Tio ĉi eksplikas la genetikajn misformojn de la embrio.

Iel, epigenezo implicas transformiĝon aŭ movon, sed temas pri movo esence antaŭformita aŭ antaŭdeterminita, kiu sekvas direkton ene de certaj limoj. Ekzemplo : hunda embrio ne povas iĝi homo, tamen la homa embrio ne estas antaŭformita en la utero, sed ĝi iom post iom formiĝas.



La holokinetiko ne estas antaŭdeterminita movo, kiu sekvas direkton. Tial ne estas epigenezo ĉe la totala movo aŭ holokinetiko. Tial ne estas holokinetika teorio de la personeco. Tial ne estas epigenezo de la unueca perceptado. Ni konsilas legi la artikolon "Observado aŭ movo kontraŭ memoro aŭ enhavo".<sup>5</sup>

La humanisma Psikologio de Abraham Maslow, Carl Rogers kaj aliaj temas pri procezo de "kreskado" aŭ "evolado", kiu finiĝas per "memaktualigo" aŭ memrealigo.

Poste, la transpersona Psikologio de Anthony Sutich, Stanislaf Grof kaj aliaj parolas pri "transcendeco" en personoj "memrealigitaj" aŭ ne.

En la holokinetika Psikologio (Kariopsikologio) ni diras, ke la procezo META estas tio, kio strukturigas kaj integrigas progresive la memoron, kiu povas esti formulita laŭ stadioj "epigenezaj", kiel faris Sigmund Freud, parolante pri stadioj buŝa, anusa, ripenisa kaj la plenumiĝo de la personeco dum la generila stadio. La generileco de Freud, la memrealigo de Maslow kaj la integreco de Erikson estas terminoj esence "epigenezaj", kaj fine kompareblaj laŭ tiu komuna denominatoro.

Anthony Sutich publikigis en Kalifornio en 1973 artikolon titolitan "**Transpersonal Therapy**". Sutich supozas, ke tia terapio devas akcepti jenajn kvin principojn :

- 1) ekzistas konstantaj impulsoj al "plejsupera" stato en ĉiu persono ;
- 2) la totala perceptado de tiuj ĉi impulsoj ne necese alestas ĉiumomente ;
- 3) la realigo de plejsupera stato dependas esence de rekta praktiko rilatita al "vojo", en kondiĉoj adekvataj por ĉiu individuo ;
- 4) ĉiu individuo rajtas elekti libere sian propran vojon, kaj
- 5) ĉiu individuo rajtas ŝanĝi la vojon, kiam li deziras.

Tio ĉi estas nenio nova kaj oni povas ĝin legi, esprimita per malsamaj vortoj, ĉe kiu ajn orienta mistika libro. Sutich falas ankaŭ en la diferencadon de la terminoj "intrapersona" kaj "interpersona", asertante, ke tio "transpersona" estas ĉefe "intrapersona".

Ni jam vidis ripete, ke la realoj de la hologramo kaj la holokinetiko ne lasas nin fari diferencojn tiel kategoriajn en holokinetika Psikologio, kaj la koncepto pri unueca perceptado iĝas absolute necesa por liberigi la homon de la krudaj aŭ subtilaj distordoj kaj konfuzoj de la horizontala

konflikto kaj ties neeviteblaj paradoksoj. Evoluado, memrealigo, generiligo kaj ceteraj, estas vortoj aplikeblaj sole al la procezo META kaj ties produkto la "mio".

Ni kredas, ke Sutich nomas "transpersona" alian iluzion de la procezo META por "eliri el si mem". Estas ĉi tie evidenta paradokso, ĉar la ideo "eliri el si mem" estas ne nur parto de la procezo META (pro tio, ke ĝi estas ideo) sed ankaŭ okazas tio, ke la kvin menciitaj punktoj (kun la konceptoj pri "impulso" kaj "vojo") estas nur la obstina rezisto de la "mio" malaperi de la ago de observado, kaj do persistas subtile la deziro konfirmiĝi "transpersone", "transcende", "histerie", "psikedele", ktp.

Oceana sperto. Mi vidis la esprimon "oceana sperto" uzitan diversmaniere : ĝi povas aludi 1) prototaksian disorganizon, kiel, ekzemple, tiu okazanta en la psikozo aŭ en la psikedela tranco de kelkaj toksigemuloj, foje eksplikeblaj kiel epigeneza regreso al la intrauteraj stadioj de la memor-evoluo, kiam la embrio estas komforte en plena kontakto kun la amnia likvaĵo (mergiĝinta en ĝi) ; 2) la stimuladon de mnemonika enhavo (imago, ideo, ideologio, plano, memoro), kune kun granda emocia ekscitiĝo, aŭ 3) nivelon de sendistorda perceptado, "altan" nivelon de kerno aŭ sfera konscio.

Tiu ĉi tria signifonuanco estas la nura, kiu akordiĝas kun la koncepto pri unueca perceptado, kies kontingenco estas la kerno.

Transcenda meditado. La unueca perceptado ne estas transcenda meditado.

La unuecan perceptadon ne povas ekspluati la ruzuloj, nek la povuloj, nek la konfuzitoj, nek iu persono, kiu bedaŭrinde kunigas en si mem la ruzecon, la povon kaj la konfuziĝon.

La unueca perceptado estas multe pli vasta ol la ruzeco kaj detruas la povodeziron kaj la konfuziĝon. La vorto "meditado" rilatas al la vortoj "mezuri", "ordo" kaj "proporcio" (tiel, kiel ni klarigis en la ĉap. VI), sed ne nur en la senco "komparo" kun ekstera ŝablono - kiel la metro aŭ la kilogramo.

Se meditado estas penso-forviŝado, estas sufiĉe mem-kontraŭdire pretendi uzi metodon aŭ teknikon (t.e. la penson mem) por mediti.

La unueca perceptado ne estas nur la hipometabola stato aŭ la viscera memregulado. Tiuj ĉi estas reciprokaj

influoj inter la enhavoj mnemonikaj (konaj), timikaj (emociaj) kaj aŭtonomikaj (visceraj). Alivorte, la metodoj, la hipometabolo kaj la viscera memregulado estas movoj de enhavo al alia enhavo, sed ne la movo, kiu okazas inter la enhavoj - sendirekta movo, totala movo, kiun nur la unueca perceptado povas manifesti al nia konscio.

La ĝantroj kaj mantroj estas manieroj de koncentriĝo aŭ truditaj enfokusigoj en simbolajn formojn, kiel, ekz-e : imago, fantaziado, lumoj, sonoj, vortoj ks.

La unueca perceptado estas nek enfokusigo nek koncentriĝo. Enfokusigo kaj koncentriĝo (kvankam foje estas utilaj por agi en la mondo dum malmultaj minutoj) fragmentigas la movon totalan de la realo. Ili povas utili, foje, dum malmultaj minutoj (20 minutojn ĉiutage, ekzemple), por plenumi niajn ĉiutagajn taskojn.

La unueca perceptado estas ne konscistato sed, pli precize, konscio moviĝanta.

Unueca perceptado ne estas konscio sen enhavo, sed male, la nura enhavo de la konscio en unueca perceptado estas la implicita ordo de la totala movo aŭ holokinetiko de la realo. Tiu ĉi kontakto kun ordo tre profunda kaj vasta de la totala realomovo estas la sola kontakto sendistorda kun la realo, kiu eblas por la observanto.

Alivorte, ekzistas tri eblaj manieroj havi konscion en la holokinetiko :

- 1) esti la movo (kerno aŭ sfera konscio) ;
- 2) unueca perceptado de la movo de ĉiu enhavo, inkluzive de la movo de enhavo al enhavo, kio estas la naturo kaj strukturo mem de la penso, kaj unueca perceptado de la movo inter enhavo kaj enhavo, kaj
- 3) konscio pri la simpla enhavo (linia aŭ spactempa konscio), simpla movo de "tie ĉi ĝis tie", aŭ ekde "nun ĝis tiam".

Kondiĉado. La unueca perceptado ne povas esti kondiĉata aŭ determinata. La teknikoj - kiel ni esperas, ke oni komprenis (malgraŭ ke la evidentajoj montras, ke estas tre malfacile kompreni tion ĉi) - estas duagrada, se ili ne estas - kiel okazas multe pli ofte - tute negravaj. La hipnoto, la kompromisa analizo, la drogoj ĉiuspecaj efikas sur la enhavojn, sed la enhavoj - siavice - moviĝas, ĉu ni volu tion aŭ ne.

Pri la psikodrogoj : ili perfortas en la neŭrono - se oni ilin uzas por atingi la unuecan perceptadon - krudan mole-

kulan ŝanĝon, kiu estas neevitebla fonto de malekvilibro (rompo de la homostato), kaj tio ĉi estas danĝera kaj do nekonsilinda.

Kion oni fine celas per la hipnoto, la drogo aŭ la tekniko, tio estas eksterigi la proprajn enhavojn, kaj tio neniel rilatas al la unueca perceptado (kiu estas la nura mensa faktoro de regenerado).

## KONCENTRIĜO

A) Sensa atento enfokusigita sur objekton. En nia artikolo "Individua interparolo"<sup>6</sup> ni klopodis transkribi dialogon, kiun ni tenis kun amiko, kun kiu ni "kune eniris" en unuecan perceptadon. Lia plej granda malfacilaĵo konsistis en lia tendenco enfokusigi la atenton anstataŭ "liberigi" ĝin.

La perceptado koncentriĝinta aŭ enfokusiginta ne estas unueca perceptado.

Rigardi estas pli grave ol tio, kion oni rigardas.

Paradokse, tamen, okazas io eksterordinara rilate tiun ĉi neinteresiĝintan rigardadon en unueca perceptado. Ĉiuj objektoj akiras neatenditan intensecon aŭ gravecon. Ni komencas vivi pli intense, kaj eĉ pli bone memori.

Kiam ni koncentriĝas (aŭ enfokusigas), la atento estas subtenata de io, pri kio ĝi interesiĝas. Tiun intereson determinas kaj limigas la procezo asociiva de la memoro. La libera spertado (vidado) transformiĝas, kiam ni koncentriĝas, en simplan spertadon aŭ vidadon de "io determinita". Estas kvazaŭ ni lasus nin kapti de rememoro (enhavo). Sed, se ni lasus, ke ĉiu travivaĵo kompletiĝu en unueca perceptado, tiam ne logus nin la plezuroj aŭ la turmentoj revivi malnovajn travivaĵojn.

Tiuj ĉi malnovaj spertoj reaperas kaj altiras nian koncentritan atenton (kaj eĉ transformiĝas en obsedojn), ĉar oni ne vivis ilin komplete en unueca perceptado je ilia ĝusta momento.

**B)**

Sintezo. Estas formo de koncentrita aŭ intenca atento, kiu altiras ĉiujn partojn en tuton. La unueca perceptado kontaktiĝas kun tutaĵo, en kiu la partoj estas jam spontane kunaj. Kiam la unueca perceptado estas en kontakto kun unu parto, tiu ĉi simpla fakto estas jam rekonstruanta la tutaĵon.

Psikoterapeŭtikaj sintenoj. Foje ekzistas implicita akordo inter paciento kaj terapeŭto por ne ĝeni sin reciproke.

Tiu ĉi akordo prezentas diversajn formojn, kiel, ekzemple la eskapon al tio, kion la paciento kredas sano. Tio ĉi estas maniero peti de la terapeŭto : "Ne ĝenu min, doktoro".

La neŭroza kunlaboro implicas la mesaĝon : "Mi faros kion vi diros al mi, se vi lasos min trankvila en mia horizontala konflikto".

La neŭroza sukceso implicas la mesaĝon : "Doktoro, mi estas pli bone ol vi, malgraŭ ke mi ne komprenas vian faman unuecan perceptadon".

Memvideble, ĉiuj ĉi estas sintenoj, por ke oni ne "ĝenu" lin. La fakto kredi, ke oni lin ĝenas, estas eksterigo de la timo moviĝi ene de la totala movo de la unueca perceptado sen gvidpunktoj ideologiaj, emociaj aŭ spactempaj.

Timo pli malgranda, sed ankaŭ signifoplena, estas la timo esti etikedita aŭ diagnozita. Tiu ĉi timo estas relative facile venkebla ; male la timo al la unueca perceptado estas kiel la timo al la morto, ĉar ĝi implicas - parte - la psikologian malligitecon de la koncepto pri "identeco" aŭ "mio" (kiu estas tio, kio mi kredas esti, aŭ tio nura, kio mi kredas esti).

Eĉ la serioza terapeŭto, kiu penas kompreni la Kariopsikologion (holokinetikan Psikologion), povas fine foreviti sian respondecon, kiu estas la reliefigo de la unueca perceptado, per asertoj similaj al tiu ĉi : "Unue necesas ordigi aŭ klarigi nian penson (la procezon META), t.e. la memorenhavojn, ĉu konajn, ĉu emociajn, kaj nur poste emfazi la unuecan perceptadon".

Tiuj ĉi terapeŭtoj ankoraŭ ne komprenis, ke same kiel la rimedo estas la celoj. Tiuj ĉi terapeŭtoj povas ŭzi la hipnoton, la **biofeedback**-n, la transcendan meditado kaj aliajn konduktajn teknikojn, la kompromisan analizon, la psikanalizon, la gestaltan psikoterapion kaj diversajn formojn de grupaj terapioj, kiuj laboras per la metodoj de tiuj aŭ aliaj disciplinoj.

Tiamaniere, ili ne ĉesos moviĝi en la kampo de la enhavoj, eĉ kiam ili "sukcesas" kaj ordigas aŭ klarigas fragmente kelkajn el ili.

La psikoterapeŭto, kiu komprenas la valoron de la unueca perceptado, ne perdos sian tempon nek la tempon de sia paciento. Lia emfazo estos sur la unueca perceptado. Tio ĉi estas kariopsikoterapio aŭ psikoterapio holokinetika.

La unueca perceptado nepre alportos sian totalan ordon al la diversaj konaj kaj emociaj enhavoj de la memoro, kaj krom tio ĝi estos la plej grava faktoro de organisma regenerado.

La generanta demando : Kio estas la mio ? Se vi vin demandas, sole aŭ kun bona amiko (ankaŭ serioza kaj kvieta) : "Kio estas mi ?" aŭ "Kio estas la mio?", vi povos respondi per senfina kvanto da enhavoj konaj aŭ emociaj, akompanataj aŭ ne per serio da biologiaj reagoj percepteblaj aŭ ne.

Sed tio, kio plej bone povus okazi al vi, estas, ke vi restas perpleksa antaŭ la demando mem, tute nekapabla respondi ĝin. De tiu ĉi perplekseco (senenhava) povas ekaperi la unueca perceptado, grandaj silento kaj kvieteco kreivaj.

La unueca perceptado estas tio, kio sole gravas en la vivo, ĉar krom ĝi ne ekzistas kontakto kun la realo kaj la personoj.

# SKEMA KOMPARO.

## INFLUO DE LA NUNTEMPA SCIENCA REVOLUCIO SUR PSIKOLOGIO KAJ EDUKADO

### Antaŭa paradigmo

1. La realo estas la aĵo (**res**), pri kiu vi povas pensi. Io, kion oni povas imagi ; la kaŭzo aŭ la konsekvenco de ideo.
2. Ĝi baziĝas sur la interrespondo inter percepto kaj objekto (aŭ objekto kaj bildo). Ĝi uzas la karteziajn koordinatojn, pro tio, ke la tempo kaj la spaco estas konceptoj necesaj por kompreni la materion kaj la energion. Ekzemplo de instrumento: la lenso.
3. Ĝi priskribas disigitajn aferojn kaj ilian ŝanĝon en la tempo. Ĝi antaŭdiras okazaĵojn. Ĝi iras de la parto al la tuto (karteziaj principoj).
4. Ekzemplo : la danco kaj la dancisto estas disigitaj konceptoj.
5. Ĝi akceptas la ekzistadon de disigo inter la observanto kaj la observataĵo (horizontala konflikto). La observataĵo povas esti io psikologia aŭ io objekta.

### \* Nova paradigmo

1. La realo estas tio, kio estas. Oni ne povas ĝin imagi. Ĉiu priskribo iĝas neakordigebla kun tio, kion oni deziras diri aŭ komprenigi.
2. Ĝi baziĝas sur la rekonstituado de la konduto de subatomaj partikloj kaj sistemoj nerekte observeblaj ("kaŝitaj variabloj"), kiel la ordo implicita en la koncepto pri holokinetiko de David Bohm. Tempo kaj spaco ne gravas por kompreni la movojn de la materio kaj la energio.  
Ekzemplo de instrumento : la hologramo.
3. Ĝi priskribas la statistikan konduton de sistemoj aŭ ordoj en Fiziiko (ekzemple : la movo inter ondo implicita kaj eksplikita). Ĝi antaŭdiras kontingencojn aŭ statistikajn probablecojn, ekzemple la **karyon** aŭ "mensa kerno" kiel kontingenco de la unueca perceptado.  
Teoremo de Bell, 1964.  
Eksperimento de Clauser-Fredman.  
Ĝi iras de la tuto al la parto (holokinetiko de David Bohm)
4. Ekzemplo : la danco kaj la dancisto estas unu sama aĵo, en la ago de la danco.
5. Ĝi ebligas la integriĝon de la observanto kun iu implicita ordo, de kiu ekaperas ankaŭ la observataĵo. (Kerna aŭ cirkla konscio en Kariopsikologio).

6. Ni povas observi ion, ne ŝanĝ-  
ante ĝin.

6. La observado estas movo, kiu  
partoprenas en la senĉesa movo  
de tio observata.

Holokinetiko de Bohm.

Epsitemologio de

Jean Piaget : → "La observanto  
Teksto de → kreas  
Rorschach : → la realon"  
Sinkroneco de →  
C. Jung : →

7. Determinismo : tio, kio  
estas, estas determinata far :  
a) alia aĵo (disigita), kiu estas,  
aŭ far b) io, kio estis.

7. Metadeterminismo : "nur povas  
esti, kio estas".

La libervolo estas alia iluzio de  
la "mio" : se la "mio" fakte mov-  
iĝas kune kun tio, kion oni obser-  
vas, sur kion oni havas la liber-  
volon ?

8. Kompreni tion ĉi postulas la  
konscion linian, polaran  
aŭ procezon mnemonikan-eide-  
tikan (logikan kaj racian).  
Ekzistas nelogika aŭ malracia  
formo de la mnemonika pro-  
cezo.

Esenco de la percepta distordo  
kaj deveno de ĉiu konflikto.

Horizontala konflikto : la dis-

igo, kiun faras la "mio"

a) de ĉiu klasifikado, nomo aŭ  
difino pri si mem,

b) tiel, kiel de ĉiu realaĵo,  
al kiu tiu "mio" rilatas kiel  
observanto.

8. Kompreni tion ĉi postulas apartan  
formon de supraracia inteligent-  
eco (kiu diferencas de tio racia  
kaj de tio malracia), kiun en  
Kariopsikologio ni nomas unueca  
perceptado, kaj kiu implicas mal-  
saman kontaktotipon kun la realo.  
La realo, rigardata kiel "tio, kio  
ĝi estas" kaj ne kiel "io, pri kio  
vi povas pensi".

La kontingenco de la unueca  
perceptado estas la kerno aŭ  
**karyon** : kontakto kun tio,  
kio estas, kun minimuma distordo.

Ni prezentas nun tri opiniojn - tiujn de psikologo, mistik-  
ulo kaj fizikisto, rilate tion supre diritan :

Carl Jung (psikologo) : "Kiam individuo ne ekkonscias pri  
siaj internaj paradoksoj aŭ kontraŭdiroj, vole-nevole la  
mondo devas esprimi tiun konflikton kaj dividiĝi en du  
kontraŭajn duonojn".

Francisko de Asizo (mistikulo) : "Tio, kion ni rigardas,  
estas tio, kio rigardas".



John Wheeler (fizikisto) : "Ĉu povas la universo esti stranga-  
maniere enportita en la realon pere de la partoprenado de  
la observanto en tiu realo ?"

En la nova edukado ni observas jenajn influojn de ĉio, kion  
ni konsideris ĝis nun :

### Antaŭa paradigmo

1. Emfazo sur tio lernita  
Ĝustaj respondoj.
2. Tiel lernita, kiel memoro aŭ  
plano (vojaĝo kun celo). Helpi  
la mondon kaj la homaron.
3. Persona aŭtoritato kaj hie-  
rarkioj. Protagonistoj, kiuj  
(nepre) determinas antagonist-  
ojn. Maldekstra kaj dekstra.  
Persona intereso kontraŭ  
komuna kaj nacia intereso.
4. Premioj kaj punoj. Emfazo sur  
la kondiĉita konduto.
5. "Sana menso en sana korpo"  
Fizikaj ekzercoj unu-dufoje  
ĉiusemajne.
6. Kondiĉita konduto. Procezo  
mnemonika-eidetika (linia  
konscio). La realo estas tio,  
pri kio oni povas pensi.
7. Efikeco, sukceso, konkuremo  
reciproka. Fari ion pli bone  
ol la aliaj.
8. Dividado de lernantoj laŭaĝe  
en fermitaj klasoj.
9. Determinismo. Kartezi ordo  
spactempa. Neŭtona meĥanismo
10. Eksploatado de la naturo.  
Nacia konscienco.

### Nova paradigmo

- \* 1. Emfazo sur la "lernado lerni" aŭ  
"iompostiome lerni".  
Ĝustaj demandoj.
2. Lernado kiel procezo (aŭ movo)  
sen deveno kaj sen celo.  
Esti unu kun la mondo kaj  
la homaro.
3. Individua aŭtonomeco kaj parto-  
prenita kondukado (ĉu rotacia?).  
Sinergio sen protagonistoj kaj sen  
antagonistoj. Eklektita transcen-  
denco de la polarecoj.  
Identigo de la bonstatoj individua  
kaj kolektiva.
4. Individua respondeco. Emfazo sur  
la kompreno de la horizontala  
konflikto.
5. Ne estas disigo inter menso kaj  
korpo. Fizikaj ekzercoj ĉiutage.
6. Konduto spontana, inteligenta,  
parto de la unueca perceptado  
(triangula konscio).  
La realo estas tio, kio estas.
7. Kunlaboro kaj individua kompetent-  
eco. Fari ĉion bone.
8. Dividado de lernantoj laŭ intereso  
kaj plenumado en malfermitaj  
grupoj.
9. Metadeterminismo. Netempa ordo.  
Sinkroneco de C. Jung. Holokine-  
tiko de D. Bohm.
10. Ekologia ekvilibro kun la naturo.  
Planeda konscienco.

11. Emfazo sur la teknologio, aŭdovidaj rimedoj, komputiloj kaj cetero.
12. Stimulado de la obeemo (" submetado "). Decidoj aŭtoritatemaj kaj protektemaj.
13. Amasa instruado. Pli ol 20 lernantoj en ĉiu klaso.
14. Burokrata administrado : direktoro aŭ ĉefo kaj instruistoj.
15. Emfazo sur administraj reformoj.
16. Edukado vidata fragmente, limigita de siaj celoj, de sia kronologio (6-17 aĝo), kaj far la lernejo kiel centro, kie ĝi estas disdonata kaj ricevata.
17. Instruisto instruas ses horojn ĉiutage.
18. Atingi certecon (neŭtona Fiziko, meĥanismo, atomismo, teorio pri la loka realismo).
11. Uzado de la eduka teknologio, sed pli emfazante la amikecon kaj la kunlaboron inter gepatroj, instruistoj kaj lernantoj.
12. Stimulado de la obeemo ("malfermo"). Malsamaj opinioj, serĉado de alternativoj kaj supozoj. Kapablo imagi sin ĉe la flanko de aliaj.
13. Individua instruado. Ne pli ol 10 lernantoj en ĉiu klaso.
14. Grupa administrado fare de gepatroj kaj instruistoj, kun konsultado al diversaj spertuloj pri iliaj specialaj fakoj. Partopreno, en la administra grupo, de lernantar-representantoj kun voĉo kaj sen voĉdonrajto. La infano tiel lernas administri pere de rekta sperto en la administrado. Edukado integrita kun la sperto.
15. Emfazo sur la unueca perceptado (Individua transformiĝo de la konscio : kompreno kaj transcendo de la horizontala konflikto).
16. Edukado vidata ĝenerale kaj integrite kun la resto de la ekzistado, kiel procezo sen komenco kaj sen fino, kiu finiĝas nur pro la morto de la individuo, kaj okazas ĉie kaj ĉiam.
17. Instruisto instruas kaj lernas senĉese.
18. Kompreni paradoksojn (Kvantum-mekaniko, teoremo de Bell, holokinetiko de Bohm). Ĉar ni estas paradoksaj individuoj ene de paradoksa medio, ni revas pri la kreado de homo kaj socio koheraj en sia respondecado vivi en senĉesa transformiĝo ene de

mensa stato de alta kaj daŭra atento. Atento, kies esencan gravecon oni rapide komprenas, kaj tiam ĝi iĝas neintenca, kaj okazas tute senpene, eĉ dum la dormo.

La menso estas ne nur procezo rezultanta de la rilato inter iu organismo kaj ties medio, sed ankaŭ reflektado de la baza aŭ substanca organizo de la universo.

## KONSILATAJ LEGAĴOJ

Ni rekomendas, pro ilia aparta graveco, la verkojn de J. Krishnamurti, troveblajn en sia originala angla versio en libroj, sonbendoj kaj vidbendoj, kaj parte tradukitajn hispanen. Speciale, **The awakening of Intelligence**, San-Francisko, Harper & Row, 1973 ; hispana versio : **El despertar de la inteligencia** (vol. I, **La raíz del conflicto** ; vol. II, **La persecución del placer** ; vol. III, **La conciencia fragmentada**), Bonaero, Paidós, 1976-1977.

Oni povas atingi informojn pri la verkoj de tiu ĉi aŭtoro: angle, el la Krishnamurti Foundation, P.O. Box 216, Ojai, Kalifornio 93023, Usono ; hispane, el la Fundacion Krishnamurti Hispanoamericana, P.O. Box 1782, Hato Ray Station, San Juan, Porto-Riko 00919.

# INDEKSO

<b>ENKONDUKO.</b> Kio estas la menso ?	4
<b>Ĉapitro I. LA UNUA PARADIGMO EN PSIKOLOGIO</b>	5
La nova paradigmo en Psikologio	6
Diferencoj inter ambaŭ	8
Skema prezentado de la mensmodelo	10
Redifino de "menso"	13
<b>Ĉapitro II. LA PROCEZO META</b>	17
Originoj de la problemo (memoro kontraŭ perceptado) = filogeneza memoro	18
Memoro de la dormoj	18
Atento	19
Cerbo, <b>eidetos</b> , ideo, bildo kaj komparo	19
Emocio kaj memoro	20
Neŭrokirurgio kaj tempia epilepsio	<b>20</b>
Memoro sen stimulo kaj pseŭdomemoro pro la stimulo	21
Penso, fermitaj cirkloj kaj iluzio	21
Anekdoto, komentario pri la <b>déjà-vu</b>	22
La mio : parto kaj produkto de la procezo META	23
Mio, tempo kaj kaŭzeco (Piaget kaj Einstein)	27
Unueca perceptado kaj triangula konscio	30
Unueca interrilato	32
Disciplino kaj obeado	33
Meta kaj META : klarigo pri signifoj	34
<b>Ĉapitro III. LA MNEMONIKA DUALECO. CELO, KONTRAŬSTARO KAJ FRAGMENTADO</b>	35
Lingvo kaj dualeco	36
Disvolvado de la dualeco	37
La menso kiel <b>continuum</b>	<b>40</b>
Kvar gradoj de neŭrona integriĝo (mensa taksio)	41
Holosintaksio kaj cirkla konscio	43
La nova paradigmo	44
Demandoj kaj respondoj	47
<b>Ĉapitro IV. DIFERENCAJ NEŬROFIZIOLOGIAJ AŬ MENSAJ STATOJ. DORMO KAJ MALDORMO</b>	51
Ĉu la penso estas iu formo de hipnoto?	53
Ni faru du gravajn demandojn	54
Noktaj teruroj	57

<b>Ĉapitro V. EBLA HISTORIO DE LA NOVA PSIKOLOGIA PARADIGMO</b>	59
Fundamentoj en Fiziko	60
La hologramo kaj la universo holografie rigardata	63
Interrespondo kaj ĝia foresto inter la objekto kaj la bildo	67
La universo : implicita ordo kaj manifestiĝinta ordo	69
<b>Ĉapitro VI. LA KONCEPTO PRI HOLOKINETIKO DE DAVID BOHM</b>	73
Unuecaj perceptado kaj rilato (implicita ordo en centripetaj kaj centrifugaj movoj)	74
Unueca perceptado kaj meditado	76
Rimarkigo pri la ordo	78
Kvantunteorio ; antaŭdiro kaj strukturo de la realo ; Teorio pri la loka realismo. Tri premisoj	79
<b>Ĉapitro VII. DEMANDOJ KAJ RIMARKIGOJ</b>	85
1. La triangula konscio en tiu ĉi prelego	85
2. Pensado senpenso	86
3. La funkcio de la Psikiatrio	87
4. Futurologio kaj unueca perceptado	88
5. Universitataj diskutoj pri Astrologio	90
6. Kariopsikologio kaj Metapsikiatrio	96
7. Kariopsikologio kaj Antipsikiatrio	97
8. La Skinner-a kondiĉado	98
9. Kerna stato kaj identiĝo	99
10. La neŭrono kaj la mio	100
11. La kompleta homo	101
12. La inteligenteco	102
13. Konflikto kaj nekonsciaj kaŭzoj	103
14. Kariopsikoterapio	104
15. Psikoterapio kaj socia adaptiĝo	105
16. Drogaj kaj kerna stato	105
17. Transcenda meditado kaj kerno	106
18. La kerna stato kaj ĝia efiko sur la agado	108
19. La celo de la vivo	108
20. Hipnoto	109
21. Malkondiĉado de la menso	109
22. La loko de Dio en la Kariopsikologio	110
La pano, la ŝtono, la akvo kaj la vino	112
Ŝlosilo por la signifo de la Biblio	117
La interpretoj. Tradukproblemoj	123

La kondiĉoj por legi : seriozeco, tempo kaj penetremo	125
La homo kaj Dio	127
Kelkaj ekzemploj	129
Esti suna homo	131

## **APENDICO. BAZAJ FAKTOROJ EN PSIKOTERAPIO**

	179
Individua interparolo	187
Interparolo kun studentino de Psikologio	191
Homostato, homodinamiko kaj totala movo	198
Enhavo, procezo kaj movo	200
Konduki estas "sekvi la procezon"	203
Ŝanĝiĝi estas "moviĝi kun la movo"	203
Ideo kontraŭ percepto	204
Dialogo pri la movo de la identeco	204
Dialogo pri la meditado	210
La naturo de la memkontraŭdiro	222
Difino pri paradokso	222
Konaj paradoksoj	222
Eksperimentaj paradoksoj	222
Konduktaj paradoksoj	224
Emociaj paradoksoj	224
Sociaj paradoksoj	225
Terapeutikaj paradoksoj	226
La naturo de la paradokso	226
Tio, kio la unueca perceptado ne estas	230
Koncentriĝo	244
Skema komparo. Influo de la nuntempa scienca revolucio sur Psikologio kaj edukado	247
Konsilataj legaĵoj	251
<b>INDEKSO</b>	253
<b>NOTOJ.</b> Notoj de la aŭtoro.	257
Notoj de la tradukistoj	257

NOTOJ DE LA AŬTORO

1. (paĝo 51) : Resumo de trihora dialogo kun kuracistoj staĝantaj en Universitato de Miami (majo 1978).
2. (p. 57) : Vidu ĉap. II, paĝoj 20-21.
1. (p. 85) : La demandoj inkluzivitaj en tiu ĉi ĉapitro estis formulataj dum la prelegoj kaj dialogoj de la aŭtoro en diversaj universitatoj de Usono, Eŭropo kaj Latin-ameriko.
2. (p. 93) : Vidu kion ni diras pri la dormo kaj la maldormo en la ĉap. IV de tiu ĉi verko.
3. (p.101) : Vd. la diskuton pri dormo en la ĉap. IV ĉi-verke.
4. (p.102) : Vd. "Rimarkigo pri la ordo" en la ĉap. VI ĉi-verke.
5. (p.109) : Vd. "Ĉu estas la penso iu formo de hipnoto?" en la ĉap. IV ĉi-verke.
6. (p.120) : Spirita kaj intelekta por Guenon estas rilatitaj vortoj.
7. (p.161) : Vd. la ĉap. II.
1. (p.179) : Prelego eldirita en la Seminario de Teoriaj Aferoj de la Antaŭgradegintoj, California School of Professional Psychology, Fresno, Kalifornio, 13. Dec. 1979.
2. (p.204) : Vd. malsupre, sur paĝo 222.
3. (p.214) : Vd. malsupre, sur paĝo 230.
4. (p.234) : Inkluzivita en nia nova preparata libro **Notoj kaj dialogoj pri la nova Psikologio.**
5. (p.241) : same kiel noto 4 de p.234.
6. (p.244) : Vd. supre, sur paĝo 187.

NOTOJ DE LA TRADUKISTOJ

- (1)(p. 3) : Grekdevena vorto signifanta "kerno, nukleo", kaj de kiu devenas la vorto Kariopsikologio kc.
- (2)(p. 7) : cirklo en kiu planedo moviĝas, kaj kiu havas centron, kiu mem estas ruligita samtempe sur la cirkonferenco de pli larĝa cirklo.
- (3)(p. 7) : Angle en la originalo.
- (4)(p. 8) : Grekdevena vorto rilata al la kapablo transformi en ideojn la okazaĵojn kaj objektojn viditajn.
- (5)(p. 8) : Grekdevena vorto signifanta "rilata al la emocio".
- (6)(p. 8) : Anglismo uzata de la aŭtoro anstataŭ "aŭtonoma", kiun li uzas en la esprimo "aŭtonoma nerva sistemo".
- (7)(p. 9) : Grekdevena vorto ("meta" : trans ; "nous" : penso).
- (8)(p.14) : "Nosologio" : branĉo de medicino, kiu traktas la klasigon de malsanoj.

- (9)(p.18) : Esperante, "memoro".
- (10)(p.18) : Relative stabila stato de ekvilibro inter malsamaj sed interdependaj elementoj aŭ aroj da elementoj en unu organismo.
- (11)(p.20) : Hipokampo : longa kurba bordo, kiu etendiĝas sur la surfaco de la malsuprenirinta korno de ĉiu latera cerba ventriklo, kaj kiu konsistas el griza materio, kovrita en la ventrikla surfaco per blanka materio.
- (12)(p.21) : (deveninta el la latina "limbus) : subkorteksaj strukturoj de la cerbo rilatigitaj al la emocio kaj al la motiviĝo.
- (13)(p.24) : Teorio asertanta, ke la disvolviĝo komenciĝas per unu ĉelo kaj konsistas en la formigo kaj aldono sinsekvaj de novaj partoj ne antaŭekzistantaj en la fekundigita ovo.
- (14)(p.25) : Hispane "reflexión".
- (15)(p.34) : Hispanlingve "meta" signifas "celon".
- (16)(p.41) : Interjekcio uzata hispanlingve ankaŭ por saluti.
- (17)(p.47) : Hispane "efáptico".
- (18)(p.51) : "miografo" (greke : **mys, myos** signifas "muskolon" ; **grapho**, "grafikon"). Instrumento por studi, per elektraj malŝarĝoj, la muskolan kuntiron.
- (19)(p.56) : Fenola amino, kiu estas potenca vazo-ĉirkaŭstreĉanto ; ĝi troviĝas ĉefe en la sanga sero kaj en la gastraj mukozo de mamuloj.
- (20)(p.62) : Hipoteza ŝanĝo ĉe la neŭra histo, supozita por ekspliki la daŭradon de la memoro.
- (21)(p.64) : Esperante, "manufaktur".
- (22)(p.80) : "Akusmatiko" (greke **akousma** = io aŭskultita) : skolo de la disĉiploj de Pitagoro, al kiuj oni ne permesis vidi aŭ aŭdi la filozofon, sed nur malantaŭ kurteno kaj silente. Post kvin jaroj ili estis akceptitaj ĉe la lecionoj antaŭ la instruanto.
- (23)(p.88) : (Greke : **iatros** = kuracado) ; kaŭzita nerimarkite far la kuracisto aŭ la kuracado.
- (24)(p.90) : Holismo (greke, **holos** = "tuto") : teorio subtenanta, ke la universo kaj precipe la vivanta naturo, estas ĝuste rigardata kiel interagantaj tutoj (nome vivantaj organismoj), kiuj estas pli ol la nura sumo de la elementaj partetoj.
- (25)(p.112) : Grekdevena vorto (**anomos** = "senleĝa") signifanta "staton de socio kie mankas kondut- kaj kred-normoj" kaj ankaŭ "staton de individuo, karakterizitan de konfuziĝo, anksieco kaj izoliĝo".



- (26)(p.112) : Greke : **demos** = "popolo" ; **thanatos** = "morto".
- (27)(p.112) : Greke, **kryptos** = "kripta, kaŝita" ; **kratos** = "reĝimo, povo".
- (28)(p.114) : Dekstra : hispane "derecho", signifas en la hispana lingvo : dekstra, rekte, rajto, justa.
- (29)(p.120) : El la greka lingvo, **ennea** = naŭ.
- (30)(p.142) : (**a** = ne + greka **nosos** = malsano + greka **gnosis** = kono) ; perdo de la kapablo konscii, ke oni suferas malsanon aŭ fizikan difekton.
- (31)(p.153) : kapablo partopreni en la ideoj kaj sentoj de aliulo (greke, **pathos** = sufero, sperto, emocio).
- (32)(p.164) : Greke, **glia** = gluo ; histo por subtenado intermiksita kun esencaj elementoj de la nerva histo.
- (33)(p.168) : Neebleco teni sin sidanta. Okazas al kelkaj mens-malsanuloj kaj karakteriziĝas per tio, ke la individuo saltas sur la seĝo kaj faras konvulsiojn.
- (34)(p.176) : Potenca antagonisto ( $C_{19} H_{21} NO_4$ ) de la narkotaj drogoj, kaj precipe dela morfino.
- (35)(p.192) : Germandevena vorto (**Gestalt** = formo).
- (36)(p.194) : Id : unu el la tri dividoj de la psiko en la psikanaliza teorio. Ĝi estas tute nekonscia kaj estas la fonto de la psika energio deveninta de la instinktaj necesoj kaj impulsoj.
- (37)(p.213) : Greke, **ataraxia** = kvieteco, ekvilibro.
- (38)(p.233) : Vorto, kiu aludas la dormemon antaŭ la dormo ; greke, **hypn** = dormo, **agōgos** = direkti, inklinigi.
- (39)(p.233) : Rilata al la senkonscieco antaŭ la vekigo ; greke, **hypn** = dormo, **pompē** = ago sendi, eskorti.

